VÍCTOR CATALÀ

SOLEDAD

ROMANO



KOREKTOJ

Paĝo	*Linio*	*Anstataŭ*	*Devas diri*
12	4	helpa	internacia
21	23	stampfiante	stampfante
29	5	tranvile	trankvile
64	3	sparta	esparta
73	4	fenda	fendita
85	5	irante aŭ	irante al aŭ
104	19	Dipatrinon	Dipatrino
»	13 ms	sorĉistino!	sorĉistino! —
110	2 ms	ĝi	ŝi
117	13 ms	kaj superbele	kaj estis superbele
119	8	una	unua
120	3-2 ms	ankaŭ ne ŝajnis al ŝi	ŝi ankaŭ ne konsideris sufiĉe
122	16	riverancataj	riverencataj
139	8	horo	horon
»	3 ms	brovokuntiriĝinta	brovokuntirinta
144	19	ŝtonigintaj	ŝtoniĝintaj
166	10	lia torturo - lia sinofero	sia torturo - sia sinofero
»	11 ms	grego	grego,
171	4	sia	ŝia
173	5	forpreni	repreni
175	1	Antaŭ ol	Antaŭ
179	18	duono da	duono de
197	1-2	konstantinta	konstatinta
»	18	sia	ŝia
215	4 ms	ko e	kore
225	1	ĝia	sia
227	1 ms	lia	sia
239	5-4 ms	kaj ankaŭ Matio denove forestanta,	kaj dum Matio estis ankaŭ denove forestanta,
243	19	ĉu	se
258	10 ms	siaj	ŝiaj
276	6	siaj	ŝiaj
»	14	ĝin trairante,	kiam ŝi ĝin trairis,

R-49

1944

VÍCTOR CATALÀ

el la "Regâ Akademio de Beletristiko" de Barcelona

SOLECO

Romano

Premio Fastenrath en 1909

Tradukis el la kataluna lingvo

JOSEP VENTURA I FREIXAS

Antaŭparolo de Josep Miracle

Ilustrâjoj de Alexandre Coll

1967

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Depósito Legal B. 32.300 - 1967

Presis:

TALLERES GRÁFICOS HOSTENCH, S. A. - Córcega, 231 - 233 - BARCELONA

PORTRETO de la vizito, kiun la tradukinto faris al la aŭtorino de "Soleco" la 6-an de julio 1959 en ŝia restadejo de La Escala, vilaĝo de la Klifa Marbordo en la provinco Girona.

Ĉeestis ŝia fratino Amèlia (stare), la aŭtorino, la tradukinto kaj lia filo Manuel, kiu fotografis.

Estas rimarkinde, ke la aŭtorino, almenaŭ en la lastaj ok jaroj de sia vivo, akceptis la vizitantojn enlitiĝinte. Ŝi tion faris ne pro malsano sed, ŝajne, pro prudento, kiun ŝi devis adopti, ĉar ŝi estis multaĝa.

Caterina Albert i Paradís — nia aŭtorino —, kiu ĉiam subskribis siajn verkojn per la pseŭdonimo Víctor Català, naskiĝis la 11-an de septembro 1869 en La Escala mem, kaj antaŭ nelonge — la 27-an de januaro 1966 — ŝi bedaŭrinde mortis tie, atinginte la aĝon de 96 jaroj kaj ĉe la zenito de sia verkistina gloro.

KLARIGOJ

"Soleco" — laŭ eminenta enlanda publicisto — "estas granda, senkompara libro de poezio, kiu reale havas tri kulminajn, esencajn rolulojn rigardatajn kiel herooj de la agado: Mila — la ermitino —, la Paŝtisto kaj alia, nehoma: la alta montaro. Tamen — li diras — necesas aldoni ankoraŭ kvaran rolulon: la Spektro, la malbonsigna servanto de la destino, personigo de la mallumaj fortoj de la naturo, kies valoro kaj misio estas puŝi antaŭen kaj rulfaligi la draman agadon en la abismon de la tragedio".

Legante la romanon en ĝia originala lingvo, oni rimarkas, ke la aŭtorino igas la Paŝtiston paroli "ian dialektan lingvaĵon, kiu, konsidere al lia mensostato de primitiva homo, produktas ĉe li grandan esprimforton. Tiu lingvaĵo havigas al ni la sensacion, ke ĝi estas viva kaj ekzotika dialekto, fidele kolektita de la aŭtorino el la lipoj mem de la montara popolo. Ni ja ne atente studis tiun ĉi pitoreskan parolon de la Paŝtisto. Sed ni ne kredas erari se ni deklaras, ke, verŝajne, ni troviĝas antaŭ simpla kaj genia kreaĵo de la aŭtorino. Tamen, ni ne intencas esprimi, ke en tiu ĉi kurioza dialekto ne ekzistas multenombraj vortoj kaj esprimoj rekte ĉerpitaj el la popola parolo en iu difinita regiono. Kaj ni precizigas, ke ni distingas en ĝi elementojn el la dialektoj empordana (1) kaj rusiljona (2). Sed la tuto de tiu dialekto donas al ni la impre-

(1) Empordano = Regiono situanta en la nordorienta parto de Katalunujo.
(2) Rusiljono = Regiono kaj antikva kataluna graflando — hodiaŭ apartenanta al Francujo —, situanta inter la Valjespiro kaj Konflento, — ankaŭ du antikvaj, katalunaj graflandoj kaj ankaŭ nun apartenantaj al Francujo —, kaj la Mediteraneo, kies ĉefurbo estas Perpignan.

son de sprita amalgamo de dialektaj formoj diversdevenaj, al kiuj sukcesis komuniki unuecon de karaktero la genia kreinstinkto de nia verkistino".

Esperanto feliĉe ankoraŭ ne havas iuspecan dialekton — kaj estas dezirinde, ke tiaj lingvoformoj neniam entrudiĝu en ĝin —, ĉar kvankam la dialektoj foje prezentiĝas bonmaniere kaj eĉ agrable, tamen, laŭlonge de la tempo, ili minacas la fundamenton de la lingvo, kiu lasis sin invadi de ili, dum ĝiaj adorantoj, absorbitaj en la antaŭjuĝoj kaj malkonkordoj, kiuj regas la mondon, ne kuraĝas kontraŭstari la ĉiam pli vastiĝantan hegemonion de la dialektoj, kiuj fine produktas la dekadencon de la lingvo.

Esperanto, do, ne havas dialekton. Tial, por traduki la lingvaĵon kiun uzas la Paŝtisto en "Soleco", mi ne havis alian rimedon ol traduki normale. Tiujn ĉi klarigojn mi kredis necese fari nun, antaŭ ol la leganto penetros en la paĝojn de la romano.

. . . . . .

DANKO

Sinceran dankon mi esprimas al mia kara amiko, fondinto de "Heroldo de Esperanto" kaj eminenta s-ano Teo Jung, membro de la Akademio de Esperanto, kiu, okaze de vizito al sia fratino loĝanta en Barcelona, speciale venis por unu semajno al Terrassa, por priparoli kun mi la tradukon de "Soleco" kaj doni valorajn konsilojn.

. . . . . .

DEDIĈO

Tiun ĉi version de "Soleco" mi varme dediĉas al miaj karaj edzino kaj gefiloj.

La tradukinto.

ANTAŬPAROLO

LA GLORO DE "SOLECO"

Komence mi diru jenon: kiam tiu ĉi libro eliros al la strato, tute bonodora ankoraŭ de la presa inko, *Soleco* jam estos atinginta la aĝon de sesdek jaroj. Tio ja ne signifas, ke ĝi estas maljuna romano: ĝuste la fakto, ke ĝi akiris multjarecon, pruvas kaj esprimas, ke *Soleco* estas romano, kiu ne maljuniĝas. Al multego da aliaj okazis ekzakte la malo.

Vivi longajn jarojn ne maljuniĝante, ja estas blazono de gloro; kaj, en literaturo kaj ĝenerale en la artoj, la maksimuma aspiro. Plej ofte oni sukcesas atingi tion je malrapidega ritmo, kiel rezulto de sedimenta laboro; tre malofte tio okazas inverse. Tial decas substreki, kiel eksterordinaran, la sukceson de *Soleco*: ĝi estis spektakla: unu el la plej spektaklaj, kiujn oni iam registris en la historio de la kataluna prozo. Kaj la evento, ke ĝi atingis tian aĝon, klare signifas, ke la iniciata sukceso de *Soleco* ja ne estis rabotaĵa fajro (nedaŭraĵo), nek rezulto de propagando, nek ekzemplo de modo, nek iu el tiuj aferoj, kiuj pentras per fosforeska purpurpulvoro la fulmajn kaj blindigajn glorojn efemerajn.

Oni povas aserti, ke la iniciata sukceso de *Soleco*, kiu estis egala al tiu de la verkoj vokitaj al la daŭreco — la sesdek jaroj kaj la sekvontaj —, fariĝis per si mem, kaj ĝi grandiĝis kaj ŝvelis kiel balono, laŭmezure kiel la paĝoj de la romano alvenis al la publiko, faldfolio post faldfolio, kajero post kajero. Longe antaŭ ol alveni al la lasta paĝo, la amaso

da legantoj jam estis ununura flamo de entuziasmo, ekscitita dank' al la simpleco kaj esprimforto de la prozo de Víctor Català. Ĉapitron post ĉapitro, oni sukcesis atingi, ne la sensacion, sed la certecon ĉeesti la naskiĝon de verko, kiu multe honorigos Katalunujon kaj kiu plenlarĝe malfermos la pordojn de la senmorteco al tiu "diletantino" el La Escala, kiu deziris sin kaŝi sub la robo de virseksa pseŭdonimo: Caterina Albert i Paradís, "Víctor Català".

Kie ajn oni legos tiujn ĉi paĝojn, eble surprizos iamaniere, ke verkon, kiu havas tian amplekson oni publikigis laŭ apartaj kajeroj. Tio estis afero de la epoko. Tiutempe, kaj en Katalunujo, literatura revuo publikigita katalunlingve, kaj kiu ne estus kreinta propran bibliotekon surbaze de suplemento apartigebla de la paĝoj de la publikigaĵo kaj bindebla en formo de libro, estus kaŭzinta tre malbonan efekton. Aliflanke, en tiu tempo, ankaŭ oni devis konsideri, ke la grandan plimulton el la aferoj literature gravaj en la lando, eĉ ekster la kadro de la periodaj revuoj, oni publikigis ankaŭ en la formo de kajeroj: ekzemple, la jarajn volumojn de la Floraj Ludoj. En tiu biblioteko mem, kie aperis *Soleco*, kaj ankaŭ en formo de literatura suplemento de la revuo, du altrangaj nomoj estis publikigintaj verkojn siajn antaŭ ol Víctor Català liveris la unuan ĉapitron de sia romano: Jacint Verdaguer, per "Aires del Montseny" (Ventetoj de la [monto] Montseny), kaj Joan Maragall, per "Les Disperses" (La disaj poemoj).

Soleco, en sia iniciato — kaj tiu ĉi estas alia aspekto de la eksterordinareco de ĝia sukceso — estis romano ne spontane fluinta el la cerbo de sia aŭtoro, sed verkita laŭ komisio kaj sub la tuta trudo de la komisio, de la devigo kaj de la fiksa dato. La komisio fontis el Lluís Via, la direktoro de "Joventut" (Juneco); kaj la tempo ekpasis, kaj finiĝis, kaj fariĝis angora, kaj devigis la aŭtorinon verki galope. Kiel en tiuj filmoj, en kiuj la savanta ago produktiĝas en la plej neverŝajna kaj lastega momento, kiam Lluís Via rekte eniris la vojon de malespero, la unuaj manuskriptaj kvartiloj (1) de *Soleco* ekalvenis al lia skribotablo. Víctor Català evidente pra-

(1) Kvartilo = Kvarona parto de faldfolio.

vis, kiam ŝi opiniis, ke tio ja ne estas verki, kaj ke, liveri literaturan verkon al la presejo ne lasinte al la aŭtoro eĉ la tempon por unu relego, estas atenci la dignon de la verkisto, kion neniu profesiulo akceptus. Sed Víctor Català ne sciis, ke ŝi, — tion esprimante per vortoj de Joan Maragall —, estis virino "tuŝita de la genia fulmo"; kaj, ĉar ŝi tia estis, tiu *Soleco*, kiun ŝi komencis verki galope, rezultis ŝia majstra verko.

Soleco estis anoncita kiel "montara romano", kaj oni ĝin ekpublikigis kiel felietonon de la revuo "Joventut" en la koncerna numero de la 19ª de majo 1904. La lasta el la kvardek ses faldfolioj aperis kun la numero de la 20ª de aprilo 1905. La kovrilo, desegnita de J. Triadó, dissendiĝis kun la sekvinta numero, tiu de la 4ª de majo. Mi jam menciis, ke la publiko atendis, kun certa avido, la lastajn faldfoliojn; do, ne surprizos, se mi diras, ke post dissendo de la lasta faldfolio, necesis tuj pensi pri dua eldono de *Soleco*, kiu aperis tiun jaron mem, 1905. La sukceso estis, do, fulma.

Romano kiel *Soleco*, kiu trenis la publikon dum la daŭro de ĝia publikigo kaj eĉ post ĝia publikigo, postulis fortavoke la tradukonton. Ankaŭ lin estus vokinta ĉiu el la ĉapitroj aparte, kiuj estas malgrandaj ĉefverkoj, ĉiuj ili kreintaj la majstran verkon, kia estas la kunaĵo. Kaj la tradukontoj ne malfruis por prezentiĝi; sed tute decas paroli plurale, ĉar ja ne estis unu, sed kvin, tiuj, kiuj volis ligi sian nomon al la jam glora nomo de Víctor Català: F. X. Garriga, kiu efektivigis version al la kastila lingvo; Marcel Robin, kiu tradukis *Solecon* al la franca; Eberhard Vogel, kiu faris senpekan tradukon germanan; Alfredo Giannini, kiu transigis la romanon al la itala kaj Maria Chitau Karmina, tradukinta la verkon al la rusa. Kvin idiomoj malsamaj inter si kaj ĉiu diferenca je tiu prilaborita de la fama verkistino; kvin ekzercoj, do, de adapto, ne en la senco de akordiĝo de la vortoj de unu lingvo kun la vortoj de alia, sed de adapto laŭ la maniero de esprimo, laŭ la maniero apliki la frazon fronte al la esprimeblo kaj al la plastikeco, portante al la sentemo de aliaj la sentemon katalunan. Konklude, la malfacila arto enfiksi la animon de popolo en tiun de alia popolo.

Kaj nun, ĝuste koincidante kun la sesdek jaroj de *Soleco*,

nova versio estas preta por voki la atenton de la mondo. De la mondo sen limoj, ĉar ĝi estas komprenita kiel ideala patrujo; tiu de la kunfrateco inter popoloj kaj rasoj, servita per la elokventeco de la helpa lingvo: Esperanto. Ni ŝuldas tiun eksterordinaran taskon al S-ro Josep Ventura i Freixas el Terrassa, kiu, dum pluraj jaroj, klopodis ellabori ĝin kun granda spirito de fideleco kaj respekto al la originalo.

Tiu ĉi ja ne estas la unua fojo, kiam Víctor Català tentis la malkvietajn apostolojn de Esperanto. Iuj rakontoj ŝiaj, iuj el ŝiaj famaj kamparaj dramoj, konsistigis parton de literatura antologio, kiu aperis en 1925 sub la titolo "Kataluna Antologio"; per tradukoj de Estanislau Pellicer kaj de Josep Ventura mem, la rakontoj de Víctor Català en K. A. estis gustumitaj ĉie, kie oni gustumas la ĉarmon de bona interkompreniĝo, la ĉarmon pro la fakto ne sin senti fremda, malgraŭ la diverseco de latitudo, malgraŭ la malsameco de la haŭtkoloro. Kaj ja ne estas mirige, ke la prozo de Víctor Català tiel tentis la fervorulojn por Esperanto, nek estas mirige, ke la tuta amplekso de *Soleco* meritis tiun ĉi honoron: la prozo de Víctor Català estas riĉega, estas forta, estas vigla: ĝi estas tiel vigla, tiel forta kaj tiel riĉega, ke oni jam povas aserti, de nun, ke tiu ĉi neniel estos la lasta traduko, kiun oni faris de ŝiaj verkoj, ĉar aliaj sendube venos poste, laŭ direktoj ne sciitaj.

Kaj tio permesas eldiri, ke nun, je la sesdekjara datrevено de la publikigo de *Soleco*, tiu ĉi traduko ne faras alion ol atesti la justecon de frazo, kiun mi aplikis al la naŭdekjara Víctor Català, kaj kiu estas perfekte aplikebla al la romano, jam sesdekjara: Al *Soleco* estas rezervita la gloro de longa vivdaŭro sen senileco.

JOSEP MIRACLE

Vallvidrera, majo de 1965

I

LA SUPRENIRO

Pasinte Ridorton (1), ili atingis ĉaron, kiu sekvis la saman vojon kiel ili, kaj Matio, dezirante ŝpari energion, demandis la ĉariston, ĉu li volas ilin kunpreni ĝis la trapasejoj de la monto. La kamparano, ridinklina kaj ravita de la ebleco ĝui tempeton da konversacio, tuj faris al li lokon apud si sur la transversa tabulo de la ĉaro, kaj diris al Mila (2), ke ŝi akomodiĝu malantaŭ ili, sur la ĉarsakaĵo (3). Ŝi danke rigardis tiun viron nekonatan, kiu faris al ŝi tian komplezon. Malgraŭ la fortika paŝo, kiun ŝi havis, ŝi sentis sin laca. Ŝia edzo estis rakontinta al ŝi, ke de Liskento (4), kie ilin delasis la publika veturilo, ĝis Ridorto, estas distanco proksimume horduona, kaj ili vojiradis jam kvin longajn horkvaronojn, kiam ĵus aperis la vilaĝa sonoriltureto nigranta sur la dubeverda supro: de la monteto ĝis ili renkontis la ĉaron, estis pasinta alia longa horkvarono, kaj la sunvarmo, la polvoleviĝado kaj ŝia malemo, ĉio kune, komunikis grandan malbonhumoron al la kompatinda virino.

Apenaŭ enkaviĝinte en sia nesto ĉe la ĉarsakaĵo, kun la tolaĵopako ĉe flanko kaj la dorso apogita al unu balustrado, ŝi malligis la tukon, kiun ŝi portis kiel tegmenteton super la vizaĝo, kaj ĝin preninte je la anguletoj, ŝi ĝin albatis kontraŭ

(1) Ridorto = Vilaĝeto.
(2) Mila = Mallongigo de virinnomo Kamila.
(3) Ĉarsakaĵo = Mato-sako, kiu formas la fundon de la ĉaro.
(4) Liskento = Vilaĝeto.

la vangojn. Ŝi statis sufokita pro varmo, kaj la freŝa aero venanta de la tuko karesis ŝiajn kolon kaj tempiojn, kiel dolĉa kaj iom tremiga dorlotaĵo, kiu ŝin tute trakuris: sed, ĉesinte sin ventumi, ŝi sin trovis pli ripoza kaj serena por admiri la belaĵojn de tiuj vojoj, kiujn Matio tiomfoje al ŝi estis laŭdinta.

Ŝi ekrigardis de unu flanko al la alia. Malantaŭe de la ĉaro forkuris malsupren, farante zigzagojn kaj diagonalojn, la intervilaĝa fiŝoseo, plena de kavoj, de profundaj radsulkoj kaj de krestoj el tro seka koto. Ilin la surpaso de la radoj iom post iom detranĉadis, kun tiel persista malrapidemo, ke ĝis la somermezo ili ankoraŭ ne estos tute formorditaj. Tiam la ŝoseo portempe niveliĝos per matracoj el polvo, ĝis denove venos ĝin difekti la aŭtunaj pluvoverŝoj.

Maldekstre de la ĉaro leviĝis alta termuro, pli elstara ĉe la supro ol ĉe la malsupro, kvazaŭ preta sin defaligi sur la vojon, tamen retenata de senmorteraj kaj malegalaj muraĉoj, tie ĉi kaj tie ventrodikaj kaj pli danĝeraj ol la termuro mem. Supre alkroĉiĝis la ĉirkaŭfermiloj de la bedoj, formitaj — parte — el agavoj bazorande detranĉitaj, kies folioj, hirtaj kaj pulpaj, vundis la spacon, kiel faskigitaj glavoj, kaj — parte — el tamarindoj kun moviĝema branĉaro aŭ vicoj da kratagoj, kiuj tiam komencis sian blankan floradon tute ĉirkaŭitan de pikiloj.

Kontraŭaflanke, kaj je proksimeco de ĉirkaŭ ulno (1) kaj duono sube de la ŝoseo, etendiĝis la ebeno de Ridorto, ĉirkaŭpremita al la altaĵo kaj tute dividita en simetriajn parcelojn, same kiel granda ŝaktabulo. Tiuj parceloj estis la irigaciataj legombedoj, la riĉeco de la vilaĝo, investita laŭ pecetoj fare de ĉiuj vilaĝanoj, dank' al antikvaj emfiteŭzaj (2) establaĵoj. Tiam vidiĝis ĉie la vivkolora pompo de la freŝaj kaj gajaj notoj de la juna verdaĵo, makulanta la brunigitan flavecon de la grundo, meze de la vojetoj de klara akvo, kiuj briletis ĉe la suno, kiel spegulaj strioj.

---

(1) Ulno = Mezurunuo de longeco, konsistanta el ok spanoj kaj valoranta proksimume 1'60 metrojn.

(2) Emfiteŭzo = Koncesio, por ĉiam aŭ por longa tempo, de la utila bienposedo, kontraŭ jara pago de monprestaĵo kaj de laŭdemio. (Laŭdemio = Imposto kiun, je ĉiu teren-vendado, ricevas la mastro de la rekta apartenaĵo).

Mila restis sorĉita de tiom da beleco. Al ŝi, filino de la granda ebeno, malgrasa pro manko de brakoj, de akvo kaj de sterko, ŝajnis, ke ĝi ne povas esti vera, sed ke nur, per efiko de fantazia miraĝo, ŝi vidas tiel ravaspekta tiun manifestiĝantan etan ebenon kiu, enfermita meze inter altaĵo kovrita de domoj, kaj montoj el kruda kaj senkultura ŝtono, havas tian fekundan kaj rideman vivon. Ekzistis nek spano da loko nekulturita, nek nura herbo suĉanta la tersukojn! Ĉio estis prilaborita, ĉio transturnita de malsupre supren per plugilo aŭ per forkfosilo, ĉio dorlotita kaj servita laŭ maniero de sinjoro, kaj ĉio superbele fruktanta, kun granda malavareco je amo kaj bonvolo!

Tie malsupre, en la lando de Mila, la personoj vaste disgrajniĝis tra la kampoj, metante multe da interspaco inter unuj kaj aliaj, kaj sur la larĝegaj kampobordoj kaj termuroj, kovritaj de branĉetaro kaj ĉiuspeca vepro, verdis sub la suno la lacertoj kaj sin paŝtis per la sensukaj herbaĉoj kelkaj malgrasaj bovinoj, kiuj montraĉis la rip-aron nudigita kiel kradrostilo kaj tiajn pintajn postostaĵojn, ke ili minacis trabori la haŭton. Ĉi tie, oni ja ne vidis eĉ unu mizerkorpan beston, tamen la personoj dense vivadis kiel la fingroj de la manoj: grandnombro da virinoj, kiel figuroj de la granda ŝakludo, dismetitaj ĉie sur la ŝaktabulo, svarmis, laboremaj kaj klopodaj kiel abeloj, dispremante la grundon, supren-kaj-malsuprenigante la put-akvoĉerpilojn, ĉirkaŭfosante la vegetaĵojn, aŭ ripozante sub la foliaro de figarbo: ili ĉiuj kun la jupo suprenfaldita, la kaptuko super la vizaĝo kaj la brakoj kaj kruroj nudaj, plifortikiĝantaj kaj bruniĝantaj ĉe la suno.

Mila, ilin rigardante, eksentis, ke plenlarĝe malfermiĝas ŝia varma animo de terkulturistino kaj ke dezirego, pasio dolĉe sufokata, ŝin puŝas desalti de la ĉaro, sin intermeti en tiujn legombedojn kaj fingrumi ankaŭ, kiel tiuj virinoj, la varmetan grundon, la malsekajn foliojn, la plezurigan akvon, kiu forfluadas meze de la tifaoj (1), kies orfloroj sinjore elŝovas la kapon rande de la termuro.

---

(1) Tifao = Planto el fam. tifacoj, kies folioj servas por plekti sidilojn de seĝo. (Typha angustifolia).

Matio efektive pravis: ja estis bela kaj ridema la najbaraĵo de Ridorto, de tiu vilaĝeto amasigita sur la monteto kaj ĉirkaŭita de la okulfrapanta ringo de ebena zono; kaj ĉar la najbaraĵo estis gaja, la ermitejo supre de la monto ne povis esti tiel malĝoja, kiel oni sufloris al ŝi. Mila imagis, ke ĝi ŝajnos nesteto pendanta de arbo, kaj ke, tuj kiam ŝi eligos la kapon ĉe la fenestro, ŝi vidos sub si la mirindaĵon de tiu granda ekstaziga vidaĵopeco. Ho, se kun la tempo ŝi povus posedi unu tian ravan legombedon por si, por ĝin mastrumi laŭplaĉe, ŝi ja ne bedaŭrus esti forlasinta sian landon por ĉiam!

Animita de similaj pensoj, ŝi turniĝis, dezirema por paroli pri tio al sia edzo: sed, vidinte la du dorsojn, kiuj rektiĝas antaŭ ŝi, ŝi sentis, ke la vortoj forfandiĝas sur la lango, kaj la animiga ideo, kiu estis elironta el sia kaŝejo, subite revenis en ĝian internon, kiel timema besteto.

La du viroj flegme konversaciis; ne atentante, ŝi interaŭdis la vortojn *malvarmo... malĝojo... bovidoj... tro alte...* sed ŝi ne sciis, pri kio ili parolas, ĉar ŝia koro kaj ŝia penso fortiriĝis de la ĉaro, returne al la grundo. Sed la ĉarmo jam estis disrompita kaj la grundo, kvankam bela kiel antaŭ momento, ne sukcesis revivigi en ŝi la brulrestaĵon de tiu unua deziregó. Kun akcento de malĝojo ŝi deturnis la rigardon, kaj ĝin suprenlevis: la ĉielo estis granda faŭko kovrita de blindiga lumhelo, kiu dolorige vundis la saturitajn okulojn... Ŝi rigardis tra la truo, kiu restis inter la du viroj: io verdis unuforme en malproksimeco, kiel bela etendita tapiŝo... Ŝi refoje atentis al la du virdorsoj: unu, tiu de la kamparano, estas malgrasa kaj osteca, kiel tiuj bovinoj ĉe la granda ebeno, kaj surhavas kungluita, kvazaŭ ĝi servus al li kiel haŭto, malbonkvalitan ĉemizon kun eluzitaj strioj, kiu odoras je ŝvito kaj je karbeto; la alia dorso, larĝa kaj mola kiel kuseno, ŝajne volas eliĝi el la nigra jako, kiu ĝin premas, streĉiĝante de akselo al akselo kun konstanta minaco de ekŝiriĝo.

— Kiel grasiĝis tiu ĉi viro de post la edziĝo! — pensis Mila, refoje rimarkinte, ke ĉio sur li malgrandiĝis, ĝis la punkto ŝajnigi lin groteska kaj enpakita kiel marioneto. La felta ĉapeleto mem, kiu antaŭe tiel bone sidis sur li, iom post iom akiradis aspekton de pastra vertĉapeto, kaj en tia situacio,

ĉe ĉiu flanko de la vertĉapeto, larĝiĝis ambaŭ liaj oreloj, brulruĝaj kaj kontraŭhele travideblaj, same kiel du ansoj el densa vitro. Pli malsupre, la trairanta linio de la gladita kolumo, eliĝante el la nigreco de la jako kaj el la varma nuanco de la karna nuko, alprenis krudajn malvarmecojn de marmoro.

La ombro, kiun projekciis ambaŭ viroj, ŝirmis Milan kiel malvarmeta mantelo, kaj ŝi sentis sin komforte en sia kuŝejo sur la ĉarsakaĵo, tute kuntiriĝinta je korpo kaj ripoza je spirito.

La ŝarĝoĉaro, intertempe, malakcele antaŭeniĝis, tiel malakcele, ke oni povus diri, ke ĝi balanciĝas ĉirkaŭ si mem, ne moviĝante de la loko, kvazaŭ ĝi ne havus alian celon ol detranĉadi la kotkrestojn de la vojo. Kiam antaŭ ili aperis arbo, ĝis ili ĝin postlasis, oni povus trankvile trapreĝi unu misteron de la rozario: kaj tiu granda lulanta parsimonio (1) fine malvigligis la animecon de la virino kaj vekis en ŝi dezirojn kuŝi ie ajn kaj dormi.

(1) Parsimonio = Modereco en la elspezoj, en la agado, en la moviĝado.

Ŝi jam estis sata rigardi la dorsojn, la ĉielon kaj la vivkoloraron de la legombedoj, kaj la kolnervoj doloris al ŝi tial, ĉar ŝi tenis la kapon tiel longe turnita. Ŝi ĝin elskuis, kvazaŭ por forĵeti el ĝi la doloran malklarecon kaj, serĉinte bonan pozon, ŝi restis senmova, dorse al balustrado kaj vizaĝe al la fronta mato: ia belaspekta mato tute ĉarpiiĝinta, kiu ŝajnis densa reto el flava silko, multe trapunktita per orsteloj, pro la sunlumo kiu reflektiĝis sur ĝi el trans la vojbordo. Invadita de dolĉa enpensiĝo, ŝi sentis, ke antaŭ ŝiajn okulojn sin metas vualo ruĝa, poste blua, poste nigra...

Frapo sur la dorso ŝin bruske vekis.

— Aj! kio estas? — ŝi murmuris konfuzite.

— Vigliĝu, ĉar ni devas desalti! — avertis ŝia edzo, jam staranta sur la haltigita ĉaro.

Ŝi sentorporiĝis, ekstaris ŝanceliĝante, kaj ambaŭ desaltis teren.

— Saluton, kamarado, kaj Dio pagu al vi la favoron! —

— Saluton al vi, ermito, kaj al via akompanantino! Mi ja supreniros vin viziti je la festo de Sankta Poncio! —

— Venu supren! Mi invitas vin por trinki... —

— Mi dankas... Adiaŭ! —

— Adiaŭ! —

La vizaĝo de la kamparano, ruĝa kaj brilanta kiel kaldronfundo, larĝiĝis per granda ridaspekta grimaco; li longe tiris la ĉevalkondukilojn, kvazaŭ ili estus kaŭĉukaj, elpafis kvar ripozajn kriojn de: *Hot, Gavaĉo!* (1) kaj la ĉaro reprenis sian malrapideman iradon pluen laŭ la ŝoseo, postlasinte la edzon kaj edzinon apudiĝintaj al la senmortera muraĉo de la ŝosebordo, kun tute sorĉita teniĝo.

— Ĉu vi aŭdis? — trene demandis la virino. — Li nomis vin ermito (2)... —

— Ĉar mi rakontis al li, ke ni iras al la ermitejo. —

— Kaŭzas al mi aflikton, tio ĉi... — ŝi aldonis, malprecize rigardante en malproksimecon.

---

(1) Gavaĉo = Nomo donita al la ĉevalo. France: "Gavache", el la rivero Gave, okcidenta francpirenea regiono.

(2) Ermito = Persono, kiu vivadas en la ermitejo kaj zorgas pri ĝiaj purigo kaj ordigo.

— Kio? —

— Tio ĉi... Kion vi volas ke mi diru!... Ŝajnas, ke ne bone sidas al juna persono tiu ĉi ofico de... de maljunulo aŭ de afekciulo... —

— Naivulino... Same bona estas unu ofico aŭ alia. —

Kaj la viro komencis piedfrapi por malsuprenigi sur si la kanalojn de la pantalono, kiuj estis kuntiriĝintaj supren de la kruroj.

Ankaŭ Mila elskuis sian jupon, dum ŝi ellasis sopirĝemon.

Kiam la kanaloj de la pantalono jam pendis kloŝe laŭ la nivelo de la maleoloj, Matio penetrigis la vergon, kiun li portis, tra la kunligaĵo de la paktuko, kie li havis kelkajn tolaĵojn, kaj ĝin metis sur la ŝultron.

— Ĉu ni ekiru? —

Ŝi ŝovis la tolaĵopakon sub la brakon.

— Ni ekiru. —

Je kvar paŝoj pli malsupre, ĉesis la senmortera muro kaj la vojbordo malfermiĝis por lasi pasejon al iu flankvojo. Tio estis speco de profunda kaj malegala skrapaĵo, kun la kuŝujo tute plena de puraj kaj ruliĝemaj ŝtonoj: unu el tiom da sulkoj de la senmezura ŝtonvizaĝo de la monto, tra kiu defluas je torentetoj la ĉielaj larmoj, la akvoverŝoj de la vintraj ŝtormoj.

Unu post la alia ili entreprenis la vojiron: li fajfante interdente, ŝi malrapide kaj tordante al si la piedojn je ĉiuj kvar paŝoj.

Ankoraŭ ŝi ne iris kvindek paŝojn, kiam ŝi haltis.

— Ĉu vi jam laciĝas? —

— Tiel vertikala ĉi tio estas! —

— Oni ĝin nomas la Kanalo (1) Krur-Rompanta. En vintro estas riske ĝin laŭiri... —

— Ĉu pli ol nun? —

— Nun ja ne grave! —

Sed, subite rimarkinte nubon en ŝia rigardo, li gaje aldonis:

— Se vi vidus ĉe la Nigra Ravino! Tie efektive estas vivrisko! —

---

(1) Kanalo = Interkrutejo. Mallarĝa pasejo inter du krutaj montoflankoj.

— Kaj ĉiuj vojoj estas tiel malfacilaj? —

— Tiuj ĉi estas la rektvojetoj, virino! La vera vojo kuras pli supre, super Murono (1), sed la rektvojetoj estas pli alireblaj. Hodiaŭ ili ŝajnas al vi pli penigaj, ĉar vi ne estas hardita travagi la montaron, sed kiam vi estos ilin ekkoninta, vi ne deziros pasi sur alia loko. Jen vidu! Tio ĉi mem, kio suprenire estas pli laciga ol ŝtuparo, malsuprenire donas plaĉon: ŝajnas, ke oni pende malsuprenigas sin laŭlonge de ŝnuro, la kruroj ne povas halti kaj la iro daŭras momenton. —

Si elĵetis sopirĝemon, kaj ili daŭrigis la vojon. Sub iliaj plandoj sinsekve moviĝadis la ŝtonoj, kaj la vojflankaj rubusoj kroĉiĝis al iliaj vestoj, kvazaŭ hokotufoj.

Iom post iom li ĉesis fajfi, kaj sur ŝi la tolaĵopaketo komencis pezi kiel ŝtonamaso. Kvindek paŝojn plu, kaj ŝi apudiĝis al la termuro, sen spiro.

Matio, kiu iradis antaŭe, turniĝis.

— Ĉu alifoje, karulino? —

— Mi ne povas... plu... —

— Kaj tutcerte ni ne povas multe stacii: post nelonge subiros la suno. —

— Ĉu la vojo ankoraŭ estas longa? —

— Kompreneble! Jen ja ni apenaŭ komencis!... —

Ŝi ricevis ekskuon.

— Ĉielreĝino! Ĉu ni apenaŭ komencis, kaj jam de la kvara matene mi tramigras la mondon? —

Li ekridis.

— Ni apenaŭ komencis tramonti, virino!... Ne maltrankviliĝu, ĉar ni ja alvenos ĝustahore. — Kaj li turnis la kapon por pluki (2) branĉeton de apudvoja rusko (3).

Mila tiam fiksis al li siajn pupilojn, tiujn pupilojn plenajn de angoro kaj de malfido.

— Estus bezone scii, ĉu pravis la avertoj kaj ĉu tiu ĉi viro ankoraŭ unu fojon trompos min per ĉiuj siaj taksograndigoj!

---

(1) Murono = Vilaĝeto.
(2) Pluki = Deŝiri, ŝirkolekti.
(3) Rusko = Planto el fam. liliacoj, specio *Ruscus Aculeatus* (Vd. Bukso virseksa aŭ apudmara).

— ŝi pensis, sentante najlon en la koro kaj apartiĝante de la termuro.

Li animis ŝin.

— Jen tiel, virino! Ankoraŭ kvar kolsvingojn kaj ni troviĝos sur la Limŝtono... —

— Se ne embarasus tiu ĉi tolaĵopako. —

Sed Matio ŝajnigis sin malatenta, kaj ili plu supreniris en silento.

La Kanalo ĉiumomente fariĝis pli vertikala kaj peniga; iliaj piedoj sinsekve deglitadis sur la ŝtonejo kaj ili devis alkaptiĝi al la flankaj arbustoj por ne perdi vojiron. Iliaj blovantaj spiroj ektimigis la lacertetojn, kiuj vostumante kaŝiĝis, kiel demonposedatoj, kaj la junaj brancoj de la ruskoj vipis iliajn brulruĝajn kaj ŝvitperlantajn vizaĝojn. Matio havis la felto-ĉapeleton sur la nuko kaj la gladitan kolumon malstreĉita kiel tripo.

La termuro ie kaj ie interrompiĝis por igi pasejon al olivarbaro, kaj tuj ĝi realtiĝis ambaŭflanke, ilin entrancigante kaj lasante al ili nur vidi la brilantan ĉielrubandon super siaj kapoj. En unu el tiuj olivarbaroj ili vidis bovoparon jungitan al la plugilo, ripozantan sub olivarbo, kaj tie proksime la plugiston, kiu trinkmanĝetis, sidante surgrunde. La brutoj sin senmuŝigis, svingante la voston kaj stampfiante; la viro havis en la manoj bulbon kiel pugnon, kaj flanke kruĉeton el nigra argilo. La olivarboj, kuniginte la brancojn supre de li, interplektis sur la ĉielo grandan arkon el arĝenta filigrano, kaj malsupre, inter sulko kaj sulko, la grundo dismovita faris larĝajn franĝojn de hematita (1) koloro.

Mila envie rigardis la terkulturiston kaj murmuris:

— Se mi kuraĝus, mi petus de li akvotiron... Mi havas la gorĝon seka kiel tindro! —

— Mi ankaŭ... Ni enpaŝu. —

Ili enpaŝis, trinkis kaj konversaciis mallonge. Matio denove rakontis, ke ili iras al la ermitejo, kaj Mila sentis sin refoje malkvieta kaj turmentata, ne sciante kial.

Poste ili reiris supren, kun la rondaj kaj glitigaj ŝtonoj sub

(1) Hematito = Tre ofta mineralo, ruĝa oksido de fero.

la piedoj kaj ambaŭflanke, sur la skrapitaj termuroj, troviĝis sternaĵoj el rubusoj kaj paliuroj (1), kiuj ilin senhalte gratvundis, kiel ungegoj de frenezaj bestetoj.

Matio ricevis eksplodon de tuso, kaj birdeto, *milhomoj* (2) kiu staris senmova sur la pinto de agavo, forflugis, ĵetante viglan kaj penetrantan pepon.

Malgraŭ la ombro, kiu kovris la profundaĵojn de la Kanalo, super tiu koridoro flosis varmo de somermezo. Mila sentis sian ĉemizon gluita sur la dorso, malseka kvazaŭ ŝi ĵus forprenis ĝin el la lesivado, kaj ŝia koro tumulte batis.

Subite la vojo tordiĝis en abruptan kubutangulon kaj direktiĝis supren, kvazaŭ ĝi intencus transsalti obstaklon. Mila tiam ellasis krion de surprizo, ĉar ŝi vidis sian tutan korpon lumbrile inundita, dum la piedoj kaj kruroj ankoraŭ restis submergitaj en la mallumo de la Kanalo.

---

(1) Paliuro = Arbusta ramnaco el la specio *Paliurus Australis* aŭ *Spina Christi*, kun la branĉetoj en zigzago, la folioj alternaj kun dornaj stiploj, la floroj malgrandaj kaj flavaj kaj la fruktoj dilatiĝantaj en cirkla disko ĉe la ekstremo. Ĝi kreskas ĉe la mediteraneaj bordoj.

(2) Milhomoj = Nomo donita al arogantulo.

Tiu ĉi finiĝis kaj la torenteto, ŝiriĝinte en tri branĉojn, alprenis la inversigitan formon de greka Y; du el la branĉoj pendis malsupren, kvazaŭ rajdante grandan ŝtonmasivon de la monto, kaj la tria, iel oblikve, sekvis montosupren. Ĉe la kuniĝo de la tri branĉoj formiĝis longforma plataĵo, tiuhore sunplena, kiel malsupre la ebeno.

— Ĉi tie ni povos iom ripozi — esprimis Matio.

Mila ne atendis, ke li tion ripetu, kaj lasis sin fali teren muelita, kontuzita, kun batoj ĉe la tempioj kaj ĉe la piedplandoj, kvazaŭ ŝi havus grandan febratakon.

Ŝi rigardis siajn botetojn: Domaĝe! Dank' al tiu faro neniam plu ili restos la iamaj... Kaj ŝi pensis ke, se li estus al ŝi rakontinta la veron pri tiuj vojoj, kiujn ili devis laŭiri, ŝi estus povinta surmeti kanabajn ŝuojn kaj ne nun freneze detrui la edziniĝan ŝuparon... la solan bonkvalitan kiun ŝi posedis.

Por dronigi la malplaĉon, ŝi levis la kapon.

Dekstre, la Kanalo alrapidis tra deklivo tiel apika, ke de la supro mem ĝi ŝajnis fendita puto. Mila, tion vidinte, miregis ke ŝi sukcesis suprengrimpi tien. Tio ne estas vojo por personoj de Nia Sinjoro, sed nur por kaprinoj aŭ banditoj.

Trans la Kanalo, etenditaj sur la deklivoj kaj grimpejoj, staris olivarbaroj kun la trunkobazoj disfenditaj; kaj ĉi-flanke, estis ŝtonplenejo sursemita per densaĵoj el kermokverkoj (1) kaj floranta timiano, kies disblovita parfumo venis ĝis supre, kiel purega anĝelspiro.

---

(1) Kermokverko = Vario de verda kverko, aŭ glanarbo, malgranda kaj kun folioj pikilhavaj.

La alia kruro de la greka Y, la dekstraflanka, angilumis pli amplekse, kaj iris kaŝi sian finaĵon en montofaldon. Inter kruro kaj kruro la plej proksima ŝtonmasivo pufiĝis kaj rondiĝis laŭ formo de virinmamo kaj — por doni al ĝi pli da tia simileco — efikis, kiel mampinto, speco de tubero aŭ natura menhiro, kiu fermis la plataĵon flanke de la ebeno, elstarante, forte konturita, sur la ĉiela helaĵo. Ĉe la bazo de tiu ĉi mampinto ekzistis postsignoj de ŝtupovico da ciklopaj rokblokoj, kaj sur ili, horizontale enfiksita en la roka vejno, peco de ferbolto, tute mordita de rusto.

— Ĉu vi scias, kie ni staras? — demandis subite Matio.

— Kiel vi volas ke mi sciu, se mi neniam travagis tiujn ĉi lokojn? —

— Ni do staras sur la Malgranda Ŝtonego. Vi jam scias, ke la Ŝtonegoj estas tri: la Granda Ŝtonego, tiu de Sankta Poncio kaj tiu ĉi. Tion — kaj li signis al ŝi la antaŭstarantan mampinton — oni nomas la Limŝtono de la Maŭroj. Oni diras ke, pratempe, la maŭra reĝo tie havis gvardianon, kiu viglis la montaron de matene ĝis vespere, ne povante fermi la okulojn nek movi piedon dum la tuta tago, sub puno je morto. —

— Kaj la ermitejo, kie ĝi kuŝas? —

— Tie malsupre, malantaŭ vi, ĉe la vojturniĝo de la Ŝtonego... Jen, ekstaru, kaj mi tion signos al vi. —

Ŝi ekstaris sendezire, kaj li, dorse al la ebeno, montre etendis la fingron rekte al sudokcidento.

— Ĉu sur tiu monto malhela? —

— Ne, tio estas la Alta Ŝtonego. Rigardu pli proksimen! Ĉu vi vidas la kuŝujon de la Nigra Ravino, kvazaŭ rubandon kiu kunligus la mandiblojn de tiu alia, pli malalta monto? Do la Ravino eliĝas el la Montokolo de Sankta Poncio, kaj malsupraflanke de la kolo kuŝas la ermitejo. —

— Bona Dio! Ĉu ĝis tie oni devas supreniri? —

— Ne, virino. Ni deturniĝos ĉe la unua zigzago, kiu blondumas: ĝi estas la vojeto. —

— Ĉu verŝajne oni povas vidi de la ermitejo tiujn belajn legombedojn de malsupre? —

— De la ermitejo mem... ne. Ili ja vidiĝas ĝuste de ĉi-tie.—

Kaj Matio, trapaŝinte la plataĵon, suprengrimpis la ŝtupo-

vicon de la Limŝtono. Mila volis fari same, sed la kruroj ne sufiĉis al ŝi: ĉiu ŝtonbloko havis altecon de ulnoduono.

— Sinjoro, kiaj ŝtupegoj! —

— Ili estas faritaj de la maŭroj... Oni diras, ke pratempe, ĉio ĉi estis plena de maŭroj. Vi vidos, etendu al mi la manojn... Hojda! (1) Alkroĉiĝu nun ĉi-tien, kaj rigardu... —

Milan kvazaŭ frapis sinkopo. Jen malfermiĝis antaŭ ŝi, en formo de urno el forestanta mondo, la senmezura malplenaĵo, kaj nur en malsupro, tre malsupre, kaj ĝis malproksimo, tre malproksime, etendiĝis kviete, kiel mirinda feĉo de la orbrila printempa posttagmezo, la legombeda ebeno, Ridorto, alia ebeno pli granda, kaj senfino da vilaĝoj, ĉiuj kuŝantaj kiel bandoj da turtoj meze de labirintoj da montetoj, arbaroj kaj vojoj; la vido perdis ilin en la malprecizeco de la lastaj spaclimoj, en la malklaraj bluoj de la horizonto.

La virino beate kunigis la manojn.

— Kia impona belaĵo! —

— Ĉu ne mi asertis, ke tio plaĉos al vi? — Kaj li, kontentigite, komencis al ŝi nomi ĉiujn vilaĝojn kaj altaĵojn, kiuj elmontriĝis.

Mila, sorĉita, venkita, ĉirkaŭpremadis per larĝa cirkla rigardo la spacon, kvazaŭ ŝi volus paŭsi (2) tiun ravan vizion sur la fundo de siaj pupiloj. Ŝi ne memorus sin movi, se Matio, saltinte de elstaraĵo al elstaraĵo, ne dirus al ŝi, rideme:

— Ankoraŭ vi ne saturiĝis, karulino? —

Tiu demando ŝin rekondukis al la realeco; sed antaŭ ol bedaŭre malsupreniri de la Limŝtono, ŝi sendis ankoraŭ lastan ekrigardon plenan de mirblindeco.

La vosto de la greka Y, kiu iris montosupren, estis ne tiel abrupta kiel la Kanalo, sed la surfaco, senigita je ŝtonoj kaj gratita sur la roka vejno, estis plena de angulrandoj kaj elstaraĵoj, kiuj kontuzis la molaĵon de la piedoj, pli efike ol la ŝtonoj mem.

La premanta laciĝo, kiu plilongigis ilian halton, malemigis ilian deziron interparoli. Ili suprensekvis kapklininte kaj en

(1) Hojda = Interj. de surprizo aŭ miro miksita de ĝojo.
(2) Paŭsi = Trakopii. (Fr. calquer; hisp. calcar).

silento; sed Mila, aŭdante antaŭ si la intermitan spirblovegon de Matio, pensis pri la graseco de sia edzo, kiu, malgraŭ ĉio, jam komencis al ŝi kaŭzi embarason.

— Li estas tiel trankvilanima! Li pligrasiĝos kiel balenino!... —

Kaj por la unua fojo alkuris al ŝi la antaŭsento, ke tiu estaĵo, freŝa kiel kazeo, baldaŭ afekciiĝos kaj suferados de astma malsano.

Matio estis nunfoje la unua, kiu haltis.

Kiam lia edzino lin atingis, ŝi defaligis sur lin malvarman ekrigardon, kaj seke al li diris:

— Vi ja povis min averti, ke ni tiel longe restados survoje, ĉar mi estus kunpreninta provizeton da manĝaĵo... Mia koro konsumiĝas... —

— Kuraĝon, virino! Je pafdistanco troviĝas la vojeto, kaj atinginte ĝin jam ni estos hejme. —

— Mi jam konas vian manieron rapidi, en ĉio — respondis ŝi malĝoje.

Li ne replikis, kaj ili denove vojiris.

Tamen Matio estis dirinta veron, tiun ĉi fojon: post malmultaj paŝoj ili atingis la vojeton.

— Ni haltu ankoraŭ iomete, se vi volas... — li sugestis.

—Ĉio ĉi estas pli malbona ol la purgatorio! — ŝi aldonis por ĉia respondo.

Ili eksidis. Matio eltiris la tabaksaketon kaj komencis kunruli cigaredon. La virino fortiris de si la kaptukon, ĝin elskuis, kaj ĉar jam ne estis varme, ŝi lasis ĝin malstreĉe sur la kolo.

Apenaŭ ili estis duone preterpasintaj la Ŝtonegon de Sankta Poncio, kiam laŭ unu flanko ĝi daŭre suprenleviĝis, tute rugigita de la oranĝkoloraj lumkrevoj de la subiranta suno, kaj laŭ la alia flanko ĝi deglitis tra krutaĵoj kaj deklivoj, kiuj jam kovriĝis per grandaj bluaj makuloj.

Oni ne plu vidis postsignon nek indicon de ebeno, kaj la ĉielo plenlarĝe etendis sian perlogrizan blankecon, iel oritan rekte al la horizonto, super kiu promenis malrapideme, tre malrapideme, kaj de maldekstre dekstren, bandoj da perlamotaj nubetoj, kiuj ŝanĝiĝadis je formo kaj koloro, dum ili daŭrigis sian vojon. Rigardante ilin distrite, Mila malkovris

meze de ili nigran punkton, kvazaŭ muŝpunkton, kiu iom post iom grandiĝis, grandiĝadis...

— Kio estas tio? — ŝi demandis Mation.

— Verŝajne ĝi estas korvo. —

— Nun ĝi ŝvebas super tiu montoflanko... —

— Ĝuste, super la "Knabino" (1)... Verŝajne ĝi flaras ion, kion la farmdomanoj el Sankta Poncio sendube ĵetis en la Ravinon. La farmodomo ĝuste kuŝas tute sube de la Knabino. —

— Kial oni nomas ĝin tiel? —

— Ĉar, de certaj lokoj, ĝi similas knabinkapon kun la pinta harplektaĵeto malantaŭ la nuko. Iam mi ĝin montros al vi de sur la Akvo-Muĝulo (2)... Ektagiĝe ĝi estas blua kiel la ĉielo kaj ŝajnas pentraĵo. —

Matio silentis, kun la rigardo perdita en malproksimo, kaj Mila, vidinte, ke li montriĝas kun tia sinteno de dolĉa humileco, pensis, ke ĉiu lin prenus por denaskiĝa sanktuleto. Sed subite, kvazaŭ tiu pozo ŝin vundus per sekreta piko, la virino devojigis la rigardon, forte ektremante.

Kun la cigaredo sur la lipoj, Matio ekstaris kaj ili suprengrimpis la vojeton.

Ĝi estis vojeto mallarĝa kaj glata kiel la sulko de kolosa rado, kiu estus ruliĝinta sur tiu loko en la daŭro de jarcentoj. Ĝi direktiĝis al sudokcidento, kaj apenaŭ oni faris kelkajn paŝojn sur tiu vojeto, rektiĝis la senmezura balono de la Granda Ŝtonego, plenigante la spacon, superregante ĉion kaj sinjorante kiel la sola suvereno, envolvita en sia pompa mantelo el violbluaj ombroj, kiuj majeste sin trenis super profundaĵoj kaj grotkavoj, donante al tiuj lokoj imponan aspekton, kiu allogis Milan.

De tiu Ŝtonego, ankoraŭ malproksima, elŝiriĝis malvarma aerfluo, stranga vintra aerfluo, kiu malplaĉe surprizis la karnojn saturitajn de printempa suno, kaj ilin vundis tiel, ke ambaŭ vojirantoj eksentis subitan impulson al returniro. En Mila tiu impulso estis tiel akra, ke ŝi bruske haltis. Tiam ŝi percep-

---

(1) Knabino = Nomo de montobloko.

(2) Akvo-Muĝulo = Nomo de akvoŝpruciganta montobloko.

tis surdan murmuron, kiu venis el nesciata loko, kvazaŭ spirblovon de giganta besto, kiu estus dormiĝinta lacigite.

— Kio estas tiu ĉi bruo, Matio? — ŝi malkviete demandis.

— La hurlo de la Torento de Malbon-Sangulo, kiu kraĉas la akvon de la Akvo-Muĝulo. —

Tiuj vortoj memorigis al Mila, kion ŝia edzo estis rakontinta al ŝi pri la miraklofaraj akvoj, kiuj vekas apetiton en la senapetituloj kaj sanigas personojn kaj bestojn de ĉiuj afekcioj pro malpuremo kaj rakito: la skrofolo, la herpetoj, la pusulceroj, la kronikaj laksoj, la malignaj (1) erupcioj...

Kaj dum ŝi pensis pri malsanoj kaj mirakloj, la vojeto, supreniĝante, supreniĝante kaj turniĝante, ĉirkaŭiris la Ŝtonegon, kaj iom post iom penetris en la regionon de la malvarmaj ombroj.

Subite Mila haltis, kaj poste ronde turniĝis. Granda impreso ŝin surprizis. — Ĉiela Reĝino, kian longan interspacon ili laŭiris! —

Sub ŝi nur vidiĝis ondoj da montoj, da montoj senmezuraj kaj silentaj, kiuj kuŝiĝas, platiĝas, submergiĝas en la ombra kvieto de la vesperkrepusko kiu, kvazaŭ nigra nebulo, sin sternas super ili kaj ilin envindigas.

Mila serĉis en tiu blua dezerto la gajan noton de fumkolono, de dometo, de homa figuro... sed ŝi trovis nenion, eĉ ne plej malgrandan signon, kiu indikus la ĉeeston kaj kompanion de homoj.

— Kia soleco! — ŝi murmuris terurite kaj sentante, ke ŝia koro fariĝas, subite, same aŭ pli malluma ol tiuj profundaĵoj.

---

(1) Maligna = Se temas pri malsano, ĝi signifas gravecon de la afekcio kaj eblan nesaniĝon. Ankaŭ ĝi signifas kvaliton de intence malbona agado.



II
MALLUMO

Ĉe la unua ŝtonfrapo, kiun ili svingis sur la pordon, leviĝis granda bojado de hundoj en la domo. Aliaj bojadoj respondis el ĉiuj flankoj.

Mila, ekterurite, kaptiĝis al la brako de sia edzo, kiu tranvile mokridis pri tio.

— Ili estas la Trumpetulinoj (1), virino; ili ĉion mokimitas, kion ili aŭdas... —

La teruro de Mila kreskis ankoraŭ per tia stranga klarigo,

(1) Trumpetulinoj = Speco de sorĉistinoj.

sed ŝi diris nenion, ĉar el trans la muro proksimiĝis paŝoj, duone sufokataj de la bojoj el ekstere kaj el interne. Malforta ekbrilo etendiĝis super la krestolinio de la muro, plena de vitraj akraĵoj kaj najlopintoj, io peze deglitis laŭlonge de la pordo, kaj post silenta minuto, malpreciza voĉo nature demandis:

— Kiu petfrapas, tiahore? —

— Malfermu, Kajetano... Estas ni. —

— Kiu, vi diras? —

— Mi kaj mia edzino, Kajetano!... Jam vi povas malfermi. —

Fariĝis minuto da silento.

— Kiam vi alvenis? — ree demandis la voĉo el interne.

— Ĝuste nun, ĉar mia edzino falis dumvoje. —

Mila, kiu staris tuj apud sia edzo, demandis al li orelkave:

— Kial li tiel prokrastas?... —

— Li malfidas... — respondis al ŝi Matio en la sama maniero.

La voĉo tuj reprenis:

— Kion vi diras tie ekstere? —

— Mi diras al la edzino, ke vi havas timon... — kaj Matio, elpoŝiginte la tabaksaketon, aldonis ridante: — Rigardu supren, Kajetano: mi transĵetas al vi la ateston... — kaj, efektive, li alĵetis la saketon trans la muron.

Tiam aŭdiĝis la knaro de riglilo, kiu deŝoviĝas, bruo de feraĵo sur la grundo, la peza grinco de ŝlosilego, kiu sin turnas, kaj orlinio traŝiris la pordon de supre malsupren.

— Bonan nokton! — diris Matio, puŝante.

— Bona ĝin Dio donu al ni ĉiuj... — Kaj la pordo larĝe malfermiĝis, kaj malantaŭ ĝi aperis ensuĉita homfiguro kun brilanta falĉileto en la mano. Apud la vireto, okjara infano tenis meĉan lanternon kaj la tabaksaketon.

Matio ekridis, vidinte la falĉileton.

— Vi venis ŝirmita, Kajetano! —

Ankaŭ la vireto ekridis.

— Kompanio estas vivduono, ĉu vi scias?... Cetere, ĉar ĉi-tie pasas pli da vulpoj ol da kaleŝoj, necesas esti singarda!... —

Kaj li lasis surgrunde la falĉileton kiu, ekmoviĝe, alĵetis malbonaŭguran fulmobrilon, li puŝfermis ambaŭ klapegojn de la pordo, ilin alĝustigante per genubato; poste li ŝovis la riglilon, firmigis la pivoton per ĉeno, kiu pendis de la muro, turnis la ŝlosilegon, kiu estis en la seruro, kaj, farinte ĉion ĉi malrapideme, li turnis sin vizaĝe al la alvenintoj, kaj ree ridetis, kunfrotante la manojn.

— Nun ni povas jam interparoli... Mi ĉiam pensis, ke vi alvenos je tiu ĉi horo... Bonvenintaj! Kaj do, kion bonan vi rakontos? —

— Vi povas jam supozi!... Ke ni kunportas preman deziron por kuŝadi... — deklaris Matio; kaj, preninte el la manoj de la infano sian tabaksaketon, li aldonis: — Ni ja ne sciis, ke vi havas ĉi-tie Baŭdilieton... —

— Vi vidos, ermito: mi nostalgiis tute sola en tiu ĉi domego, kaj ekdiris al la infano: — Suprenvenu, ĉar ci faros al mi konversacion! — Kaj li, kondiĉe ke mi rakontu al li fabelojn... ĉu ne? —

Kaj la viro ridetis rigardante la knabon, kaj la knabo ridetis rigardante la viron kaj poste mallevis tute honteme la kapon.

Mila, kiu ne estis malferminta la buŝon escepte por deziri bonan nokton, intertempe esploris ĉion, kion ŝi havis ĉirkaŭe. Sub la malmulta lumradiado de la lanterno ŝi distingis, malprecize, korton ĉirkaŭitan de altaj muroj kaj kuntuŝiĝantan kun domo; meze de la korto ŝi eltrovis la ĉirkaŭbalustradon de putbuŝo, kun la fera akvoĉerpilo tute kurbigita; funde, granda arkado rompis la murlinion de la domo, kaj flanke de la arkado, ĉe la angulo de la korto, estis ŝtuparo el prilaborita ŝtono... Ŝi ne povis vidi ion pli, ĉar la vireto, ĉiam kunfrotante la manojn kaj ĉiam ridetante, estis sin turninta al ŝi kaj al ŝi li parolis:

— Kaj do, ermitino, ĉu fakte vi falis? Kiel tio okazis? Ĉu turniĝis via kapo? —

— Tute ne! pinradiko, kiu min falŝanceligis... ĝi estas nenio... — Kaj Mila palpis sian kontuzitan frunton.

— Ĝi ankoraŭ iomete sangas, vidu; sed, ne estas ja bezo-

ne preni ĥa sakramentojn pro tio, mi pensas... Per iom da tindro ĝi tute kuraciĝos. —

Li sin turnis al la infano:

— Etulo, rekaptu la falĉilon kaj ni ekiru supren... — Kaj ridetante novafoje al la geedza paro, li aldonis: — Mi ja vetus ion, ke vi ankoraŭ ne vespermanĝis, ĉu? —

Matio klarigis de kiam ili nenion glutis; kaj dum ili supreniris la ŝtuparon, — la etulo antaŭe kun falĉileto kaj lanterno kaj la aliaj tuj poste —, la vireto esprimis, ke li tion jam supozis kaj ke, *por tia eventualeco*, li antaŭpretigis vespermanĝon.

— Mi dubas, ermitino, ĉu plaĉos al vi nia manĝaĵo... Se vi ne kunportas bonan saŭcon de apetito! Ni estas, la etulo kaj mi, fuŝegaj kuiristoj... — Kaj la vireto bonvole ekridis.

Mila restis de li ĉarmita. Al ŝi li ŝajnis bona individuo, agrabla kaj servema. Li estis malalta kaj malgraseta, sed li krispigis sian figureton per larĝa kaj mallonga jako kaj pantalono ankaŭ mallonga kaj vasta, el dika kamloto. Plušа ĉapo formanĝis duonon de lia vizaĝo, kaj la alia duono, tute senhara, pli ĝuste ol freŝrazita, ŝajnis denaskiĝe senlanuga. Li iris piedvestita per najlumitaj ŝuoj kaj kviete alpaŝadis. Mila altaksis al li ĉirkaŭ kvardek jarojn.

Eĉ se ŝi ne scius, ke li estas paŝtisto, ŝi tion tuj divenus laŭ la pozoj kaj laŭ la granda malbonodoro je lanbrutaro, kiun li elspiris el si. Tiu malbonodoro, sekve, plenigis la tutan domon: ŝi ĝin flaris jam antaŭ ol frapi sur la pordon, ĝin pli forte perceptis enirante en la korton, kaj nun, rifuĝinta en la altajn ĉambrojn de la domo, kie la liberaero ne povis ĝin forblovi, ĝi fariĝis al ŝi ankoraŭ pli intensa kaj naŭza.

Ili estis transirintaj teraseton kaj paŝintaj en la kuirejon. Tio estis tre granda dompeco, kies muroj kaj plafono, nigrigitaj de ombro kaj de fumo, ŝajnis posteniri, por ke ilin ne atingu la homrigardoj, kaj nur la vigla brilado de kupra aŭ latuna uzilo certe evidentigis, kie ili staras. Sub la kamenkloŝa breto flagris plenmano da fajrorestaĵo, kaj apud la fajrorestaĵo io nigris: plejeble kuirpoto. Fiksita sur siaj kvar piedoj disstarigitaj en la duonlumo, kaj en inerta pozo, la longa tablo similis senkapan bestegon pretan ekataki la enirantojn.

Mila ankoraŭ duone distingis la eluzitan kaj gluecan ŝtonon de lavujo, la pordojn de ŝranko, la farunan kribroturnilon... Sed ĉio cetera restis por ŝi en la mistero: mistero farĉita per surprizoj kaj strangaĵoj.

Dumparole, la paŝtisto ekbruligis ferlumilon.

— Por tiu ĉi nokto mi volas trakti la gemastrojn kiel gastojn. Tial ke la ermitino neniam tramigris tiujn ĉi lokojn, ni devos ŝin instrui pri ili, ĉu ne? Dum ci pretigos la tablon, knabo, mi iros montri al ŝi la domon. Venu, venu, ermitino... — Kaj ĉar, sin turninte, li kvazaŭ rimarkis, ke ŝi balancas tien kaj reen la kapon, li ekhaltis. — Ĉu vi eble timas fantomojn? Estas malbona vermo, la timo, kaj decas ĝin sennestigi. La virinoj estas brave (1) tuŝitaj de tiu ĉi difekto, sed ĉi-tie ni kuracos vin de tio, se Dio volos... —

Kaj li ŝoviĝis apud ŝin por daŭre antaŭeniri. Mila serĉis Mation per la okuloj, sed li estis restinta en la kuirejo.

Ili eniris en grandan salonon, kie ne staris aliaj mebloj krom kesthorloĝo, paro da tabloj kaj kelke da seĝoj. Surplanke, sternita sur la ligna pavimo kaj apudigita al la muro, kuŝis longa trabo, kiu ŝajnis morta serpento. Vidinte tiun senzorge malfermitan salonon, Mila rememoris pri la soleco sur la montoj, envolvitaj de la nigra nubaro de la vesperfino, kaj eksentis timtremojn.

La paŝtisto rakontis al ŝi, ke pasintatempe, en la tagsoleno de la Sanktulo, oni dancadis en tiu salonego, sed ke nun la sinjoro Paroĥestro tion malpermesis, pro timo ke ĝi disfalus, ĉar ĝi estas tre difektita.

Ĉe unu flanko la salono estis blinda, ĉe la alia ĝi havis du pordojn, kaj funde balkonon.

— Ni eniru ĉi-tien, unue. Ĉi estas via dormoĉambro, ermitino. —

Tie staris pretigita lito, kun ovoflava kovrotuko, knedujforma komodo, seĝoj kaj lavopelvo. Tra la fenestro, kiu havis la ŝutron (2) malfermita kaj estis senvitra, eniris frostaera blovo, kiu preskaŭ estingis la lumilon.

---

(1) Brave = Forte, multe, tre.

(2) Ŝutro = Pordeto adaptita al vitra fenestro, taŭganta por gradigi la eniron de la lumo.

— Ĉiam spirhaladzas (1) tiu ĉi diabla Ŝtonego!—

La paŝtisto fermis la ŝutron kaj poste, levinte la lumilon, li montris listelkadran bildon de sanktulo.

— Jen Sankta Poncio, ermitino... Bonega Sanktulo, patrono pri la purigozorgado. —

Mila ekvidis la Sanktulon, episkope vestitan, kun la mitro sur la kapo, la kurba bastono en la maldekstra mano kaj la alia mano suprenturnita, kun du fingroj etenditaj, farantaj la benosignon.

Ili eniris la duan ĉambron: ankaŭ tie staris lito, sed ĉi tiu nepretigita, vestoŝranko, longa tablo kaj sep aŭ ok seĝoj

(1) Spirhaladzas = Ventfuriozas.

kun plektaĵo el tifao. En angulo, spirala ŝtupareto ŝraŭbiĝis supren laŭ la muro, kaj en la fronta angulo la planko malfermiĝis por fari pasejon al alia ŝtupareto, kiu malsupreniris. Ambaŭflanke de la muro, gluitaj per pastaĵo kaj en vid-al-vida pozicio, estis du popolaj kantversaĵoj, identaj, laŭde al Sankta Poncio, kun gravuraĵo, kiu reprezentis la Martiran Sanktulon meze de du rozvazetoj.

— Jen, ermitino: via domo estas jam finvizitita... Por la birdoj, kiom vi nun estas, vi efektive havas sufiĉe da kaĝo, kaj kiom ajn da ili plu venos, ankaŭ... La antaŭaj geermitoj konsistigis familion el ses... sep... ok... Ok enkalkulitaj la idoj kaj la grandaĝuloj, kaj ĉiu havis sian trueton por kuŝadi... Mi nun montros al vi la kapelon, kiu estas vidinda afero, mi certigas... Sed... —

Speco de sonora fulmo pasis en tiu momento super la kapo de la viro kaj de la virino, rompante lian parolon kaj lasante ŝiajn lipojn senkoloraj.

Kajetano ĵetis rideksplodon, kiu zigzagigis la lumilon en lia mano.

— Kioma ridado, ermitino! Tiel certe kiel ekzistas la mondo, vi restis ĉe tio tute timskuita, ververe!... — Kaj iel rekonsciiĝinte, li aldonis kun trankviliga teniĝo: — Cetere, tio ja ne estas timiga afero... Ĝi estas la noktuo de la sonorilturo, kiu esprimas al vi la bonan nokton... Morgaŭ ni povos ĝin vidi: nun ni vane kaŭzus al ĝi konfuzon. Alie, vi estas tro timema, ermitino: mi tion tuj rimarkis kiam mi vin ekvidis... Decas, ke vi ŝanĝu la temperamenton sur tiuj ĉi lokoj, ĉar se ne oni vin enterigus en ilin... La teruron al si faras oni mem, vidu: ĉar la ĉielaj kaj teraj aferoj tre malmulte ja prizorgas pri ni... —

Sed Mila, ridetante por si mem, rememoris la ŝtalfalĉileton en la manoj de la paŝtisto kaj la malfidon, kun kiu li malfermis al ili la pordon.

La ligna pavimo de la salono krakis sub ies piedoj: tio estis Matio, kiu alproksimiĝis, kriante:

— Kie vi estas? kie vi estas? —

Li venis por diri al ili, ke Baŭdilieto jam pretigis la tablon

kaj ke li, Matio, mortas pro sennutriĝo. Mila intencis rapidmove lin sekvi, kiam Kajetano haltigis ŝin.

— Antaŭ ol altabliĝi estas konvene viziti la kapelon. Kion dirus la Sanktulo se vi farus al li malĝentilaĵon? — Kaj li komencis malsupreniri la ŝtuparon kun la lumilo en la mano.

Matio malbonhumore grincigis la langon, sed ŝi, rezignacie ridetante, malsupreniris post la paŝtisto.

Forta mucida odor-ondo venis renkonte al ili meze de la ŝtupareto, kaj kiam, post la lasta ŝtupo, ili penetris en la kapelon, tomba frosto kovris ilin ĉiujn, tute kvazaŭ malseka ĉifonaĵo. Mila ektremis kaj kuntiris la kapon mezen de la ŝultroj.

Funde de la navo, malalta kaj seninterrompa kiel fervoja tunelo kaj, kiel ĝi, plena de mallumo kaj malsekeco, io flagris, kvazaŭ obtuza, nedifinita rebrilo de ĉielruĝo: ĝi estis la ĉefaltaro.

Kajetano estis metinta la kapan plušĉapon sub la akselon, kaj krucosigninte sin kaj montrinte al Mila la pelvon kun la benita akvo, li lante (1) antaŭenpaŝis, genufleksis surplanken antaŭ la altaro kaj faris riverencon. Poste, restariĝinte, li levis tiel alten kiel li povis la lumilon, kaj ĝin promenigis dekstre maldekstren kaj maldekstre dekstren.

Sub la centropunkto de la volbo, ĉirkaŭita de fumnigrigitaj orumitaĵoj, de anĝelfiguretoj kun la *karnetoj* kovritaj de kontuzoj kaj erozioj, de florvazoj kun paperrozoj, kiuj perdis la koloron kaj kies tigoj kliniĝis, Mila ankoraŭ vidis Sanktan Poncion: korpomalgrandan, ventroŝvelintan, kun longa cindrokolora barbego. Lian kapon ornamis la mitro, per unu mano li tenis la kurbobastonon, la alia mano estis suprenturnita, kun du fingroj etenditaj, kaj malsupre de la vestaĵoj, torditaj kvazaŭ blovus granda ventego, li eligis longan piedon, pendantan kaj pintan, kiu similis al la tabaksaketo de Matio, kiam ĝi estas malplena. Tiu estis la tria fojo, en la daŭro de mallonga tempo, kiam ŝi vidis la Sanktulon, kaj neniam ŝi lin trovis tiel malbela kiel nun, kun tia konfuza barbo, tia gravedvirina ventrego kaj tia deformita piedo, kiu ŝajnis nenatura. Al Mila li kaŭzis strangan malagrablan impreson, inter naŭzan kaj ango-

(1) Lante = Malrapide.

ran, kaj neniam plu ŝi memoris, ĉu la Patro-Nia, kiun ŝi estis sencele komencinta preĝi al li, alvenis aŭ ne al la fino.

La kapelo estis plena de tremiga frosto, kiu al ili traboris la karnon kaj movigis la kolon mezen de la ŝultroj.

La paŝtisto estus dezirinta ĉion montri al Mila plendetale, sed vidinte, ke Matio maltrankviliĝas, li tion preterlasis.

— Tion ni daŭrigos alihore, ermitino... Ĉion vi vidos iompost-iome, ĉu ne? — Kaj dum li pasante duonvidigis al ŝi la grapolojn el eksvotoj (1), kiuj pendis sur la muroj — pentritaj tabuletoj, kruroj kaj brakoj el flava vakso, lignaj lambastonoj, senkoloriĝintaj hartufoj... ĉiuspecaj rancaĵoj plenaj de malbonodoro kaj anobio, kvazaŭ embarasaj objektoj en forlasita mansardo, — li pasis malantaŭ la ĉefaltaro kaj eliĝis tra pordeto.

Mila retrankviliĝis, kvazaŭ ŝi estus ĵus forkurinta el karcero. La pordeto donis eniron al la sakristio, plena de malnovaj kestoj kaj kripligita uzilaro, kaj la sakristio al alia dompeco, egale plenŝutita per rubaĵoj, polvo kaj araneaĵoj. Apenaŭ ili eniris ĝin, ilin ekatakis grandaj bojoj kaj furiozaj gratkrakoj malantaŭ la pordo, kiu vidiĝis en la fundo.

Mila faris paŝon malantaŭen, kaj Kajetano kriis:

— Ha, Strigo (2), se mi vin kaptos! Ĉu ci volos meti punkton al cia langego de publika anoncisto? — Kaj li deŝovis la riglilon de la pordo.

La hundo alsaltis lin, kvazaŭ volante lin formanĝi.

— Neniel posteniĝu, ermitino: ĉio estas fantazio... —

Sed la hundo surde gruntis, rigardante la eksterulojn, kaj tiam Kajetano, mankaptinte ĝin je la kolrimeno, ĝian muzelon (3) trenis ĝis la jupo de la virino.

— Kio al vi estas, ruktobesto? Ĉu ci riproĉas la mastrinon? Priflaru ŝin plene, kaj se ci rebojas!... —

Li ĝin minacis per la mano, kaj la hundo ĉesis grunti.

Ili staris en la stalo. La granda varmo kaj la vigleco de la haladzo haltigis la spiron al la virino, kaj ĉi tiu povis vidi

---

(1) Eksvotoj = Votoferoj, danko-memoraĵoj.
(2) Strigo = Nomo de la hundo.
(3) Muzelo = Nazego aŭ lipego de besta vizaĝo.

konfuzan blankecon etendiĝantan de unu flanko al la alia, kiel neĝosternaĵo en nigra nokto.

— Ĝi estas mia ŝafinstruejo — rimarkigis la paŝtisto ridetante. — Ŝafida bando falinta el la Limboj (1), jen vidu... Morgaŭ mi montros al vi la ŝafinojn de la Sanktulo: la plej belkonstruitaj el ĉiuj. —

Ĉe la alia ekstremo de la stalo reliefiĝis la kortarkado, konturita en la mallumo per la noktaj lumfiltriĝoj; ligna palisaro malhelpis al la brutaro ĝin trapasi.

Ili trairis meze de ĉi tiu, sekvataj de la hundo. Mila ne havis sufiĉe da manoj por suprenlevi sian jupon, kaj ĉiufoje, kiam ŝi piedpremis la molajn fekaĵobuletojn sur la planko, nevola ekskuiĝo fermigis al ŝi la okulojn.

La brutaro kuŝadis kunamasigita, en grupoj; sed kelkaj ŝafinoj, stare, rigardadis la lumilon per gapaj okuloj. La virŝafo elĵetis longan treman blekon kaj faris kelkajn paŝojn kun demanda pozo.

— Kion ci volas, reĝo Herodo? — demandis ĝin la paŝtisto, haltinte momenton por grati al ĝi la ĝiban kornfrunton. La virŝafo ĝue klinis la kapon, kaj Mila povis admiri en ĝi la fortikecon de la svelta spiralforma kornaro.

— Ĉu estas vero, paŝtisto, ke tiuj ĉi bestoj estas tiel frenezaj? —

— Brave frenezaj, bravege, ermitino... Se ilin oni ja ne kondukus tute kapaltere!... —

La paŝtisto postenigis la hundon, malfermis la palisaron, ili eliris al la korto kaj suprengrimpis la ŝtuparon.

— Kia malvarmo! — ekkriis Mila, rigardante ektremigite la ĉielan serenecon.

— Tute ne! Ĝi estas vetero dolĉa kiel mielĉelo, ermitino! Sed okazas ke, kiam oni eliras el tiu forno, ŝajnas, ke eĉ terno povas malvarmumigi.

— Jes ja estas varme, interne. —

— Tion ne tute kredu! Mi pli amas la varmon de mia ta-

---

(1) Limboj = (rel.) Loko, kie estis haltigitaj la animoj de la justuloj atendantaj la elaĉeton de la homa gento; loko, kien iras la animoj de senpekaj infanoj, kiuj mortis ne ricevinte la bapto-sakramenton.



bernaklo (1), kun kvar trunketoj de pajlo ĉi-tie, ol la plej molan liton kun sep matracoj en la altetaĝaj ĉambroj, vidu! —

La kuirejo aspektis alie. Verdlada petrollampo, kun la konko rebrilanta, kiel manpleno da diamantoj, aspektigis ĝin tute gaja. La tablotuko etendiĝis sur la tablo kaj, supre de la tablotuko, supujo kaj kvar flavaj teleroj ŝajnis, kvazaŭ poluritaj orpecoj.

La paŝtisto blovestingis la lumilon kaj ĝin pendigis sub la kamenkloŝa breto.

(1) Tabernaklo = Kuŝejo.

— Ĉu ni alsidiĝu, geermitoj? Vi sendube jam sufiĉe fastis, mi pensas... — Sed li eksilentis, tute surprizite.

— La supujo malplena!... Kion tio signifas, etulo? —

La malgrandulo, tute ruĝiĝinta, ridetis frotante al si la orelon per la ŝultro.

— Mi vetus ion, ke ci forgesis pri tio? Malbenata memoro... Kaj fakte ni ja ne povas ĉerpi rekte el la poto; ni efektive brogus al ni la lipharojn... —

Kaj tion dirinte, li iris al la kameno, alportis la kuirpoton kaj enversis la supon. Leviĝis supren granda aromo kaj blanka kirlonebulo, kvazaŭ la supujo estus vazo kun florantaj konvolvuloj. Ĉiuj snufis kun ĝuo.

— Kia bonodoro! — kriis Mila, surprizite.

— Jen paŝtista supo, ermitino — respondis Kajetano irante reporti la kuirpoton. — Ajlero, burĝono de timiano, kvar gutoj de olivoleo kaj sufiĉa kunbolado. Ni, la viroj, ja ne scias fari iel belajn komplikaĵojn kiel vi... —

Sed, malgraŭ tiuj vortoj, Mila perceptis, ke tiu supo havas ĉiajn bongustojn: je ĉiu kulerpleno, ŝi sentis reveni al si la perditajn spiritojn, kaj kiam nenio plu restis en la telero, ŝi levis al la ensuĉita vireto siajn okulojn malsekajn pro dankemo kaj plenajn de granda admiro. Kia bonŝanco esti tie renkontinta tian bonan animon! Kiamaniere ŝi estus sin aranĝinta la unuan nokton, se ŝi devus prizorgi ĉion, sola?

Post la supo, Kajetano alportis kaserolon da rizo kun gado. Ĉe tio duonrido elŝteliĝis el Mila: ĉiu rizograjno ampleksis fingrolarĝon.

— Jen merita afero! — deklaris la paŝtisto, kontentigite.— Tiu ĉi plado da nutraĵo distaŭzis al mi nokton da dormado. Mi meditis: kion mi faru, ke ĝi povu esti manĝoplaĉa al ili...? Nenio venis en mian kapon, kio estus valora, kaj dum mi pripensis, pripensadis, min ekkaptis la matenkrepusko. Mi jen tiam desaltis de la litaĵo kaj, lasinte, ke la etulo ronketu, mi malsuprenvenis al la Knabino, trafis la patrinon de ĉi tiu knabo, ni havis kunsidon, kaj ŝi min eltiris el la embaraso. —

Li paŭzis por engluti tri aŭ kvar forkoplenojn.

— Cetere, tio ja ne havis tiel malbonan rezulton, kiel oni

povus supozi... Ĉu ne, ermitino, vi kiu estas kompetenta en tio? —

La apetito faris miraklojn, kaj ĉiu trovis la rizon ĝuste kuirita, malgraŭ la kuirprocedo.

Post la vespermanĝo, la malĝojoj de Mila estis grandparte forblovitaj kaj la malordo en la ermitejo jam ne ŝajnis al ŝi tiel granda, nek la soleco sur la montoj tiel absoluta. En la personeto de la nekonata paŝtisto ŝi perceptis, kvazaŭ familian brulrestaĵon, agrablan kaj revivigan.

Si kuŝkovriĝis kun tia impreso; sed la fremdeco de la lito, ĝiba kaj sennivela, la forto mem de ŝia laciĝo, la obtuza, sed ne haltigebla bruo de la Akvo-Muĝulo de Sankta Poncio, kiu filtriĝis tra ĉiuj flankoj en la ĉambron, kaj la penetrantaj sibloj de la noktuo en la sonorilturo malebligis al ŝi fermi la okulojn dum multaj horoj. Kaj kiam ŝi endormiĝis, jam matenhore, ŝi ricevis turmentan sonĝon. Ŝi sonĝis, ke ŝi foriras el la ermitejo por reveni al sia lando, malsupre de la montoj: nur ke, ju pli da montoj ŝi postlasis, despli multaj aperis antaŭ ŝi kaj neniam ŝi finis ilin tute postlasi. Ĝis kiam, vojirante ĉiam pli, ŝi malproksime ekvidis malgrandan lumhelon. — Dank' al Dio! — ŝi pensis. — Tio estas la ferlumilo de la paŝtisto... — Kaj ŝi daŭre malsupreniris tute animite. Sed, estante proksime de ĝi, ŝi rimarkis, ke tiu lumpunkto, kiu abrupte fariĝis duobla, ne estas la lumilo de la paŝtisto, sed la okuloj de Sankta Poncio: de Sankta Poncio de la kapelo, kiu plugas olivarbejon, kun unu mano ĉe la plugilo, la alia suprenturnita, kun la du fingroj rigidaj kaj oblikve trenante la piedon, tiun grandan deformitan piedon, kiu ŝajnas la tabaksaketo de Matio... Mila, vidinte la Sanktulon, intencis forkuri, sed la Sanktulo ŝin haltigis, kaj ĵetis sur ŝian kapon ruĝajn beretojn, kiuj estis beretoj de rusko; kaj ŝi, sentinte ke tiuj beroj descendas ĝis ŝia buŝo, sin demandis, kun teruro, ĉu ŝi havas la kranion truita. Sed ne: la beroj rulfalis tra la brova interarkaĵo, kiu estis malfermita kiel fenestreto, kaj rulfalante ili produktis al ŝi tiel vivan doloron, ke ŝi petis pro amo al Dio la Sanktulon, ke li ĉesu plu ĵeti da ili al ŝi. Kaj tiam la Sanktulo ekridis per grandaj ridoj, skuante la gravedvirinan ventron, kaj dirante al ŝi, mokeme: — Ermitino, ermi-

tino, ermitino!... tiu nomo, kiu al ŝi kaŭzis tioman ĉagrenon. Vidinte tion, Mila sentis, ke ŝia koro rompiĝas, kaj komencis senkonsole plori; sed la paŝtisto, karesante ŝin kiel infanon, forvišis al ŝi la larmojn, dolĉe susurante: — Ja ne havu timon... ni aplikos tindron al tio! —



III

HELECO

ELIRINTE al la teraseto de la salono, Mila elreviĝis: ne brilis suno! La fera balustradeto sekreciis ruston, kiu, se ŝi ĝin ektuŝis, ruĝigis al ŝi la manojn; la platŝtonoj de la korto estis tute malsekaj, kaj perlis la roso ĉe la vitraj akraĵoj alfiksitaj sur la nigrigita krestolinio de la altaj muroj.

La frosta venteto de la mateno ŝajnis plena de pikiloj, kiuj pikvundis la haŭton.

Mila orientiĝis: maldekstraflanke, ŝi havis la pordon de la kuirejo; dekstraflanke, ĉe la kontraŭa ekstremo de balkona koridoro kaj ĝuste sur la ŝtuparo, estis nova pordo, kiun ŝi ne rimarkis la antaŭan vesperon; ĝi estis fermita per riglilo.

— Ĉie estas rigliloj en tiu ĉi domo — pensis ŝi, laŭ tiuj, kiujn ŝi jam estis vidinta.

Ŝi deŝovis ĝin, kaj troviĝis sur alia teraso longa kaj larĝa, kiu donis vidon al la sudo. Ŝi malprecize jam konis tiun teraseton, laŭ la klarigoj kiujn al ŝi faris Matio, sed ŝi ne pensis, ke ĝi estas tia. Laŭ ĝia tuta longo, eksteraflanke, kuris mureto kava kaj plena de tero, kie libere implikiĝis faskoj el juna foliaro. Okcidente, taŭgis al ĝi kiel balustrado la elstara korpo de la ĉambroj, kaj ĉiuflanke, fendita kuvo, ĉirkaŭbarita per ferringegoj, utilis kiel terpoto al rakita arbaĉo, plena de sekaj branĉetoj tondendaj kaj de novaj burĝonoj apenaŭ krevintaj. Matio estis rakontinta al ŝi mirindaĵojn pri tiu teraso kaj pri la vido kiun ĝi havas: sed por ŝi ĝi estis nova elreviĝo.

La tuta teraso ŝajnis sekrecii, same kiel la balustradeto de la koridoro, kaj oni dirus, ke la muroj, dekrustiĝintaj kaj kun la antikva stukaĵo plena de malhelaj makuloj, suferas pro kancero. La kahelpavimo rememorigis al ŝi najbarinon el ŝia lando, kies dentaro staris tute dismovita, kun ĉiu dento iranta laŭ sia bontrovo. Tiel same tiuj kaheloj: premplatigitaj, konsumiĝintaj, roditaj kiel musmordita fromaĝo, ilin verde dismakulis la glitiga musko kaj ĉiujn ellevis la agropiro (1), kiu premŝtopis la larĝajn juntojn.

Kaj pri la vido? Mila longe promenigis la rigardon. Ĉio, kion ŝi vidis estis samkolora: el kompakta kaj pala cindra grizkoloro. Griza la melankolia ĉielo de sensuna tago; griza la granda monto, kiu iris renkonte al ĝi tie en la altaĵo; griza la peza nubaro, kiu malsupre de la montomezo ĉion enkaŝis, formojn, limojn, horizontojn...

Nur kliniĝinte trans la balustradon, oni vidis ion malsaman: sur la malglataj deklivoj ĉirkaŭ la ermitejo, kreskis plantidaj pinaĉoj, arbustoj el kermokverkoj kaj kelkaj tufoj da implikitaj rubusoj, kiuj disdividis inter si la grundon, kaj peco da ruiniĝinta muraĉo ĉi-tie, altaĵo sen multa belaspekto pli malsupre, estis la ĉefaj ornamaĵoj de la vidaĵokadro.

Mila memoris la malbonan korinklinon, kiun ŝi ĉiam havis por la ermitejo; memoris la konfuzajn viziojn dum la antaŭa

(1) Agropiro = G. de gramenacoj (agropyrum).

tago, la songon mem dum la pasinta nokto, kaj... ŝi foriris de la teraso timante devi lavi al si la vizaĝon per frumatenaj larmoj.

Ŝi staris ĉe la pordo, kiam ŝin surprizis stranga resono, speco de longigita bleko, kiu ŝajnis eliri ĝuste el tie kaj samtempe veni de trans la monto... Ĝi finpasis. Surventre kuŝante sur la cisternbuŝa balustrado, kun duonkorpo interne kaj la kruroj pendantaj ekstere, Baŭdilieto vekis la eĥojn.

— Aaaah!... — li pafis, ampleksante kiom li povis la sonon de sia voĉo; kaj — Aaaah!... — respondis al li aliaj misteraj sonoj, kiuj longe sonoris sub la volbo. Kaj la knabo, preskaŭ kaprenverse, gaje krurbaraktis.

Mila lin rigardis kun veo en la koro, timante vidi lin fali en la cisternon. Sed en tiu momento eksonis alia voĉo, tiu de la paŝtisto, kiu eliris el trans la stalo.

— Etulo! Ha, se mi vin ekkaptos! — Kaj la paŝtisto eliris, diligente, por lin admoni duonvoĉe. — Ĉu ci do ne scias, vepra birdo, ke supre oni dormadas, dum ci pepas kun tia akcento? —

— Sed ja ne ĉiuj, paŝtisto... Bonan tagon! — salutis Mila, malsuprenirante la ŝtuparon.

— La ĉielo min prenu!... Ĉu ĝi estas vi, ermitino?... Bonan tagon Dio donu al ni! Mi kalkulis, ke vi ankoraŭ troviĝas inter la littukoj... Cetere, tio signifas, ke vi ja ne tre plezure dormis, ĉar vi leviĝis tiel frue... —

Mila konjektis, ke li eble pretigis la liton, kaj ne volis lin ofendi.

— Jen mi ja deziris vidi la domon. —

— Ha, bele! Se nur tio ĝi estas, vi ja ne multe malpacienciĝos... Kaj la ermito? —

— Li estis tiel laca, ke li kuŝturniĝis aliaflanken por plua tempospaco... —

La paŝtisto ridis pri tio, kunfrotante la manojn.

— Bone, bone!... La ermito havas alian temperamenton ol vi, mi pensas... Li ĉion prenas kun flegmo, kaj vi estas nervofasko... Ĉu mi eraras? —

Mila faris ridan geston por kaŝi la ĉagrenon kiun al ŝi kaŭzas, ke ĉiu konas la konduton de Matio.

— Malbona afero la nervoj, ermitino — esprimis plue la paŝtisto — Ili forskuas la kvieton kaj punas la prudenton... Mi kredas, ke via edzo tion pli bone komprenas. La zorgoj estas paperaj flugdrakoj: ju pli da fadeno oni liveras al ili, des pli malproksimen ili flugas... Sed nun mi pensas, ke vi bezonas matenmanĝi, kaj jen mi staras ĉi-tie klakigante la mueldenton... (1) Ni eniru, eniru ĉi-tien internen... —

— Mi ja ne havas apetiton, paŝtisto... —

— Kion tio signifas? Ĉu vi do pensas pentofari, eble? Decas ion gluti por reakiri la energiojn, kaj supre ne estas eĉ kvanteto da fajrorestaĵo por ekbruligi la pipon... Knabo, donu al mi la bovlon... Mi melkos por vi sorbon da lakto. —

Mila intencis protesti, sed la paŝtisto ne dediĉis al ŝi atenton.

— Ni jam senlaktigis la kaprinon kunhelpe, la etulo kaj mi, vidu... Por hodiaŭ la lakto devos esti el ŝafino... — Kaj ekpreninte unu je la posta piedo, li kaŭriĝis kaj komencis la melkadon.

La laktoradioj, rektaj kaj maldikaj kiel eburaj pingloj, impete faladis, jen el unu mamo, jen el la alia, kaj la vazo pleniĝis kun rapideco de neĝosimila ŝaŭmo, per likvaĵo, kiu elfumis kaj iel kraketis. Kiam ĝi estis plena ĝisrande, la paŝtisto stariĝis, per ekblovo ĵetis teren la tutan ŝaŭmon, kaj prezentis la bovlon al Mila. Ekstrema naŭzo surprizis la virinon: la lakto odoris ŝafine en unuhora distanco, kaj en la taso ekzistis signoj, ke iuj jam trinkis el ĝi: sed la paŝtisto ĝin prezentis kun tia bonvolo, ke Mila ne havis koron por ĝin rifuzi. Ŝi ĝin prenis kaj tute senspire ĝin malplenigis, superregante sin por ne fari signifan grimacon.

— Hojda! Vi vidos kiom tuj reviviĝas tiu ĉi vizaĝeto via tiel pala! Cetere, tial ke la ermito dormas, estos profite, ke ni unue esploru la eksteraĵojn... —

— Ĉu vi ne devas elstaligi (2), hodiaŭ? —

La paŝtisto ekridis.

— Estas tro frue, tamen! Ni devas atendi, ke la rososter-

(1) Klakigante la mueldenton = Longe babilante.
(2) Elstaligi = Elkonduki la brutaron por ke ĝi sin paŝtu.

naĵoj iomete forigu... Ĉi-supre ja ne okazas kiel en la ebeno, kiu tuj ŝajnas forno... Hodiaŭ ni ja ne havos sunbrilon ĝis la deka... —

—Ĉu vi certe kredas, ke je la deka la suno brilos? —

— Mi opinias ke jes; mi ne volas aserti, ke ĝi brunigos nian vizaĝon, vi scias?... Tamen, ia pluvoverŝo... — Kaj rigardinte supren, li aldonis: — La nubovualo estas maldika... —

— Ho, se ĝi brilus almenaŭ iomete!... — ekkriis Mila, kunigante la manojn. — Se brilus suno, ĉio ŝajnus alia afero... De sur la teraso tiu nubaro kaŭzas tian ĉagrenon! —

La paŝtisto ankoraŭ ridis.

— Je ĉiuj sanktuloj! Mi jam vidas, ke vi neniel estas montaranino, vi, ĉar la nubaro vin timigas. Al mi, vidu, ĝi liveras plaĉon kaj diktas tiajn pensojn, tiajn pensojn, la nubaro!... Mi amas promeni tra la sunplenaj suproj kun la grego, kaj de tie vidi pluen, sub mi, la tutan mondon vinditan de la nubovaporo... Estas vojoj kie mi aŭdas voĉojn, profundajn voĉojn, kaj ne vidas estaĵon, kaj mi pensas pri la feinoj, kiuj sin spegulas aŭ kiuj lavas sian tolaĵaron ĉirkaŭ la gurgo (1)... Estas bela afero la nubaro; ne dubu tion, ermitino! —

Interparolante ili supreniris al la kuirejo, kaj dum la paŝtisto ekbruligis fajron, Mila tratranĉis panon por la supo kaj pendigis la kuirpoton sur la kamenhokoj; poste ili reiris malsupren, forŝovis stangon kaj feraĵon de la ekstera pordo kaj eliris post la knabo kaj la hundo kiuj, senbride, impetis supren tra la senkulturejoj, ĵetante tranĉajn kriojn kaj bojojn.

La ermitejo leviĝis meze de deklivo, kiu glitkuris inter akcidentoj, ĝis la Montokolo. Dekstre mallumis, iel apartigite, la pinaroj sur la deklivoj, kiuj konturiĝis kaj maldensiĝis supren de la Granda Ŝtonego, kaj maldekstre la deklivo altiĝis ĝis la kalva montokresto de la Meza Ŝtonego. En la kavo de la profundaĵo estis terpecoj plataj en formo de ŝtuparo, kun dismetitaj olivarbetoj ĉe la fino, kaj pli proksime migdalarboj, kiuj vigle verdis sub la griza ĉielo, kvazaŭ ili estus ankoraŭ teruritaj de sia pasinta elflorado.

---

(1) Gurgo = Profunda kavo en la kuŝujo de kuranta akvo, kie tiu ĉi stagnas aŭ malakcelas sian fluon.

Je kvar ulnoj de la ermitejo, staris la duonruiniĝintaj muroj de stalo, kun du putoj sen balustrado kaj grandaj profundaj basenoj, plenaj de pluvakvo, tie apude; kaj malantaŭ la stalo, la deklivo larĝiĝis tute striita de cistaj (1) arbedoj kaj florantaj rosmarenoj, en kies mezo elstaris, simile al grandaj blankaj koraloj, du figarboj, kiuj rigide etendis siajn mil fin-

(1) Cisto = G. *cistus*, familio Cistacoj, specioj diversaj, inter kiuj elstaras: *Cistus creticus* kaj *cistus laurifolius* kun blankaj floroj kaj *cistus crispus* kun floroj de purpura koloro; krome estas la *cistus albidus* kun rozkoloraj floroj, k.a. La kunteksta cisto apartenas al unu el la du unuaj.

graĉojn torditajn kaj interstreĉitajn, kvazaŭ de podagrulo. Ĉe la fino de ĉio ĉi, kaj mezvoje de ambaŭ Ŝtonegoj, pufiĝis glata kaj dikbaza monteto, speco de ĝibo de tiu longa granita skeleto, kiu baris la fundon.

Ili malsupreniris la ŝtupareton, kiu kondukis al la bedoj, en kies enirejo du centjaraj cipresoj sin interplektis, kiel du ebriaj gigantoj, kiuj ĉirkaŭprenus sin reciproke tie sur la supro kaj konfuzus siajn verdajn tunikojn, ŝiritajn tie ĉi kaj tie de la ungegoj de la tempo.

— Vidu, ermitino, kia selekta kulturgrundo!... Mi uzis iom de mia superflua tempo supraĵe fosi ĝin, kaj la ermito tuj povos tie planti, kion li volos. Se vi estus pasintatempe vidinta tiujn ĉi migdalarbojn, vi estus sentinta ĝuon: mi tion certigas al vi... Ili ŝajnis la montoj el Francujo en vintromezo: ĉio estis florblankaĵo... Atentu, atentu, kian floran jupplenaĵon ili portas... —

Sed la atenton de Mila vokis la izolita monteto sur la fono.

— Kio estas tio tiel stranga, paŝtisto? —

— La Elefanto... Hej! (1) la ĉi-tiea loĝantaro ĝin alnomas la Floko, sed mi konsideras, ke al ĝi pli bone sidas la alia nomo; laŭ la simileco, vi scias? — Kaj ĉar Mila konfesis, ke ŝi ne scias kio estas elefantoj, la paŝtisto tion al ŝi klarigis.

— Ili estas la bestegoj plej grandaj, kiuj tretas la teron, prezentu tion al vi: ĉiu ilia piedego estas kiel pino, vidu, la haŭto tute skvama, kaj kio kaŭzas pli da impreso, tio estas ke ili havas du vostojn, unu malgrandan, kiel la ceteraj bestoj, kaj unu grandan, grandegan, kiu ĝuste pendas antaŭ ilia vizaĝo... —

Mila ekrigardis la paŝtiston: li aspektis serioza, ne rikanis. Sekve, Mila sin demandis kun surprizo, ĉu tiu viro estas same trotaksema kiel Matio, kaj la admiro kiun ŝi sentis al li ricevis ekskuon.

— Foje mi renkontiĝis kun ili survoje al Murono, apud trupo da homoj, kiuj ludis komediojn sur la vilaĝoplacoj. Abrupte ili donis al mi timegon, vidu, sed poste mi estus ŝa-

(1) Hej = Interjekcio por sekvigi reĝustigon, limigon, kontraŭopinion, kc. de aŭ pri esprimo antaŭe elmetita.

tinta havi unu tian por fantazio... Bravaj bestoj, certe!... Mi ne plu vidis da ili, malgraŭ ke de tio, kion mi rakontis jam forpasis multopo da jaroj: mi ankoraŭ estis fraŭlo... —

Mila ekhaltis, surprizite.

— Ĉu vi estas edziĝinta, paŝtisto? —

— Vidvo, ermitino. —

Ili malsupreniradis tra glitigaj montoskrapitaĵoj (1), kaj li etendis al ŝi la manon, por ke ŝi ne ekfalu: poste li, ripoze, komencis rakonti:

— Jen mi apenaŭ estis malsuprenveninta de mia regiono ĉitien kaj gardozorgadis la brutaron ĉe la farmodomo de Sankta Poncio, kaj okaze tie loĝis servistino bela kiel florkruĉeto. Mi ŝin fikse rigardis dum semajnoj kaj semajnoj, ĝis kiam, iutage, mi ŝin haltigas solece, kaj al ŝi ekpafas: — Senkomplimente, Lucia, ŝajne konvenas al mi edzino... Ĉu fakte konvenus al vi edzo? Kaj ni tuj venis al interkonsento, sen multa interbabilado, vidu! Ŝajne ŝi anticipe karesis ankaŭ similan penson, jam de longe... Kaj jen kiel mi rulfalis al edzoligiĝo... Ŝi estis pli malpli parenca al la bofilino, kaj ĉar mi prizorgis iliajn domkalkulojn tute precize, ili plendecide volis, ke ni restu en la domo, kiel ĝis tiam, ĝis ni ne plu povos tion daŭrigi, kaj jen ni enloĝiĝis tie... Bonaj homoj, ermitino, tiuj el Sankta Poncio!... Kiam min trafis la malfeliĉo ilia konduto korŝiris... Tial mi sentas al la farmodomo korinklinon: ŝajnas al mi, ke ĉiuj farmdomanoj ankoraŭ estas por mi io kara... —

— Kaj via edzino, paŝtisto? — demandis Mila, kompreninte, ke tiu konversacio plaĉas al la vireto.

— Mia edzino daŭris nur ok monatojn, ermitino! Bedaŭrinda virino, fakte, ĉar ŝi estis el kupelita (2)oro!... —

La paŝtisto faris longan paŭzon, kaj poste reprenis:

— Unu tagon oni estis puriginta je sterko la stalon, kaj la ĉaro staris ŝarĝita meze de la enirejo, preta ekmarŝi: ŝi faris movon por eliri... la ĉevalo ekpaŝis, kaj la ĉaro ŝin premkaptis inter la fosto de la pordo kaj la aksingo de la rado... —

— Sankta Virgulino! —

---

(1) Montoskrapitaĵoj = Skrapitaj montorandoj.

(2) Kupeli = Purigi metalojn ĉe la krisolo (fandujo) aŭ ĉe la kupelvazo.

— Oni diras, ke ŝi faris krion kaj tordiĝon! —

La paŝtisto mallevis la kapon, kaj poste malrapideme aldonis, per malpreciza voĉo:

— Tuj alkuris ĉiuj; sed ĉar ŝi jam troviĝis en tre progresinta gravedstato, ili sendis kurieron al la kuracisto, kaj komisiis al la knabo min serĉi sur la monto... La alia alvenis unue... Kiam mi eniris, mi jam aŭdis la kriegojn... kvazaŭ de besto kiam oni ĝin buĉas... Tio terurigis... Kaj supraĉambre oni montris al mi anĝeleton, kiu enhaviĝus ĉi-tie, en la kavo de la manoj... Li estus povinta fariĝi karmezina rozo, la dorlotindulo!... Dio ilin pardonu!... —

Mila ĵetis kompatan ekrigardon sur la vireton: li havis la okulojn ruĝaj kaj la lipojn kunpremitaj.

Ŝi demandis, por ion diri:

— Kaj vi ne edziĝis denove? —

La paŝtisto batis la palpebrojn kaj malfruis por respondi.

— Mi ja ne havis koron, ermitino!... Ĉiam mi aŭdas tiujn hurlojn interne de la orelo kaj vidas la anĝeleton antaŭ la okuloj... Dio scias kion Li faras, kaj ni fakte estas ne pli ol polvograjnetoj, sed... tiu okazaĵo!... —

Kaj la paŝtisto skuis la kapon, kvazaŭ li ankoraŭ ne scius rezignacii pri tiu malfeliĉo.

Nun Mila rigardadis lin aliaspekte. Ankaŭ tiu kvieta kaj ridema viro estis pinĉita de la dolor-vipuro, kaj, malgraŭ tiom da jaroj kiom forpasis, lia vundo ankoraŭ sangas. Kaj li, tamen, nek plendas nek ĉiam ploras: li havas la spiritĉeeston akcepti la vivon tia, kia ĝi venas, kaj memori ankoraŭ pri la proksimuloj. Li do ne estas, ne, samspeca kiel Matio, kaj se li asertis, ke li vidis la elefantojn, tio sendube estas certa kiel li esprimis.

Ili estis promenintaj laŭ la ĉirkaŭaĵoj de la ermitejo kaj malsupreniris al la pinaroj, tra inter elstaraĵoj kaj mallarĝaj ombraj kavegoj.

Ŝajnis, ke la Alta Ŝtonego disfalos super iliaj kapoj, kaj la malproksima ululado, kiun Mila aŭdis dum la tuta nokto penetrantan ŝian ĉambron, rapide proksimiĝis al ŝi, malvigligante

la ridojn de la knabo kaj la bojojn de la hundo, kiuj petolis jen antaŭen, jen malantaŭen.

— Kien ni iras, paŝtisto? — demandis la virino.

— Al la Akvo-Muĝulo, ermitino. Mi aŭdis vin paroli pri ĝi, kaj volas ĝin montri al vi prefere ol ĉion. La tiea akvo estas pli bona ol tiu de la ermitejo: akvo brave saniga, certe... Okaze de la tragedio, kiun mi ĵus al vi rakontis, mi tiris el ĝi helpon. Mi tiagrade venis al velkostato, ke la sinjoro kuracisto el Murono travivis maltrankvilon; kaj Sankta Poncio, tute sola, min fortiris el la perturbiĝo... Jen kuraĝa Sanktulo, Sankta Poncio, ermitino!... —

Mila refoje memoris la pasintnoktan sonĝon kaj la groteskan Sanktulon, kun unu mano ĉe la plugilo kaj ĵetantan al ŝi per la alia la ruskoberojn al la frunto. Ŝi ektremis kaj senkonscie metis la manon sur la vundon.

La paŝtisto tion rimarkis.

— Tio aranĝiĝos per si mem, ermitino. La vundo cikatriĝis, kaj baldaŭ ĝi aspektos, kvazaŭ nenio okazis. —

La vojeto, kurbiĝoplena, resaltadis, malsupreniĝante meze de krutrokoj, unuj akraj, aliaj defalintaj de la monto, kaj la bruo de la Akvo-Muĝulo obstine frapsaltis de unu al la alia, kiel enkaĝigita sovaĝbesto, kiu volus sin forsavi.

Mila staris meze de mallarĝa deklivo, kiam ŝi sentis ke, per ekscitita kuro alfalas sur ŝin, la Strigo, la hundo de la paŝtisto.

Ŝi rapide apudiĝis al roko kaj la hundo preterpasis kiel kuglo je tuŝeto de ŝia jupo. Baŭdilieto, supre de la grimpejo, krevis de rido.

Mila turnis la kapon, ĝin suprenlevante, kaj vidis preskaŭ inversa la spritan vizaĝon de la etulo, kun liaj verdaj okuloj kaj la haŭto tritikkolora. La knabo subite ĉesis ridi, kaj ruĝiĝis, kaj Mila, ankaŭ subite, eksentis, ke febrofluo bruligas al ŝi la internaĵojn. Vidinte ŝin haltinta, la paŝtisto, kiu sin trovis jam malsupre, diris al ŝi ion, kaj Mila rapide finmalsupreniris.

Momenton ŝajnis al ŝi, ke la monto ŝin englutas aŭ ke ŝi eniras alian kapelon. Mallumo, frosto kaj malsekeco ŝtopis profundaĵon, kavernon gratitan en la monto. Funde de tiu ĉi

kaverno kaj je tri metroj super la ternivelo estis fendo — la buŝo de kanalo, kiu mistere tordiĝis en la montofundo, nekonata de la homoj — kaj de tiu fendo faladis radio el fandita arĝento, kiu, formante grandan nebulon el pulvoriĝinta akvo, dissplitiĝis sur cisternon, kiun ĝi mem estis traborinta en la rokvejno. El la cisterno ĝi elverŝiĝis, vezikiĝante, por enabismiĝi alifoje en fluetojn distaŭzitajn pro la mallarĝeco de la torentdeklivo, en serĉo de la pli granda torento, kiu ĝin forkondukos al la ebeno.

— Kiel klara akvo! — ekkriis Mila kun ĝuo.

— Alia, pli bona, ne ekzistas en la mondo, ermitino — entuziasme respondis la paŝtisto. — Bone tion pripensinte, ni estus povintaj kunporti la akvokruĉetojn por trinki da ĝi. Sed mi volas averti vin pri unu afero: trinku neniam el la akvo de la Baseneto... en ĝi sin banas malsanaj personoj kaj bestoj, kaj kvankam la Akvo-Muĝulo ĉion forlavas ĉiutage, ĝi estas abomena, ĉu ne? —

— Kio estas la Baseneto, paŝtisto? —

— Tiu ĉi tuta kluzo, kiu kolektas la grandan akvokunfluon!... Interne ĝi formas, kvazaŭ konkavon, atentu bone... Cetere mi trabatis al mi kanaleton tie ĉi proksime, por ebla bezono. Kiam vi volos plenigi la kruĉeton, metu ĝian buŝon al la kanaleto kaj ĝi tuj salivas... (1) —

Tute kiel por praktike montri al ŝi tion, kion diris la paŝtisto, Baŭdilieto metis la lipojn ĉe la *kanaleton* kaj suĉtrinkis kun granda bruo.

— Ĉu ĝi ne malbonfartigos lin se li trinkis lakton? — demandis Mila.

La paŝtisto solene deklaris:

— Oni memoras, ke la akvo de la Akvo-Muĝulo neniam malutilis al iu, ermitino: ĝi sanigas la afekciojn, kaj nenio plu. Sankta Poncio, perfekte scias kion li faras! Studu la pentraĵojn en la kapelo kaj vi scios ĉiujn liajn miraklojn: ĉar tio estas sciinda afero, sciinda afero, mi certigas! —

La knabo estis apartiĝinta de la Akvo-Muĝulo, kun la sprita vizaĝo de faŭneto tute malseka. Mila lin rigardis ravite, kaj

(1) Salivas = Elŝprucas.

ree sentis en siaj internaĵoj la varman fluon de febra amsopiro.

— "Mirakloj, mirakloj"! diris la paŝtisto... Mi vidu, do! — Kaj kliniĝinte ankaŭ siavice al la rokdefluilo kaj kuraĝe suĉtrinkante tiun puran glaciaĵon, kiu krevigis al ŝi la dentojn kaj haltigis la spiron, la virino faris enpense, grandan voton...



. . . . . .

Ili regrimpis supren laŭ la vojeto, kaj la bojoj de la Strigo estis respondataj, kiel la antaŭan vesperon, de la voĉoj de la montoj.

Mila diris ridetante:

— Hieraŭ vespere animskuon donis al mi, tiu ĉi bruado!... —

— Ĉu eble vi ne scias, kio ĝi estas? —

— Matio parolis pri la Trumpetulinoj... sed kio estas la Trumpetulinoj? —

— La sorĉistinoj, virino! Mi spertas, ke la ermito ne rakontis al vi ion profitan, malgraŭ ĉio... Sed ne ĉagreniĝu, ĉar mi jam rakontos al vi, kiam ni havos libertempon, kial la Trumpetulinoj ludas tiun komedion ĉion mokimiti, kion ili aŭdas... —

Baŭdilieto, kiu marŝadis tuj antaŭe, ekkaptis la ŝvebantajn vortojn de la paŝtisto kaj rapidè revenis, kaj pendiĝis ĉe lia mano.

Kajetano ridis pri tio.

— Rigardu la etulon! Aŭdinte, ke mi parolas pri kia ajn rakonto, mi jam havas lin gluita al mi kiel iksodo (1). Li lasus sin rosti kontraŭ fabelrakonto, ĉu ne? —

La knabo frotetis la vangon per la ŝultro kaj pli forte sin apogis, ridetante.

— Sed ci vidu... La fabelo pri la Trumpetulinoj estas tro longa kaj nun nin atendas la supo... Kion ni profitus se mi devus lasi ĝin stumpigita? —

Baŭdilieto mallevis la kapon, tute malkontenta.

La paŝtisto krevigis grandan ridon.

— Ja ne ĉagreniĝu pro tio, etulo! Mi ĝin rakontos, kiam la ermitino kuiros la vespermanĝon. Ĉu tio ne ŝajnas al ci bona, tiel? —

La knabo tiam levis tute rideme la malicetan vizaĝon, kaj lasinte la manon de la paŝtisto li denove kuris post la Strigon.

— He, etulo, zorgu pri la pantalono! Tiu frangolo faros en ĝi judnazon (2)!... — kriis la vireto vidinte, ke li forkuras nenion atentinte; kaj li kormole aldonis:

— Li efektive ŝajnas ŝtono el ĵetilo!... Unu tagon li enabismiĝos. Dio nin gardu kontraŭ tio!... Ha, la fruaj vivjaroj, la fruaj vivjaroj! —

— Ĉu do li apartenas al la farmodomo de Sankta Poncio? — demandis al li Mila.

— Jes, ermitino... Li estas ĝia bofilina etulo... Mi amas lin ĉar li havas nenian sigelon de perfidemo en la koro; tute kiel ŝafido. Kiam mi tro nostalgias sur tiuj ĉi altaĵoj, mi kunprenas

---

(1) Iksodo = Parazita insekto de la lanbrutaro kaj de la hundoj.
(2) Judnazo = ŜiraĴo.

lin kun mi. Li neniam min lasus, la infano: kaj ĉefe pro la fabeloj, vidu!... Vintre, kiam mi enfermiĝis en lia hejmo, li ĉiam cerbumigas min por povi akuŝi al li novajn... —

Ili estis alvenintaj al la deklivo post la ermitejo kaj la paŝtisto levis la kapon.

— Kion mi asertis al vi, ermitino? Rigardu la sunon malantaŭ ni: ĝi baldaŭ alsendos ekrigardon... —

Efektive: inter la Elefanto kaj la Supra-Altaĵo pala sunhelo, velkinta lumfloro konfuze sin trapuŝis tra la malviglaj nubogazoj de la griznuanca ĉielo.

Ili eniris en la ermitejon: ŝafinoj kaj ŝafidoj ekblekis. Baŭdilieto kantadis kiel kanabeno, ĉiuj pordoj plenmalfermiĝis kaj la domo pleniĝis de vivo. Sed Milan vundis malĝoja furiozo: Matio ankoraŭ dormadis, kiel sanktuleto, kun ĉiuj zorgoj sub la kuseno.

Dum la paŝtisto ĵetis ekrigardon al la supo, ŝi iris veki sian edzon.

— Ĉu vi ne hontas? Jam estas tempo por matenmanĝi... —

Sed ŝi tuj aŭdis la paŝtiston en la salono:

— Nun ĉar mi memoras, ermitino... Ĉu vi ŝatus viziti la sonorilturon antaŭ ol matenmanĝi? —

— Se vi volas, paŝtisto... —

La ŝtuparo de la sonorilturo estis mallarĝa kiel intesto, kaj ĝiaj lignaj ŝtupovicoj anobimanĝitaj kaj malfirmaj. La longa kaj mallarĝa fendo de embrazuro ĝin iam kaj iam heligis. Rigardante tra tiuj truoj, kvazaŭ tra la lorno de *tuttilimundi* (1), Mila vidis fragmentojn de pejzaĝoj unike konsistantaj el ĉielo kaj montaro, ĉiam el ĉielo kaj montaro.

Ili venis sub la kupolon, havantan formon de lumestingilo. Mila levis la kapon, kaj kun instinkto de timego rimarkis super si la nigrajn faŭkojn de la sonoriloj, malfermantaj siajn malmoligitajn kaj cirklajn lipojn, kiuj lasis la frapilojn pendadi tute kiel paralizitaj langoj. Sed ili ja ne estis paralizitaj, ne: apenaŭ la paŝtisto ekprenis la ŝnurojn, tiuj pezaj langoj agitiĝis ĵetante tumultan kriegadon, kiu disvastiĝis ĉiuflanken kun granda sonora elradiado.

---

(1) Tuttilimundi = Diorama kesteto.

—Kion vi faras, paŝtisto? — tranĉkriis Mila ŝtopante siajn orelojn.

— Mi salutas vian alvenon, ermitino! Decis ion fari por vin akcepti, ĉar se ne, oni ja ne scius, ke ni havas novajn gastojn... — Kaj li firme sonorigis, ridante animita; sed ĉar li komprenis, ke ŝi estas brusurdigita, li deĵetis la ŝnurojn.

— Vi devas kutimigi la orelkonkon al tiu serenado, ĉar la tagon de la ĉefa festo la tuta montaro prisciiĝas tiel. —

La fragmentoj de la pejzaĝo duonviditaj tra la embrazuroj kungluiĝis kaj vaste etendiĝis, sen plia temo ol la eterna, la unika: ĉielo kaj montaro, montaro kaj ĉielo.

La Granda Ŝtonego en unu flanko, en la alia la longa masiva dorso, cetacoforma, de la Meza Ŝtonego, kaj fronte la defluejo de la ravino (1), plena de altaĵoj, marĉetoj kaj vepro, en kies interrompo leviĝis kaj malleviĝis novaj malproksimaj montoj, ankoraŭ drapiritaj de subtila nebulo.

La virino gapis, ilin rigardante per la okuloj plene malfermitaj, kun la dentoj kunpremitaj kaj stranga interna tremo.

La paŝtisto ŝajnis rimarki tiun animstaton, kaj rapide diris:

— Apenaŭ la suno leviĝos, vi vidos efektivan belvidaĵon antaŭ ni, ermitino! Ĉio flagrolumos, kvazaŭ ĝi estus elĉizita el roka salo kaj el vitretoj de orelringo. La tieaj malsupraj montoj ŝajnas ricevi lumon subaflanke, kaj la Ŝtonego ilin rigardas tute envieme kaj pli blua ol bluiĝulo (2). Laŭ tiu flanko, trans la Montokolon, oni distingas Muronon, vilaĝon brave grandan, kaj pli apude la torenton de Malbon-Sangulo, kiu ĉiam malsuprenfluigas la akvon ruĝa... —

La paŝtisto interrompis sin:

— Ĉu vi scias, kial ĝi malsuprenfluigas ĝin, ruĝa? —

Mila tion ne sciis.

— Efektive la ermito meritas oreltiron: li ja ne helpis vin trasilabi la alfabeton de la monto... Tial vi ne scipovas trafi ion agrablan. Oni devas rakonti la farojn, kiuj okazis sur la lokoj, por ke oni sentu al ili korinklinon. Cetere, sciu ke pra-

---

(1) Ravino = Profunda kruta valeto en montaro, formita de la fluo de pluvakvoj sur dekliva tereno.

(2) Bluiĝulo = Venena fungo, kies interno fariĝas blua, kiam oni ĝin derompas. Lat.: *Boletus Satanas.*

tempe, ekzistis super la vilaĝo, trans la Ŝtonego, maŭra kastelego, kun la reĝo mem, kiu konsideris siaj tiujn ĉi montojn kaj ne permesis, ke oni ilin trairu, escepte se tio estis knabinoj inter la dekkvina kaj dudeka jaroj, kiujn li poste venigis en la kastelon kaj se ili akiris plaĉon en liaj okuloj, li ilin alproprigis al si kaj se ne, li ronde fortranĉigis al ili la kapon kaj ĵetigis ilin al la torento de Malbon-Sangulo, kiu ricevis de tio la nomon kaj la povon fluigi la akvon ruĝa. Kaj ĉiujare, dum Kristnasko, se vi troviĝus akurate je noktomezo sur la Ponto de la Frapo, kiu trairas la torenton, vi aŭdus veojn kaj ĝemojn, kapablajn hirtigi la harojn. —

Mila ricevis frostotremon.

— Kaj kio ĝi estas, paŝtisto? —

—Ĝi estas la fortranĉitaj kapoj de la rifuzitaj knabinoj, kiuj resaltas tra la pontarkaĵoj kaj plendas per siaj malgajaj voĉoj de senvivulinoj... —

La hororo de tiu fabelo paligis la virinon; sed la trankvila figuro de la paŝtisto serenigis ŝin, kvazaŭ li dirus al ŝi, ke ne ĉio estas terura kaj dolora en la enfermaĵo de tiuj mallumaj montoj. La paŝtisto daŭrigis, ridante:

— Mi rimarkas, ke vi ĉiam rigardas supren, kiel la blinduletoj... Decas disdirekti la okulojn ĉien, virino... Vidu, do, kiel agrabla estas tiu ĉi malsupra vidaĵo... —

Ŝi fleksiĝis super la balustrado de la fenestrego.

Granda placo ebeniĝis antaŭ la ermitejo, tute cirkaŭita de muroj kaj cipresoj ankoraŭ pli grandaj ol tiuj de la bedoj, sed rektestaraj kaj densfoliaj, kun la trunkobazoj blankaj pro maljuneco kaj dikaj kiel pilastroj de portiko. Ŝtupovico kun borderaĵoj el prilaborita ŝtono malsuprengrimpis de la placo ĝis la pli malsupraj pinetoj. Al Mila plaĉis tiu placo kun severa sinteno kaj plena de majesteco, kaj ĝin rigardante ŝi eltrovis, tra inter la mezo de du verdaj kapuĉoj de la cipresoj, ion bluan, kvazaŭ makulon, kiu moviĝas.

Ŝiaj birdokuloj tuj divenis, kio estas tiu makulo.

— Viro, paŝtisto! — ŝi ekkriis mirigita, kvazaŭ ŝi ĵus retrovis tion, kion ŝi kredis esti lasinta malproksime por la vivodaŭro.

La frunto de la paŝtisto nubiĝis.

— La Spektro! (1) — li silabis; kaj, sin turninte al sia akompanantino, tute serioze li aldonis: — Fiksu atenton al tiu viro, ermitino... Li estas la afero plej malŝatinda sur la monto. —

La pala suno estis flankenviŝinta la subtilajn nubogazojn, kiuj ĝin vualis, kaj malvigla orŝmiraĵo sin etendis sur la nuda montokresto de la Meza Ŝtonego.



(1) La Spektro = Alnomo de perversa homestaĵo personiganta la fortojn de la malbono sur la alta montaro.



IV
PURIGO

Mila pasigis dek aŭ dekdu tagojn en plena ebrieco de virino: ŝi purigis. Lasinte la pordojn kaj fenestrojn de la domo liberaj al ĉiuj ventoj, kaj kun la jupo krurmezen tirita kaj la haroj distaŭzitaj, ŝi ne ĉesis purigi ekde kiam leviĝis la suno ĝis fariĝis nigra nokto.

Ĉion ŝi renkontis kiel ĉe stalo; la muroj, neblankigitaj de antaŭ multaj jaroj, estis kovritaj de fingromakuloj, de skribitaĵoj, de rudimentaj desegnoj, de malĉastaj bildoj surskizitaj de la vizitintoj, kiuj tien supreniris en pilgrimaj tagoj; la araneoj, sinjoraj kaj mastraj tie je ulno super la planknivelo, ŝpinadis pendante de la ĉevronoj kaj teksadis retojn en ĉiuj mur-

anguloj; surplanke estis grasaĵtavolo, kiu ne divenigis kion ĝi sube kaŝas, kaj la ĉarpentaĵo, ĉie, postulis seriozan rabotadon laŭ lignaĵista mano...

En demando pri purigo, la tuta domo ludis sufiĉe gravan rolon, sed super ĉio elstaris, en la supraj partoj, la kuirejo, kaj en la malsupraj, la kapelo.

Tamen, kio unuamomente pli imponis Milan, estis la kuirejo, ĉar ĝi montriĝis la loko, kie ŝi devos pli longe restadi.

Kiu estus kapabla heligi tiujn murojn kaj plafonojn tiom nigrigitajn de fumo? Kies kuraĝo forpelus la malmoliĝintan tavolegon da ŝlimo de sur la lavoŝtono? Kiu povus revenigi la brilon al la granda abundo da kuireja ilaro el kupro kaj latuno, kiu dismetite pendis de la najloj, manĝita de verdigro kaj muŝpunktoj sub la krusto de la polvo?...

La paŝtisto, vidinte ŝin tiel kunpremita, konsolis ŝin:

— Ĉu vi scias ermitino? Tiu ĉi ermitejo estas ĉieleto, do se en ĉielo ne ekzistus purema homgento, ĝi nomiĝus alimaniere. La formortinta ermitino estis la estaĵo plej malpurema, kiun naskovomis patrinaj internaĵoj. Dum dek jaroj, kiujn ŝi travivis ĉi tie, ŝi tute ne prizorgis fari eĉ fuŝan balaadon... La fojojn, kiam ŝi bredis porkidon, al la Sanktuloj neniam mankis kompanio, kaj la kokinoj bekis ĉe la onia telero dum oni manĝis ĉetable. Ĉar mi tie ne malsaniĝis en la someroj, mi konsideris, ke mi ne konsistas el la sama materialo, kiel la cetera popolo, vidu... Mi eĉ konfesis al sinjoro Paroĥestro la tentojn, kiuj venis al mia menso por fari malsaĝaĵon, kaj tiam sinjoro Paroĥestro superŝutis ilin per admonoj kaj minacoj, sed, ĉio vane: ĉar kiu estas knedita laŭ ia maniero, tiu ja ne ŝanĝas tiel simple la naturon. Li do ne havis alian rimedon ol ilin maldungi de ĉi-tie... La domoj ne tute aranĝiĝas per si mem, mi pensas, kaj la kompatinda ermitino estis virino malfortika por aranĝi domon. Sed, vi! Vi ja ne devas malkuraĝiĝi ĉe tiom malmulta akvo... Post kelkaj frapoj viaj per la senpolvigilo ni povos nin ĉie speguli... —

Mila fermis la okulojn kaj sin ĵetis plenkape al la tasko, kiel naĝisto sin ĵetus kape al la maro. Matio unue volis ŝin konduki al Murono, kaj al tridek lokoj pli, kun la intenco malproksimigi, antaŭ ĉio, tiun grandan dompurigon, kiun anon-

cis lia edzino kaj kiu malkvietigis lian ripozan humoron de mallaboremulo, sed Mila absolute rifuzis.

— Dum la domo estas sterkejo, ne venu al mi kun promenproponoj; vi jam iros tien sola vidi sinjoron Parohestron kaj serĉi la nutraĵojn... —

Kaj Matio devis rezignacie lasi ŝin fari, kaj siavice agi kiel furiero, ĝis ĉio estos en ordo. Finfine, li pli ŝatis tiun komision ol sinsekve putĉerpi akvon kaj aŭskulti la abundon da petoj pri aferoj, per kiuj ŝi ne lasis lin en paco apenaŭ ŝi lin vidis proksime. Mila decidis agi laŭregule, de la pli simpla al la pli malfacila, komencante per la supraj partoj kaj finante per la malsupraj; kaj ŝi ne sin metis en la kapelon, ĝis ĉio cetera estis tiel prizorgita kaj bonordigita ke, laŭ la paŝtisto, ĝi ŝajnis, kvazaŭ la anĝeletoj estus tie surpasigintaj la langon.

Sed tuj kiam balailoj kaj skrapbalailoj komencis regi tie, en tiu kapelo, oni dirus, ke la monto renversiĝas. La sanktuloj tremis sur siaj altaroj, la musoj diskuris terurite al ĉiuj flankoj, pecoj de anobiaj modluroj (1) defalis, vaksaj kruroj kaj brakoj ŝiriĝis en du partojn... Kaj meze de la tumulto kaj de la densaj nubaroj el sufokanta polvo, oni vidis Milan moviĝi kaj vigle la brakon svingi, ĉion purigante kaj esceptante nek murangulon nek truon. La purigofebro ŝin estis kaptinta tiel freneze, ke ŝi sentis voluptan ekscitiĝon, plene sin fordoni al tiu granda revolucia klopodado.

Kaj jen unu vesperon, kiam grimpinte ŝi troviĝis sur reliefo de altaro, super la altarŝtono, forgratante la vaksaĵon, kiun havis interfingre anĝeleto, kiu taŭgis kiel kandelingo, subite rimarkinte, ke la heleco malpliiĝas, ŝi deturnis la kapon kaj ekvidis viron plantitan sur la sojlo de la kapelo.

Rapide kaj iel konfuzite ŝi descendis de la altaro, penante, ke ne tro multe elmontriĝu ŝiaj tibikarnoj. Ŝi estis ruĝiĝinta kaj iom agitata; la okuloj, netaj kaj kristalaj, rebrilis en ŝi sub la polvoblankaj okulharoj, kaj la ruĝa tuko, kiun ŝi estis liginta ĉirkaŭ sia kapo por ŝirmkaŝi la hararon, donis al ŝi teniĝon de petolema bubo.

La viro restis ŝin rigardante, kvazaŭ surprizita.

---

(1) Modluro = Reliefa strio.

Li estis mezaĝa kampulo, malbone vestita, kun ŝrumpinta bluvelura jako kaj pantalono el flava velurfelpo ŝirita kaj zonita ĉirkaŭ la korpo per sparta ŝnureto. Li iris nudabruste kaj senŝue. El la bareteno (1) surmetita sen suprenfaldo, — kun ĝia sakekstremaĵo malantaŭen pendanta, inter nuko kaj orelo —, frunte aperis olekolora osta borderaĵo kaj sub ĝi brova tufostreko, kaŝanta kavon, en kies fundo malkviete moviĝadis, — kiel du insektoj meze de vepro —, du malgrandaj, tre malgrandaj okulgloboj, de nedifinita koloro.

— Bonan vesperon — al li diris Mila.

Sed la viro, hezitpoze kaj ŝin fikse rigardante el la profundaĵoj de sub la brovoj, ne redonis al ŝi respondon.

Mila sentis, ke ŝi pli ruĝiĝas fronte al la nekonata rigardo, kaj kompromitite ridetis. Tiam la viro, kvazaŭ revigliĝante, devojigis la kaŝitajn pupilojn kaj ankaŭ ekridis.

— Hu, hu, hu!... Bonan vesperon... —

Li havis raŭkan voĉon kaj ridis fuŝmaniere, fermante la okulojn kaj volvante la supran lipon buŝinternen. Tion farante li montris la dentojn kaj suprajn gingivojn, kaj Mila tuj rimarkis, ke la dentoj estas blankaj kaj brilantaj, kiel ŝtonbutonetoj, kaj la gingivoj duberuĝaj, de koloro simila al tiu de ĉokolado.

La viro gratis sian talion, per la mano en la pantalona subŝtofo, kvazaŭ li ne scius kion fari. Abrupte li balbutis, laŭ skuoj kaj nenien rigardante, ke li malsuprenvenis de la Kokpiedo, apud la Supra-Altaĵo, kaj ke li tiel multe soifas, ke li eniris por peti akvotiron.

— Efektive — bonvole respondis Mila... — Supreniru, supreniru! — Kaj ekkaptinte la ŝtupareton, kiu kondukas al la ĉambro, ili trairis la tutan domon ĝis la kuirejo.

Mila prezentis al la viro seĝon kaj la vintrinkilon, sed la viro ne havis deziron por sidi: li nur volis estingi la soifon, kaj li trinkis longe, longege... Lia gorĝo aŭdigis ritman bruon, kvazaŭ de botelo, kiu malpleniĝas, kaj la Adam-pomo (2), pinta, supermezura, supren kaj malsupren oscilis resaltante.

---

(1) Bareteno = Tipa kataluna sakforma ĉapo.

(2) Adam-pomo = Protuberanco (elstaraĵo) formita en la antaŭa parto de la kolo, de la kartilagoj de la laringo.

Trinksatigite, li kontente spirblovis, kaj ĉar li staris tute ŝvitante, li demetis la baretenon por forviŝi la kapŝviton.

Mila tiam vidis la frunton plej strangan, kiun ŝi iam vidis en sia vivo: frunton, kiu ne similis tiun de homo. Longforma laŭ maniero de piro, ĝi havis la fruntalon (1) kaj parietalojn (2) enprofundigitaj, kvazaŭ per efiko de impeta cirkla stringado, kaj la brovosupron ĝi havis tiel superstara, ke de tempio al tempio ĝi formis, kvazaŭ randelstaran kornicon: tiun ostan borderaĵon, kiu aperis el sub la bareteno.

La viro rakontis, ke de antaŭ la matenkrepusko li ĉirkaŭiris la monton serĉante novajn kaŝejojn, kien la morgaŭon li povos enkonduki sian furon; ke la pasintan semajnon li per la furo ĉasakiris ses kuniklojn en unu tago, kaj ke li kalkulas ĉasakiri similan nombron post nelonge; ke ĉiujn ilin li disvendis en Murono, ĉe la gastejoj kaj sinjoraj domoj, kaj ke la furo estas eĉ *pli adaptita* por serĉesplori ol skadra gvardiano... (3)

Al li estis malfacile ekspliki kaj, dum li parolis, lia rigardo forturniĝis de sur la personoj, kiel izolema kaj timema io, kaj lia raŭka voĉo komplete dronis, tute kvazaŭ membrano sin metus en lian gorĝon.

Kiam la viro, pasinte la korton, ekforiris, Mila, tra la stalo kaj altarpostaĵo, revenis al la kapelo.

La sunlumo eniris tra la pordo plenlarĝe malfermita, oblikve sterniĝis sur la ŝtonpavimo, ĝisvenis ĝis la ŝtupoj de la presbiterio (4), kaj dissendis el ĉiuj flankoj reflektojn kaj ombromakulojn, kiuj gaje flagris sur la muroj.

Mila denove grimpis sur la altaron, kaj dum ŝi estis puriganta la maneton kaj la femuron de ligna anĝeleto, ŝin turmentis penso:

— Cetere, kie mi vidis iam tiun ĉi viron? Ĉar mi estas certa, ke mi lin vidis ie. Mi bone memoras tiujn strangajn gingivojn kaj tiujn blankajn dentojn... —

---

(1) Fruntalo = Fruntosto, formanta la antaŭan parton de la kranio.

(2) Parietaloj = Ostoj, kiuj formas la mezan kaj flankan partojn de la vizaĝo.

(3) Skadra gvardiano = Membro de kataluna armita institucio, fondita por persekuti malbonfaristojn aŭ krimulojn.

(4) Presbiterio = Preĝejparto, kie estas la ĉefaltaro, unu aŭ plurŝtupe pli alta ol la planko.

Sed kvazaŭ la menso, maldiligenta, ne volus al ŝi precizigi la rememoron, post kelkmomenta klopodado ŝi finis tute malatentante pri tiu pensabsorbo, forpelita de la avido purig-ataki la Sanktan Patronon kaj liajn eksvotojn.

La Sanktulo, antikva kaj malbone skulptita bildo, havis diablajn okulojn, kiuj estis la teruro de Mila. Al la malsupra palpebro, ampleksa kaj elmontranta la ruĝecan internon, kiel tiun de certaj maljunuloj, aldoniĝis pupiloj tiel sennivelaj, ke ili, per si mem, ŝajnigis la tutan vizaĝon tordita. Simila torditeco, la ventro ŝvelinta kaj rondeta kaj la granda sakforma piedo, ĉiam rememorigis al la virino la sonĝon dum la unua nokto kaj la mokridan malbonagon de la Sanktulo, kiu ŝin tiel impresis.

Kaj iliaflanke la eksvotoj, — tiuj mizeraj braketoj kaj kruretoj, kiuj ŝajnis membroj detranĉitaj de mortintaj infanoj, tiuj lambastonoj ŝvitkovritaj de fulgaj manoj, tiuj hararoj fortonditaj de sur la kapoj, kiuj ilin subtenis, kaj tiu senmezura amaso da mallumaj eksvotaj tabuletoj, kiuj krustigis murojn kaj pilastrojn —, ŝajnis al ŝi aferoj kontaĝantaj (1) ĉiujn malsanojn, kiujn ili menciis kaj memorigis kun morna (2) cinikeco de kriplulo. Sekve, apenaŭ ŝi tuŝis per la fingropinto tiom da polvokovrita relikvaro (3) de malsaneco, frostotremo ŝin tute skuis kaj ŝi vive retiris la manon, lasante la malagrablan taskon por poste, ĉiam por poste, kvazaŭ malprecize esperante, ke iu alia ĝin prizorgos.

Kaj ree ŝi daŭrigis senpolvigi la altarojn, pertere (4) frotante la pavimŝtonojn kaj ŝanĝante la vicordon de la vakskandeloj: de tiu bosko el ĉiamezuraj vakskandeloj, kelkaj tiel dikaj, kiel homaj brakoj kaj femuroj kaj ĉiuj ĉirkaŭgarnitaj per girlandoj, per oritaj literoj, per vivkoloraj paperfrizaĵoj...

Sed kiam la malviglaj kaj degratitaj oritaĵoj jam eligis pli da fajreroj ol ili povis, kaj la sanktuletoj, puraspektaj, kvazaŭ ili devus iri al ĉefa festo, ridetis sur la alto de sia soklo per sia sorĉita duonrido de sanktuloj, kaj la franĝetoj estis tute

(1) Kontaĝi = Komuniki malsanon per senpera aŭ pera kontakto inter du personoj aŭ objektoj.
(2) Morna = Preme malĝojiga, malhela.
(3) Relikvo = Postrestaĵo.
(4) Pertere = Procedo por frotpurigi uzante flavan absorban teron.

rekudritaj kaj la kandelegoj, blankaj kaj aromaj, vicigitaj, laŭlonge de la presbiterio, tial ke ankoraŭ ne prezentiĝis la dezirata helpanto, Mila ne havis alian rimedon ol decide pensi pri tio, kio devis esti farata kun tiuj eksvotoj, kiuj ĉie pendis, kiel stalaktitoj en kaverno, kaj gutigante en la kvieto de la forgeso dolorajn ĥimerojn.

— Se vi min helpus, Matio! Tiom da tasko estas farota, ke mi sola neniam plu finos!... — ŝi petegis al sia edzo, per klaraj okuloj plenaj de tima angoro. Sed Matio malforte gratis al si la nukon, kaj malordigante la harojn li sugestis, ke, ĝuste tiun tagon, sinjoro Paroĥestro komisiis al li, ke li iru lin vidi...

La glacia rideto de Mila haltigis al li la eksplikojn.

— Iru, karulo, iru vidi sinjoron Paroĥestron, ĉar povus okazi, ke li nostalgius sen vi, kompatinda viro! —

Kaj ĉe flamiĝo pro spito, ŝi putĉerpis sitelon da akvo, prenis sapon kaj lavĉifonojn kaj sin direktis al la kapelo. Tute sola kaj kun agitita rapideco, kiu ŝajnis multobligi al ŝi la manojn, ŝi entreprenis la taskon sur la dankmemoraĵoj, komencante per la eksvotaj tabuletoj. Unu post alia ili estis malpendigataj, senpolvigataj, lavataj, skrapataj, ĝis ili perdis ĉian postsignon de la patino, kiun al ili donis la tempo kaj la malpureco. Kaj estis kvietiga surprizo por la virino vidi, ke elŝprucas, sub la malglata frotkareso de la lavĉifono, nekonita mondo, plena de revivigitaj koloroj, de objektoj kaj scenoj rekoneblaj: montoj, kiuj konturis sur la ĉielo siajn simetriajn krestojn, kiel puntajn mueldentojn; virinoj, kiuj ekfalis tute nekombitaj malsupren de la ŝtuparo; ruĝaj ĉevaloj senbridiĝintaj sur smeraldaj herbobedoj; foirejaj budoj formanĝitaj de grandaj bruloj; ŝipoj kiuj enabismiĝis, kun la tuta ŝipanaro surferdeke vicigita kaj levanta la brakojn al la ĉielo same kiel grekaj Y el la alfabetlibro... Konklude, malligita fulmobrilado en intensegaj tonoj, en pozoj de plastikeco barbara kaj eksterordinare esprimhava, kie infanece balbutis arto efektema kaj naiva, kiu elspiris specon de kaŝita ĉarmo, de sovaĝfojna parfumo, kiu venis ĝis Mila, vualigante iom post iom ŝian antaŭjuĝon kaj vekante en ŝi pasantajn scivolojn, simpatiajn fulmojn, terurojn sen pikilo, kiuj ŝin tuj lasis perfekte tranvila. Ekde tiam, la tabuletoj estiĝis por ŝi ordinaraj objektoj; kaj kiam, jam purigitaj kaj brilegantaj, kvazaŭ ĵus faritaj, ŝi ilin etendis ĉe la suno por ke ili sekiĝu, ili eĉ sukcesis ŝin ridigi. Ŝi komparis sin kun la *Maljunulo de la Romancoj* (1), viro longa kaj maldiktrunka, kiu ĉiujare, foirtempe, iris al la vilaĝo kaj starigis sian elmontrejon sur la placo, laŭlonge de la muroj de ĉe la forĝisto: granda disetendaĵo el kolorpaperoj, falditaj laŭ la mezo kaj pendigitaj rajdpoze sur strečitaj ŝnuretoj. Sur tiuj paperoj, kiuj ŝin tre gapigis, kiam ŝi estis infa-

(1) Romancoj = Paperfolioj enhavantaj, en vulgara lingvo, versan priskribon de okazaĵoj aŭ rakonton pri faroj de heroo, kontrabandisto, rabisto, krimulo, virindelogisto, kc., kiujn ilustras koncerna bildo. La *Maljunulo de la Romancoj* estas do, tiu viro, kiu disvendas la *romancojn*.

no, ankaŭ estis bildigitaj brulegoj, faloj, puntrenadoj... ĉiuspecaj ekstreme ŝveligitaj okazintaĵoj. kaj teniĝoj kaj legendoj ankoraŭ pli ŝveligitaj ol la okazintaĵoj. Same tiel sur la tabuletoj, kiuj ne havis grandan diferencon inter si krom tio, ke sur iuj oni legis *malfeliĉo*, kie aliaj parolis pri *miraklo*, kaj sur la unuaj ne ekzistis iu sanktulo ĝuanta popolkulton, dum en la duaj neniam mankis Sankta Poncio, en kiu ajn anguleto, interne de nuba cirklo, kun unu mano eterne direktita supren kaj la alia lutita al la episkopa kurbobastono.

Tiu vastigita prestiĝo de la Sanktulo, kiun distrumpetis ĉio, kion ŝi vidis, estis tio, kion Mila ne povis bone kompreni; kaj ofte, levinte la okulojn por lin rigardi kun medita atento, ŝi penis, per la tuta strebado de sia volo, kontaĝi al si grandan respekton kaj adoron; sed senkonscia skeptikismo ŝin plenigis per duboj kaj sentigis al ŝi, en konfuza maniero, ke ĉiam ekzistos io neakordigebla, kiel sekreta malamikeco, inter ŝi kaj la glora patrono de la regiono.

— Tiu ĉi Sanktulo ne ŝajnas sanktulo kiel la aliaj — ŝi meditis. — Oni dirus, ke li min rigardas kun kaŝita malico... —

Kaj por sin distancigi de tiu impreso, kiu malgraŭ ŝia volo ŝin maltrankviligis, ŝi reprenis la taskon kun nova avido.

Post la pentritaj tabuletoj, venis la vico al la strutaj ovoj venintaj el la kontraŭa mondoparto kaj pendigitaj sur tordaj fadenoj; al la barketoj vastaj kiel pugno, plenaj de ŝnuretoj kaj pulioj tute kiel ĉe la grandaj ŝipoj; al la hararoj malglataj kaj krakantaj kiel spikaj faskoj, kiuj, kvankam ĝisradike detonditaj kaj mortaj de antaŭ multaj jaroj, ankoraŭ ŝajnis haladzi je malsanaj ŝvitoj; al la defiguriĝintaj ŝuoj, similaj al bestungegoj, kiuj survestis afekciitajn piedojn; al la rozarioj alportitaj el Jerusalemo kaj kun la globetoj pli grandaj ol nematuraj migdaloj, al... al tiom da heterogena objektaro, kiu stapliĝis kun hieroglifa miksiĝo en tiu rifuĝejo de pieco, ŝajnigante ĝin peco de maŭra bazaro.

Inter tiom da objektoj, kiuj, tamen, nenion signifis por ŝi, estis unu, kiu kortuŝis Milan. Ĝi estis blanksilka vesteto, garnita per antikvaj puntaĵoj de netaksebla delikateco. La silko

jam estis alpreninta nankenan koloron (1), la puntaĵoj pece disflugis laŭ la aero de la spirblovo, kaj la malsekeco de la kapelo, longjare fermita, estis tiamaniere algluinta al ĝi la polvon, ke ĝi faris, kvazaŭ sekguman tavolon, kiu ĝin tenis rigida. Mila estis irinta por ĝin senpolvigi, sed ŝi renkontis la faldojn algluiĝintaj unu al la alia kaj ĉiuj tratruitaj, kvazaŭ per borilo; kaj la ideo, ke ĝi povus disfandiĝi kiel sukero se ŝi ĝin tro manipulus, pie incitis ŝin ne plu ĝin tuŝi. Sed ĉiufoje, kiam ŝi vidis ĝin pendanta, tute inerta, de la muro, ŝia nostalgiema imagopovo plenigis al ŝi la malplenaĵon de la vesto per la rozkolora kaj mola infankarneto, la etaj pugnoj maltrankvilige fermitaj, la okulglobetoj sorĉitaj kaj la fiŝbuŝeto de malmultmonata infano; de dia bagatelo pri kiu ŝi ĉiam, eĉ fraŭlinaĝe, sopiregis.

Fine, tiel same, kiel ŝi estis pretiginta ĉion antaŭan, ŝi finpretigis ankaŭ la eksvotojn; kaj kiam jam libera de purigavidoj kaj kun la koro tute larĝiĝinta, ŝi terpurigis la lastan almozpleton, surgenue sur la placeto, ŝi ekvidis la paŝtiston ĉirkaŭiranta la kreston de la Meza Ŝtonego, sekvata de Baŭdilieto kaj la brutaro. La paŝtisto venis flegme malsupren, kun la plušĉapo super la brovoj kaj la celtisa (2) forkbastono ĉe la brakfleksaĵo.

Mila, ne sciante kial, eksentis senpripensan impulson voki lian atenton kaj ekkantis, per voĉo sufiĉe laŭta por esti aŭdata de sur la montokresto, la kanton "*La Filino de la Stratvendisto*" (3). La paŝtisto levis la kapon kaj ŝin ekvidis.

Mila tiam, ankaŭ ne sciante kial, pentis pri tio, kion ŝi ĵus faris.

La paŝtisto, lasante la knabon kaj la brutaron sekvi la diagonalon, kiun ili desegnis orienten, en direkto al la stalo, deflankiĝis kaj venis rektalinie malsupren al la placo.

— Bonan vesperon, kiun Dio donu al ni... Ĉu eblas, ke mi ankoraŭ vin trafas laboranta, ermitino? Tio ja estas neantaŭ-

---

(1) Nankena koloro = Helflava.

(2) Celtiso = Arbo el fam. de ulmacoj, specio *celtis australis*, kun flekseblaj brancoj, fortika ligno, nesimetriaj kaj stipulaj (apendicaj) folioj, blankaj floroj, drupeca frukto nigra, manĝebla.

(3) La Filino de la Stratvendisto = Kataluna popolkanto.

vidita; vi transpasas la mezuron, tutcerte... La kompatindaj sanktuletoj ja ne kutimiĝis al tiom fortaj transturniĝoj, kaj mi volas pensi, ke eĉ ne sidos al ili bone la ŝanĝiĝo... Vi ja ne volas min obei kaj agas malbone. Konvenas preni la aferojn kun flegmo, alie, se vi ĉion mortigas en unu tago, poste vi ja ne scios per kio vin okupi sur nia montaro, virino! —

Kaj la paŝtisto ridadis, kun la kruroj disetenditaj, sub cipreso.

Li komunikis al Mila, kvazaŭ birdan gajecon, kaj, tute kontenta, ŝi detale montris al la paŝtisto la grandan dompurigon.

La paŝtisto ĉion al ŝi laŭdis per tiuj siaj vortoj tiel simplaj, kiuj ŝajnis grandaj komplimentoj.

— Jen nu, ermitino: mi devas diri tion al vi! Neniam Sankta Poncio sin sentis tiel bele prizorgata... Ĉio al mi flagrolumas, kvazaŭ en plena tagmezo. Apenaŭ mi vin vidis, mi tuj pensis, ke ni faris bonan akiron... Morgaŭ, post frua ellitiĝo, mi grimpos malsupren al Murono por inviti sinjoron Paroĥestron, veni ĉi tien ĵeti decan ekrigardon, sur tion ĉi... Mi fidas, ke li aprobe manklakos.

— Nur ne, paŝtisto! — esprimis Mila kun korfrapo — li ja ne venu, antaŭ ol estos remetitaj la altartukoj jam lavitaj kaj gladitaj: ĝis tiam tio ne estos konvena... —

— Ni atendu, do, la altartukojn, se tio ne multe prokrastiĝos... Ĉar mi jam alsopiras, ĉu vi komprenas?... — Kaj subite: — Ĉu vi jam bone purigis ĉiujn miraklopentraĵojn? —

— Dum tri kompletaj tagoj mi ne faris alian aferon, paŝtisto!... — Kaj kun enridiĝintaj okuloj pro ioma maliceto: — Laŭ mi li eĉ faris ian eksceson da mirakloj, Sankta Poncio!...—

— Ha, herezulino, herezulino, vi riskas, ke li donos al vi frapon per sia kurbobastono! Ĉar, efektive, vi ja estas iomete herezulino, ĉu ne? — demandis la paŝtisto duone ridante, duone serioze.

— Mi, malfeliĉa mi? —

— Foje mi trafas vin, kiam vi direktas al la Sanktulo malbonan okulon, kompatinda! — Kaj la paŝtisto ĉesigis la rideton por konsili kun graveco: — Tamen, tio ĉi estas malbona faro, ermitino. Decas, ke vi lin amu, Sanktan Poncion. Se vi

scius, kiamaniere li haltigas la zorgojn!... Vi vin metas ĉi tien surgenue, vi plendetale rakontas al li viajn aferojn, kaj post nelonge, vi dirus, ke li turnas la okulojn kaj vin ekrigardas vid-al-vide... Kaj per tiu rigardo la koro malligiĝas kaj elglitas el ĝi ĉiuj ĉagrenoj... Ho, Sankta Poncio, Sankta Poncio!...—

Kaj la paŝtisto balancis la kapon, tute penseme kaj emociite.

Al Mila ŝajnis, kvazaŭ en tiu momento li malproksimiĝus de ŝi, forirante al alia mondo.

Sed la paŝtisto tuj revenis: la rideto reaperis sur liaj lipoj kaj liaj okuloj denove vigliĝis.

— Ĉu vi scias kion mi pensas, nun, ermitino? Ke ni devus adekvate vidi vian dompurigon... — Kaj ĉar ŝi kvazaŭ demandis lin per la rigardo, li aldonis: — Lasu min enstaligi, ĉar la knabo jam estas malsupre, kaj mi tuj revenos. —

Kaj li longpaŝe supreniris laŭ la senkulturejo.

— Kiu dirus, ke li estas tiel bona viro! Li ŝajnas ĉies patro aŭ frato!... — pensis Mila, vidante lin malaperi enprofundigante, jen la krurojn, jen la korpon, jen la plušĉapon, malantaŭ la kurbiĝo de la stepo. Kaj kiam ŝi jam ne vidis lin, ŝi kaŭre kliniĝis por ekpreni de la planko la almozpleton, kiun ŝi estis tie lasinta meze de la pertera frotado.

Ĝi estis malnova almozpleto, el latuno, kiu ronde havis latinan legendon faritan per longaj kaj kunigitaj literoj, kiun la virino ne scipovis silabi. Sur la plata franĝo, kolizio estis farinta al ĝi kaveton kiel duono de avelŝelo, kaj Mila devis forkonsumi siajn ungojn kaj la sukon de citrono por forpeli la verdigron de tiu kaveto: sed nun, sin spegulante en ĝi, ŝi tie vidis sian vizaĝon; etan, etan, sed klaran kaj detalan, kiel kolora fotografaĵo.

— Kiel beleta mi estas, tiel! — ŝi pensis, fikse sin rigardante; kaj abrupte, apudiginte la almozpleton al la lipoj, ŝi kisis sin mem sur la kaveton.

Apenaŭ ŝi tion faris, tamen, ŝi koloriĝis kiel koĉenilo kaj ekrigardis spiritkonfuze ĉiuflanken.

— Sed nu! Kiaj subitaĵoj okazas al mi hodiaŭ? — ŝi meditis konfuzite kaj sentante la okulojn larmokovritaj. Kaj

kiam la paŝtisto revenis, ŝi ridetis al li per timema rideto de infano, kiu ion disrompis.

La paŝtisto venis tute animita, svingante longan kanon kaj petante kandelan stumpon. La kano estis fenda sur unu ekstremo, kaj li transverse lokis ĉe la fendaĵo la seban stumpeton.

— Ĉu vi bonvolos fermŝovi la pordon, se al vi plaĉas, ermitino? —

Mila sin direktis, tute senatente, al la malsupra parto de la kapelo. Kiam ŝi troviĝis ĉe la pordosojlo ŝi iom fermis pordoklapegon, poste la alian, kaj ilin ne delasinte, ŝi restis ravita, rigardante tra la aperturo la dubekarminan makulon, kiun tie lasis la sunsubiro kaj kiu ŝajnis sanga kraĉaĵo sur la randolinio de la lasta monto ĉe la horizonto.

— Kiel stranga estas la suno... Ŝajnas, ke ĝi mortis... Estas tute malĝoje devi morti!... — Kaj, kiel fulmo, morboza (1) sensacio — la ideo pri la morto — trakuris la malkvietan senkonsciecon de ŝia spirito, lasante ŝin sangoglaciigita.

Kiam ŝi turniĝis ŝi ne povis sin deteni ĵeti krion.

La tuta kandelbrulejo, kiu staris en la kapelo, kanelitaj vakstorĉoj, cilindraj kandelegoj kaj kandeloj, flamis. Super interplektaĵo el flagranta oro moviĝis en la mallumo la fajraj tufoj, kvazaŭ la tuta altaro estus mirinda tapiŝo agitata de okultaj manoj.

De ĉe la kapelcentro, la paŝtisto, sen io sur la kapo kaj ankoraŭ kun la kano ĉe la mano, rigardadis la brulefekton.

— Ĉielreĝino! Kial vi tion faris? —

La paŝtisto alproksimiĝis al ŝi paŝon post paŝo.

— La ĉi-tiea loĝantaro estas stulta kaj ne scipovas fari ĝustapunkte la aferojn. Ili oferportas kandelojn al la Sanktulo, kaj la Sanktulo restas en mallumo la tutan jaron. Ĝis la mateno de la ĉeffesta tago ili ja nenion ekbruligas, kaj eĉ, post la solena meso, ili tuj ĉion ree lasas en la mallumo... Kaj krom tio, ne ekzistas inter ili eĉ persono, kiu priatentu ĉion, kion li vidas kaj kiu havu provizeton da pieco... Ili zorgas nur pri la tagmanĝo, la dancadoj kaj la ekstravagancoj, kva-

(1) Morboza = Malsaneca. Vorto aplikebla en senco fizika aŭ morala. Oni diras: morboza influo, doktrino, sensacio, kc.

zaŭ ili ĉiuj ne estus saĝaj... Ili kaŭzas kompatindecon... Ĉu ne vi kredas, ke ĉies festoj ja ne estas festoj por ĉiuj?... Al mi plaĉas celebri ilin sola kaj kvietmaniere... Ili almenaŭ ne distaŭzas miajn pensojn... —

Li tuŝis la brakon de la virino, por ke ŝi lin sekvu malantaŭen, ĝis la plej malluma angulo el sub la ĥorejo, kaj igis ŝin sidi sur la ŝtonbenko; li sidiĝis apud ŝi.

— Atentu tion bone, ermitino... Ĉu ne vere, tiu brullumo pli pompas nun ol la suno, kiam ĝi ĉie promenas?... Certe, la ĉi-tieaj talentuloj tion ja ne komprenus sufiĉe facile. Estas fojoj, kiam ili kaŭzas al mi tian ĉagrenon, se vi scius! Malfeliĉaj! Ili foriras de la mondo, ne sciinte, kio estas plezura afero... —

Li silentis. Strabokule Mila vidis lin resti senmova, kvazaŭ blindigita, rigardante la grandan iluminon en la fono; kaj, en la paca enfermiĝo de tiu malluma angulo, dume sentante, laŭlonge de sia dekstra brako, la delikatan varmon de la vira korpo, rigardadante la ekstazan esprimon de tiu senbarba vizaĝo kaj la oritan blankecon de lia frunto, ŝvelinta pro longaj revaj meditadoj, ŝi komprenis alifoje, ke li staras malproksime, malproksime, senfine malproksime de ŝi... en apartaj misteraj lokoj.

Kaj tiam la indiferenteco, kiu ĉiam estis envolvinta la vivon de la virino, same kiel muro longa, sinsekva kaj sen ia reliefo, komencis fendiĝi, filtriĝante tra la fendetoj, kiel silentaj montarspiritoj, malbonfaraj kaj perturbemaj nekonataj sensacioj.

* * * * * * * * * * * * * * * * *

Kiam unu tagon, * ĉe la falo de la posttagmezo, Mila, sur la placeto de la ermitejo, prenis la virinhararon — tiun hararon tiel longan kaj tufoforman, kiu ŝajnis, kvazaŭ fajo (1) —,

---

* Unika fragmento trovita el la du neeldonitaj ĉapitroj, kiuj perdiĝis dum la hispana civila milito en 1936-39. La aŭtorino, unuamomente, planis la verkon en dudek ĉapitroj, sed ĝin fininte, ŝi konsideris ĝin tro longa kaj memvole decidis formeti du el ili, kiuj, kvankam bele konstruitaj kiel la ceteraj, ne estis, laŭ enhavo, tiel esencaj al la disvolviĝo de la agado. La verko restis, do, limigita al dekok ĉapitroj; tamen, de post la kvina kaj sekvintaj eldonoj, en kataluna lingvo, estis interaldonita tiu ĉi delikata fragmento.

(1) Fajo = Dika, silka ŝtofo.

por ĝin senpolvigi, ŝi ekvidis la paŝtiston kiu, kune kun Baŭdilieto kaj la grego, malsupreniras de la monto en rekta direkto al la ermitejo.

Ili alvenis al la placeto, kiam la ermitino, espriminte al ili bonan vesperon, sin direktis al la kapelo por remeti la hararon sur ĝian lokon. Tiam, la viro, kaptinte ŝian brakon per la celtisa forkbastono, malhelpis ŝin plenumi sian intencon.

— Ĉu vi ne scias, eble, ermitino, kiel estas nomata tio, kion vi havas ĉe la fingroj? —

— Ne... ĉu do eble tion scias vi? —

— Ĉiuj tion scias, ĉi-tie... Ĝi estas bela historio, certe... —

— Ĉu, efektive... Rakontu ĝin al mi, paŝtisto, se al vi plaĉas! — petis Mila, tuj scivoligita.

— Ja ne necesos multe da vortoj, ermitino... — kaj sin turninte al Baŭdilieto, li ordonis al la knabo trankvile, kiel ordinare, sed kun maliceta duonrido: — Enstaligu, etulo, dum mi rakontos la okazintaĵon... —

— Ve! — esprimis la knabo, surprizite, kaj kun granda bedaŭro en la rigardo.

— Ĉu io doloras cin? — al li demandis la paŝtisto, palpebrumante al Mila.

— Ne... — aldonis la knabo, kun surprizo.

— Ĉar mi aŭdas, ke ci ĝemas... — Kaj vidinte, ke li tute ruĝiĝas: — Nu!, mi jam komprenas, ke tio estas pro la fabelo. Ĉu ne?... Laŭdata estu la Sanktega Sakramento! Mi ja ne volas, ke ci ĉagreniĝu pro kialo tiel eta... Ja ne montriĝos maloportuna iomete da brutarhaltado antaŭ ol kaŝiĝos la suno... Mi opinias, ke la brutoj neniel kontraŭstaros, ĉu tio ne ŝajnas al ci? Ili faris sufiĉe longan sieston sur la Supra-Altaĵo. —

Kaj sidiĝinte sur la mureto, kiu ĉirkaŭas la placon, dum la brutaro, disŝutiĝinta sur la sunflanko, demordis la verdan franĝeton, kiu kreskis ĉe la juntoj de la ŝtonplatoj kaj ŝtupoj, li rakontis, sen tio, ke deturniĝus de sur li la okuloj de la virino kaj de la knabo.

— Cetere, ermitino, tiu ĉi hararo ja ne estas hararo, kiel la aliaj... Vi devas scii, ke antaŭ multaj jaroj ekzistis nobela

damo (1), kiu havis hararon tiel belegan, ke pro ĝi, la popolo distingis ŝin per la kromnomo "*Suno de Murono*". Ĉar ŝi ĝin portis supre de la kapo, ĝi pompis tiel brilege, ke vi estus asertinta, ke ĝi estas prilaborita el splitoj de spegulo... En sia deksesjara aĝo, tiu damo jam havis pli da svatiĝantoj ol da sulkoj la jupo; kaj konsideru, ke la jupoj tiam estis multampleksaj, ke la virinoj ja ne domaĝis en ili la ŝtofon... Tute male ol nun, — do vi dirus, ke nun ili paŝas enpremitaj — tiel striktaj la jupoj estas — en akolitan (2) surpliseton (3), vidu... Do, revenante al la damo, en la deksesjara aĝo, kiel mi diris, ŝi jam havis tiom da svatiĝantoj, kiom da steletoj ekzistas surĉiele; kaj ŝi ilin havis el ĉiuj specoj kaj kutimoj, tutcerte; iuj fanfaronaj kaj iuj humilaj, iuj riĉegaj kaj iuj mezklasaj, iuj belaj kaj iuj malbelaj, iuj kadukaj, kiuj karambolis kun la ŝtonoj per la pinto de la ŝuoj, kaj iuj junaj, tiel junaj, ke se oni elpremus ilian buŝpinton, ili ankoraŭ estus vomintaj la mamlakton; ĉar ja ne troviĝis vidvo nek fraŭlo en sephora radio, kiuj ne estus tute enamiĝintaj al ŝi kaj volus ĉiel edzoligiĝi kun ŝi. Sed ŝi malakceptis ĉiujn, unu post alia, kiel ajn bonajn proponojn ili faris al ŝi kaj kvankam ĉiu el ili regalis per kvanto da donacoj ŝian servistinon, por ke ŝi influu apud ŝi favore al li. Ĝis komencis rondiri la famo, ke la *Suno de Murono* estas tiel fiera pri sia belegeco, ke ŝi ne volas ĝin fordoni al tiu, kiu ne posedas rangon de laŭleĝa princo, aŭ superan. Kaj laŭmezure, kiel tiu famo disvastiĝis, la edzokandidatoj, ofenditaj, tuj klaĉis pri la aroganta damo kaj faris mokŝercojn pri ŝia vantemo. Tamen, ili malprave ŝin kalumniis, vidu, ĉar ne estis pro fiereco nek malbonvolo, ke ŝi ĉiujn rifuzis, sed ĝuste pro tio, ke ŝi estis liverinta sian amon al kuzeto, kiu ankaŭ ŝin amis, kaj al li promesis esti lia kaj ne ies alia. Sed la kuzeto estis malriĉa, kiel lignaĵa rato kaj la gepatroj de la damo ne konsentis, ke ilia filino edziniĝu kun persono, kiu ne havas blazonŝildon sur la pordo kaj ne povas

(1) Damo = Nobela aŭ altpozicia virino.
(2) Akolito = Infano, kiu dum la meso servas la ministrojn de la altaro, aŭ kantas en la horejo.
(3) Surpliseto = Lina, blanka mezlonga vesto, kun aŭ sen mallarĝaj manikoj, por ekleziulo aŭ akolito.

disponigi al ŝi kaleŝon kaj tapiŝitan estradoĉambron; ĉar la gepatroj, vidu, ja ne estas sencerbaj, kiel la gejunularo kaj perfekte scias pri konvenkalkuloj. Kaŭze de tio, la kuzeto, memdecide, elmigris al Ameriko por tie akiri riĉon; kaj de tiam ŝi rezignacie lin atendis, ne atentante ies riproĉojn kaj tute konvinkita kaj certa, ke li revenos por fari ŝin feliĉa... —

— Kaj ĉu revenis la fianĉo, paŝtisto? — demandis Mila tute interesita kaj kun palpebrumantaj okuloj.

— Mi tion sincere kredas, ermitino! Konsideru, ke estis forta allogaĵo la *Suno de Murono!* Sed ĉar la okeskudajn ormonerojn oni ne kolektas en la daŭro de okulturniĝo, kiel la helikojn en pluvonokto, la kuzo, por trabati al si sian monsaketon almenaŭ bezonis dudekon da jaroj. Jen kial reveninte ĉi-tien li rimarkis, ke la knabino, kiu jam estis preskaŭ atinginta la kvardekjaran aĝon, en granda diferenco ne aspektis tiel freŝa kaj fortika, kiel li ŝin estis lasinta.

De tio li ricevis grandan ĉagrenon, sed ĉar la kuzino ankoraŭ portis supre de la kapo tiun oran famon, kiu donis al ŝi tian belan vidon, la kuzo iom post iom rezignaciis; kaj oni jam parolis pri la geedziĝa tago, kiam okazis, ke la diablo, kiu ĉiam cerbumas kian malbonagon li tuj farus, jen abrupte, surprizis la fianĉon per tiaj malvarmetoj kaj frostotremoj tiel strangaj, ke oni tuj devis venigi ĥirurgojn kaj "salutistojn" (1) por ke ili lin esploru; kaj la ĥirurgoj kaj salutistoj lin esploris kaj unuanime konsentis, ke li kaptis peston tiel malignan, ke ĝi lin metas en situacion de ekstrema mortdanĝero kaj ke, escepte se okazos miraklo, li nepre pereos. Prezentu al vi, kiel ektimiĝis la *Suno de Murono* aŭskultinte tian verdikton! Kaj ĉar ŝi ne rezignis ĝismorte vivi kiel fraŭlino, post tiom longa sopirado al edziniĝo, jen ŝi sin ĵetas surgenue al la piedoj de Sankta Poncio, kiu ĉiam estis la Sanktulo de ŝia adoro, kaj al li petegas miraklon. Sed la kuzo ĉiam pli malsaniĝas kaj la miraklo tute ne prezentiĝis. Tiam la damo jen interplektas la manojn kaj kun la okuloj ĉielen direktitaj, eldiras al la sanktulo ke, se li savos ŝian fianĉon, ŝi oferos al li la plej bonan aferon, kiun ŝi havas. Kaj vi devas scii, ke la Sanktulo, kiam li ŝin vidis meze de tiu afliktiĝo, turnis kompaton al ŝi kaj al ŝi komprenigis, ke ŝi povas esti trankvila, ke ĉio aranĝiĝos.

Kaj, fakte, ĉio aranĝiĝis, dank' al la interveno de Sankta Poncio; do de post tiu momento la kuzo reakiris sanon, transirante de morto al reviviĝo. Konstatinte helpon tiel manifestan, la damo prenas la brodkadron kaj ekbrodas delikatan rubandon. En la momento, kiam la malsanulo forlasas la liton, ŝi konsideras pretigita sian laboron. La morgaŭon matene, ne dirinte vorton al iu, ŝi prenas tre akretranĉan tondilon kaj, per seninterrompa irado, ŝi suriras la monton. Fortomanko fluktuis en ŝi dum ŝi supreniris la deklivon kaj kiam ŝi perceptis la unuan mordon de la tondilo, ŝin kaptis tia malforteco ĉe la kruroj, ke ŝi preskaŭ falis svene. Sed, ŝi estis farinta voton kaj decis ĉiel ĝin plenumi, se ŝi ne volis fali sub la pu-

(1) Salutisto = Viro aŭ virino, kiu arogas al si la magian kapablon sanigi certajn malsanojn per sia salivo aŭ per kontaktoj aŭ specialaj vortoj.

nojn de la infero; ĉar pri sanktegaj aferoj ne decas fari ŝompomokojn nek artifikojn, vidu. Jen do, ŝi ĝisfunde pripensas kaj veninte al decido, ŝi reprenas la tondilon kaj trak... trak... trak... ŝi fortondas ĝis sia lasta haro; poste ŝi ĉirkaŭligas la hararon per la brodita rubando kaj ĝin pendigas sur najlo de la muro. Kiam ŝi malsuprenvenis de la monto, ŝi ja ne similis, tutcerte, al tiu, kiu antaŭ nelonge ĝin supreniris. Sekve, kiam la kuzo vidis ŝin antaŭ la okuloj, tiel senhara, kvazaŭ ŝi eskapus el galeroj, li posteniĝis, daŭre posteniĝis kaj krucosignis sin, tute kiel se estus aperinta al li la malbona spirito; la sankoloroj, kiuj komencis elmontriĝi sur li paliĝis kaj jam ne multe mankis, ke li refalu en la malsanon. Dum tempodaŭro, li penis, kiel li povis, prezenti al ŝi kuraĝon, sed unu tagon, neatendite de ĉiuj, jen li foriras el Murono kaj reveturas al Ameriko; kaj de tie li sendas leteron al la kuzino, en kiu li anoncas, ke li bonstate alvenis, dank' al Dio, sed ke liaj aferoj ne plu disvolviĝas sufiĉe bone kaj ke li devas resti tie por ĉiam; kaj ke, rilate la geedziĝon, bone tion kalkulinte, en la aĝo, kiun ĉiu el ili havas, li opinias, ke estas preferinde ĝin preterlasi... La damo, leginte tian mesaĝon, jen tiam efektive falas teren, kvazaŭ fulmovundita kaj ĝuste post monato ŝi eniris kiel novicino en la monaĥinejon de Sankta Klara... Kiel mi jam al vi diris, de post tiu momento ŝia hararo restis pendanta sur la muro, sen tio, ke tineo aŭ iu mal-

sano estus iam produktinta al ĝi difekton. Kiam mi venis al tiu ĉi regiono, ĝi ankoraŭ fulmobrilis tute kiel splitoj de spegulo; kaj tio estis, ĉar la antikva ermitino ĝin frotlavis kaj kombetis unu fojon en la jaro, kaj pro tio ĝi kaŭzis plaĉon kiam oni ĝin rigardis. Sed la lastemortinta ermitino, kiu, kiel mi diris al vi alifoje, estis forlasita de la Dia mano, eĉ ne unu fojon ĝin prizorgis kaj tial ĝi nun montriĝas tiel velkaspekta, vi scias?... —

Tiu emocia historio kortuŝis Milan, kaj inspiris al ŝi la deziron agi kiel la zorgema antikva ermitino; do, finfine, tiu kompatinda relikvo de la enamiĝinta damo, kiu unuamomente sentigis al ŝi ian naŭzon, ne devis esti malpli ranga en prizorgado ol ĉio cetera en la kapelo. Anstataŭ ĝin pendigi sur la muro, do, la morgaŭon matene ŝi ĝin kunportis al la teraso, por ke ŝi tie povu ĝin manipuli ŝirmite kontraŭ malhelpoj kaj scivoloj, kaj iom post iom, ŝi malligis la rubandon, kies silko, kolorperdinta kaj rigida kiel papero, krakis kaj fendiĝis ĉe la plej eta kontakto; kaj poste ŝi restis ĝis tagmeze ĉe la sunmezo, sapumante, tralavante kaj frotpurigante, unu kaj alian fojon, la senmezuran harartufon, kiu malrapide ondadis en la akvoplena kuveto, kiel granda tufo el fadenformaj angiloj. Kaj ŝia koro larĝiĝis, kiam ŝi rimarkis, ke tiu kompakta harfasko, malkuniĝante iom pli ĉe ĉiu froteto, tute spongiĝas, kaj pompe kreskas sub la lerta kareso de ŝiaj manoj, perdante la krudecon kaj malbrilon de morta afero, por reakiri la poluron kaj flekseblecon, kiujn ĝi kredeble posedis pasintatempe. Kiam ĝi estis tute pura, kombetita kaj masaĝita helpe de kelkaj olegutoj, ŝi ĝin lasis etendita ĉe ŝirm-angulo, por ke ĝi sekiĝu kaj eniris domen por tagmanĝi. Kiam ŝi revenis al la sunflanko, ŝi restis mirigita antaŭ la spektaklo, kiun ŝiaj okuloj perceptis; la tuta hararo, jam sekiĝinta, brilegis kiel senmezura fajranta juvelo... La altetaksaj vortoj de la paŝtisto, certe, ne estis fikciaj! Tiam ŝi komprenis, kial la damon oni alnomis per la kromnomo *Suno de Murono* kaj ankaŭ komprenis la tutan vastecon de la sinofero plenumita de la antikva enamiĝintino. Ĉar, eĉ fortondita de la kapo, kiu iam ĝin subtenis, tiu bela memoraĵo montris suverenaj siajn potencon kaj ĉarmon. Kiam Mila ĝin rigardis, ĝi donis al ŝi, kvazaŭ

ĝojan ekbruliĝon kaj kun la nazlobetoj tremantaj kaj la lipoj duone malfermitaj, ŝi profundigis ambaŭ manojn en la superbrilan harfaskon, ĝin volupte frotetis sur sia karno, per ĝi karesis sian vizaĝon, ĝin ĉirkaŭplektis sur siaj brakoj, kiel malvarmetan serpenton... Subite, rektigante la kapon kun orgojlo de fiera virino kaj spasmigante la blindigitajn okulojn, ŝi murmuris per varma kaj koncentrita voĉo:

— Kontraŭ ĉiuj viroj en la mondo, mi ne foroferus similan riĉaĵon! —



V
SUMIGANTE TAGOJN

Mila preskaŭ estis fininta la grandan aranĝon en la ermitejo, kaj jam sin sentis en ĝi ne tiel fremda.

Oni povis ĉion esplori de unu ekstremo al la alia, ne trovante ie, polvotavoleton, forgesitan malpuran angulon, rubaĵon senordigitan. La malnovaj meblaĉoj estis formetitaj de la altarpostaĵo, kie ili staris amasforme, kaj portitaj malsupren al la subtera etaĝo sub la kapelo; sur la planko de la stalo estis etendita tavolo da herbaĉo, kiun la paŝtisto estis detranĉinta ternivele ĉe la proksimaj erikejoj kaj sekiginta sur la tagmezosuna kampo; eĉ la defluilo, tra kiu oni elversis la fluidaĵojn de la lavoŝtono, estis senkotigita kaj ellavita per

plensiteloj da akvo, kaj la malfirmaj ŝtupoj de la sonorilturo renajlitaj, ĝis ili restis tute fortaj kaj firmaj. Irante aŭ revenante el Murono, kies vojon devigis al ŝi frekventi la mallerteco de Matio, kiu neniam ion trafe alportis, Mila provizis la proviantejon — jen la mezurkvarono da bakebla tritiko, jen la sako da terpomoj, jen la sekigita moruo — kaj garnis la ĉirkaŭbreton de la kamenkloŝo, per larĝa strio de verdkolora papero kaj la manĝilarejon, per iuj blankaj teleroj kaj duondekduo da tasetoj; en la ekstera korto ironie movis sian delikatan nazeton kelkaj kuniklidoj; en la malluma kamereto de la stalo strebe kovis du kokinoj; sur la kulturtereno estis aranĝita malgranda speciala enfermaĵo plugita laŭ sulkoj rektaliniaj, kie la semoj jam estis ekĝermontaj, kaj, fine, en multego da fenditaj bolpotoj kaj da pecoj de terpelvo vicigitaj sur la muro de la granda teraso, malfermis siajn fajrajn korolojn la brilantaj kalenduloj, krevis la plurpetalaj konvolvuloj kaj lasis sin senhonte kisi de la suno la ruĝaj diantoj.

Tiujn florornamitajn plantojn, la plej gajan noton de la ermitejo, Mila ŝuldis al la komplezemo de la paŝtisto. Ĉar iutage ŝi diris, ke ŝi amas pli multe la florojn ol la manĝaĵon, la paŝtisto, en la sekvinta tago, ŝin kondukis al la farmodomo de Sankta Poncio, kaj ĵus ili estis tie, li petis al la bofilino, ke ŝi liveru kelkan viveman stikaĵon (1) al la ermitino. Sed la bofilino, kies tuta fruktejo aspektis kiel florbukedo kaj kiu de nature estis malavara, diris al Mila, ke ŝi elektu kion ŝi volas; kaj ŝi mem serĉis por ŝi terpotojn kaj ordonis al sia filo, fraŭlo Arnaŭ, ke li elradikigu la plantidojn kompaktaj kun grundo, por ke ili enradikiĝu.

Mila ankoraŭ imagis lin, la belaspektan fraŭlon, fortikan kaj bravan kiel juna glanarbo, sen io sur la kapo kaj kun la kruroj arkigitaj, kiel ponto, super la plantidoj, svingantan tiel trafan frapon per la forkfosilo, ke la grundomaso eliris kompakta kaj sen ia difektita radiko. La paŝtisto estis rakontinta al Mila, ke Arnaŭ, kiu antaŭ du jaroj devis soldatiĝi, amindumis junan unuenaskitinon el Ridorto, kaj ke ili geedziĝos

(1) Stikaĵo = Juna branĉo, tigo aŭ folio detranĉita disde la reproduktota planto.

tuj kiam ŝi atingos aĝon dudekjaran; kaj Mila estis prikalkulinta kiaj homidoj sanaj elkreskos el tiaspeca homa beltalio.

Krom donaci al ŝi la florojn, ankaŭ ĉe Sankta Poncio oni pruntedonis la kovkokinojn kaj vendis la ovojn por kovado, kaj Mila restis pro tio tiel danka, ke multfoje, irante aŭ revenante el Murono, ŝi ne povis sin deteni, ŝovi la kapon en la farmodomon por esprimi la bonan tagon al la gefarmistoj, kvazaŭ ili estus dumvivaj gekonatoj. Kaj ĉiam ŝi renkontis la avinon, kiu volis ŝin iom ripozigi flanke de si, apud la kameno, kaj la bofilinon, kiu komisiis al ŝi ian malgrandan mendon en la vilaĝo: cendon da safrano, paketon da kenaj alumetoj, novajn hirudojn, kiujn ŝi bezonis...

Estis virino alta kaj malgrasa, la bofilino; famo diskuris, ke iam ŝi estis iel okulfrapa, sed la suno, la prujnoj, la tuta laborpezo de la kampara vivo kaj, krom tio, la mamnutrado de ok filoj, velkigis ŝin kaj perdigis al ŝi la freŝon de juneco, kaj nun ŝi havas la haŭton ĉifita kaj kovrita de konfuzaj makuloj, kaj la konturon de la okuloj kaj de la lipoj striita de faltetoj delikataj kaj glataj, kiel linioj faritaj per klingo de tranĉilo. Sed ŝiaj flavaj pupiloj, ŝia diligenta sinteno kaj ŝia voĉo klara kaj vibranta estis plenaj de tiel simpla kaj alloga nekaŝemo, ke ili tuj ŝin faris simpatia kaj estiminda al ĉiuj.

Nelonge post kiam ŝi konatiĝis kun ŝi, Mila kuraĝis direkti al ŝi grandan peton.

— Aŭskultu, Marinjo: kion vi faras el tiom da filoj ĉe via ĉirkaŭo? Efektive vi havas pli da ili ol vi bezonas por la prilaboroj de la farmodomo... Kontraŭe, mi havas neniun, kaj tamen, kiom konvenus al mi havi da ili sur tiu ekzilejo! Kia malagrablaĵo estus por vi pruntedoni al mi Baŭdilieton por ĉiam? Li tiel multe akompanas tie supre!... —

La bofilino ridetis. Ĝuste ŝi forpetis de ŝi la lastenaskiton, la dorlotulon de la patro kaj de la avino, kaj ĝuste nun, kiam estas jam tempo, ke li ĉeestu lernejon por iom eklerni la alfabeton... Sed vidinte, ke Mila malĝojiĝas, kaj dume deklarinte, ke ŝi perfekte pravas, la bofilino tuj cedis, kaj alkonformiĝis liveri lin al ŝi por ia tempodaŭro... *ĝis ŝi estos hardita al la ermiteja vivo.*

Tiun matenon, reveninte hejmen, Mila serĉis ĉie Mation,

kaj trovinte lin dormetanta en la ombro de la bedocipresoj, ŝi malĝentile tiris al li la orelojn:

—Ĉu vi tion jam scias, mallaboremulo, perfekta mallaboremulo? Mi portas al vi bonan sciigon... Ni havos infanon!...—

Matio plene turniĝis surtere kaj restis ŝin rigardanta. Mila, surprizite, ruĝiĝis ĝis la okulblanko, kaj, metinte manon sur la ŝultron de sia edzo, ŝi rakontis al li, tute serioze, la konversacion kun Marinjo de Sankta Poncio.

— Ha!... Dio scias, kion mi pensis!... — Kaj Matio longigis kruron, kiun li havis maletendita, kaj fermis la okulojn.

Tiu indiferenteco vundis la virinon, kaj stariĝinte, ŝi malproksimiĝis ne dirinte ion plu: sed la tutan tagon ŝi sentis sin malkontenta ne sciante la motivon, kaj la sekvintan tagon, matene, ankoraŭ ne estis disbloviĝinta ŝia malbonhumoro. Ŝi tion ekkonis per la kolerflamiĝo ricevita, kiu ŝin konsternis, kiam ŝi vidis Mation elirantan el la salono, tute rideme kaj kun felsako sur la dorso kaj ligna urneto kun pordeto el vitro pendanta antaŭ la brusto. Interne de la urneto, tapetita per velursimila ruĝa papero, kaj supre de soklo garnita per celtisberoj kaj markonketoj, duonspana bildo de Sankta Poncio, kolklininta kaj flaviĝinta kiel hektikulo, tenis sin krampfe, meze de pendaĵoj el skapularioj, stanaj florvazetoj kun pentritaj rozoj kaj benitaj rozarioj.

— Kien vi iras kun tio? — ŝi subite ekkriis, tute ĝeme kaj antaŭsciante, ke la demando estas superflua.

Matio ekridis, tute kontenta.

— Jen, oni diras, ke tio multe enspezigas... Hieraŭ la Spektro rakontis al mi, ke la antaŭa ermito preskaŭ povis sin vivteni nur per ĉi tio. —

Ŝi krevis pro kolero:

— La Spektro diru kion li volas; sed, ĉu ne kaŭzas al vi honton, ke vi, sana kaj normala viro, migru almozpetante tra la mondo? —

Tion ŝi eldiris al li kun la dentoj fermitaj kaj kun la tuta vundanta furiozo de granda spitkolero kaj de granda malestimo.

Matio konsterniĝis, kiel ĉiam, kiam ŝi lin ekatakis rekte en la vizaĝon.

— Ĉu mi? Kaj do!... Jen mi ja devas almozpeti... por la Sanktulo!... —

— Por la Sanktulo! Por la Sanktulo!... — Kaj ŝi dolore rikanis. — Ĉu vi scias, por kio vi volas almozpeti? Por distri la mallaboremon, ĉar eĉ vi mem faras al vi aflikton kuŝi la tutan tagon!... Sinjoro! Ĉu ne estis por mi sufiĉa kornajlo renkontiĝi kun tio, ke vi devigas min vendi la dometon de la onklo, ke vi min fortiras de mia lando, ke vi min enterigas vivanta en tiu ĉi vulpokaŝejo, ke ankoraŭ mi devas vin vidi kun la tornistro surkole, irantan de pordo al pordo, kiel senzorgulo aŭ kiel monavidulo? —

La konsterniĝo de Matio estis granda. De antaŭ dudek kvar horoj — de kiam la Spektro entuziasmigis lin — li ne revis pri io alia ol pri la monkolekto, konfidante al mirinda rezul-

tato de profito kaj distriĝo: kaj ĝuste nun lia edzino elsaltis sur lin kun tiu impertinenta absurdaĵo por riproĉi lian penson! Spite tion, li ne kuraĝis kontraŭdiri al ŝi nek malkaŝe protesti. Li konis sian edzinon kaj sciis ke, kiel ĉiuj ordinaraj milduloj kaj rezignaciuloj, ŝi estis kapabla kovi en silento kaj dum jaroj siajn kontraŭaĵojn, sed ke la tagon, kiam ŝi perdis la paciencon, la eksplodo estis viva kaj prenis amplekson. Kaj li timis tiujn eksplodojn: li estis malforta kaj malkuraĝa, kun la tuta malforteco kaj malkuraĝo de neaktiva estaĵo; li sentis sin en falsa pozicio antaŭ ŝi, senigita je inĝenio (1) por ŝin konvinki, kiam ŝi obstinis en ideo, kaj senigita je fortikeco kaj decido por redukti ŝian koleron, kiam ŝi altgrade furiozis. Pro tio li fleksiĝis tuj kiam li perceptis ŝtormon, sed en la momento, kiam tiu ĉi forpasis, lia ruzeco pasiva kaj malakcela denove surnaĝis kaj sin tenis nemodifebla kiel buo.

Tiun tagon li faris same kiel ĉiam: kovrinte sian retiriĝon per unu "Iru al la diablo!", duonvoĉe elmaĉita, li malaperis de ŝia antaŭo kaj iris promenigi sian elreviĝon tra la ĉirkaŭaĵoj de la domo.

La paŝtisto eksciis pri la kverelo laŭbuŝe de la edzo mem, kaj vidinte, ke kvardek horojn poste Mila ankoraŭ demandis kaj respondis al li ne lin rigardante, li decidis ion fari, kio dispelu ilian intermalicemon.

Pluvoverŝo devigis lin iri returne kaj pasigi la tagmezon hejme; enkondukinte la brutaron kaj ordiginte siajn aferojn, li supreniris al la kuirejo, tute rideme, kiel ordinare.

— Efektive, ermitino, hodiaŭ ĉar la tago estas malvarmeta, ni povus okazigi helikfestenon. Mi havas iujn fastigitajn aspersojn (2) pli grandajn ol kaŝtanoj. Ili devenas de Lup-Pasejo, la regiono, kiu ilin naskas plej belkreskaj el la tuta montaro. Kion vi opinias pri tio? —

Al Mila tio ŝajnis tre oportuna: nur ke ŝi jam havis la tagmanĝon preskaŭ preta.

— Tio ne gravas, virino! Ne plu suferu pro tiel eta kon-

(1) Inĝenio = Spirita lerteco, sagace kaj fekunde eltrovema.
(2) Asperso = Plej granda, malhela heliko. (Latine: Helix aspersa).

traŭaĵo: lasu tion por la vespero kaj tiel, vi havos pli frue preparita la laboron. Per telero da legoma vermiĉelosupo kaj la aspersoj, ni sendispute havos sufiĉe por klopodi la tutan tagon. —

Matio akceptis entuziasme la ideon, kaj la paŝtisto kontente kunfrotis la manojn.

— Jen do: interkonsento farita... Dum la ermitino pruntos al mi la pistujon por kirlopisti kulerplenon da oleajlaĵo — ĉar sen oleajlaĵo aŭ pipro la helikoj ne valoras eĉ kraĉaĵon de pendigito! — vi, ermito, kolektu sufiĉan brakplenon da branĉetaĵo de ĉe la korto kaj ĝin konduku al la rigardejo sur la sunkampo, sur tiu ebeno ronda kiel tablo. —

Ĉion alian oni preterlasis por la helikfesteno. Apenaŭ la paŝtisto estis pretiginta la oleajlaĵon, li ĝin plenplene elversis sur teleron el ruĝa argilo, kaj sekvate de Mila, kiu portis la panon kaj la vintrinkilon, kaj de la knabo kun la helikkorbo tenata je la vimena anso, li sin direktis al la altaĵo ĉe la sunkampo. La virino aspektis tute vigliĝinta.

— Kiel tintas, paŝtisto, viaj helikoj!... —

— Ili certe faros pli da muziko, kiam ni rostos iliajn gluteojn, ermitino! —

Sur la rigardejo ilin atendis Matio, sidanta ĉe la suno, apud la fasko da seka branĉetaĵo, kun la kruroj angulformaj, la brakoj krucigitaj sur la genuoj kaj la mentono sur la brakoj.

— Per Dio, ermito! Vi ja estus povinta ordigi la brul-faŝĉinon, malgraŭ ĉio! Kiam ni estos finpretigintaj la preparojn, jam la oleajlaĵo estos fluidiĝinta kiel siropo. Zorgu tuj fari bonan kuŝujon, por ke almenaŭ ili ebene sidu antaŭ ol ekmorti... Intertempe la ermitino kaj la knabo elektos tiujn helikojn, kiuj plej ĉarmos ilin kaj mi elĉizos forkojn (1)... Forkojn, kiujn ni uzos debute... Ĝuste nun mi portas erikon (2) celtaŭgan... —

Li elŝutis la enhavon de la helikkorbo sur la stepon. Edzo

---

(1) Forkoj = La paŝtisto parolas pri forkoj, sed temas pri nuraj unupintaj vergetoj.

(2) Eriko = La radiko de la erikoj estas uzata por fari pipojn, forkojn, kc.; la branĉoj servas kiel balailoj por draŝejoj, kortoj, kc.

kaj edzino krevis per admiraj ekkrioj: ili ne sciis klarigi al si la kreskon de la helikoj, grandegaj, malhelaj, malmolfaŭkaj kaj kun la spiraloj de la konko dikaj kiel fingroduono. Baŭdilieto plenigis ambaŭ manojn per kvanto da tiuj, kiuj plej belaspektis. La paŝtisto radiis pro kontento.

— Kio ŝajnas al vi tiu ĉi konkegularo? Aspekton tiel belan ne havas tiuj de la ebeno, ĉu vere? Kaj eĉ la aspekto ne estas la plej bona. Se malproksimalande oni scius la bonguston de la helikoj de la Ŝtonegoj, la registaro devus rekruti soldatojn por gardi la montaron, vidu. —

Sur la platigita fasĉino ili sinsekve ilin spirale etendis, sufiĉe densaj, kuntuŝiĝantaj, kun la faŭko malsupre. Mila kaj la etulo ilin elektis, kaj ŝi kaj Matio ilin surmetis; kaj kelkafoje, kiam renkontiĝis la manoj de edzo kaj edzino por meti helikon samloken, ambaŭ ili ekridis, li bonfide — ĉar li ne estis viro retenanta venĝemon — kaj ŝi eĉ senvole.

— For de ĉi-tie! —

— Kviete, ĉar la mia estas pli granda!... —

Kiam la helikrondo havis moderan ĉirkaŭamplekson, Mila konsultis la paŝtiston.

— Kion vi diras pri tio ĉi, Kajetano? Ĉu ili sufiĉos? —

La paŝtisto, kiu surgrunde kaŭrante estis forŝeliginta la erikojn kaj ilin pintigis, respondis ne levinte la kapon:

— Neniel ŝparu tie la municiojn (1), ermitino... Mi havas pli profundan ezofagon ol la abismo de la Kokpiedo, kaj neniam plaĉis al mi halti mezvoje: kaj la knabo ankaŭ estas akolito, kiu rilate apetiton ne plu kondutas malakorde kun la paroĥestro. Cetere, ja ne necesas barakti en malsufiĉo: ni certe ne elĉerpos la helikojn de la regiono; dank' al la kelkaj hodiaŭaj pluvgutoj mi esperas fari alian abundan kolekton da ili... —

— Ĉiujn, ĉiujn!... — kriis Baŭdilieto.

— Ci bone komprenas, etulo: mi jam vidas, ke ci portas tian apetitegon kiel brakamplekso... —

Kaj cirklon post cirklo, la rondo larĝiĝis, ĝis eniris en

(1) Municioj = Manĝmaterialoj.



ĝin la tuta restaĵo el la helikkorbo, escepte de la difektitaj kaj de la mortaj.

—Nun lasu tion al mi!... — Kaj la paŝtisto, kiu jam estis glatiginta la pintajn erikojn, ilin skrapinte per la klingo de la tranĉilo, maldensigis la branĉetaĵon, kiu restis kaj ĝin ŝutis je plenmanetoj sur la helikrondon, iom post iom, ĝis fariĝis sufiĉe dika tavolo: poste li malforte ĝin surpremis per ambaŭ manoj, kaj ekbruligis sub ĝi fajron.

La branĉetaĵo tuj ekfajris, kaj starigis grandan flamon.

— Iru etulo! Ni vidu ĉu ci transsaltos la fajron, fulmotondroj! —

— Ĉu efektive? — demandis la knabo kun la okulgloboj brilantaj.

— Se ci transsaltos de flanko al flanko, ne stumblinte, mi donacos al ci la asperson el la spiralcentro, la avon de ĉiuj ceteraj; sed se ci implikos ion aŭ ekrostos al ci la ungojn, tiun ĉi vesperon ne okazos fabelrakonto. —

La knabo faris kelkajn paŝojn malantaŭen por preni avantaĝon, kraĉis, suprentiris sian pantalonon, kiu ĉiam malsuprenglitis sur li kaj, ŝvelinte la vangojn, li ekigis kuron.

Mila kaj la paŝtisto, avidege, manklakis.

— Ĉu mi ektuŝis fajron? — demandis Baŭdilieto, sin turninte ĉe duonŝanceliĝo de la falo.

— Kio, eĉ ne pensu! Almenaŭ ci transsaltis fingramplekson super ĝi! — ekkriis la paŝtisto ridante. — Ci plengajnis la helik-avon; kiam ci estos ĝin manĝinta ni pendigos la karapacon, kiel tintilon, sur la korno de la virŝafo. —

La fajroflamo komencis estingiĝi, ŝiriĝante tie ĉi kaj tie, kaj sub ĝi oni perceptis la flustron de la helikoj, kiuj rostiĝis.

— Kiel ili grincas, malfeliĉaj bestetoj! — murmuris Mila.

— Ja ne malĝoju, ermitino: ĉio devas fini sian vivon en tiu ĉi mondo... Kaj krom tio, neniel pensu, ke ĝis nun ili kunvivis brave amuziĝante... Pli ol unu monaton ili nenion glutis, la naivuloj!... Ba, ba, ni preparu la ilaron, ĉar mi jam flaras ilian riĉan odoron... —

Ili kolektis apud sin, je ĉies manatingo, la oleajlaĵon, la panon, la vinon kaj la malmultajn pintajn erikvergetojn.

— Ni vidu, kion ili nun petas... — Kaj la paŝtisto levis stumpon de brulardanta branĉetaĵo kaj, tute kaŭriĝinte, li rigarde esploris.

— Ankoraŭ ili petegas pli da fajro, tiuj ĉi animetoj el la purgatorio; ĉiuj siblas kaj kraĉas kiel damnitoj. Ekzamenu vian flankon, ermito. —

Tial ke de la flanko de Matio la helikrondo montriĝis preskaŭ ĝustapunkte, ili pli ŝarĝis per fajro la kontraŭflankon.

La penetrema odoro de rostaĵo kaj kuirita afero plenigis la proksimajn erikejojn.

Kiam la flamoj estingiĝis, langante jen nur per fajrero, jen per alia, restis surgrunde granda nigra disko lentugita de ardantaj brultufoj.

— Etulo, vizaĝalteriĝu, ĉar nun venis nia vico: ni vidu, kiu pli forte blovos... —

Kaj surmane ĉetere, kun la kolo elastiĝinta kaj la okuloj oblikve turnitaj, la paŝtisto kaj la knabo kunblovis, kiel fluo de nordovento, flugigante ternivele, trans la rigardejon, la malhelajn aŭ flagrantajn fajrerojn de la konsumiĝinta branĉetaĵo.

— Aj, aj, ĉiuj bruldifektiĝis! — tranĉe kriis Mila pro falsa alarmiĝo, tuj kiam ekmontriĝis la helikaj karapacoj, ĉi-tie

plenrostitaj, tie kalcinitaj kaj ĉiuj malpuraj de cindro kaj rulpremitaj, kiel ludilaj spiralkukoj.

— Vi jam alimaniere tion esprimos al mi post nelonge, ermitino; se vi ne manĝatingos la centon, mi vete rezignas por ĉiam veturi al Barcelona, eĉ se mi gajnus en la loterio... —

Kaj denove ili blovincitis la fajron kaj forigis per la fingropinto pajlerojn kaj trunketojn, ĝis la fajrorondo restis pura sed kunigita kiel unu tutaĵo, kun la helikoj kunlutitaj unu je la alia per bruna kaj gluiĝema gelatenaĵo.

— *Ganing!... Ganing!... Ganing!* (1)... Jen la sonorileto de la komuna manĝo, Dia popolo!... Alproksimiĝu antaŭ ol ili malvarmiĝos! —

Kaj la paŝtisto, forĵetinte la plusĉapon malantaŭen kaj gaje manklakante, sidiĝis la unua apud la rondo, krucigante la krurojn laŭ maniero de klaplito.

— Donu al mi pintovergeton! — kriis Mila.

— Kien ni metu la oleajlaĵon? — demandis Matio, kun la telero en la mano.

— Tien, kien ni ĉiuj povos atingi ĝin... Ĉi-tien, sur la aspersojn... He! lasu antaŭe al la etulo forkapti tiun grandan helikmoŝton el la centro... Li ĝin gajnis per la transsalto... —

Per mansvingo la etulo dekroĉis la asperson, ŝaŭmantan tra la tuta buŝo per verd-flavaj salivaĵoj.

— Rigardu, rigardu! — li ekkriis montrante ĝin kun admiro al la paŝtisto.

— Konsideru kiel multe ĝi sakris antaŭ ol ekstermiĝi!... Kian haladzan faŭkon ĝi postlasis!... Sed, zorgu ne difekti ĝin, ĉar ĝi devas esti la tintilo de la virŝafo, konforme mi jam al ci diris... —

Ĉiuj ili akomodiĝis, kaj kvar manoj, ĉiu ĝiaflanke, detranĉis samtempe la helikrondon. La erikaj pintovergetoj scivole priserĉis en la karapacoj, per lerta turnomovo sekvigis la dube verdajn pulpojn, finiĝantajn per blanka aŭ ŝlima bukleto, ilin ĉirkaŭfrotis en la oleajlaĵa telero kaj kondukis al la buŝoj kun eksterordinara diligenteco.

La eksteraj spiralvicoj de la helikrondo rapide malpliiĝis,

(1) Ganing = Elparole akcentu la lastan silabon.

kaj ĉirkaŭ la kvar kunmanĝantoj, la Strigo, la hundo de la paŝtisto, daŭre kolektis la malplenajn karapacojn, ilin tralekis kaj poste dentomuelis kun kraketado pli brua ol se ĝi manĝus ostojn.

— Laŭdata estu Dio! La fasto estas bona afero por la sanstato... Tiuj ĉi bestetoj ja ne gustas tiel amare, kiel ŝoso (1) de absinto (2), ĉu ne vere? Etulo, se ci gardos sendifektaj la karapacojn, en la tagsoleno de Sankta Poncio mi aranĝos al ci iluminon, per lanternetoj, ronde ĉirkaŭ la teraso. —

Mila ne povis plu sin teni ne deklarante, kun amika entuziasmo:

— Fakte, paŝtisto, vi havas sagacon por ĉia faro... —

La paŝtisto trankvile ridis.

— Se tio ĉi temas pri la aspersoj, mi vin atendos tiun ĉi posttagmezon ĉe la Lup-Pasejo, kaj tie vi spertos, al kiu apartenas la sagacaĵoj... —

Vigla kaj klara trilo, kvazaŭ de kardelo, eliĝis el sub la rigardejo mem. La supraj kunmanĝantoj turnis siajn akrevidajn kaj scivolajn rigardojn rekte malsupren.

Viro suprenrampis tra la deklivo, fajfante, kun la kapo klinita kaj la brakoj sentakte balanciĝantaj.

Matio plenvoĉe ekkriis:

— Spektro!... He, Spektro!... —

La viro levis la kapon, iel rigardis kaj poste fermis la okulojn kaj montris la dentojn. Mila tuj rekonis la kampulon, al kiu ŝi donis por trinki antaŭ kelkaj tagoj.

Ne akcelinte la paŝon li fingrimpis ĝis la altaĵo, kaj ekhaltis.

— Hu, hu, hu!... Mi jam sciis, ke vi faras helikfestenon... De malproksime mi vidis la flambrulaĵon... — Li movis la nazon flanko-flanken, kiel leporhundo. — Hu, hu!... kian aromon ili dissendas!... —

— Ĉu vi volas ilin gustumi? Ili estas kvazaŭ torto!... — esprimis Matio, iel apartiĝante por lasi al li lokon.

La viro kvazaŭ hezitis, sed je la dua afabla invito de Ma-

(1) Ŝoso = Juna brancoĝermo jus elvolviĝanta.
(2) Absinto = Amara, aroma vegetaĵo.

tio, plifortigita de duonrido de Mila, li genufleksiĝis kaj eksidis sur la kalkanoj.

Ĉar tie ne ekzistis pintovergeto por li, li elpoŝigis la kornan tranĉilon, kun klingo mallonga kaj larĝa, sed pinta kiel ponardo. Sed, kvankam li tenis ĝin malfermita en la mano, li preskaŭ ĉiam mankaptis la helikojn, ilin dispremis per krakmaĉo, kvazaŭ li disrompus nematuran migdalon, kaj elkraĉinte ĉiuflanken la pecetojn da karapaco, li englutis la helikmedolon. Vidinte tian manĝomanieron, Mila eksentis vomemon en la stomako. De tempo al tempo, tamen, la viro uzis la tranĉilon: tio okazis, kiam li volis trempi la aspersojn en la teleron de la oleajlaĵo; kaj tiam la virino rimarkis, ke la Spektro havas manojn preskaŭ nigrajn, longajn, maldikajn kaj laŭlonge kovritajn de vilo densa kaj raspa, kvazaŭ ĝi estus subrostita.

Tiel longe, kiel tiu viro estis tie, la paŝtisto ne diris vorton, li nur trankvile manĝadis; sed ĉiufoje kiam li levis la vintrinkilon por trinki, la penetrema viveco de liaj okuloj duonfermitaj defalis preskaŭ vertikale sur la invititon.

Subite Mila ĵetis surprizkrion.

— Ni ne memoris pri la legoma vermiĉelosupo! —

La paŝtisto turnis al ŝi la kapon.

— Vi pravas, la ĉielo min prenu! Tio signifas, ke por ĉefmanĝaĵo ĝi ja ne mankis... Kaj nun ja ne estas oportune ĝin meti ĉe la voston de tia abundaĵo... Mi, almenaŭ, jam estas sufiĉe sata. —

En tiu momento Mila surprizis, sub la rubusformaj brovoj de la Spektro, fulmobrilon, kiu direktiĝis rekte al la paŝtisto. Sed tiu fulmobrilo tuj estingiĝis: la Spektro estis ferminta la okulojn, kaj ridis per tiu sia rideto tiel propra.

— Hu, hu, hu!... Ĉu vi donacos al mi unu el tiuj aspersoj por la edzino? —

Ili rigardis lin mirigite, ne lin komprenante.

Li tiam ektiris ŝnureton, kiun li transverse portis sur la brusto, kaj venigis el malantaŭe antaŭen retoforman plektaĵon, en unu el kies faldoj estis tufo hematitkolora. Tio estis furo.

Baŭdilieto agitiĝis kiel hidrargo, kun la okuloj plene malfermitaj.

La furo malkviete tretis la reton kaj snufis, eligante la blankan nazeton tra inter la maŝoj.

La Spektro dispremis helikon, ĝin senŝeligis kaj donis al ĝi.

— Ĉu ĝi ankaŭ manĝas da ili? — demandis Matio.

— Ĉion ĝi manĝas: escepte de ovoj, hej, ĉar ilin mi devus aĉeti... —

Kaj la viro ridis kun la okuloj fermitaj, kiel ordinare.

— Sed, kie mi lin vidis? — Mila pense demandis al si.

—Ĉu estas bele, ĉasi per furo? — redemandis Matio.

— Tiel oni asertas... Hu, hu, hu!... Venu tiun ĉi posttagmezon kaj vi tion spertos... —

Matio animiĝis.

— Ĉu vi iros tre malproksimen?... —

— Nur ĝis la Gurgo de la Tri Kombiletoj... —

— Jes ja mi venos. Fakte oni ne scias, kiel pasigi la tagon, ĉi-tie ĉe la ermitejo!... —

La frunto de Mila kuntiriĝis.

— Ĉu vi ne volis fosi la bedojn hodiaŭ? —

— Jam mi fosos ilin, morgaŭ... Sufiĉan tempon mi ja disponos por tio! —

Baŭdilieto apudiĝis al la ŝultro de la paŝtisto, kaj ĝin iom frotetis, dolĉe.

— Kion ci volas, etulo? —

La knabo murmuris malrapideme, ne deturnante la okulojn de sur la furo:

— Ĉu vi volas lasi min tien iri? —

La paŝtisto rigardis lin serioze.

— Tio ne taŭgas por ci, dorlotindulo... Kiam ci estos pli aĝa... —

— Kio! Allasu lin, viro... Li helpos nin porti la kuniklojn, ĉu ne, Baŭdilieto? — diris Matio, rideme.

La knabo rerigardis la paŝtiston; tiu ĉi dezirus rediri al li ke ne, sed tiuj verdaj okulglobetoj turnis al li tiel teneran (1) peton, ke li ne kuraĝis senmezure disrevigi lin.

— Nur hodiaŭ kaj ne plu — li konsentis malbonvole, al-

(1) Tenera = Karesema, milde amema, kormola.

donante por si mem: — Jam mi kondutos tiel, ke ci ne plu petu de mi tion, kompatinduleto! —

Kaj kiam, post formanĝo de la lasta heliko, ambaŭ viroj kaj la knabo malsupreniris de la sunkampo, la paŝtisto, tenante je la kolrimeno la Strigon, kiu donis signon ilin sekvi, turnis sin al Mila, ankoraŭ sidanta, kiel li, apud la cindroj de la rondo, kaj al ŝi diris, balancante la kapon de supre malsupren:

— Malbona ŝanco nin trafas, ermitino!... Tiu ĉiu malbonaŭgura rabobirdo rondiras la ermitejon. Mi rediras al vi: Fiksu al li atenton, fiksu ĝin bone! Tio ne estas ridiga afero, certe! —

— Sed, kiu estas tiu viro? —

— Kiu li estas? Kiu scias? Ia bastardo pri kiu Dio scias el kie li eliris... Oni diras, ke li, infanaĝe, almozpetadis kune kun maljunulo, kaj kiam la maljunulo mortis li restis por servi en tiuj ĉi farmodomoj, ĝis ĉiuj lin elpelis for, kiel mallaboremulon kaj friponon... Nun li ŝtelĉasas kuniklojn por ŝpari al si laboron; kaj ilin ĉasas ĉiatempe, vidu: ĝis li ekstermos la tutan kuniklan idaron. Li ne simpatias kun mi, ĉar mi malsukcesigas ĉiujn liajn planojn. Kiam li viglas kuniklokaŝejon, mi, returnire, plantas tie antaŭe ian birdtimigilon, kaj la kunikloj ektimas kaj serĉas alian kuŝejon... Sed verdire: tio estas la sola afero, kiu atentigas mian okulon... Se mi falus en liajn manojn, li min ja ne indulgus pro tio. Jen: mi posedis pasintatempe pafilon... Jam mi rakontis al vi, ke mi amas promeni sur la altaĵoj dum la nubaj matenoj... Do, iutage, vagante laŭ la Kresto-de-la-Gnomo, kiu estas eĝo soleca kaj tiel neta, ke oni povas distingi sur ĝi muŝon en distanco unuhora, mi ekaŭdis serpentan siblon, kaj kuglo preterpasis mian orelrandon. Mi ja ne vidis homon, ĉar malsupre ĉio estis, kvazaŭ nubovato, sed mi perdu la vidkapablon, se ne estis tiu fripono mem, kiu pafis. Poste, ĉar li faris tiom da malbono, la ĝendarmoj konfiskis lian pafilon, sed malgraŭ tio, mi ne konfidus al li eĉ sensignifaĵon, vidu... Li konas ĉion, scias artikigi ĉiuspecajn voĉsonojn kaj ĉiam portas enmense ian friponaĵon. Kaj se tion oni bone pripensas, rezultas, ke

ĝi ne povas esti alimaniera. Ĉu vi vidis liajn manegojn de virsimio? Jen li ja havas pli da pozoj bestaj ol homaj... —

Mila ricevis, kvazaŭ intuon.

— Ne plu parolu! Nun mi konscias, de kio mi lin konas! Ne pro tio, ke mi lin vidis iam, ne: sed ĝuste tial, ĉar li havas la samajn dentojn kaj la samajn gingivojn kiel hundino, kiu loĝis ĉe la onklo, kiam mi estis infano. Ĝuste, guste... Nun mi trafis!... Kaj mire rigardante la paŝtiston, ŝi tre mallaŭte aldonis: — Vi pravas... Pli da pozoj bestaj ol homaj!... —

VI
FABELOJ

Dum la vesperiĝoj, ankoraŭ pli malvarmetaj ol plezurigaj sur tiuj altaĵoj, ĉiuj kolektiĝis en la kuirejo, kiu tute ridis per grandaj lumaj ridoj. El ĉiu seka arbustaĵo, kiun oni metis en la kamenon, ŝprucis nova fajra bukedo. Ĝi larĝe serpentumigis siajn brulantajn langojn, — fleksiĝantajn kvazaŭ batataj de ekvinoksa ŝtormo —, plenigis per intensaj kaj subitaj helecoj la ombrajn murojn kaj ĉirkaŭvolvis la figurojn de la knabo kaj de la paŝtisto — per ruĝaĵoj —, simile al demonetoj en magiaj komedioj.

La knabo havis apud si staplon da arbustaĵoj kaj periode

nutradis tiun malgrandan inferon, dum la paŝtisto, kun la kruroj etenditaj kaj la plusĉapo sur la nuko, senŝeligis la celtisajn vergojn, kiuj, pli poste, estos kolbridiloj por la bravaj virŝafoj, ĉirkaŭplektitaj bastonoj por la dandaj fraŭloj el la farmodomoj kaj fajfantaj vipoj por la ĉaristoj el Murono. Matio kutimis sin kuŝigi plenplezure sur la benkon apudtablan, kun la buŝo suprenturnita kaj la brakoj interplektitaj servantaj al li kiel kuseno, kaj Mila moviĝis tien kaj reen pretigante la manĝaĵon kaj strečante la orelon, aŭ mem sidiĝante kiam ŝi povis apud la kameno.

La paŝtisto, dum sia laboro, rakontadis fabelojn al Baŭdilieto, kaj lia parolo, ripoza kaj milda, plena de la ekzotika ĉarmo, kiun ĝi estis konservinta el la naskiĝaj lokoj, leviĝis en la brulruĝa kvieto de la loĝejo kun granda majesteco, simpla kaj mistera, laŭ druida rito.

La unua el tiuj fabeloj, kiun Mila aŭdis lin rakonti, estas tiu pri la Trumpetulinoj.

Jen ĝi kiel specimeno.

La paŝtisto rakontis tiel:

— Jen en pratempo, kiam la bestoj ankoraŭ parolis, ekzistis maljunulo treege maljuna, kiu vivadis sur tiuj ĉi montoj de antaŭ jarcentoj. Kaj tio okazis pro volo de Dio, kiu permesis al li vivi pli longe ol la aliaj homoj, ĉar li ne estis pekulo nek iam havis rilaton kun iu ajn virino. Anstataŭ jako kaj pantalono, kiel la ĉi-tiea popolo, li portis, kiel solan vestaĵon, siajn harojn tiel longegajn ke, malantaŭe, ili ŝirmokovris lin kiel mantelo, kaj la blankan barbegon, kiu antaŭe, pendis de li ĝis malsupre de la genuoj... —

La knabo ĵetis admiran ekkrion, kiun la paŝtisto komentis per duonrideto kaj tiuj ĉi vortoj:

— Imagu, etulo, se nun ni devus iri tiel nekonforme vestitaj, kian belan aspekton ni prezentus... Vidinda afero tio estus, fakte!... Revenante al la maljunulo, mi volas al ci diri, ke li estis sankta viro, kiu ne havis alian obsedon en la cerbujo ol preĝi al Dio tage kaj nokte kaj manĝi radikojn de plantoj anstataŭ ĉian manĝaĵon, kaj aldone, kelkajn celtisberojn kiel komplimentan frandaĵon.

— Ĉu celtisberojn? — esprimis Baŭdilieto kun nova surprizo, memorante ke ankaŭ li kutimis ilin manĝi.

— Tute kiel ci aŭdas! Kaj povas esti, ke ili eĉ apartenis al la celtiso de ĉe la Intermonto, al tiu celtiso mem, kiun ni plukas, ci kaj mi, ĉe ĉiu preterpaso. —

La knabo restis tute ravita de tia supozo, kaj la paŝtisto daŭrigis:

— Tiel sankta estis tiu bona viro, ke la aliaj hontis apudstari ĉe li, pro timo ke Nia Sinjoro tro klare rimarkus ilian malgravecon per la komparo. Kaj okazis, ke jen unu, jen la alia, ili ĉiuj ĉiam pli malsupreniris for al la ebeno, ĝis venis tago, kiam sur tiuj ĉi montoj ne restis aliaj krom la maljunulo tiel maljunega kaj la sorĉistinoj. Jam mi rakontis al ci alifoje, mi pensas, ke la Torento de Malbonsangulo, la Gurgo de la Tri Kombiletoj kaj la Siloj de Belfeĉo estis pli surŝutitaj de sorĉistinoj ol ĉevalaĉo de moskitoj. Sole ke ilin oni ne vidis, ĉu ci komprenas? Kaj oni renkontiĝis promenante meze inter ili kredante sin sola kaj ili, tion rimarkinte, prezentu al ci kiel sendube ŝiriĝis pro rido! Ĉar ci devas scii, ke la sorĉistinoj estis speco de gento tre amuziĝema kaj amanta petoli kun la junularo. De tio ĝuste venis ĉio, kion mi al ci rakontos. Kaj estas ke, mallonge post kiam ĉiuj viroj forlasis la montaron, la sorĉistinoj ne sciis kiel konsumi la tempon kaj komencis nostalgii kaj fariĝi enpensiĝemaj, ĝis kiam, eksuspektinte, ke pri ĉio havas la kulpon tiu maljunulo manĝanta radikojn, ili decidis fari al li malagrablaĵon por sin venĝi. Tial do ili okazigis kunsidon ĉe la Intermonto de la Knabino, kaj tie ĉiuj esprimis sian opinion; sed fariĝis tia implikiĝo de eldiroj, ke ili nenion interkonsentis. La virinoj estas iel malstreĉitaj ĉe la lango kaj foruzas vane multe da kraĉaĵo... Mi konjektas, ke ili ne estus alvenintaj al akordo, se abrupte, la plej juna el la sorĉistinoj, kiu estis tre sagaca, ne estus alsaltinta mezen de la rondo kaj dirinta tiel: — Oni ne plu parolu pri tio, kamaradinoj! Ĝis nun mi cerbumis, kiel oni povus malvirtigi viron, kiel ajn sankta li estas, kaj nun mi proponas, ke vi lasu tiun al mi, ke mi prenu lin sub mian respondecon... — Tiu afero okazis hodiaŭ, ni supozu, kaj jen en la sekvinta tago, ektagiĝe, la maljunulo troviĝis surgenue pre-

ĝante, kiam li rimarkas grandan ombron surteran. Li levas la kapon kaj, kion ci dirus ke li vidis? Birdeton malgrandan, tre malgrandan, tute oritan, kaj kun tri ruĝaj plumetoj kiel tri sangaj gutetoj, anstataŭ kresto... —

La verdaj okuloj de la knabo rebrilis kiel du lampiroj kaj liaj manoj, senmovaj, forgesis la vojon sekvotan de la sekaj arbustaĵoj. La paŝtisto komencis senŝeligi novan celtisan vergon.

— Vidi la birdon kaj resti ravita, estis por la maljunulo afero sammomenta; kaj okazis, ke rigardante, rigardante, li perdis la fadenon de la patro-nia kiun li preĝis; kaj ĉar la birdeto prenis flugon kaj forrapidis al la Supra-Altaĵo, jen li tute enpensiĝis demandante al si mem: — Kiel estas eble, ke tia malmulta vivantaĵo produktas ombron tiel grandegan? Kaj kiel povas esti, ke ĝi faras tian ombron se nenia sunlumo vagadas surtere? Kaj krom tio, el kiu speco estas tiu birdeto, ke mi ankoraŭ neniam ĝin antaŭe vidis en la daŭro de tiom da jaroj kiom mi havas?... Ĉu ĝi estas upupo? Ĉu sturno? Ĉu ardeo? Ĉu emberizo?... — Sed, kvankam li plue meditadis, li neniel trovis en sia menso ion similan... —

La paŝtisto interrompis sin por saltigi per lerta oblikva tranĉilfrapo trunkidon de la vergo, kiu falis en la krakantan kamenon. Tiam sur la vizaĝoj de la knabo kaj de Mila malklariĝis dum momento la mieno beata kaj timvundita pro la aŭskultado, kaj eĉ Matio, apenaŭ dormetanta sur la longo de la benko, moviĝis malkviete, frotante sian dorson sur la ligno kaj duone malfermante demandan okulon, kiam la paŝtisto tro malfruis repreni la fadenon de la rakonto. La filtrilo de la homa parolo tiel pove agas sur la senton de la homoj ke, kiam ĝi tranĉiĝas, ili sentas sin pro tio angore nostalgiemaj.

Sed la rakontoj de la paŝtisto ne longe tranĉiĝis: ili malavare elglitis, sen klopodo, kiel la elflukvanto de natura fonto.

— La maljunulo estis naiva kiel infaneto kaj ĉion li kredus, escepte ke en la mondo povus okazi fakto kun makulaĵo de malico aŭ de sekreta perfido. Sed ci jam sendube imagas, etulo, ke ĉio temanta pri la birdeto estis friponago de la sorĉistinoj, ĉu ne? Tiel ke, en la sekvinta tago, apenaŭ li surgenuiĝis, li jam ree vidis la surteran ombron kaj la birdon an-

taŭ la okuloj: nur ke la duan fojon ĝi ne kontentiĝis pepante kaj saltetante, sed ĝi trilis per triloj tiel viglaj kaj dolĉaj, ke neniel ili estis kompareblaj al tiuj de la plej langakuta najtingalo... Mi jam al ci diris, ke la maljunulo estis naiva kiel infano, kaj ĉar la infanoj montriĝas kiel la virsimioj, kiuj volas ĉion tuŝi, kion ili vidas, okazis, ke la maljunulo, tuj kiam al li estis oportune, etendis la manon por ekkapti tiun belan birdeton, kiu faris al li dorlotaĵojn; sed apenaŭ ĝi rimarkis lian intencon, la birdo batis la flugilon kaj sin direktis alifoje al la Supra-Altaĵo. Ja ne demandu kion faris la maljunulo ekde tiu momento! Li nek memoris preĝi al Dio, nek elterigi radikon, nek manĝi ununuran sensukan celtisberon. Kaj dumnokte, anstataŭ bona dormemo, al li nur venis tiu ĉi penso: la birdo, la orita birdo! Tio signifas, ke ankoraŭ la steloj faris sur la ĉielo la kuku-ludon (1), jam li staris surgenue ĉe la ĉiutaga loko kaj tutforte tenante lazon, kiun li mem elpensis al si. Kaj apenaŭ heliĝis kaj la birdo komencis ĉirkaŭflirti lin, jen li alĵetas la lazon kaj... —

La paŝtisto ĉesis paroli por fini la senŝeligon de la vergo, kaj vidis, ke la okuloj de Baŭdilieto, rondaj kiel tiuj de fiŝo, ŝajnas kvazaŭ ŝtoniĝintaj.

— Kaj li ĝin trafis? — demandis avide la knabo.

—Ĝuste, ĝuste je la kolo, etulo! Kaj tuj kiam li ĝin havis, la maljunulo mokridis tiel:

— Ho, vi orita sorĉbirdet',
Mi ja vin kaptis per lazet'.

Sed li restis marmorŝtona, kiam li aŭdis la birdon respondi:

— Ho, maljunulo de la monteto,
Min ne strangolu per la lazeto!

ĉar en efektiveco mi ne estas tio, kion vi pensas. Mi estas malliberulo de la Reĝo de Maŭrolando, kiu, pro miaj pekoj, liveris min al la sorĉistinoj, ĝis mi trovos antikvatempan maljunulon, kiu ne estos koninta iun ajn virinon kaj volos min liberigi! — La maljunulo, tion aŭdinte, ekhavis grandan ĝo-

(1) Kuku-ludo = Kaŝludo.

jon, ĉar li pensis, ke tio estas afero de Nia Sinjoro, kiu, pere de li, volas efektivigi ian fakton neniam viditan. Kaj estis tial, ke li diris tiamaniere:

— *Ho, vi orita sorĉbirdet',*
Mi lasos vin for de l' lazet'.

ĉar mi estas la viro maljuna el la antikveco, kiu neniam konis iun ajn virinon. Diru tuj al mi, kaj senprokraste, kion vi postulas ke mi faru. — Fortiru du plumetojn de mia kresto — respondas al li la birdo, — kaj enpiku unu en ĉiun vian okulon. — La maljunulo jen tuj fortiras el ĝi la du plumetojn de la kresto kaj enpikas unu en ĉiun sian okulon, kaj li tuj fariĝas pli blinda ol antaŭ naskiĝo. — Nu, ve al mi, do mi perdis la helecon de la tago! — li krias tute terurite. Sed la birdo ĵetas grandan ridon, fortiras el si la lastan plumeton de la kresto kaj ĝin enpikas ĝuste en la mezon de lia koro. En la momento ĝi redonas al la maljunulo la vidkapablon kaj... kion do ci dirus, ke li rimarkis antaŭ si?... —

Baŭdilieto, ravita, estis perdinta la voĉon.

— Do li rimarkis fraŭlinon belan kiel Dipatrinon, sed ankaŭ, kiel li, sen iaspeca vestaĵo kaj sole nur garnita per rozgirlando, kiu ĉirkaŭvolvis al ŝi la kolon kaj krome treniĝis surtere... —

La paŝtisto tute rideme interrompiĝis.

— Ĉu ci iam divenus, kiu estis tiu fraŭlino? —

— La sorĉistino!

— Ekzakte, ci perfekte trafis, etulo! Kaj la rozgirlando? —

Baŭdilieto restis surprizita, rigardis supren, rigardis malsupren, frotis sian vangon kontraŭ la ŝultro kaj... nenio venis al li en la menson, pri kio povis esti la rozgirlando.

— La lazo, knabo! —

— Fi al mi! — Kaj la knabo mordis al si la langon pro spito, ke ideo tiel simpla ne alkuris al lia cerbo.

— Kaj kio okazis? — demandis siavice Mila, tute scivoligita.

— Tion vi ja povas supozi, ermitino! La sorĉistinoj montriĝis perfekte sagacaj, kiam ili sin ekzercis en sia ofico, kaj la kompatinda maljunulo estis sankta viro, kiu neniam ren-

kontiĝis kun tia stranga situacio interrilati kun ili. Tiel ke, vidante sin tiel proksime de tiu fraŭlino en tute maldika vestaĵo, kiu lin vid-al-vide rigardas, la malfeliĉulo eksentas nepriskribeblan honton, kaj jen li sin envolvas per sia hararo kaj metas la manojn antaŭ la vizaĝon. Sed li forgesis, ĝuste, ion pli efikan, kio estus fortiri el si la plumeton de la sorĉo, kiun li portis enpikita en la koro; do, ju pli li kovris la vizaĝon, des pli li ĉiam vidis transe la sorĉistinon, kvazaŭ li havus fingrojn el vitro. Kaj li tute korpremiĝis kiam ŝi, apudiĝinte, flustris al li:

— *Ho, vir' maljuna de la monteto,*
Forŝovu l' manojn de l' vizaĝeto.

ĉar mi ne volas al ci kaŭzi iuspecan malbonon. Mi estas Flortremolo, la plej juna el la sorĉistinoj de la Gurgo, kaj eksen-

tis kompaton al ci. Se ci volas iri kun mi, mi el ci faros la viron plej riĉan sur la tuta tero. Penetrinte tra la gorĝo de la Akvo-Muĝulo, mi havas tie, en la koro de la monto, palacon tute konstruitan per pulvoro de la steloj kaj per konketoj el la salita maro: la altanoj estas el polurita koralo, la blankargĝentaj portaloj kaj la pilastroj de la salono skulptitaj el la ostoj de la giganto Veŭtakrusko, kiun mia patro mortigis ĉar li volis edziĝi kun mi. Se tien ci venus kunvivi, mi dormigus cin sur kurtena orlito, en ĉambro kun speguletoj, drapirita per gemoj; mi liverus al ci, por ĉia manĝaĵo, fiŝojn el la laktoriveroj subtere fluantaj, kaj por ĉia trinkaĵo, rozolion (1) kiun filtras kaj distilas ĉiutage la tricent virinoj de la Orienta Reĝo... — Dirinte tion, la sorĉistino eksilentis ĉar ŝi kredis, ke li jam estas pli ol sufiĉe tentita per tiuj promesoj, por ke li ŝin sekvu. Sed la maljunulo, kiu jam iomete rekonsciiĝis el la korpremo kaj preĝis al Dio ke Li donu al li kuraĝon, turnas subite la vizaĝon kaj diras kriante: — For de ĉitie, sorĉanta feinbildo, ĉar mi preferas la ĉielan gloron ol ĉiujn riĉaĵojn sur la tero! — Aŭdinte tion la sorĉistino jen lin rigardas kun granda malestimo, kaj sammomente forfandiĝas per arto de magio... —

Esprimo de elreviĝo longigis la faŭnetan vizaĝon de la knabo. Kiel estis eble, ke viro, kiu ne havas alian veston ol sian hararon, rezignus tiel facile palacon faritan el partetoj de stelo, kun altanoj el koralo kaj portaloj el arĝento?

— Kaj kio, ĉu revenis la sorĉistino? —

— Ĉu ŝi revenis, ermitino? Neniel pensu, ke la sorĉistinoj estas virinoj, kiuj forlasas proceson tiel senkontraŭstare... —

La vizaĝo de faŭneto sereniĝis.

— Dum tiu tuta tago la kompatinda maljunulo ne konsciis pri kio al li okazis. Sufiĉe li provis promeni de la Akvo-Muĝulo al la Krut-altaĵo kaj de la Kok-Piedo al la Kapreoloj; sufiĉe li komencis pripreĝojn kaj pentofarojn! Per nenio li povis forviŝi de siaj okuloj la sorĉistinon, kun tiaj haroj similaj al ora polvonubo kaj la rozgirlando interplektita ĉirkaŭ

(1) Rozolio = Likvoro, konsistanta el brando, sukero kaj aroma ingredienco. (Vd. vortaron de E. Boirac).

la kolo. Meznokte li ne povis plu rezisti, kaj jen li sin metas surgenue sur la ĉiutagan lokon. Sed, post plua kaj plua atendado, aperas nek la birdo nek la sorĉistino... Kaj jen li pensas: — Mi volus, ke ŝi venu; ĉar mi donacus al ŝi mian hararon, por ke ŝi kaŝu sian karnon; ĉar, fakte, estas honto, ke tiamaniere vagu fraŭlino kiel ŝi. Ĵus pensinte tion, okazis, ke la sorĉistino prezentiĝas, kaj jen li, anstataŭ liveri al ŝi la hararon, ŝin plene oblikve rigardas, mallevas la okulojn, ektremas kaj eĉ vorton li ne diras. Kaj la sorĉistino jen admonas lin: — Kvankam hieraŭ ci forĵetis min de antaŭ ci, mi havas al ci kompaton kaj revenas. Tial ke sur ci ne sidas bone esti riĉa, se ci volas veni kun mi, mi transformos cin en la homon plej potencan sur la tero. Mi donacos al ci vestaĵon tute silikan, spadon faritan el strio de fulmo kaj ĉevalon pli kureman ol la vento, kaj per tiu ĉi vestaĵo, tiu ĉi spado kaj tiu ĉi ĉevalo, ci povos iri pluen tra la mondo, trakuri reĝlandojn kaj proprigi al ci tiujn, kiujn ci volos, do neniu povos kontraŭstari cin, ĉar se la homoj volus cin mortigi, cia vestaĵo, por ĉiu frapo kiun ili svingus sur cin, resendus al ili fajroradion; se ili volus sin forsavi de ci, kiel ajn ili kurus, cia ĉevalo tuj atingus ilin, kaj se ili neniel volus kapitulaci, cia spado, farita el fulmostrio, tuj lasus ilin ardocindraĵo... — La maljunulo aŭskultadis la sorĉistinon tute senkuraĝe kaj enpensiĝeme, kaj jen tiam ŝi, tion vidinte, demandas al li kion li decidas. En la momento la maljunulo faras grandan terurskuon kaj, kiel la antaŭan tagon, diras tute korpremite: — For de mia antaŭo, sorĉanta feinbildo, ĉar mi preferas la ĉielan gloron ol ĉian povon sur la tero! — Jen ŝi lin rigardas kun vizaĝo pli malestima ol la antaŭan tagon, batas la piedon sur la teron kaj forfandiĝas per magioarto... —

La paŝtisto momenton haltis por elstreĉi la lacajn brakojn kaj trafroti la plušĉapon sur la kranio, sed la senpacienco de la knabo tuj lin pikis kvazaŭ pikilo.

— Rakontu! —

— Kvieton, etulo, ĉar mi efektive perdas la spiron... Konsideru, ke ĉe rakontado de fabeloj oni ja ne devas tiel rapidi, kiel irante al la apotekisto... Do vi vidos ke, post kiam li alifoje forigis de apud si Flortremolon, restis al la maljunulo

speco de ĉagreno tiel forta, ke li pasigis la tutan tagon plorante kiel juna vidvineto: kaj dum li ploris, li profundiĝis en meditadon, kaj diradis al si: — Verŝajne ja estas tute pli agrable havi palacon interne de la monto kaj dormi sur kurtena orlito, kaj manĝi fiŝojn el la laktoriveroj, kaj trinki rozolion filtritan kaj distilitan de la virinoj de la Reĝo de Oriento, ol kuŝi en la kavernoj kaj ĉe la vesperrosoj, pikiĝi je la piedoj per la arbustaĵoj kaj sin nutri per nenio alia krom per amaraj radikoj kaj la klara akvo, kiun oni kaptas per la kavo de la manoj!... Sed mi nur estas sensignifa pekulo, kaj ĉar Dio min propravole ne favoris per tia donaco, signo estas ke mi tion ne meritis... — Kaj tiel dirinte li rezignaciis momenton, ĝis venis al li tiu ĉi alia penso: — Fakte la sorĉistino trafis aferon tute logan! Travojaĝi ĉiujn reĝlandojn el la tero kaj proprigi ĉiajn al mi, kiajn mi volus... Se tiuj ĉi montoj havas kvar tagojn da travojirado, kiom da ili plejeble havas la mondo? Ĉu eble dek? Ĉu eble dekdu? Ĉu eble tiom da ili kiom enkalkuliĝas en ĉiuj fingroj de la piedoj kaj de la manoj?... Kiam mi estis infano, korvo rakontis al mi, ke ekzistas tiom da kastoj homaj kiom birdaj, kaj ke ĉiuj ili havas ankaŭ la parolkapablon kaj la plumaron diferencaj unuj de aliaj... Se tiel ĝi estus, ĝi fakte estus tute vidinda afero; sed mi ne scias certe, ĉu la korvo rakontis al mi ian mensogon. Ĝi diris, ke ĝi ĉirkaŭflugis la tutan teron kaj mi ne moviĝis de tiu ĉi ŝirmejo. Efektive en mia juneco mi estus devinta malsupreniri de la montaro por iomete tramigri la mondon; ĉar ja ne estas brave amuza pasigi la vivon kiel lacerto... — Kaj okazis, ke dum li meditis pri tiuj ĉi aferoj, kiuj neniam antaŭe trakuris lian kapon, lin atingis la ombroj de la nokto; kaj ankoraŭ la mateno ne krepuskiĝis, kiam li jen sin metas sur la ĉiutagan lokon, surgenuiĝe, atendante la sorĉistinon; ĉar la koro al li flustras, ke ŝi revenos, kaj kvankam li sin sentis fortika kaj firma por ŝin rifuzi, tamen li ne kontentiĝus ŝin ne vidonte, tial, ĉar la plezuro pro la kompanio estas allogaĵo, kiun la homoj perceptas pli baldaŭ... —

— Kaj ŝi revenis, paŝtisto? — Mila demandis interesite.

— Pli frue ol la antaŭajn tagojn. Antaŭ la ektagiĝo jam li havis ŝin tie, sidanta apud li, rigardanta lin per okuloj bri-

lantaj kiel tiuj de strigo, kaj diranta al li per voĉo pli dolĉa ol kiam ŝi faris la trilojn de orita birdo: — Mi ja ne scias kion ci inokulis al mi, maljunulo de mia koro, ke mi tute ne povas apartiĝi de ci, eĉ se ci min ofendas. Mi devas, kiel ajn, al ci donaci favoron, kaj ĉar ci ne volas esti la viro plej riĉa nek la plej potenca sur la tero, ci estos la plej saĝa. Ci scios ĉion, kio okazas en la mondo kaj ekster la mondo; ci vidos la limfon suprenrampi laŭ la trunko de la plantoj kaj la florojn kaj la foliojn elkreskadi; ci vidos la formikon alkuri transen de la tero kaj la ŝipon navigi tra la plej malproksimaj lokoj sur la oceano; ci vidos la kaŝitajn vojojn de la steloj kaj la kavernojn de la infero, plenajn de monstroj kaj de kondamnitoj, kiuj tordiĝas kaj sin ungovundas; ci vidos la intencojn en la koro de la homoj kaj la infanojn en la ventro de la virinoj; nenio ekzistos kovrita por ciaj pupiloj de okcidento al oriento, nek en ĉielo nek sur tero... Kaj tiel same ĉion ci aŭdos kaj komprenos: la lingvaĵon de la birdoj en la aero kaj de la teraj bestoj sur la tero; la kantojn de la fiŝoj kaj sirenoj ĉe la fundo de la akvo, kaj la muĝojn de la vento, kaj la resonon de la fulmotondroj, kaj la ĝemojn de la montoj, kaj ĉiuspecan bruon aŭ murmuron, kiujn okazigos kreita estaĵo apud aŭ malproksime de ci... Kaj per tio, ci anticipe ekkonos ĉiujn sekretojn de la mondo kaj kie sin certe trovas la bono kaj la malbono por ilin forpeli aŭ akcepti. — Tiel longe kiel la sorĉistino tion rakontis, la maljunulo ŝin rigardis kaj lia koro konsumiĝis. — Kion mi faru, kompatinda mi? — li demandis al si mem. — Ĉu mi ŝin aŭskultu aŭ ne aŭskultu; ĉu mi ŝin sekvu aŭ ne sekvu? Se mi ŝin rifuzus kaj ŝi forirus de mi, mi mortus pro nostalgio, kaj se mi ŝin sekvus, mi estus kondamnita ĝis la konsumiĝo de la tempo, ĉar mi komprenas, ke ŝi estas feino kaj ŝia povo elvenas nur de magioarto... Ve, kompatinda mi, kion mi faris, ĉar mi vide kaj aŭde pekis kaj estas perdita sen savespero!... — En tiu momento la sorĉistino, kiu lin spionis, al li pafas: — Nun mi jam diris ĉion al ci, kion mi povas al ci donaci: diru al mi, fine, ĉu ci volas veni kun mi aŭ ĉu ci ne volas veni... — La maljunulo tiam ekkrevas per granda ploro dume plendokriante: — Lasu min en paco, sorĉanta feinbildo, ĉar mi

ne povas plu rezisti! — Kaj metinte la kapon inter la genuojn, li komencas preĝi al Dio. Sed ŝi proksimiĝas al lia orelkavo kaj al li diras tute mildatone: — Venu kun mi, maljunulo de mia koro, ĉar mi enamiĝis je ci kaj deziras fari cin la viro plej riĉa, plej pova kaj plej saĝa sur la tero!... — La maljunulo ŝtopas siajn orelojn por ne aŭdi ŝin, kaj farinte klopodon per ĉiuj siaj fortoj, krias per granda kriego: — Ne, ne!... Malaperu de antaŭ mi, malbona konsilantino, ĉar mi preferas la ĉielgloron ol ĉion plej bonan super la plej bona sur la tero!... — Kaj okazis ke, kiam li ĵus diris ion tian, ĉio al li fariĝis malluma kvazaŭ la mondo finiĝus; kaj tio estis ĉar li kredis, ke la sorĉistino jam foriris de li kiel ĉiutage... —

— Kaj ŝi ne foriris? — ekkriis Mila kun la okuloj tutege malfermitaj.

— Foriri, certe ne, ermitino! Ŝi ja ne havis ankoraŭ finita sian laborplanon, kaj mi jam diris, ke ŝi ne estas virino, kiu lasus tiun aferon mezfare... Okazis do, ke kiam ŝi vidis la maljunulon tiel kapklinitan, jen ŝi etendas brakon ronde ĉirkaŭ lia kolo kaj al li lante diras, kvazaŭ ŝi konfesdonus: — Cetere, mi jam spertas, ke ci estas la viro plej simpla kaj sankta sur la tero, kaj ke mi havas nenian povon super ci... Mi estis enamiĝinta je ci kaj volis fari cin mia edzo; sed ci min forrifuzis jam tri fojojn kaj mi devas tuj foriĝi; neniam plu ci vidos min, nek aŭdos, nek scios ion pri mi. Sed antaŭ ol malaperi mi volas al ci lasi memoraĵon, kiu daŭru por ci dum la mondo estos mondo... — Kaj tion dirinte, ŝi apudiĝas al li, premas sur liaj lipoj tre longan kison kaj forfandiĝas per sorĉarto.

— Kaj ŝi ne revenis? —

— Ne, ermitino; tiam ŝi ne plu revenis, ĉar alie mi neniam finus la fabelon, mi pensas... — Kaj la paŝtisto ekridis rigardante al la vizaĝo de Mila.

—Sed kio! — aldonis ĉi tiu, surprizite: — Ĉu ĝi jam finiĝis? —

— Mankas nur la vosto... Sed ne restu ankoraŭ tiel disrevigita, virino! Vi vidos, kio okazis. Tuj kiam la sorĉistino estis forlasinta la maljunulon, ĝi surgrimpis sud-okcidentan ventblovegon, kiu flugpasis, kaj komisiis al ĝi, ke ĝi kondu-

ku ŝin al la Intermonto de la Mortintino, kie sin trovis la aliaj sorĉistinoj trikante kaj babilante; kaj, apenaŭ ŝi tie alvenis, jen ŝi vokas laŭte:

— He, koleginoj, sorĉa kohort',
La ŝtrumptrikaĵojn tuj ĵetu for!
Prenu l'kombilon el diamant',
La speguleton el fajrkristal',
La kolĉeneton el granitŝton',
Kiu blindigas ĉiujn en mond',
La verdan veston el alga flor'
Per triglaj (1) skvamoj kun brodlabor',
Kaj la pantoflojn el satenstri':
La viroj venas ree al ni! —

Prezentu al vi kia kriegado leviĝis ĉe aŭdo de simila novaĵo! Ĉiuj sorĉistinoj demandis, kiel tio okazis, ĝis la plej juna rakontis al ili, ke ŝi jam venkofaligis la maljunulon de la montaro. La sorĉistinoj ne volis tion tute kredi kaj petis eksplikojn pri ĉiuj provoj faritaj kaj pri ilia rezultato, kaj sciante, ke ŝi nenion povis eltiri de li tentinte lin per la riĉaĵoj, per la povo kaj per la saĝo, kiuj estas efikaj tentiloj por venki la virojn, kaj ke, malgraŭ tio, ŝi plue diradis, ke ŝi venkofaligis lin, ili pli kaj pli demandadis, per kiaj armiloj, per kiaj ĉenoj, per kiaj sorĉtrinkaĵoj aŭ per kiaj sorĉalvokoj ŝi helpiĝis por atingi la miraklon; ĝis ŝi deklaris, ke ŝi ĝin atingis per nura kiso!... Ĉar neniam, de kiam la mondo estas mondo, ankoraŭ oni eltrovis trinkaĵon, ĉenon, artifikon, provoson aŭ sorĉalvokon tiel povajn kontraŭ la sento de la viro, kiel ajn sankta li estas, kiel kiso de virino... Ĉe tiuj vortoj, ĉar la sorĉistinoj malpli sagacaj rikanis, okazis ke ili ekaŭdas profundan voĉon, profundan kaj konfuzan kiel maronda resono, kiu venas de tre malproksime. Ili streĉis la orelon kaj ekaŭdas, ke tiu voĉo nur elparolas: — Flortremolo!... Flortre-

(1) Triglo = Fiŝo el la specio *Mullus barbatus*. Ĝi abundas en la mediteraneo kaj estas ŝatinda manĝaĵo. (Fr. Rouget; Hisp. Salmonete; Katalune: Roger).

mooolo!... Flortremooolo!... — Ĝi estis la voĉo de la maljunulo, kiu malespere trakuris de unu flanko al la alia, jen tra la Kresto de la Gnomo, jen tra la Pokalo de la Reĝo, jen tra la Baŭo de la Olivarboj, ĉie serĉante la sorĉistinon kaj petegante ŝin, ke ŝi akceptu lin al si, ke kontraŭ alia kiso de ŝiaj lipoj li bonvole donacus, krom ĉiuj feliĉoj surteraj, la gloron mem de la ĉielo... Kaj tion aŭdinte, la sorĉistinoj, ekstreme amuziĝemaj, disiris ĉiuflanken de la montaro kaj komencis mokimiti la maljunulon, ripetante la samon, kion li diris, kun grandaj ridoj... Kaj de tio venis tiu abomeninda inklino, kiun ankoraŭ ili konservas... —

— Kaj pri la maljunulo, paŝtisto, kio el li fariĝis? —

— Li mortis en la fino de la jarcento pro enamiĝa malsano; kaj ĉar li mortis freneziĝinte kaj sen pentofaro, li ja ne povis eniri en la ĉielon. — Dio gardu nin kontraŭ tio! Kaj

ankoraŭ nun, ermitino, dum la ŝtormaj noktoj, kiam sonoradas la tintilo de la Supra-Altaĵo anoncante malfeliĉon, oni vidas lian suferantan animon traflugi, tute kiel vaglumo, super la ravinoj kaj profundegaĵoj, kaj lia voĉo, malklara kaj longa kiel maronda resono, ne ĉesas alvoki: — Flortremolo!... Flortremooolo!... Flortremooolo!... ĝis la tago leviĝas. —

VII
PRINTEMPO

La unuaj tagoj de majo estis mirindaĵo; la tuta montaro, parfumita de bonodoroj, briligita de helecoj, plena de birdaj kantoj, estis perdinta sian miljaran sovaĝan aspekton kaj ŝajnis reveni al sia montara juneco, kun ĉiuj dolĉaĵoj de virgulino kaj ĉiuj ĝojoj de fianĉino. Ĉiutage, ellitiĝinte, Mila trovis en ĝi novan plibeliĝon, ne perceptitan la antaŭan tagon; kaj ŝi trovis ankoraŭ pli: ŝi trovis, ke tiuj plibeliĝoj reflektiĝas en ŝi kaj ke ankaŭ ŝi, laŭtakte de la montaro, faras grandan regresan transformiĝon. Ŝiaj okuloj, netaj kaj klarlumaj, sed plenaj de melankolia sereneco, animiĝis per subitaj fulmobriloj, ŝiaj lipoj ruĝiĝis kun intenseco ĝis tiam ne konata, ŝiaj mamoj alprenis ŝvelojn de ĵuspatrinaj mamoj, kaj gracila kaj harmonia malpezeco ritmigis ĉiujn ŝiajn movojn. Al tiuj eksteraj ŝanĝiĝoj respondis, interne, ekzaltita pleno de sentoj kaj impreseblo tiel surfaca, ke

ili konsternis ŝin mem pro sia neordinareco, sentigante al ŝi, kvazaŭ ŝia estaĵo multobliĝus kaj ŝin estigus virino nova por ĉiu momento de la vivo. Kiel la aliajn malproksimajn montojn el la deklivofundo, ŝajnis, ke ankaŭ ŝin tute irizas, korpe kaj anime, mistera interna lumo. Kaj tiun grandan metamorfozon, kiun ŝi sentis en si, sentis ankaŭ la aliaj montaranoj.

Unu tagon la paŝtisto, envolvinte ŝin de supre malsupren per longa afabla rigardo, ŝin avertis:

— Per Dio, ermitino, ne plu klaĉu kontraŭ Sankta Poncio, se vi estas bonfara virino! Li agis en vi, kvazaŭ specon de miraklo. Kiam vi venis ĉi-tien, via animo trafiguriĝis kontraŭhele, kaj nun vi donas ĝuon al kiu vin vidas; vi estas la virino plej freŝaspekta kaj beltalia, kiun mi iam renkontis en mia vivo... —

Alian tagon, dimanĉe, Arnaŭ el Sankta Poncio, ĉasante estis suprenirinta ĝis la ermitejo kaj eniris por esprimi al ili bonan vesperon.

— Ave Mario! (1) — li kriis ĉe la pordo de la korto, sin anoncante.

—Kiu estas?... Supreniru! — respondis Mila el la kuirejo; kaj lasinte la telerojn, kiujn ŝi lavis, ŝi eliris al la balkona koridoro kaj kliniĝis trans la balustradon.

Arnaŭ haltis duonŝtupare kaj, post momento de hezito, li ekkriis surpriziĝe:

— Sed nu! Mi vin ne ekkonis... Vi aspektas tute alia... —

Kaj tiel longe, kiel li restis tie, Mila, tramoviĝante kaj intence lin ne rigardante, rimarkis, ke li ne deturnas la okulojn de sur ŝi, kaj ŝin sekvas ĉien per admira rigardo.

Ankoraŭ alian tagon, dum tagmezo plena de prema varmo, en kiu ŝajnis jam kovi ĉiuj someraj sufokiĝoj, ŝi, post tagmanĝo kaj pretigo de la domlaboro, prenis la kudrokorbeton, sin direktis al la legomejo, sidiĝis sub migdalarbo kaj komencis fliki eluzitan ĉemizon de Matio.

Malantaŭ ŝi, la bazo de la monto etendiĝis supren; dekstre kaj malproksime, la Floko enfundigis sian ĝibon en la lu-

(1) Ave Mario! = Saluta alvokesprimo ĉe eniro en domon. Ankaŭ ekkrio de admiro aŭ de teruro.

man bluecon; kvar paŝojn maldekstre, vepra enfermaĵo limigis la kulturan grundon, kaj super ŝia kapo, la migdalarbo larĝe sternis siajn branĉojn, kurbiĝintajn kaj pendantajn pro la granda jupplenaĵo da migdaloj, kiun la paŝtisto estis prognozinta al ili. Sub la verda baldakeno, kiu apenaŭ lasis travidi la ĉielhelon, fluis dolĉa freŝaero, kiu kontrastis kun la ardo de la torporiga atmosfero. Al Mila, kiu restis malvigligita de la vetero kaj de tio, ke ŝi ellitiĝis frumatene, tiu freŝaero donis post nelonge deziron kuŝi, kaj tute ne foriginte de sia krurbenko la tolaĵon kiun ŝi estis flikanta, ŝi klinis la korpon malantaŭen, tiel, ke ŝia dorso tuŝis la deklivantan grundon. Interne de la brusto ŝi sentis, kiel en la atmosfero, la varmon de vivtegita ardaĵo, ŝiaj okuloj ebrie blindiĝis de fortaj verdonuancoj kaj de lumaj interspacoj, kaj malvigla kaj laca deziro elstreĉi la muskolojn, postulis al ŝi apartigi la brakojn de la korpo kaj ilin kuŝigi sur la herbon, kun la manplatoj supren kaj la sango peze haltigata en la vejnoj. En tia pozicio ŝi endormiĝis: sed la dormemo, mokŝerca kaj senpudora per si mem, iomete malfermegis al ŝi ambaŭ antaŭaĵojn de la korsaĵo, kies altajn butonojn la varmo devigis ŝin malbutonumi, kuntirigis unu ŝian kruron laŭ formo de ponteto kaj duonturnigis ŝian buston fronte al la vepraĵo. Ŝi restis kun la kapo malantaŭen, la buŝo duonmalfermita, la kolblanko eliĝanta el la blueca ingo, kiun formis la korsaĵo, kaj superbele manifestiĝanta la supla (1) kaj perfekta ondolinio de la korpformoj... Ŝi dormis trankvile, kviete, sed subite, kvazaŭ kaptita de malbona sonĝo, ŝi komencis doni signojn de agitiĝo; la busto ektremis, la brovoj kuntiriĝis, la dekstra brako resaltis surtere per nerva skuo, la frunto, paligita de la ripozo, iel roziĝis... Mila malfermis la okulojn, palpebrumis, ekrigardis kaj... per ekscitiĝa eksalto ŝi restis surgrunde sidanta. Du fajreroj rebrilis meze de la veprejo: du linkaj avidoplenaj pupiloj, restis alnajlitaj al ŝia karno same kiel ardantaj pingloj.

Vidinte sin malkovrita,

— Hu, hu, hu!... Jen la furo envepriĝis... Hu, hu, hu!... — Kaj la Spektro, plukante la rubusojn, kiuj kroĉiĝis al li

(1) Supla = Malrigida, fleksebla, subtila.

kaj surde ridante per sia stranga gorĝa ridmaniero, posteniĝis, posteniĝis ĉiam pli, ĝis li malaperis... Jam oni lin nenie vidis, kiam ankoraŭ Mila, rigardante al la veprejo, kvazaŭ sorĉita, sentis sur la brusto la resaltojn de sia koro kaj havis najlitaj en la cerbo la fulmantan vivecon de tiuj pupiloj kaj la abomenan blankon de tiuj dentoj. Poste, abrupte, ŝi klinis la korpon sur la kunigitajn femurojn, kaŝis la vizaĝon kaj spasme ĉirkaŭpremiĝis al la genuoj. Arda ondo farita el honto, el feliĉo, el timo kaj el deziro, ĉio samtempe, ŝin invadis, suprenrampante ŝin de la piedoj al la kapo; kaj envolvante ŝian animon ĉirkaŭ ŝi mem en vertiĝodona vortico, ĝi preskaŭ perdigis al ŝi la konscion.

Kiam ŝi rektiĝis, ŝi havis la kapon malklara, malvarmon ĉe la spino, kaj la sulketojn de la fingringo forte stampitaj sur la pulpo de la maldekstra brako.

Ŝi prenis la tolaĵokorbeton kaj malrapide sin direktis al la domo.

Matio, kiel kutime, estis dirinta, ke li iras viziti sinjoron Paroĥestron, kaj ŝi, tion rememorante, pensis, ke ŝi ankoraŭ ne iris konfesi kaj ke decas, ke ŝi iru. Iri, jes, perfekte; sed por kion konfesi?

De antaŭ kelkaj tagoj pasis tra ŝia vivo, kiel falsteloj aŭ kiel nigraj burdoj, malviglaj incitiĝemoj, strangaj sorĉantaĵoj, elreviĝoj pro nesciata kaŭzo, sekretaj tremoj pro necertaj feliĉoj, sed, ĉu tiuj impresoj jen brilantaj, jen vualigitaj, estas pekoj, propre pekoj, malbonfaroj, kiujn oni devus konfesi? Al ŝi ŝajnis, ke ne; ke ili ne taŭgas por esti konfesataj al sinjoro Paroĥestro, al vera konfesprenanto, kiu ajn li estus, sed al alia klaso de persono... — Al la paŝtisto! — tuj alkuris al ŝi laŭ la logika enĉeniĝo de la penso. Sed impulso de protesto ŝin tute ruĝigis: — Ne, ne! Al la paŝtisto neniel... Kial?... Tial ke... ne! — La paŝtisto estas viro stranga, viro, kiu ne ŝajnas el la mondo... Sendube se ŝi rakontus al li ĉion, kio al ŝi okazas, li ne bone ŝin komprenus... Eble li mokridus ŝin, eĉ eble ŝin juĝus alimaniere... Li asertis, ke Sankta Poncio ĉion resanigas, li ne suferis pro difinita speco de maltrankviloj, iutage li ŝin traktis kiel ian herezulinon, li ŝajnis nenion atenti el tio, kio okazas en la mondo... Ne, ne; al la paŝtisto, ne! Tiom

pli bone, ĉiuokaze, al Matio... se Matio estus alia speco de viro; viro kiel la aliaj, kiu ŝin rigardus kiel la ceteraj viroj ŝin rigardas: ĉu per admiraj okuloj, kiel tiuj de Arnaŭ el Sankta Poncio, kiel ekzemple, ĉu per la bok-okuloj (1) mem de la Spektro, ĉu eĉ per la fidelaj kaj malsekaj okuloj de la Strigo... per rigardo persona aŭ besta, sed kiu ion esprimus. Sed Matio havas neniuspecan rigardon: nun ŝi tion bone konstatis por la una fojo en la vivo. Li ne havas rigardon iuspecan, ĉar en li regas la paco; la paco de besto, sed besto nenormala, pli besta ol la ceteraj, ĉar li estas besto sen seksimpulsoj...

Tiu ĵus analizita anormaleco, persekutis kaj mordis Milan, kiel rememoro pri delikto, pri malnoblaĵo, pri io, kio ŝanĝis ŝian vivon en mizeran kaj malindan. Kaj kun sekreta honto pri si mem, ŝi alkondukis, ne tion klare atentante, ĉiujn siajn klopodojn al la restarigo de tio, kio devis esti. Surprizita kaj konfuza ŝi malkovris en si sintenojn de ruza katino, dubesencajn pozojn, perfidajn dorlotaĵojn, simulatajn langvorojn (2), sugestiajn voĉfleksojn, modulojn plenajn de promesoj, konsternajn malaltigojn de palpebroj, detenitajn elspirojn... tutan manovron per nelaŭleĝaj armiloj, kies ekziston kaj kies uzon ŝi estis ignorinta ĝis tiam kaj kiujn ŝi nun uzis kun amara mallojaleco de spitulino... Kaj kiam ŝi vidis, ke eĉ per tiaj armiloj ŝi ne atingis la deziratan celon, ne malfermis la sopiratan vundon; kiam ŝi konstatis, ke ĉio restas trankvila kaj nemodifebla en la kontraŭa kampo, ŝi, venkita, subpremita, kaptita de ombra kaj nekrevema malespero, sentis avidon surtere treniĝi, sin mem silente mordi, morti pro malsato ĉe domangulo, transŝanĝi sian estaĵon agitatan de amsopiroj en ion sensentan, ŝtoniĝintan, mortan en vivo... — Kiu estus kiel ili! — ŝi malĝoje al si diris, dume rigardante de la ermiteja placo, kiel malsuprenvenas tra la montokolo la fasĉinportistinoj el Ridorto, kvazaŭ procesio de formikoj, ĉiuj kurbigitaj sub la branĉofasko, trifoje granda ol kiom ili estas, ĉiuj sen instinktoj, sen pasioj, sen klareco de prudento, sen alia nocio pri la ekzisto krom la pezo, kiu masive gravitas sur ilia dorso, sed

(1) Boko = Virsceksulo de remaĉuloj, precipe de kaproj aŭ cervoj.
(2) Langvoro = Velkiĝo, malvigleco, senenergio, konsumiteco, amsopirego



ne tiel masive, kiel tiu alia pezo, kiun ŝi portas en sia interno. Kaj pense ŝi rekonstruis al si la scenon pri ilia ĉiutaga tasko. Ellitiĝi ankoraŭ dum mallumo, preni la ŝnurojn kaj la sakojn, kolektiĝi kun la najbarinoj kaj, ĉiuj kune, supreniri la monton en la matenfreŝo, interrakontante onidirojn de najbaraĵo,pikantajn rakontojn de mulisto aŭ fabelojn mirindajn kiel tiuj de la paŝtisto. Jam ĉe la suproj, uzurpe elradikigi pliajn kaj pliajn arbustaĵojn, kapuĉforme meti sur sin la sakojn, surŝarĝi la pezan krucon kaj reiri alifoje malsupren, por delasi la ŝarĝaĵon apud la dompordo de la panistoj el Murono, kie ili ricevos po du realoj (1) ĉiu, antaŭ ol reveni hejmen kun la korpoj lacigitaj, sed kun la konscienco trankvila pro la plenumo de la tasko kaj pro tio, ke ili travivis unu tagon pli...

Sed Mila mezmedite paŭzis. Bone tion mezurinte, ankaŭ ne ŝajnis al ŝi sufiĉe anodina (2), sufiĉe abomeninda, sufiĉe morta la vivo de fasĉinportistino; estis preferinde esti plan-

(1) Realo = Hispana monero valoranta kvaronon da peseto.
(2) Anodina = Sensignifa, malgrava, senefika.

taĵo, libera de ĉia servuteco, de ĉia bezono, de ĉia laboro, de ĉia angoro... aŭ, pli bone ankoraŭ, esti monto, anfrakta (1) kaj kruda monto kiel la Ŝtonegoj!...

Subite, iu besto, kiu ĉiam estis al ŝi indiferenta kaj eĉ malagrabla, prenis lokon en ŝia koro. Ŝi afekciiĝis al iu sucŝafido, kiu havis, ĉe la lanhararo, tute neĝblankan krispon. Ŝi al ĝi donis eretojn da pano, kaj la ŝafido ĉiam ŝin sekvis kiel hundeto, grimpis sur ŝin tuj kiam ĝi ŝin vidis haltinta, kaj per sia felposimila buŝeto, ĝi prenis de ŝia buŝo la verdajn foliojn, kiujn ŝi tien metis; kaj Mila eksentis delican (2) traskuon, kiam la varmeta glateco de tiu ŝafida buŝeto tuŝetis ŝiajn lipojn, lasante sur ili agrablan elspiron, kvazaŭ viran elspiron. Ankaŭ en la rigardo de la ŝafido, kiel en tiu de Matio, forestis ĉia pensesprimo, tamen kian alian dolĉecon, kian alian teneron naivan havis tiu! Kiam la ŝafido ŝin rigardis, Mila, kortuŝite, ekhavis deziron plori.

Aliaj animaletoj anstataŭis la ŝafidon.

Okazis unu tagon, ke la paŝtisto hejmenvenis tute konsternita.

La farmdomanoj el Sankta Poncio estis fortimigintaj frandeman katinon, kiu ŝtelmanĝis iliajn kokidetojn; tiom ili punbatis ĝin, ke la katino perdis la irinklinon al la domo kaj rifuĝis en la proksiman Ravinon, kie ĝi ĉasis la birdetojn kun granda lerteco. En la Ravino ĝi naskis kvar katidojn grizebrunajn kaj izolemajn kiel ĝi mem. Pasante tie, la Spektro ilin ekvidis, alĵetis la lazon, ĉaskaptis la katinon, ĝin turmentis dum tempospaco por memamuziĝo, kaj fine ĝin krevigis per kelkaj piedfrapoj. Poste li malproksimiĝis tute trankvila, fermante la okulojn kaj elmontrante la gingivojn. La kvar katidoj, kiam ili sentis malsaton, sin buŝalpremis al la mamoj kaj sucis el sia morta patrino; la morgaŭon ili miaŭis pro malsato.

Baŭdilieto, kiu vidis la okazaĵon, ĝin rakontis al la paŝtisto, la paŝtisto indignis kaj ĝin rerakontis al Mila.

— Mi ĵuras al tiu malbon-sangulo, ke mi venĝos tion. Ĝuste morgaŭ mi detruos ĉiujn kaŝejoretojn, kiujn li gvatas

---

(1) Anfrakta = Malrekta, zigzaga, serpentuma, malegala, akcidenta.
(2) Delica = Ĝuoplena, plezuriga, ĉarmega, volupta.

(1)... Mortigi per malsato la kompatindajn animaletojn!... Pli valorus per trafa ŝtonfrapo... ke ili ne suferu! —

Mila ektremis, kaj posttagmeze ŝi malsupreniris al la Ravino kune kun la paŝtisto kaj Baŭdilieto. De iom malproksime ili jam aŭdis iliajn paŭtoblovojn (2) kaj ekvidis la kvar bestetojn, harhirtigitaj kiel erinacoj, fuĝi terurite, per plenmovado de siaj mallertaj piedetoj. Tie ne efikis voĉkaresoj nek iuspecaj tentoj. La sovaĝaj animaletoj, kaŝitaj inter la arbustaĵoj, ne volis eliri nek lasi, ke oni apudiĝu. Sed de post tiu momento, dum tri aŭ kvar tagoj, Mila jam havis difinitan taskon: ĉiumatene kaj ĉiuposttagmeze ŝi malsupreniris al la Ravino, plenŝarĝita per manĝofrandaĵoj por la katidoj. Unu mortis ĝuste tie, obstininte ne manĝi, sed la tri aliaj fine lasis sin kapti, pli mortintaj ol vivantaj, kaj estis translokitaj al la ermitejo. Per ekstrema prizorgo kaj pacienco saviĝis du el ili, kiuj estis riverancataj kiel en la antikva Egiptujo. Kiu intencus kaŭzi al ili domaĝon, tiu vidus Milan furioza, kiel oni ankoraŭ neniam ŝin vidis. Sed la katidoj sin instalis tie, elkreskis, prenis la manĝaĵon solaj, freneze interludis la tutan tagon kaj jam por nenio bezonis Milan. Tiam ŝia koro, superrande plena de varmaj avidoj, ree sin sentis senokupa kaj sopirema: sopirema amadi kaj senhalte sin blinde foroferi...

Unu tagon, kiam ŝi almezuris ŝelkon al Baŭdilieto, la febrofluo, kiu al ŝi estis brulvundinta la internaĵojn en la proksimeco de la Akvo-Muĝulo, reviviĝis abrupte aliformiĝante en flamon; per bruska impeto ŝi kaptis la kapon de la knabo, frotetis sur ĝi sian vizaĝon kaj poste, plenbuŝe, kovris lin per ammalsataj kisoj... Sub tiu ama tempesto la knabo mire malfermegis la okulojn kaj senkonscie kuntiriĝis, kvazaŭ birdeto falinta de la nesto. Kaj dum la etulo el Sankta Poncio komencis brilegi per vivecoj de fajraĵo aŭ de sunzenito en la ombra soleco de Mila, li, pli kontenta kaj dorlotata ol propra filo de la ermitino, ne estus povinta aserti, kiun li pli multe amas: ĉu Milan ĉu la paŝtiston.

---

(1) Gvati = Kaŝe, ŝtelume observi, atendi.

(2) Paŭtoblovoj = Blovoj, kiujn ellasas la katoj, kiam ili, en teniĝo grimaceta, montras malbonhumoron, malkontentiĝon, kc.



VIII

LA FESTO DE LA ROZOJ

Mila sekvis unuafoje inverse la vojon, kiun ŝi estis laŭirinta la tagon de la supreniro al la monto. Ĝis tiam ŝi malsupreniris ĉiam laŭ la flanko de Murono, sed oni sciigis al ŝi, ke la ovoj kaj la laktuko el Ridorto estas tre bongustaj, kaj jen al Ridorto ŝi sin direktis por mendi da ili por la tago de la festo.

Estis frumatene, sed la suno, jam tre alte staranta super la Floko, gaje sendis siajn lumbrilojn super la tuta etendaĵo de la malproksimoj.

Mila, etpaŝe kaj senhalte, laŭiris tiun vojeton — glatan kiel sulko farita de kolosa rado — tute senatente, pensante senscie pri kio, pri aferoj sensignifaj kaj malprecizaj kiel nubaroj de la penso.

Sub ŝi elrigardis la Plataltaĵo de la Limŝtono, platigita kaj rondigita kiel pato, kaj kun la tenilo — la dua interspaco de la Kanalo Krur-Rompanta — oblikve hirta. Kiam ŝi delasis la vojeton por ekpreni tiun ĉi duan interspacon, ŝi memoris kion Matio estis al ŝi dirinta pri tiuj tretvojetoj tiel malfacile suprenireblaj: "Ĉe la malsupreniro, la kruroj ne povas halti kaj la vojiro daŭras momenton". Efektive, Mila sentis sin kvazaŭ ŝarĝita per energio; ŝajnis al ŝi, ke ŝi malsupreniĝas ne bezonante meti en tion ian klopodon el si mem, kaj tuj ŝi troviĝis, kvazaŭ falinta el la ĉielo, meze de la vilaĝa placeto. Maljuna viro, kun malpura sako rajdanta lian ŝultron, ripozis sur la loko, kie ŝi estis ripozinta ĉe la supreniro. Mila salute diris al li bonan tagon kaj sin direktis al la Limŝtono: ŝi havis grandan deziron revidi la ebenon de supre de tiu altaĵo mem.

Serĉante firmigokavetojn por la piedoj kaj tenilojn por la manoj, ŝi sukcesis suprengrimpi kaj ekrigardis per avidaj okuloj. La impreso kaj la surprizo de antaŭ monato ripetiĝis sen malpliiĝo.

La tuta ebeno de Ridorto estis plena de rozkoloraj makuloj, en tia abundo ke, se oni iom palpebrumis, ĝi ŝajnis tute rozkolora.

— Virgulino Mario! Jen kiel bela tio estas alifoje! — pensis Mila, rekonsciiĝinte de la lumblindigo.

Efektive, sub tiu ĉielo en purega bluo de virgulinaj okuloj, la monteto, nuancita de printempaj verdoj, superŝutita de blondaj dometoj kaj zonita de la gaza rubando de la rozkolora ebeno, pli similis al magia fantazio de ilumin-arta pentristo ol al afero reala kaj vera.

Sed kio estis tiu ĉielarka daŭbo, kiun ŝi ne povis distingi? Mila decidis demandi tion al la viro ripozanta.

— Tio estas la rozoj de Sankta Poncio, bonulino... La rozoj benendaj. Nun la fruktejoj montriĝas plenaj de ili, sed post morgaŭ vi ne vidos eĉ unu: ĉiuj ili forrifuĝos supren sur la montaro. —

La postmorgaŭan tagon Mila povis ekkoni la verecon de tiuj vortoj.

Jam ellitiĝinte, je la kvara matene, ŝi rimarkis kiel suprenrampas, tra la montokolo, frua vico da homaj rozujoj, da bonodoraj bukedoj kiuj, ascendante (1), malfermiĝis al la freŝa matenaero; kaj pli poste, laŭmezure kiel la tago leviĝis, la rozbukedoj multobliĝadis kaj densiĝadis, elmergiĝante el ĉiuj flankoj, laŭ vojoj kaj rektvojetoj, laŭ rokkavejoj kaj montokrestoj, tiel same sur la fundo de la torentoj kiel sur la abismo de la Kok-Piedo. Je la deka matene la tuta montaro estis floranta, kiel mirinda ĝardeno senmezura. La sonoriloj de la ermitejo, senbride sonorante, ŝajnis voki la homamason per sia gajekscita sonorado, kaj la popolo, sentante, ke tiu gajeco enpenetras en ĝiajn internaĵojn kaj resaltas en ĝiaj brilantaj okuloj, en la voĉoj magie agorditaj kaj en la gestoj elokventaj, plue supreniradis senĉese, ĉirkaŭpremita al la protektantaj rozoj, kiuj ĉion parfumis en sia agonio: teron, aeron kaj cerbojn.

El inter la kompakta superdensaĵo de la rozbuked-amaso, kronanta la ĉirkaŭaĵojn de la ermitejo, suprenleviĝis zumanta murmuro de abelujo: krioj, ridoj, flustroj, sakroj, kantoj... la sonora elspiro de la pilgrimantaro.

La tuta vivo de la regiono, de Liskento ĝis la maro kaj de Roktremoloj al la malproksima ebeno, koncentriĝadis sur tiuj senkulturaj suproj de Sankta Poncio, kiuj, ne povante enteni la homamason, lasis ĝin disflui malsupren laŭ la deklivoj kaj sunflankoj, al la Akvo-Muĝulo, al la pinaroj kaj proksimaj ravinoj, kie ĝi haltis formante aglomerojn, svarmojn malkvietajn, kiuj faris pitoreskajn bivakojn. Mezmatene ĉie vidiĝis, kvazaŭ misteraj signoj de strategia plano, grupetoj el po tri ŝtonoj servantaj kiel kampaj fajrujoj, kaj apude dismetitaj, la mankorboj kaj korbegoj ventrokrevintaj de la provizaĵoj; kaj pli malfrue, grandnombraj kaj blankaj fumkolonoj rekte trafendantaj la kvieton de la aero, leviĝis kiel elviŝiĝantaj arboj el blanka miraĝa arbardensaĵo. Laŭ la vojo kaj rektvojetoj de la flanko de Murono povis supreniri, kvankam

(1) Ascendi = Supreniri.

malfacile, rajdobestoj kaj eĉ lu-tartanoj (1), kiujn tiris animaloj kun fortika piedaro, gvidate de kuraĝa kondukistaro hardita kontraŭ veturilskuoj; kaj jen laŭ tiu vojo ĝuste venis, kun ĉiuj siaj ekipaĵoj surŝultre aŭ rajdante azenojn, la foiristoj el la foireto de Sankta Poncio, vendistoj de kringoj kaj karameloj, de sukeraĵobuletoj, de blanka vino (2) kaj brando, de subrostitaj aveloj kaj pinioj, de plurbek-verŝiloj (3) kaj kruĉetoj el vitro, de plumbosoldatoj kaj ladotrumpetoj; la viro de la celpafado kaj tiu de la "babojo" (4), la blindulo kun la violono, kiu aliformigas en plendajn melopeojn la raporton pri vulgaraj krimoj, kaj tiu Kristoforo, la stultulo el Liskento, kiu gestas kaj grimacas meze de la homrondoj, mokimitante ĉiujn konatajn bestojn, de najtingalo ĝis porkido kaj de azeno ĝis lacertetoj.

Ĉiuj tiuj foiristoj sin instalis sur la ermiteja placo kaj, vicigitaj sub la cipresoj, ili starigis siajn elmontrejojn aŭ montris siajn lertecojn antaŭ ĉeestantaro el ridemaj gapuloj, ĉefe konsistanta el gemaljunuloj kaj infanoj feste vestitaj, kun malstriktaj jakoj kaj pantalonoj el rigidaj teksaĵoj, kun longaj jupoj, kiuj ilin falpuŝigas, kun vigle brilantaj kaptukoj kaj kun novaj baretenetoj tiel vive ruĝaj, ke ili ŝajnigis la tutan placon trapunktita per pinĉprenetoj da minio.

Mila, kiu neniam vidis similan pilgrimsvarmon, staris blindigita kaj timigita. Ŝi estis suprenirinta almenaŭ dekduon da fojoj la sonorilturon, por peti pro amo al Dio, ke oni lasu pace la sonorilojn, ĉar ŝia cerbo disrompiĝas; sed ŝia peto estis senutila: legioj da buboj kaj da grandaĝuloj, el tiuj mem kiuj, sur la placo, laciĝis rigardante elmontrejojn kaj pantomimojn, supren-kaj malsuprenirante fuŝmaniere la ŝtupareton de la kapelo, estis fariĝintaj mastroj de la sonorilturo kaj tie ili despote regis. Pendante laŭ svarmoj ĉe la ŝnuroj

(1) Tartano = Durada veturilo tirata de ĉevalo.
(2) Blanka vino = Dolĉa, ĉar boligita kaj sukerita, vino.
(3) Plurbek-verŝilo = Vitra kruĉo kun multaj bekoj kaj ofte kun ornamajoj diverskoloraj, kiu taŭgas por enteni bonodoran parfumon ĉefe destinitan al surverŝado ĉe dancoj aŭ aliaj popolfestoj.
(4) Babojo = Hazarda ludo, en kiu la ludanto donas rotacian movon al metala lamenstrio, kiu turniĝas ĉirkaŭ akso kaj pasas super pentritaj apartamentoj enhavantaj la ludatajn ŝanc-objektojn; se la lamenstrio haltas ĉe la apartamento je kiu li ludas, gajnas la ludanto; se ne, gajnas kiu estras la ludon.

de la sonoriloj, ili sonorigis senhalte, kaj tiuj, kiuj ne trovis ŝnurlokon kien alnajli la ungojn, elŝovis, ĉiuj samtempe, kapon kaj korpon tra la altaj fenestregoj kaj mansvingis kun afekta teruriĝo, elpafante al la spaco ridojn kaj kriegojn, kiujn neniu aŭskultis. La bandoĉefo de la petolega bubaro estis Baŭdilieto: veste neglektita, ĉifonita, kun la zono de la pantalono malsupreniĝinta ĝis la ventra subaĵo kaj la akuta voĉo sur la lipoj, li moviĝadis kiel hidrargo. Tiel ekscitita kaj ekster si lin vidis Mila, ke ŝi rezignis lin admoni kaj meti ordon en la sonorilturon.

Ankaŭ ŝi sentis sin traskuita de tiu granda tumulto de la festo, kaj ne sciis kien ŝi direktis sian personon: de la balkono al la korto, de la korto al la kuirejo kaj de la kuirejo al la teraso, meze de la trafiko de iroj kaj reiroj, kiuj ŝin persekutis petante de ŝi provizaĵojn. De nememorebla tempo, la ermitejo luprovizis je malalta prezo uzilojn por fajrujo, vendis ovojn, oleon, laktukon, anizojn (1) kaj blankan vinon, kaj krome ĝi servis manĝaĵon jam kuiritan al la multaj poltronoj (2), kiuj ne volis mem ĝin pretigi. Parapetitaj malantaŭ aroj da kaldronoj, kaseroloj kaj potetoj, du kuiristinoj el Murono, kun siaj koncernaj helpistinoj, ĉiuj kun tranĉilo en mano, starigis batalon je morto kontraŭ la kokinoj, anasoj kaj anseroj, kiuj kriaĉis kaj terurite baraktadis antaŭ ol lasi tranĉi al si la kolon.

Pri la kunikloj zorgis la Spektro. La antaŭan vesperon li alportis vicon da dekunu, ĉiu kun la kapo frakasita per ŝtonbatoj aŭ piedfrapoj, aŭ kun la gluteoj ŝiritaj de la dentoj de la furo. Sed sciante, ke per dekduo da ili li neniam provizas laŭbezone, li estis promesinta, ke la postan matenon li alportos pli. Kaj la morgaŭon Mila vidis, kiel la Spektro, izolita sub la breto de la kamenkloŝo, ne ĉesis senfeligi kunikloj, kvazaŭ per magioarto li tiradus ilin el la poŝo.

Okaze venis al la kuirejo viroj aŭ virinoj:

— Ĉu vi hazarde havas ioman manĝaĵon por vendi? —

(1) Anizo = Globeto konsistanta el anizgrajno, kovrita per malmoliĝinta sukerpasto.

(2) Poltrono = Maldiligentulo, malkuraĝulo, malbravulo.



La Spektro, tuj proponis la beston, kiun li estis senvestiganta, pritraktis, enspezis, proprigis al si la felon kaj, tuj post momento, alia kuniklo, alkroĉita je la artiko de malantaŭa piedo, pendis de la najlo sub la kamenkloŝa breto.

Mila ne povis rezisti la tenton iom halti por rigardadi tiun senkompatan senfeligon: ŝi neniam vidis manlertecon similan al tiu de tiu viro. Per nura tranĉilfrapo li ronde tran-

ĉis la felon ĉe la rando de la tibioj, lasis la piedojn vestitaj per ilia felpa piedŝirmilo, fiksis transverse en sia buŝo la tranĉilon, kaj tirinte per ambaŭ manoj la grizan sutaneton, subŝtofitan per membraneto brilanta kaj glata kiel bulboŝeleto, ĝin rapide kuspis malsupren de la femuroj, lasante la nervojn kaj muskolojn malkovritaj. De tempo al tempo la felo ekhaltis ĉe vundorando, fariĝis ŝiriĝo, defalis aglomeraĵo da koaguliĝinta sango, la tranĉilo faris kvazaŭleke tranĉeton kaj la felo denove sekvis. Kiam ĝi atingis la kolon de la besteto, la Spektro ŝajnis ĵongladi. Li interplektis sur sian maldekstran manon la felon, per la dekstra tranĉe glitigis karnonivele la sangantan tranĉilon, kunstreĉis la okulojn kaj la dentojn, kaj, farinte tirskuon, li lasis la kuniklon, senigita je ĝia vestaĵo, balanciĝanta sur la hoko, tute ruĝa, ruĝa, senvosta kaj senorela, elmontranta la blankajn daŭbetojn de la dentoj kaj ambaŭ manetojn kontuzitaj. Vidinte ilin en tia stato, tiel nudaj, korpe elstreĉitaj, kokse malgrasaj, abdomene ensuĉitaj, kun la kubutoj kuntiriĝintaj kaj la kruretoj longe etenditaj, Mila pensis, kun kortremo, ke tiu estaĵeto ŝajnas homo, homo tia, kiu ne povis elkreski, sed ke, eĉ morta, ĝi sentas kion oni operaciis sur ĝi kaj paroksisme ridas per la cinika grimaco de skeleto, kiun la sufero metas sur la vizaĝon de la torturitoj. Kaj kiam la Spektro enprofundigis la tranĉilon en la ventron de tiuspeca homunkulo, por ĝin senigi de la intestoj kaj fortiri el ĝi la internaĵojn, Mila devis fermi la okulojn, sentante, ke hororfulmo trapikas ŝian koron, kvazaŭ la fraŭda ĉasisto estus ekzekutisto, senanima kaj abomeninda ekzekutisto, kiu ĝue sin dediĉas al tio, disŝiri senkulpajn kunfratojn. Pro tio, kiam oni ŝin avizis, ke en la salono iu petas pri ŝi, Mila eskapis el sub la kamenkloŝa breto forte spirante, kvazaŭ ĝis tiam, oni estus kontraŭvole reteninta ŝin, kvazaŭ ŝi fuĝus, korpremita, de privata loko, kie oni faras tiajn aferojn, kiajn oni devas ne vidi.

En la salono ĉio havis alian aspekton. Sub la ekscitita sonorado de la sonoriloj, kiu malsuprenfalis kiel tumulta kaskado laŭ la sonoriltura ŝtupareto kaj per sonoraj flugfluoj eniris tra la balkono kaj la tutmalfermitaj fenestroj, la ko-

blo (1) el Murono agordis la misakordajn instrumentojn, kaj la ses aŭ sep pastroj el la najbaraj vilaĝoj iradis tien kaj reen tre okupite, vokante unuj la aliajn, ridante, ŝercante kaj interrompante, per la larĝa, melana (2) noto de la sutanoj, la viglajn brilojn de la poluritaj metaloj (3). Ĉiuj ĉeestantoj preparis sin por la Diservo, la solena Diservo de Sankta Poncio.

Kiam Mila eniris la salonon, ŝi aŭdis, ke la sinjoro Paroĥestro el Murono ordonas al la paŝtisto, iri signali la unuan sonoriltrilon: kaj tuj kiam la paŝtisto, forpelinte de la sonorilturo la bubaron, ekprenis la ŝnurojn por solene dissonorigi, ŝi, kiu sin estis elŝovinta al la balkono, povis rimarki, ke la tuta montara homamaso sammomente tumultiĝas, kiel formiksvarmo surprizita de pluvoverŝo.

Ĉio estis moviĝado, akcelita purigo de kortbirdaro, multobligo de fajrujoj... Kaj kiam eksonis la fina sonortiro, ĉie vidiĝis polvoskuoj de jupoj, fulmanta kolorflagrado de kaptukoj, kriegado kaj ekkuroj, kaj la kompleta homdensaĵo impetis al la pordo de la kapelo. Post kiam aperis meze de la altaro, la sinjoro Paroĥestro el Murono ĉirkaŭita de pastroj, radie majest-aspektaj sub la liturgiaj ĉefornatoj, broditaj kaj orborderitaj, tie interne ne estus plu loko eĉ por kudrilpinto. Viroj, virinoj kaj infanoj, kunpremite, miksite, sin interpuŝis kaj insultis reciproke senparole, klopodante trabati al si lokon kaj spiri. Kaj ĉar la kapelo montriĝis tro malgranda por enteni tiom da miloj da piuloj, restis plenplenaj de ili la placo, la ŝtuparoj kaj muroj kaj eĉ la spaco de la malsupraj pinetoj: ĉiuj elstreĉante ĝis elartikigo la kolojn por duonvidi, kio okazas sur la altaro, kaj ĉiuj altigante kaj protektante kiom eble, kontraŭ kunpuŝiĝoj kaj interfrotiĝoj, la multkolorajn bukedojn da rozoj kaj rozkapetoj.

---

(1) Koblo = Muzika korpo aŭ malgranda dekunu muzikista orkestro, kiu ludas popoldancojn, speciale sardanojn. Sardano = Ĉefa kataluna popoldanco, kiun oni dancas ordinare en la libera aero, nedifinita nombro da gedancantoj interprenitaj je la manoj, kiuj formas rondon. La dancado povas konsisti el tiom da rondoj kiom la gedancantoj volas.

(2) Melana = Nigra. El la greka lingvo "melas" = nigra. (Kp. Melanozo: Malsano produktata pro depono de nigra materio en la histoj).

(3) Metaloj = Blovinstrumentoj de la muzikistoj.

Meze de la Epistolo, apud la ĉefaltaro, flavkolora vizaĝo spasmigis la okulojn, dilatis la pupilojn, lante mallevis la palpebrojn kaj dekliniĝis sur najbaran ŝultron... Kostis Difavoron kaj penon malfermi tie koridoreton inter tiu korpa amasiĝo por elporti la svenintinon; ĉe la Evangelio oni devis ripeti la manovron kun maljunulo kaj infano, kaj ĉe la lastaj preĝoj, ne vidiĝis en la kapelo eĉ unu persono kun natura aspekto: ĉies vizaĝoj estis kongestaj aŭ palaj kiel neĝflokoj.

La forta odoro de incenso kaj bruligita vakso, la intensa aromo de la rozoj kaj la ardovaporo, kiun ellasis la akumuliĝo de korpoj, haltigis la spirojn; la ilumino de la altaro kaj la ruĝornata, dancoŝajna ceremoniado de la pastroj, ĉirkaŭ la mescelebranto, palpebrumigis la cerbojn, kaj la brua kantimplikiĝo en la ĥorejo, kun la interrompiĝantaj kaj rekomenciĝantaj fluoj de la homaj voĉoj, kun la longigitaj grincoj de la violonoj kaj la basaj tondroruliĝoj de la fiskorno (1), pufiĝante kaj hiperakustike perkutante (2), ebriigis per harmoniaj bruoj la aŭdon plej neŝanceleblan. Meze de la Diservo, preskaŭ ĉiuj estis perdintaj la spiritĉeeston: la brustoj spirblovis kiel balgoj, la ŝvito, kiel kvieta pluvo, defluis laŭ la tempioj, kaj glaciaj mankatenoj (3), ĉirkaŭpremegante la manradikojn, malfermigis la fingrojn kaj malstreĉis la nervan rigidecon: sed neniu volis cedi, ĉiuj restis najlitaj sur sia loko kiel kojno, avide atendante la superegan momenton: la benon.

Post tio la Diservo finiĝis, kaj dum oni kantadis avemariojn kaj surmetis la pluvialan mantelon (4) sur la sinjoron Paroĥestron kaj per puŝoj kaj deturniĝoj eliris el la kapelo la duono de la homamaso; la alia duono, jam preskaŭ sereniĝinta, viciĝis post la tabernaklo de la Sanktulo, dolĉe levita sur la ŝultrojn de kvar viroj. Komenciĝis la procesio; la deliranta trilado de la sonoriloj, malŝparege frapataj, aŭdigis sin

---

(1) Fiskorno = Kupra muzika blovinstrumento similanta trumpeton sed kun korpo pli dika kaj provizita per tri klavobutonoj.

(2) Perkuto = En la blovinstrumentoj, sonoro produktata per malmola frapado sur la klavobutonoj.

(3) Mankatenoj = Simbola esprimo por reprezenti la premegon de la ŝvito.

(4) Pluviala mantelo = Mantelo kiun surportas la prelatoj aŭ pastroj en la procesioj kaj aliaj liturgiaj solenoj.

en unuhora malproksimo; sub la mezpunkta volbo la liturgia ĥoro supermezure nutriĝis, kaj la tuta monto subite krevis per ekzaltitaj salutaklamoj:

— Sankta Poncio!... —

— Sankta Poncio, Sankta Poncio!... Sankta Poncio!... —

Tio estis, ĉar la stranga kaj melankolia bildeto de la Sanktulo, pli anobia kaj malnoviĝinta ankoraŭ meze de tiu vivkrevo kaj de tiu kadro de eterna renoviĝo, ĵus elpaŝis el la malluma rektangulo de la pordo: altigita super la denseco de kapoj, senmova inter la salomonaj (1) kolonetoj de sia orita kaĝo, kun la ŝrumpa kolo kliniĝanta sub la pezo de la mitro, mantenanta la episkopan kurbobastonon kaj, per la du krampfaj fingroj, sendanta al la afekciitaj homsvarmoj la sanon per sia eterna beno. Kaj kiam tiu sankta gesto, inerta kaj morta, fariĝis dolĉe vivanta, kiam la sinjoro Paroĥestro levis la aspergilon por transdoni okultan povon al la ĉeestantaj rozoj, la homsvarmoj, fulme-vunditaj de emocio fronte al la nepenetrebla mistero de la granda miraklo, tute mutiĝis, kaj, sentinte la krurojn paralizitaj, ili fleksis la genuon kaj humiliĝis ĝistere.

Tiam Mila, kiu alifoje estis elirinta al la balkono, vidis, sur la tuta vasteco de la placo, nur nigraĵon kovritan per rozoj, el tiu granda florado da rozoj hisitaj super ĉio kaj tremantaj per tremo de feliĉo kaj triumfo, kvazaŭ meze de ili pasus, ilin dorlotante kaj revivigante, dia venteto. Ĉio estis kapitulacinta, ĉio malaperis, ĉio neniiĝis en tiu regado de bonodoro, krom la sentoj kiuj, vekitaj kaj ekscititaj de la ebriiga beleco de la spektaklo, por momento limtuŝis la intensecon de la ekstazo.

Ankaŭ Mila sentis sin vundita de la fervoreksplodo.

Ne atentinte ŝi renkontis sian frunton najlita sur la balustrado de la balkono, la vizaĝon kovrita de larmoj kaj la koron traskuita de delica tumulteco. Ĉio surtera malaperis antaŭ ŝiaj okuloj, kaj la unuaj ekbriloj el la transmondo blindigis al ŝi la animon.

---

(1) Salomonaj = Rilatantaj al juda reĝo Salomono, viro de granda saĝo, kiu konstruigis faman templon kaj starigis ankaŭ luksegajn palacojn, por kies realigo, li venigis la plej lertajn artistojn el la najbaraj landoj, kiuj kreis propran stilon.

— Sankta Poncio!... Sankta Poncio!... Sankta Poncio!... — denove muĝis la homsvarmoj; kaj tiu petalvoko, freneze ripetata kun ĉiuj fleksoj de la emocio, sentigis al ŝi, por la unua fojo, ion grandan, puran, eminentan: la subliman imperion de la sankteco...

Post la unua beno, la procesio sekvis sian vojon laŭ la dekstra flanko de la placo. La svarma ondo malfacile dispartiĝis ĉe la trapaso de la tabernaklo, por rekuniĝi tuj poste malantaŭ la koblo; la akraj sonoj kiujn ĉi tiu elradiis, estis disfendataj de la pafoj de la distriktaj ĉasistoj, kiuj krakbrue

salutis la Sanktan Patronon, kaj sub la ĉielo, paligita de ĉiuj blindigaj helecoj de la tagmezo, la blankaj fajroflamoj de la vakskandeloj ĉaste lentugis la mallumon de la vestoj, kvazaŭ lumaj anĝelkisoj.

Alveninte al la ŝtupoj de la placocentro, la procesio haltis, kaj la sinjoro Paroĥestro, denove levante la dekstran manon, ripetis la benon al ĉiuj rozoj, al ĉiuj rozoj el la regiono, tiel same al ĉiuj, kiuj velkas sur la brakoj de la ĉeestantoj, kiel al la aliaj, kiuj ankoraŭ pompe krevas sur la brancoj mem de la rozujo.

Kaj prezidinte tiun lastan ĉiujaran benon, Sankta Poncio lante finĉirkaŭiris la placon, kaj triumfe skuiĝante sur la ŝultroj de la viroj, kiuj lin portis, li revenis al sia kapelo, kune kun la senfina homsvarmo post si.

Nur mankis ankoraŭ fari al li la lastan komplimenton; kaj dum oni ĵetis por kuiro la rizon en la kaserolojn, kaj meze de ĉiu rondo oni tratranĉis la panon, kaj la odoro de la manĝaĵoj eĉ vekis la apetiton de la plej nemanĝemaj, la tuta ermitejo ree tondris per la laŭdoj de la kantstrofoj, kiujn ĥore ripetis miloj da vibrantaj voĉoj:

"Naskiĝis, vi, antaŭtempe
pro Dia privilegi',
ĉar, tiel, mokita restis
la ruz' de l'infergeni'."

Kaj al la varma entuziasmo de tiuj voĉoj, respondis post ĉiu stanco, kaj ankoraŭ kun pli da entuziasmo, la peteganta rekantaĵo:

"Tial ke je pov' mirakla
vin investis supra Di',
gardu nin en viv' kaj sano,
martir' glora, Sankt-Ponci"!"

Tiam la rozoj, sentante, ke finiĝas ilia festo kaj al ili dolĉe venas la bona morto, balanciĝis sur siaj verdaj tigoj kaj, senvestiĝante, ili surŝutis la montaron per pluvo da velkintaj rozfolioj.



IX
ĜOJTUMULTO

De unu ekstremo al la alia de la salono, oni estis etendinta du longajn tablojn — luprenitajn, kun tukoj kaj cetera servico, ĉe gastejo el Murono kaj muntitajn sur lignoĉevaletoj; — en la ĉambro kun la knedujforma komodo staris du aliaj tabloj, mallarĝaj kaj malfirmaj, krom unu ronda en la ĉambro ĉe la sonorilturo kaj ankoraŭ alia en la korto, improvizita sur la cisterna buŝmuro; ne enkalkulinte en tio alian tablon, kiu staris en la kuirejo, kiun la domanoj kaj la dungitoj por tiu tago — la Spektro, la kuiristinoj kaj la helpistinoj — decidis rezervi al si, sed tiu ilia intenco ne sukcesis.

Ĉirkaŭ horduono post tagmezo, ĉiuj ĉi tabloj — escepte de la ronda, destinita al la pastroj — estis ĉirkaŭplenigitaj de popolo malsata kaj agitema, kiu faris grandan bruon.

Tuj post finiĝo de la kantikoj en la kapelo, ĉiuj, kiuj ne kunportis provizaĵojn, malorde sturmis (1) la domon, laŭ maniero de konkeranta armeo, kaj turniĝadis tien kaj reen, filtriĝante ĉiuflanken, ĉion tuŝante, ĉion snufante, ĉion petante kaj ĉion vokante unuj al la aliaj. Ili kriegis en la korto, en grupoj eniris en la kuirejon, kie ili malhelpis la kompatindajn taskopremitajn virinojn, kuriris en vicoj al la korto por kontentigi siajn necesaĵojn, baraktis kontraŭ la palisaro, bastonis la cipresojn, invadis la terason kaj derompis la florojn per fuŝemaj mankaptoj, kraĉis en la eksterajn basenojn, suprenrampis la migdalarbojn por faligi la frukton, ĵetis ŝtonojn al la gapantaj ŝafidoj, kiuj apudigis la buŝeton al la latpordo de la korto, kaj, fine, kiel tiom da aliaj nubokirloj, ili nenie lasis objekton sendifekta.

Tamen, laŭmezure kiel la malsato ilin pikis aŭ kiel ili laciĝis furmaniere esplori, promeni aŭ damaĝi, ili koncentriĝis en la altaj ĉambroj kaj ensiliĝis (2) en la improvizitaj refektorioj (3). Kaj tie kreskis la brukonfuzo.

Unuj kuntrenis seĝojn, interdisputante pri ili; aliaj, juĝinte la tablon ĝiba, ĝin fuŝe rektigis, sulketigante la tablotukon kaj ŝancelante la servicon; ĉi tiu, premtenante per mano kiel strobilo favan krajonstumpon, skribis sur la muro malĉastajn vortojn en zulua ortografio; tiuj, manklakadis kaj eltordis la korpon, stulte mokimitante specon de serpenta danco... Forminte rondon apud la balkono, aro da flamiĝuloj mezvoĉe ekkantis, tuj kiam ili vidis pastron, tiun satiraĵon:

Jen frat' kaj monaĥino
dormadis kune...

spicante ĝin per okulsignoj kaj kubutfrapoj, kiuj komunikis acidan vizaĝesprimon al du piaj maljunulinoj, kiuj perdiĝis

(1) Sturmi = Kurante aŭ alsaltante ataki.
(2) Ensiliĝi = Meti sin enpremite en lokon, kiel la greno staras en silo.
(3) Refektorio = Granda manĝoĉambro en monahejo, kastelo, ktp.

inter la junularo. Alia aro da vantaj unuenaskitoj (1), kun vivkoloraj kravatoj kaj la novaj ĉapoj surnuke pendantaj, mokŝercis, kun la kapo tre alta, laŭte parolante kaj rigardante ĉirkaŭen, kvazaŭ ili ĉiujn invitus priridi iliajn spritaĵojn. Ili estis tiuj aĉuloj kiuj, kiam Mila kaj la helpistinoj pasis kaj repasis, longigis la kruron por ilin falpuŝigi, aŭ riskis pinĉi la pulpon de ties sidvango kaj tikli sub ties akselo. Kaj ili, la virinoj, superruzaj kaj konfuzitaj, pasis kiel fulmoj meze de la tumulto, portante pladojn da laktuko, vicigante sidlokojn, plenigante la vintrinkilojn, farante avertojn, kiujn neniu aŭdis kaj sugestante admonojn, kiujn neniu volis aŭskulti. Ankaŭ Matio havis sian taskon. De unu rondo al la alia, prefere sin ŝovinte kie estis pli da jupoj (2), li montradis al ĉiuj la urnokapeleton de Sankta Poncio, tiun urnokapeleton interne tapetitan per veluraspekta papero, kiu havigis al li tiel severan riproĉon fare de lia edzino; kaj dum li ĝin montris kaj faris longajn eksplikojn pri la celtisberoj, kiuj ĝin garnis kaj pri la mirakloj de la Sanktulo, li vendadis laŭdostrofojn presitajn sur pajlokolora paperfolio, kun literoj grandaj kiel grajnoj de milio, krome travideblajn sanktulbildojn, kiuj tordiĝis kaj maltordiĝis per spirblovo, latunajn medaletojn kun reliefo de la Ŝtonegoj, benitajn rozariojn kaj skapulariojn... Kaj kiam oni ne volis ion aĉeti de li, li ridete petegis kvincentiman almozon por la festo de la Sanktulo, kaj lin tute ne konsternis la malicaj supozoj de tiuj, kiuj volis scii, por kia Sanktulo devis taŭgi tiuj centimoj, ĉu por tia el ligno aŭ por tia el karno kaj ostoj, nek ĝenis lin la malprudaj demandoj de la klaĉuloj, kiuj alparolis lin pri la belformeco de lia edzino per esprimoj hontinde trotaksemaj. Li ĉion toleris ne priokupiĝante, kaj Mila, ĵetante al li, dum ŝi pasis, rapidajn ekrigardojn, rimarkis kiel li negocas, kontente kaj bonhumore, sed enpoŝigante la centimojn per artifika kaj profitama sinteno de blankrasa cigano, dum ĉirkaŭ li grupiĝis ĉiuj infanoj en la salono, kiel bando da muŝoj, ne

(1) Unuenaskitoj = Laŭ kataluna familia moro, la unuenaskitoj ĉe farmobienoj posedas unuavice la rajton transpreni, post la morto de la patro, la heredaĵon kaj la direktadon de la bieno.

(2) Jupoj = Ideo pri virinoj.

fortirante de sur li la okulojn kaj petegante de li, tiuj pli obstinaj, la veluraspektan urnokapeleton mem. Kaj ne povinte ĝin ekposedi, ili rabietis, tordiĝante sur la brakoj de la patrinoj, piedfrapante kaj, por sin venĝi, kriegante, ke ili volas reiri hejmen, ke ili havas dormemon, ke ili havas soifon, ke ili havas ventrodoloron, aŭ... ĉiujn imageblajn blagojn kune.

Kaj ĉies malpacienco kaj la kribruego pligrandiĝis pro la prokrasto ĉe la manĝoservado, kaj iuj minacis foriri, ne ekmanĝinte ion kaj aliaj grincigis la langon ĉagrenite. Ĝis kiam, subite, altigita super bruniĝintaj brakoj, aperis, ĉe la pordosojlo de la salono, la unua kaserolo kun fumanta nutraĵo. Unuanima ekkrio aklamis ĝin, kaj tiam fariĝis rapidega okupiĝo de sidlokoj, oni ekpuŝis kaj sakris, sekvis piedpremoj kaj ektiroj de jupoj, kaj la homoj sidis preskaŭ unu sur la alia, kiel kunpremitaj figoj interne de korbo. Fulmorapide restis lutitaj, ĉirkaŭ la tabloj, du homringoj, sinsekvaj kaj firmaj kiel ferringoj. Sed la kaserolo pasis laŭlonge de la strato el dorsoj, trairis la salonon, lasante en ĝi fluon da stimulanta bonodoro, kaj eniris en la ĉambron ĉe la sonorilturo: ĝi estis destinita al la pastraj moŝtoj.

Kiam la ĉeestantoj rimarkis tion, kaj komprenis, ke oni iras servi al tiuj unuavice, ĝenerala murmuro de protesto leviĝis el ĉiuj flankoj, speco de elektra kurento ekscitis la klerikofobian instinkton, kiu ĉiam nestas en la plej intima refaldo de la homsvarma animo, kaj sekreta rabio, impeto de ĵaluza senpoveco, kiu ŝajnis ilin interne brogi, ĵetigis al la ĉambro ĉe la sonorilturo provokajn rigardojn kaj intermitajn vortojn de insulta spitkolero.

Kaj kiam, fine, ankaŭ venis la kaseroloj al la longaj tabloj kaj ekzistis por ĉiuj abunda manĝaĵo, tiu spitkolero, tiu rabio, ankoraŭ latentaj, kvazaŭ ili spicus per nigra pipropulvoro la nutraĵojn, alportis kun si varmon al la stomakoj, kaj la sango rapide ardis en la vejnoj, kaj rapide la cerboj pleniĝis de ruĝaj vaporoj.

La kompaktaj homringoj estis rompataj kaj relutataj ĉiumomente de la el-kaj-enirantoj el kiuj, unuj, ĉar ili tagmanĝis haste, ekforiris, kaj la aliaj, ĉar ili ankoraŭ ne trovis sidlokon, atendis sian vicon por altabliĝi; sed la ĝenerala kun-

grupiĝo ne ĉesis, kaj la tagmanĝo senmezure longiĝadis. La bruetado de la maĉoj, la grincoj de tiuj, kiuj bekflue trinkis, la tintoj de la teleroj kaj vitroservico, interrompitaj de la konversacioj kaj la krevoj de ridoj, plenigis la domĉambrojn, kaj la aero haladziĝis per malbonodoro de ensiligita homkarnaĵo, de malpuraj spirblovoj, de trinkita vino, de englutitaj manĝaĵoj kaj de fetoraj fumnuboj el bruligita tabako. Apenaŭ unu horo post la komenciĝo, la agapo (1) estis alpreninta la malordajn sintenojn de saturnalio (2). La okulgloboj de la viraĉoj briletis, la grasaĵaj lipoj dilatiĝis de orelo al orelo per stultaj ridegoj, la fingroj, tremaj, longiĝadis por ekpalpi la unuan virinkarnon, kiu falis al ilia atingopovo, kaj la neaŭdindaj ŝokvortoj kaj konceptoj resaltis en la oreloj, tute kiel hajlo sur tegmentoj.

La virinoj, izolaj aŭ kunigitaj per konateco, sed kiuj renkontiĝis sen akompana helpo de viro, plue forglitis konsternitaj, ilin sekvis la malmultaj familioj, kiuj ĉeestis, incititaj de la patro, frato aŭ edzo, kiu malbonhumore grumblis, kaj fine, la pastroj, singarde eniginte la kongestajn vizaĝojn tra la pordo de la ĉambro kaj teruriĝinte pro la konfuzo en la salono, plej rapide retiriĝis, silente ŝoviĝante laŭ la ŝtupareto, kiu komunikiĝas kun la kapelo.

Tiam estis la momento kiam la paŝtisto, kiu jam delonge rondiradis, ĉion observante, haltigis Milan apud la pordo kaj al ŝi diris kun subita aŭtoritateco:

— Neniel eniru ĉi-tien, ermitino: jam nun, tio estas bestorifuĝejo... Ĉu vi memoras kion mi asertis al vi antaŭ kelkaj tagoj?... Ili nur pensas ekstravaganci kaj tuj perdas la saĝon... Post nelonge, ni devos ilin forpeli per frapoj de balailo. —

Mila, ne protestinte, reiris al la kuirejo. Tie ankaŭ aliaj fremdaj homoj ne ĉesis manĝegi, kaj en la salono kaj granda ĉambro daŭris la brutinstinkta saturnalio, sub la viglado de la paŝtisto kiu, izolema kaj brovokuntiriĝinta, malestime rigardadis tiujn bestojn nomatajn superaj, kiuj tordiĝis kaj hurlis, ebriigitaj de gajeco, de substancoj malbone digestataj, de

(1) Agapo = Komuna manĝo de la kristanoj, dum la unuaj jarcentoj de la Eklezio. Manĝo de pluraj personoj ligitaj per amikeco aŭ simpatio.
(2) Saturnalio = Festa orgio antikve dediĉita al la dio Saturno.

la korpokontaktoj kaj ankaŭ iomete de superflua vino: de ĉio, per kio ne ebriiĝas la aliaj bestoj nomataj malsuperaj.

Ĉe la libera aero, tiuj ekspansiaj tumultoj prezentis tute alian serenecon. La ridoj harmonie tintis, kaj unuj respondis al la aliaj kiel birdaj kantoj, la ruĝa tono de la vizaĝoj, akordiĝis kun la pura ĉielbluo, la membroj, kun pigra laceco, adoptis gracilajn pozojn de klasika statuo. La malagrablaj odoroj disiĝis kaj forbloviĝis tra la aero, kaj la agrablaj restis ŝvebantaj ĉirkaŭ la kapoj, kiel kareso por la flaro. En la levitaj manoj brilis la vinglasoj per kristala viveco de opaloj kaj grenatoj, la tranĉiloj fulmis tratranĉante la maturajn fruktojn, kaj la stomakoj satigitaj, vigliginte la akutecon de la ideoj, inspiris adekvatajn spritaĵojn, lertajn artifikojn el popola rakonto...

En ĉiu loko ridis familio, amuziĝis parencaro bone interrilatanta, libera de la korupta puso, kiun formis la superfluaj membroj: la senokupuloj, la onklo-fraŭloj, la homaj vespoj enfermitaj tie supre, en la kaĝoj de la ermitejo, kie ili senbridigis la malvirtajn ekscesojn de siaj plezuroj.

En tiuj lokoj, kiu pli libere agis laŭ sia volo, estis la infanaro, — akute kriante, rultreniĝante, manĝante kiel kvar, ĉiu buŝeto malgranda kiel pinio, — poste frotetante la gluecajn

fingretojn sur la vizaĝo de la patrinoj en nefineblaj karesoj, kaj ĉion implikante per sia malkvieta babilado kaj moviĝado. Kaj tie apude, la ĉevaloj kaj azenoj alligitaj al la surtere apogitaj ĉarbrakoj, levis la kapon el la manĝosaketoj kaj momenton ili restis enpensaj, kun la trunketoj el luzerno aŭ el pajlo pendantaj de la buŝegoj malseketaj pro la spiro kaj rigardante tiun nekutiman homsvarmon per siaj grandaj malhelaj okuloj, plenaj de neesprimeblaj pensoj; poste ili ree klinis la kolon, kaj kun filozofia indiferenteco, ĉiam distranĉante interdente la trosekajn tigojn kaj fortimigante de sur si, per la vosto, la persistajn muŝojn, lasis, ke en ilia ĉirkaŭo la homa vivo bolu, superbordiĝinta el siaj moroj, fermentante kaj kraĉante siajn malpuraĵojn en la brileganta sunpleno de majo.

Meze de la amas-agitiĝo kaj profitante de la malfortecoj, kiujn la satmanĝado portas al la homoj, serpentumis kun lerteco la malgravaj stratvendistoj; fremda strabulo kun kesteto plena de horloĝaj ĉenetoj, de malkaraj butonkartonetoj, de elastaj ŝelkoj, de krajonoj kaj teketoj; la virino vendanta subrostitajn avelojn, kun sia vizaĝo ruĝeta kaj sulka kiel velkinta pomo kaj sia korpo kurbiĝanta al la peza kankorbo, plena de bongustaj pruneloj; tiu, kiu portas paperkornetojn

kun fratanizoj (1) kaj karamelojn, duonfandiĝintajn en siaj kvadratitaj paperstrioj, punktitaj de muŝfekoj; la oranĝovendisto, levanta brakon kaj iganta flagreti per sia bruna mano malgrandan ormondon sub la vibranta elkrio: "Dolĉaj kaj plezurigaj, knabinoj!"; la kafejestro el Murono kun siaj boteloj da siropo kaj ŝaŭmlimonadoj... Ĉiuj lertaj, spritaj, sugestemaj, riĉaj je mielaj vortoj kaj tenta insistemo, kiu naskas dezirojn aĉeti ĉie, kvazaŭ kontaĝanta avido.

Kaj la gepatroj kaj geavoj, nekapablaj rezisti la petegojn de la infanaj voĉetoj, aĉetis la gluiĝemajn karamelojn kaj tordiĝis pro rido, kiam ili vidis ilin gluitaj sur la freŝaj kaj brilantaj vangetoj de la etuloj; kaj la vantamaj junuletoj domaĝe gratis al si la poŝon antaŭ ol decidiĝi eligi el ĝi la peseton por akiri la bluŝtonajn butonetojn, kiuj tiel bele sidus sur ilia malvokolora ĉemizo; kaj la fianĉo enamiĝinta, kiu leginte en la okuloj de la amatino antaŭtempan kapricon, plenigis al ŝi la jupangulon per oranĝoj, kaj petis ŝin orelkave, ke ŝi permesu al li iomete sursuĉi tie, kien ŝi ĵus penetrigis la dentojn.

Intertempe — ĉe la proksimaj bordodeklivoj kaj kavejoj, sub la ombreloj de la pinoj intense aromigataj de rezinoj, kaj ŝirmate de la ĉaroj, senmovaj kiel afustoj de kanono —, la viroj jam sataj kaj regataj de pigraj torporoj, sen io sur la kapo kaj senjake, longe sin sternis sur la grundo. Tie ili kuŝis apud la edzino duonvoĉe kantanta lulkanton, dum ŝi dancigis la infanon kuŝantan sur ŝiaj genuoj, aŭ en la vidatinga proksimeco de edziniĝ-aĝa fraŭlino, kiu de tempo al tempo fiksis al ili atentan rigardon, en kiu oni divenis submetiĝon de femalo (2) kaj respekton de servutulino al sia virseksulo kaj sinjoro.

Kaj jen ĉi-tie, sub protekto de murangulo, fortika brako stringe zonis korpon, kiu sin lace fordonis al la kareso, kaj tie, deirinte de interdistancitaj grupoj, du sopiraj rigardoj senĉese renkontiĝis kaj koliziis, kaj ankoraŭ pli supre, malantaŭ la kaŝanta altaĵeto, kolo skuita de subita sveno falis sur ŝultron, kaj du ardantaj buŝoj kupliĝis kun avida deliro.

(1) Fratanizo (aŭ anizo de frato) = Anizo pli malgranda ol la ordinaraj.
(2) Femalo = Inseksa estaĵo.

En la kvieto plensateca kaj sorĉita pro la digestado, la vivinstinkto, ekscitita, preskaŭ neretenebla, faris sian vojon, defiante la neglektitajn viglojn kaj la indulgajn ridojn de la fermiĝemaj okuloj. Ĝis venis ĝin ekataki kaj devojigi la unua trilo de la ŝalmo, kiu anoncis la sardanojn.

Starantaj sur la ambaŭflankaj ŝtonbenkoj de la pordego kaj apudmetitaj ĉe la muro de la kapelo, la muzikistoj, kun la korpo rigida kaj la vizaĝo plena de grimacoj, ŝajnis ekspozicio el groteskaj statuoj. Ili ludis, kun tuta seriozeco, la komikan pantomimon, levante kaj mallevante la brovojn, malfide deturnante la okulojn, pufigante kaj malpufigante la vangojn, dum — per la metalaj plilongigoj, laŭ ekstravagancaj formoj —, ili kraĉis tra siaj lipoj, lavangojn da notoj, kiuj falis super la ĉeestantaron kiel magia ekzorcismo, strange ĝin ekskuante kaj tute impulsante de unu flanko al la alia.

Kaj, — same kiel en ebena marĉo formiĝas rondetoj kiam en ĝin falas nedaŭra pluvgutado — en la placo kompaktigita de homamaso rapide konturiĝis pli kaj pli multaj dancorondoj, perfektaj kaj koncentraj cirkloj, kiuj turniĝis jen iomete dekstren, jen iomete maldekstren, ritme, matematike teksante la antikvan sanktan dancon. Dume la proksimaj bordodeklivoj kaj kavejoj kaj la etendaĵoj da senkulturejoj kaj pinetoj restis dezertaj, escepte de ia prokrastema paro kiu, silente, la okulojn en la okuloj kaj la manojn en la manoj, restis forgesiĝinta pri ĉio kaj malliberigita de sia propra amblindiĝo. Ankaŭ la domo malpleniĝis ĉe la unuaj sonvibroj de la muziko, kaj restis en la kuirejo nur la virinoj, baraktantaj kontraŭ la malpura teleraro. En la kapelo, ĉirkaŭ dekduo da piulinoj, surgenue antaŭ la altaroj, suprenturnis la pupilojn al la Sanktulo de sia adoro kaj preĝis fervore per preĝoj parkere lernitaj, kaj iu scivolulo malmulte simpatianta kun la amasbruo, kiu, kun la ĉapo en la manoj kaj tiuj ĉi kunplektitaj malantaŭ la dorso, ĉirkaŭvagis, detale reviziante la objektojn, kiuj vokis lian atenton kaj duonvoĉe silabante la trivialajn sublegendojn de la eksvotoj.

Kaj la suno, dume, ŝvebante en la palaj bluecoj de la ĉielo kaj jam subire al okcidento, origis la homamason per la lumverŝado de siaj radioj, kiuj fajrerbrile disrompiĝis sur la laki-

taj trikornoj (1) de la ĝendarmoj kaj sur la metalaj instrumentoj de la koblo.

Subite, sen ke iu povus certigi kiamaniere, aŭ de kio venis la fakto, eksonis izola krio, klako de vangofrapo, tri aŭ kvar tranĉ-krioj pro timo, kaj, ĉe la placangulo kontraŭa al tiu, kie staris la paro da ĝendarmoj, suprenleviĝis bastonoj kaj fariĝis granda kirliĝo de homamaso.

— Kio estas?... —

— Kio okazas?... — terurite demandis kelkaj voĉoj.

— Oni sin interbatas! — respondis aliaj voĉoj ne malpli alarmitaj, dum la konfuzo, kreskanta, rapide vastiĝis al la centro de la placo.

Derompiĝis la sardano-rondoj pli proksimaj, poste la ceteraj; ĉiuj rondoj disfandiĝis, kaj meze de la kompakta nodo, kiu tuj poste formiĝis, ekbrilis nuda klingo de tranĉilo kaj teruriga bruo de pafo traŝiris la aeron.

Leviĝis infera kriegado, speco de unuiĝinta muĝo, regata de hurloj kaj virinaj plorsingultoj, kaj la muzikistoj, — kun vizaĝoj blankaj kiel muro, kun okuloj ŝtonigintaj en la kavoj kaj kun grimacoj mulditaj sur la vizaĝo — eĉ ne havis spiritĉeeston por apartigi de siaj buŝoj la instrumentojn, subite silentiĝintajn.

— *Haltu! Haltu!* — vokis la ĝendarmoj, ĉagrenite malfermante al si pasejon tra la homa interpuŝiĝo; kaj kiam ili alvenis al la centro de la malpaciĝo, trabatinte al si rondamplekson, ili ripetis la ordonon. Neniu turnis al ili atenton. Bulo el interbaraktantaj viroj, dikiĝanta ĉiumomente, surde muĝis, kraĉante insultojn kaj blasfemojn, kaj ĉirkaŭ ĝi, aliaj viroj vane klopodis disigi la baraktantojn, ilin detirante de ĉiuj flankoj, dum la virinoj tranĉ-kriis, ĉirkaŭprenante timigitaj unuj la aliajn.

— *Sed, kio estas tio, brutoj?* — kriis aŭtoritate la kaporalo de la ĝendarm-paro. — *Disiĝu tuj aŭ mi vin...* —

Kaj kompletigante la ideon per la ago, li ŝajnigis intencon ellasi kolbobaton al la centra hombulo. Sed tiam okazis stranga afero. La interluktado bruske ĉesis, kvazaŭ per efiko

(1) Trikorno = Tripinta ĉapelo.

de surprizo, kaj ĉiuj vizaĝoj sin turnis al la ĝendarmoj; fariĝis momenteto de hezito, simila al tiu de la bovo, kiu iras returne por ekataki, kaj abrupte, klara kaj trema voĉo ĵetis kiel raketon, krion de:

— *For!* —

La tuta homamaso ŝajnis reviviĝi.

— *For!* —

— *For!* —

— *For!* — kriegis, sammomente, dudek kvin voĉoj, kun protesta sinteno.

La *kaporalo* rektiĝis laŭ sia tuta longa staturo kaj kuraĝe rigardis ĉiujn.

— *Haltu mi diris, aŭ ĉi-tie okazos fandango!* (1) —

La hombulo, kunmetita el tiuj, kiuj interbaraktadis, malfariĝis per si mem, kiel paniklo (2) disgrajnigata, kaj tiuj, kiuj ĝin formis, animitaj de la teniĝo de la publiko, kontraŭstaris al la ĝendarmoj per provoka aroganteco.

Insulta vorto, poste alia, rekte direktiĝis al tiuj ĉi. La *kaporalo* perdis la paciencon kaj per bruska movo li celdirektis la pafilon, lia kamarado lin imitis, kaj tiam la tuta placo ŝanĝiĝis en kriĥaoson. La publiko, fulmomomente flamiĝinta, inkliniĝis flanken de la ribeluloj kaj pluvo da malbenoj furioze falis sur la ĝendarman paron, izolitan meze de la tumulto. La vino kaj la brando, bruliginte la sangon kaj malliginte la langojn, faris sian "civilizan" verkon inter tiu homa aĉularo. Ĉe la vido de la ŝtormo, azenetoj kaj mulinoj estis haste jungitaj al la ĉarbrakoj, kaj la familioj, la stratvendistoj kaj ĉiuj bonordaj personoj, surŝarĝinte ekipaĵojn kaj ensakiginte postrestaĵojn, forŝutiĝis en vicoj, en fluoj, kiel kabiloj (3), de pesta loko, kaj rapidante kiom ili povis. Vojoj kaj tretvojetoj pleniĝis de brukonfuzo kaj de timigaj komentarioj...

— Ili kontraŭstaris la ĝendarmojn... —

— Oni sufloras, ke estas mortigito... —

— Kaj dek vunditoj... —

---

(1) Fandango = Krom speco de antikva hispana popoldanco el baska deveno, tiu ĉi vorto signifas bat-tumulton.

(2) Paniklo = Maiza spiko.

(3) Kabilo = Tribo da beduenoj (araboj) aŭ berberianoj (el Berberio).

— La *kaporalo* ploris pro rabio... —

— Sed, kio tio estis, finfine? —

Neniu sciis tion tute certe; sed, per detalo de unu, detalo de la alia, oni povis deĉifri la enigmon.

Kamaradoj Ruleto, Maldekstrulo, Kat-Orelo kaj Ĉerizetoj, la kvar plej elstaraj friponoj el la paroĥoj de Liskento, Ridorto, Murono kaj Roktremoloj, ili ĉiuj, portante pli da vaporo ol da prudento en la kapo, kaj memorante pri antikvaj rivalecoj, sin reciproke defiis, kiu el ili plej laŭtakte dancos la sardanojn. Proklaminte sin la ĉampionoj pri sardan-dancado (1) en sia vilaĝo, kaj ĉiu envicigita en sia rondo, kiu lin apogis, ili dancis la unuan sardanon tute sendiscipline. Kiam ĝi finiĝis, venis disputoj, imputoj, malakordiĝo pri la verdikto kaj nova defio por danci duan. Ĉe ties unua kontrapunkto neniu sciis, en kiu punktonombro ili renkontiĝas: unuj dancis dekstren kaj aliaj maldekstren; la plej sobra haltis por fari admonon; la malplej sobra indignis pro tiu halto kaj, levinte la manon, li vangofrapis sian kundancanton; la malmulta sobreco de tiu plej sobra forbloviĝis kiel ventoturniĝo, kiam li sentis sur si la vangofrapon, kaj jen ili tuj malpaciĝis. De post tiu momento la tumulto ruliĝis kiel sur reloj.

Rezulto: ke per penoj kaj klopodoj kaj petinte helpon de la *noktogardistoj* el Murono kaj de ĉiuj aŭtoritatuloj el la najbaraj vilaĝetoj, kiuj troviĝis inter la pilgrimantaro, la ĝendarm-paro sukcesis silentigi kaj aresti la plej elstarajn kverelulojn; tiuj, kiuj ankaŭ sin enmiksis en la disputon kaj faris pli da bruo ol diktis la modereco, sed kiuj ne deziris porti la sekvojn, forŝovinte la korpon, malaperis inter la homamaso, kaj la resto, — ĉirkaŭ cento da homoj, kiuj restis en la placo — ne sciante kion fari, kaj ankoraŭ tute ekzaltitaj kaj plenaj de timskuoj pro la pasinta interbatiĝo, sekvis post la ĝendarmoj kaj arestitoj malsupren de la monto.

---

(1) Sardan-dancado = Por danci sardanon estas necese, endance kalkuli la punktojn aŭ taktojn kiujn ĝi havas, ĉar ĉiu sardano estas takte malsamnombra, kaj tiel povi dividi la muziktiriĝojn, ĉu mallongajn, ĉu longajn, el kiuj ĝi konsistas, tiamaniere ke la finiĝo de la danco koincidu kun la finiĝo de la muziko.

Ĉe la sunsubiro, ne restis alia fremda animo sur la suproj de Sankta Poncio, krom la kompatinda avelvendistino, sidanta en la ermiteja kuirejo, kun la kapo bandaĝita, ĝemanta, kaj la kalvil-aspekta (1) vizaĝeto tute kovrita de larmoj. Ne sciante kiel, ŝi sin trovis meze de la interluktado kaj estis resaltigata de unu al alia kolektiĝo da diabluloj, kiuj ŝin puŝis ĝis la pordeto de la placo kaj rulfaligis malsupren de la ŝtupoj.

Matio ŝin kunprenis post la kolizio, duone frapsvenintan, tute sangomakulitan, kun orelo ŝirita kaj brako elartikigita; kaj malgraŭ tio ŝi, la virino, inter ĝemo kaj plorsingulto, ne ĉesis danki la benitan Sanktan Patronon, tial ke, malgraŭ ŝiaj pli ol okdek jaroj, li permesis al ŝi elrampi el tiu situacio ne rompinte oston.

Apud ŝi Baŭdilieto, malkvieta, avide atendis, ke Mila kaj la paŝtisto finu sursorbigi per vino ŝiajn bluaĵojn kaj kontuzojn; kaj kiam li vidis, ke la paŝtisto iras al la lavoŝtono por lavi siajn manojn, li malforte tiris de li la kamlotan manikon, dum li frotetis la vangon kontraŭ la ŝultro.

— Kion ci volas, etulo? —

— Kaj do la ilumino? —

— Laŭdata estu Dio! Jen kiel ni animstatas por iluminoj, filo de mia koro! — ekkriis Mila, ĉagrenita de la rememoro pri la okazintaĵo. Sed la paŝtisto, viŝinte al si la ledaspektajn fingrojn, afable ridetis al la knabo.

— Kial do ne tio? Mi juĝas, ke la etulo pravas. Hojda, kiom mildigos la animstaton iomete da lumigado, kontraste kun la ŝtormo krevinta dum tiu ĉi posttagmezo. Oni ja ne devas doni la tutan viandon al la lupo! (2) — Kaj ŝajnigante sin animita li komencis manklaki: — Iru, iru sturneto, pretigu la kandelon. —

Kaj tiel longe kiel la ombroj falis kvazaŭ granda aro da korvoj sur la teron, la paŝtisto kaj la knabo daŭre plenigis, per oleo, la aspersajn karapacojn, kiujn la antaŭan tagon ili

---

(1) Kalvilo = Pomo grandeta, ronda, havanta flave-verdan koloron, kun bonodoro kaj gusto tre agrabla.

(2) Doni la tutan viandon al la lupo = Tute afliktiĝi.

fiksis sur la frontispico (1) de la kapelo randornamante, kvazaŭ per girlandoj el minusklaj (2) lampionoj, pordegon, balkonon kaj fenestrarojn. Unu horon poste, en la altestaranta soleco de la dezertaj montoj, kie ŝajnis ankoraŭ agitiĝi kaj sinistre (3) ŝvebi la spirito de perforto, tiu ermitejo, konturiĝanta en la mallumo per la strekoj el iluminaj punktetoj, prezentis la aspekton de sorĉpalaco, de loĝejo de feinoj el ia fantasta (4) rakonto.

(1) Frontispico = Ĉefa fasado de monumento; dekoraciita enirejo.
(2) Minuskla = Tre malgranda.
(3) Sinistra = Malbonsigna.
(4) Fantasta = Fantazia, eksterordinara.

X
RELIKVOJ

FRUMATENE, ellitiĝinte, la paŝtisto rimarkis, ke la pordo de la korto estas jam malriglita kaj eliris eksteren, por ekscii, kiu leviĝis tiel frue. Li rondiris la erikejojn kaj jam baldaŭ malkovris Milan, starantan sur altaĵo, kun la brakoj pendantaj kaj la rigardo abismiĝinta en la profundaĵon, tute en stranga pozo de vundita birdo.

La paŝtisto sin direktis al la altaĵo kaj kiam li estis proksime, rimarkinte ke ŝi lin ne aŭdas, li vokis ŝin:

— Kion vi tie faras tiel frue, ermitino? Vi kvazaŭestas falko!... —

Mila malrapide sin turnis kaj rigardis al la paŝtisto. En

la fundo de ŝiaj okuloj estis ia afliktiĝo, kiel en la tago kiam li montris al ŝi la montojn de sur la sonorilturo mem, kaj ŝia pala vizaĝo, sur kiu estis haltinta la esprimo, ŝajnis tiu de marmorstatuo kun lipoj polikromiaj (1). La paŝtisto restis surprizita. Ŝi montris intencon por malsupreniri de la altaĵo kaj ŝiaj paŝoj estis perturbataj, kvazaŭ ŝi havus la krurojn kovritaj de nevideblaj ligiloj. La paŝtisto rapidis suprengrimpi, kaj ŝin haltigis mezdeklive.

— Ĉu vi ne bonfartas, eble? — malkviete li demandis.

Ŝi kaptis lian malgrasan manon per sia mola mano, kaj per rapida kaj neatendita movo, kvazaŭ falka ungegokapto, ŝi lin ektiris en silento kaj proksimigis al la rando de la altaĵo.

— Rigardu! — ŝi murmuris per raspa voĉo, kiel tiu de persono, kiu apenaŭ leviĝis el la lito. Kaj ŝi signis, per la fingro etendita, unu, du, tri punktojn sur la profundaĵo. La paŝtisto tuj komprenis la kaŭzon de ŝia stato, sed ne kuraĝis ion diri. Ŝi denove havis la rigardon fiksita al la fundo kaj nerve mordis al si la lipon. La paŝtisto faris, kvazaŭ li retiras la manon, sed ŝi ĝin retenis kun pli da forto.

— Ho! Ne estas sole tio! Nur ne tion imagu! — Kaj, ne ellasinte lian manon, ŝi malsuprengrimpis, kiel lavango, ĝis la ŝtonejo. Ŝajnis, ke ŝi havas flugilojn, kaj la paŝtisto, kuntrenata de ŝi, preskaŭ ne povis ŝin sekvi. Ŝi lin kondukis suben de la figarboj, al la fruktejo, al la Akvo-Muĝulo, al la pinaroj... Sur ĉiu nova punkto ŝiaj dentoj pli mordis la lipon, rabie ruĝan, kaj la okuloj pli ekscitiĝis. Ĝis la paŝtisto, metinte la liberan manon sur tiun, kiu premegis la lian, haltigis tiun korpmaŝinon, kiu daŭre ekzaltiĝadis, dirante al ŝi per voĉo kaj animo afliktitaj:

— Sufiĉe, sufiĉe, mia kara! ne plu montru ĝin al mi, ĉi tiun malfeliĉon, ĉar mi ĝin perfekte konis jam pli frue ol vi! —

— Ĉu vi jam vidis tian damaĝon, paŝtisto? — Kaj en ŝia voĉo estis dispremitaj plorsingultoj.

La viro kuntiris la ŝultrojn.

---

(1) Polikromia = Multekolora.

—Kion vi volas fari kontraŭ tio, ermitino?... Mi daŭre meditas de longe, ke en la mondo ne ekzistas tiom da bonaj homoj, kiom estus konvene, kaj ke la diluvo nur efektivigis etan forlavadon... Sed oni ja ne devas ĵeti la kapon kontraŭ la murojn, ĉar per tio ne multe reboniĝus la afero... En granda malfeliĉo Dio helpas, ĉu vi scias?... —

— Ĉion nian ili frakasis! —

— Estas preferinde la kaserolojn ol la ripojn... Demandu pri tio la malfeliĉan avelvendistinon!... —

Li intencis kuraĝige rideti, sed ŝia esprimo tion ne permesis.

— Nenion ili pagis kaj krom tio ĉion disrompis! —

— Kvankam mi ne volas vin riproĉi, tamen, ĉu vi memoras, kion mi diris al vi antaŭhieraŭ? Precipe, ermitino, ne liveru kredite al iu eĉ ajlovoston! Vi estas tro bonkora kaj ne tre atentas pri la agmaniero de la personoj. Al kiu ne venas kun bona mono en la manoj, unu ĝentilan vorton de rifuzo kaj ne pli!... Mi ne permesis al iu eliri el la salono ne paginte... —

— Jen ĉio, kion ni do forsavis el tio!... La aliaj ĉiuj certigis, ke ili pagos je la relivero de la uziloj... —

— Vi estas naiva kiel sudĉinfano, vi, kristanino! En tiaj festotagoj, uzilo, kiun oni ne lupagas anticipe, estas uzilo perdita. Post kiam ili estas sataj de la manĝaĵo, kredite ricevita, ili ensakigas la luitajn uzilojn, se ili kunportas sakon, se ne, ili bastonas la kaserolojn kaj rompas ĉiun en du partojn, ludas celtrafi la vintrinkilon, ĵetas la kuleron en la rubusujon, kaj jen ili tre baldaŭ hastas ĉion finrompi, sen malprofito por la poŝo. —

— Mi supozis, ke pro la interbatiĝado, la homamaso, terurita, malaperis ne memorinte pri io, sed ke, post la okazaĵo, ili revenus, jen unu, jen la alia, kaj ke mi renkontus la uzilojn dismetitaj ĉi-tie; sed kiam mi ekvidis tian disrompitaĵon... — deklaris la virino, humiligita.

La paŝtisto desegnis rideton de kompato.

— Jam tion mi konstatis hieraŭ, ke vi rezonadas tiel, kaj ne volis ion esprimi; sed sufiĉe mi ĝin timis, tiun ĉi tumulton... Mi ripetas: paciencon kaj nenion alian krom pacienco,

ermitino; kaj ĉar vi troviĝas implikita en tio, flankenlasu la ŝuldojn, ĉar poste vi pli bedaŭrus la fakton... Prezentu al vi, ke vi ĉion enspezis de ĉiuj kaj ke rafinita ŝtelisto senmonigis vian monkeston. —

Mila eksentis sufokpremon en la gorĝo...

— Vi efektive ne konas certan aferon... Matio elspezis, por tio hieraŭa, ĉion kion ni havis... —

La paŝtisto levis la kapon, alarmite.

— Kion vi ja diras? —

— En la domo ekzistis nenia provizaĵo, ĉu vi atentas? kaj per ĉio ni provizis... Li certigis, ke ni tiel multe gajnos... kaj la sinjoro Paroĥestro, kaj mem la farmdomanoj de Sankta Poncio, ankaŭ asertis tion. En la daŭro de dekkvin tagoj ni ne ĉesis alportadi, jen manĝaĵojn, jen servicon... ĝis ne restis ĉe ni eĉ kupromonero... Jen vi vidas... —

— Mi tion jam sufiĉe vidis, ermitino, kaj ne scias fakte kiel, sed certe, mi havis de tio najlon en la koro... —

Li silentis momenton kaj poste, kvazaŭ flanke aldonis:

— Kaj do, nun... kion vi pensas fari? —

Mila lin fikse rigardis kontraŭvizaĝe; ŝiaj verdaj okuloj havis misteran trankvilon de profunda gurgo.

— Nun?... Estas nun konsumita la dometo de la onklo, elĉerpitaj ĉiuj ŝparaĵoj, kaj se oni ne venos pagi al ni la hieraŭajn ŝuldojn, ni restos, en tiu ĉi malbenita ermitejo, pli malriĉaj kaj senigitaj je ĉio ol Adamo kaj Eva. —

Kaj sentinte sian koron flamiĝi pro io sovaĝa, ŝi surde aldonis:

— Jen estas la relikvoj, kiujn al ni lasis Sankta Poncio! —

La retenata energio kun kiu ŝi parolis, ŝanĝis ŝiajn vizaĝotrajtojn, kiuj malmoliĝis kaj ŝajnigis ŝin pli maljuna.

La paŝtisto, ŝin subrigardante, pensis en si:

— Tiu ĉi kompatinda virino havas preman ĉagreniĝon... Se ŝi ne elversos la koleron, tiom pli malbone... —

Kaj li rigardis ŝiajn okulojn, sed ili estis sekaj kiel tindro.

Ĉien ili rondiris, tien kaj reen, rapidmove, kaj ili renkontis la tutan monton kiel batalkampon. Ĉe ĉiu paŝo aperis rompita argilaĵo kaj senfunelaj vintrinkiloj, kaj iel malofte, ia sendifekta uzilo — terpoteto, forko, telero — kiujn ŝi daŭ-

re kolektis kolermiene kaj dentoklakante, kvazaŭ nur tiuj forgesitaj postlasitaĵoj estus ekscitiloj de ŝia ĉagreno. Tie en angulo, sur la herbaĵo, kiu tapiŝis la grundon, ili ekvidis poŝtukon tute ĉifitan kaj kun nodo ĉe unu pinto; en tiu nodo, kiun la paŝtisto klopodis por malligi, ekzistis duonpeseta monero kaj alia, dekcentima.

— Rigardu ĉi-tien, ermitino... Jen la monpoŝo de iu servistino kies enhavon ŝi ŝteletadis kiel aĉetakcizon... —

Kaj la paŝtisto, tuŝita de bonvolo, intencis komuniki duonridon al la virino; sed ŝia vizaĝo, tute koncentriĝinta, ne sereniĝis.

Paŝante, ili ankoraŭ renkontis kanaban ŝuon, novan foirkruĉeton, markitan buŝtukon pendantan el trans rubusujoj, fermitan tranĉilon: tuton da bagatelaĵoj perditaj aŭ forgesitaj meze de la tumulto da ŝmiritaj paperŝiraĵoj, da oranĝoŝeloj, da premplatigitaj rozoj, da kotletoj ĝisoste senviandigitaj, da kokskeletoj nigrumitaj de formikoj, da cirkloj el malvarmaj cindroj... da ĉiuj naŭzaj postrestaĵoj de la pilgrimado.

Kiam ili alvenis al la domo, ili renkontis Mation, kiu ĵus leviĝis, ankoraŭ tute regata de oscedoj kaj brakelstreĉiĝoj; kun la vizaĝo ŝvelinta, la okuloj kiel truoj, kaj sen deziroj interparoli. Tuj kiam li ilin vidis apudiĝi al la kuirejo, li lasis sin fali sur la benkon, kun sinteno de malbonhumora infano, kaj grumblis frotante al si la okulojn:

— Nu! De kie vi venas? Ĉu ni ankoraŭ ne devas matenmanĝi? —

Mila estis mirigita de tia akcepto; poste, tute subite, ŝi sentis, ke la sango suprengrimpas al ŝia kapo kiel pistolpafo. Ŝiaj lipoj tremis, ŝiaj okuloj brilegis kiel ĉe la katoj, ŝia frunto kovriĝis per ruĝaj makuloj... Ŝi proksimiĝis al sia edzo per rapida movo de besto, kiu ekatakas.

— Matenmanĝi, he?... Maten... manĝi?!... Iru... iru eksteren... tie vi ĝin trovos... la matenmanĝon... —

Ŝi ne povis paroli plu; la vortoj elfluis el ŝi, kiel globetoj de rozario: unu post unu, kaj interĉenitaj per paŭzetoj kaj konvulsiaj spiroj.

Ŝi havis unu el siaj klaraj atakoj de eksploda kolero, kaj neniam la paŝtisto ŝin estis vidinta tiel skuita.

Matio, sentorporiĝinte kvazaŭ mirakle, ŝin rigardadis kun preteco fuĝi, per okuloj tute malfermitaj kaj ne komprenante, kion tio koncernas.

La paŝtisto tion eksplikis al li kun plirapidigo tute embarasa, por doni al la virino oportunecon rekonsciiĝi.

Ĉion eksciinte, Matio estis konsternita. Kun la kubutoj sur la tablo, la pupiloj gapaj, vagantaj laŭ la junto de la lignaĵo, li pasigis kvin minutojn komplete perpleksa. Poste li komencis implikiĝi en labirinton da superfluaj demandoj, da naivaj supozoj, da minacoj malplenaj de intenco...

Mila fine lin rigardadis kun la malŝatanta kompato, kiun ŝi kutimis senti al li, kiam ŝi lin vidis tiel nekapablan, kaj neatentinte, supre de lia klinita kapo, la okuloj de la virino serĉis tiujn de la paŝtisto kiel rifuĝejon. Ŝi ilin trovis fiksitaj al ŝi... Tiuj okuloj, ĉiam plenaj de fortikeco, de antaŭvido, de sereneco, ŝin inundis per larĝa rigardo varma, sindona, senfina...

Mila sentis trapafon en la brusto kaj ke la tero mankas post ŝi; ĉio al ŝi fariĝis malluma, kiel ĉe preterpaso de fulmo...

En tiu tempopunkto la voĉo de Baŭdilieto vokis ĉe la pordo:

— La fraŭlo venas! La fraŭlo venas!... —

Efektive, Arnaŭ de Sankta Poncio, kun la vipo pendanta sur la kolo, la pantalono faldita super la maleoloj kaj la pajloĉapelo ombranta lian brunan vizaĝon, tuj enpaŝis en la kuirejon. Kun li ŝajnis penetri potenca blovo de juneco.

La paŝtisto kaj Matio antaŭenpaŝis por lin afable akcepti, dum Mila, fremda al ĉio, restis apudiĝinta al la muro, kvazaŭ ŝi lin ne konus.

Arnaŭ venis kun la ĉaro por kunpreni ĉion apartenantan al la gastejo el Murono kaj ĝin reliveri tie.

Ili matenmanĝis kune, kaj en la daŭro de la matenmanĝo oni ne parolis pri alia afero ol pri la okazaĵo dum la antaŭa tago; pri la interbatiĝoj, pri la disrompado de objektoj, pri la trompoŝtelo farita al la geermitoj... Ĝis kiam Arnaŭ eldiris:

— Ankaŭ ni suferis iagrade de tio... Al mia patrino oni forŝtelis tiom da kunikloj, kiom ŝi havis... —

— Kion vi ja diras! Al via patrino? —

— Kaj ankaŭ al la malsupra farmodomo... Ŝajnas, ke ni havas lertan kuniklorabiston sur la monto, la perversulo!... —

En tiuj vortoj de Arnaŭ ĉiuj legis konkretan nomon, kaj perceptis, ke tiu nomo mem venis sammomente al ĉiuj en la menson. Tiu nomo vekis en Mila timon, kaj kiam post la matenmanĝo la viroj finŝarĝis la ĉaron per la ĉarpentaĵo kaj servico, ŝi sin direktis al la korto. Ellitiĝinte, kun la ideo vagi tra la montaro, ŝi estis enportinta domen jupoplenon da herbomanĝaĵo, kaj ĝin ĵetinta en angulon nenion atentinte; nun tiu manĝaĵo restis tie preskaŭ ne tuŝita. Nur du gravedaj kuniklinoj, rondaj kiel buloj, rektigis meze de la vepraĵo siajn longajn orelojn cindrokolorajn. Ĉion ŝi traserĉis, ĉion reviziis: la ceteraj kunikloj restis malaperintaj. Ŝi amare ridetis. Nun kiam la animagitiĝoj, kaŭzitaj al ŝi de la matena surprizo, estis dispelitaj, jam restis al ŝi nur la malvarma afliktiteco, kun kiu ŝi ĉiam vidis la kontraŭaĵojn fali super ŝian vivon.

Kiam la viroj estis finintaj sian taskon, kaj la paŝtisto foriris laŭ sia bontrovo kaj Matio iris iomete sin revesti por direktiĝi al Murono pagi kalkulojn, Mila vokis Arnaŭ-on kaj al li montris la priŝtelon faritan al la korto.

Arnaŭ skuis la kapon kun signifa gesto.

— Vi povis jam tion suspekti, fakte! Kiuj, se ne la viaj, estis pli proksimaj al la manatingo, virino! — Li ridetis ĉe tio. — Sed, ĉu vi vetus, ke ankaŭ ili forkuris? —

Kaj kvazaŭ Mila ne lin komprenus, li esploris de unu flanko al la alia, ĝis li trovis tuj apud la muro, malantaŭ roka krusto, skrapaĵon ĉirkaŭ truo.

— Rigardu ĉi-tien!... Ĉu mi tion ne asertis? — Kaj ŝovinte la tenilon de la vipo en la kavon, li gratserĉis.

— Efektive, jes, ĝi komunikas eksteren... tute kiel ĉe mi. Tiamaniere neniu povas diri, ke oni ilin ŝtelis... Jen kiel sagaca li estas, tiu ĉi monavidulo! —

— Jen do, el kie li eltiris tiom da kunikloj... — ekkriis Mila — Mi ne povis kredi, ke li ilin ĉasis... Sed kian profiton

li tiris, farinte la truojn, se aliflanke ĉiuj suspektos la saman individuon? —

— Sed kio gravas al li, ermitino? Sufiĉe li ja estas hardita al sia reputacio, ĉiam kondiĉe, ke oni ne povu lin kapti freŝfare... ĉu vi scias? —

Kaj la lipoj de Arnaŭ tiriĝis per malestima grimaco. Mila turnis tiam la atenton al tiuj lipoj: ili estas pulpaj kaj ruĝaj kaj havas oni ne scias kian strangan aspekton de bongusta frukto. La neta emajlo de la dentoj kaj la bruna streko de la naskiĝanta liphararo ilin vive reliefigas, ilin aliformigante en la regantan noton de la vizaĝotrajtoj.

Pro bruska salto de la ideoj Mila improvize demandis, eĉ ne atentinte pri tio:

— Kaj do, kiam vi edziĝos, Arnaŭ? —

Arnaŭ ricevis kvazaŭ ektimfrapon; li turnis subrigardon al la virino, mallevis la kapon kaj restis serioza.

— Jam mi ne edziĝos... — li duonvoĉe silabis.

— Kio, ke vi ne edziĝos? — ekkriis ŝi ridante.

— Mi certigas vin, ke mi jam ne edziĝos... — ripetis Arnaŭ, ne levinte la kapon kaj ludante per la vosto de la vipo.

—Mi konjektas, ke tio ne temas ĝuste por jam nun, sed... —

— Nek por jam nun nek por iam — li insistis kun preteco.

Mila restis mirigita.

— Sed nu! Vi estas efektive ŝercema, hodiaŭ... Se eĉ mi vin vidis en la pilgrimfesto kun la unuenaskitino! —

—Tamen vi ne plu vidos min kun ŝi... —

— Ĉiela reĝino! Sed do kial? —

Arnaŭ hezitis, ruĝiĝis, kaj malrapide murmuris:

— Tial ke hieraŭ mi reprenis de ŝi la parolon donitan... —

Mila lin rigardis per okuloj larĝe malfermitaj.

— Kion vi ja diras? —

Kaj vidinte lin tute apatia kaj kun mallevita kapo, ŝi dolĉe aldonis:

— Kaj pro kio, Arnaŭ?... —

Arnaŭ montriĝis embarasita; li malvolvis la rulon, kiun li faris ĉirkaŭ unu sia fingro per la ŝnuro de la vipo, ĝin ree volvis, kaj apenaŭ li esprimis, kuntiriĝante je la ŝultroj:

— Ptse!... Aferoj kiuj okazas... —

Mila lin rigardis de supre malsupren per demanda rigardo.

Plantita antaŭ ŝi meze de la sentegmentejo, alta, rekta, fortika, li tute elspiris fortecon kaj sanon; kvankam li ne estis ĝustadire bela, li havis la logan altiron de la virpotenco. Ne sciante eltrovi en li ion riproĉindan kaj memorante kiel kontentaj sin sentis tiuj de Sankta Poncio pri la geedziĝo, la virino sin demandis: — Sed kial oni tie forrifuzis tiun ĉi kompatindan fraŭlon? — Kaj al ĉi tiu muta demando sekvis la nerekta respondo per laŭta voĉo:

— Jen vidu, mi ja ne scias formi al mi ideon pri tio, kion vi rakontas... Mi fidis tion, ke ĝi estas afero formaligita kaj ke ni povos gustumi baldaŭ geedziĝofestajn sukerbuletojn... (1)—

— Efektive... sed la intencoj ŝanĝiĝas, ĉu vi scias?... kaj nun oni interesiĝas pri unu afero... poste pri alia... —

Arnaŭ formetis de sia kolo la vipon kaj komencis per la tenilo fari kavetojn surgrunde.

—Oni diris, ke ŝi tiel amas vin! —

— Ŝi sendube! —

— Kaj ke ankaŭ vi estis fervore enamiĝinta al ŝi... —

La junulo mallevis ankoraŭ pli la kapon kaj pintogratis kun nova vigleco la grundon.

— Antaŭe... mi ne neas... — li fine esprimis.

Mila ne sciis, kie ŝi staras, pro surprizo.

— Ĉu do vere ŝi ne plu plaĉas al vi?... Laŭdata estu Dio! Kian malagrablaĵon ŝi sendube al vi faris! —

Arnaŭ vigle levis la kapon kaj decidite respondis:

— Nenian malagrablaĵon ŝi faris al mi; nenion mi havas por riproĉi al ŝi! La kulpo estas mia... —

Antaŭ la sinteno de la junulo kaj lia rezisto por paroli, Mila sentis sin intrigata kaj demandema.

— Sed nu! Kiu vin komprenu, tiu vin prenu, mia kara! Nenion vi povas riproĉi al ŝi, la kulpo estas via kaj tamen vi ŝin forlasas? —

Kaj Mila malice ridetis.

Arnaŭ sendis al ŝi alian rapidan subrigardon, poste levis

(1) Sukerbuleto = En vilaĝoj, post geedziĝofesto, la geedziĝintoj kutime disdonas sukerbuletojn.

la brakon kaj krakigis la vipon en la aero; ambaŭ gravedaj kuniklinoj trakuris la korton kiel spirblovo, timigitaj.

Vidinte, ke la junulo ne montras inklinon por respondi, Mila, kvazaŭ ŝi havus tiklojn ĉe la lango, insistis, ŝajnigante sin naivulino:

— Jen kiel plaĉus al mi scii, kion vi, viroj, fantazias!... —

Arnaŭ levis la kapon kaj ŝajnis, ke li subite decidiĝas por paroli.

— Ĉu vi tion volas scii? Do mi ŝin forlasis, ĉar oni ne

povas havi aminklinon al du personoj samtempe, kaj estas ofendo trompi la personojn. —

Mila restis mirigita.

— Ha!... ĉu estas certe, ke...? —

— Ĉu vi konas tiun kanzonon? "Ŝi al mi donata min ne allogas, — ŝi de mi amata..." (1) — Li interrompiĝis, kaj rigardante kun kuraĝa impeto la okulojn de la virino, li aldonis per tute alia tono: — Ha, se tiu, kiun oni amas, reciprokus al onia sento!... —

Mila perceptis novan trapikan impreson, parte doloran parte teruran, sed sensurprizan. Kaj ŝi rimarkis samtempe ke, tion ne pripensinte, *ŝi jam scias*, ke *ankaŭ* tiu junulo ŝin amas, ke ŝi regas jam longe en li, ke ŝi divenis la sekretan motivon de liaj oftaj suprenvenoj al la ermitejo, la kaŝitan sencon de liaj rigardoj saturitaj de admiro. Vualo de prudento, de pudora timo, celis ĝis tiu momento moderigi tiujn rigardojn; sed ŝi, konfuziĝinta meze de la konsternaj tiumatenaj agitiĝoj, en unu instinkte danĝera senfortiĝo, ĵus traŝiris la kaŝantan vualon, kaj nun la rigardoj ŝin rekte atakas, ŝin vundas kun tuta evidenteco, pretendante de ŝi kategorian respondon interŝanĝe de la postulita rivelo.

Arnaŭ, staranta meze de la korto, vindita de sunlumo kaj fortika kiel juna glanarbo, troviĝis je du paŝoj de ŝi. Mila tion konsideris kaj eksentis timon: timon de tiuj okuloj penetrantaj pro la impeto mem de la amdeziro, timon de tiuj brulantaj kaj provokaj lipoj, kiel naskejo de voluptoj, timon de tiu brava homtrunko plena de virseksaj ardaĵoj, timon de tiu vertiĝodona ondo de pasia vivo, kiu ŝin plene atakas en ŝia sensuka soleco de forgesita virino...

Mila timis malsaĝaĵon de la destino, kaj instinkte iris returne unu paŝon.

Arnaŭ, kiu, avide, ne deturnis de ŝi la okulojn, vidis ŝin heziti, ruĝiĝi, poste intense paliĝi, kaj, treme, antaŭeniris siavice la paŝon, kiun ŝi estis postenirinta.

Ambaŭ restis malkaŝe mezurante unu la alian per la rigardo, kiel du soldatoj de malamikaj armeoj, en kies interno

(1) Fino de la popola distiko: "...rifuzas min".

la sango parolas, forgesigante al ili konvenciajn diferencojn kaj inspirante la humanan impulson sin reciproke ĉirkaŭpreni. Sed tio daŭris nur momenton; abrupte, io intermetiĝis inter ambaŭ. Izolaj okuloj, sen vizaĝo, kiu ilin enkadrigus, magiaj okuloj, kiuj ne similis tiujn de Arnaŭ, envolvis per larĝa rigardo varma, sindona, senfina, la paliĝintan virinon. Kaj tiuj okuloj, kvazaŭ ili fermus en sia fundo forton pli serenan, pli regantan, pli potencan ol la vivinstinkto mem, refluigis kaj malproksimigis sammomente la turbulentan avid-ondon. La virino riproĉis sin mem.

Ŝi pasigis unu manon sur la frunto kaj etendis la alian al Arnaŭ kun trankviliga gesto.

— Arnaŭ... ne estu infano! Se la unuenaskitino amas vin kaj vi deziras bonan konsilon, edziĝu kun ŝi, Arnaŭ... La bonŝanco pasas nur unu fojon en la vivo. —

La fraŭlo, atendanta, divenis laŭ la skuita akcento de tiuj afablaj vortoj admonon, nerevokeblan ordonon. Li akceptis firmpiede la rifuzan hakbaton kaj poste mallevis la kapon, vundite, submetite, sen protesto. Sed en lia bruna vizaĝo tiel klare aperis la skuo de la doloro, ke Mila pro tio sentis sian koron premegata.

— Arnaŭ — ŝi mallaŭte voĉis por lin konsoli, — same valoras proverbo ol kanzono, kaj vi verŝajne jam konas tiun, kiu tekstas: "Pli valoras havi ol poste bedaŭri..." —

La malfeliĉa fraŭlo faris senesperan geston per la mano, kaj pendiginte al si la vipon sur la kolo, li eliris el la korto ŝin ne rigardinte.

Mila, tute senmova, vidante lin foriri, komprenis, kun neeksplikebla maltrankvilo, ke ŝi ĵus mortigis ion en tiu naivulo kaj en si mem.



XI

SURMONTA MALSANO

La somero estus pasinta langvore aŭ kruele por Mila, se ne venus ŝin iom distri la homgrupoj, kiuj, en ĝia tuta daŭro, ofte supreniris al la ermitejo.

Foje, tio estis karavanoj da urbaj ĉasistoj kun grandaj novaj ĉapeloj, poluritaj ĉasilaroj, vestoj provizitaj per grandaj kaj malgrandaj poŝoj kaj la korpoj ĉirkaŭplektitaj per rimenoj kaj bagateloj. Ilin sekvis bandoj da purrasaj hundoj, difektumataj de la senageco, kun la hararo brila kiel speguleto kaj la grasaĵo skuiĝanta ĉe ĉiu ĉaskurado. Unuj kaj aliaj, homoj kaj bestoj, trakuris la monton, kiel frenezuloj, ĉie tondrante per ridoj kaj bojoj, konfuzante la ĉaspraktikulojn kaj

kuraĝe plenigante la spacon per senmotivaj pafoj. Estis kvazaŭ miraklo, ke tiuj ŝablonaj ĉasistoj portus sur si ĉasaĵon pendantan de la komplika kaj luksa felpoŝego, sed interŝanĝe ili kutimis porti vulturan malsategon, kaj apenaŭ ili enpaŝis, kiel tempesto en la domon, ne ekzistis tie sufiĉe da ovoj por friti al ili omletojn nek sufiĉe da tempo por mortigi kokojn kaj ilin rapide kuiri. Kaj dum ĉiu el ili manĝadis kiel kvar, Mila vidis, ke ili freneze sin amuzas, farante infanŝercaĵojn, ŝtelrigarde admirante siajn belan veston kaj militeman sintenon, kaj rakontante hiperbolajn heroaĵojn kun aplombo kaj amplekso tute cyraneca (1). La virinon ankaŭ ŝiamaniere amuzis tiuj petolaj gajmanifestiĝoj, kvazaŭ de buboj elŝteliĝintaj el la lernejo, kaj ŝi komparis, en sia menso, tiujn elegantajn ĉasistojn kun tiuj de la distrikto, ĉiuj maldelikataj kaj ĉifonaj, kun unu kanalo de la pantalono sur la maleolo kaj la alia suprenfaldita, kun kanabošuoj krevintaj kaj kartoĉujo ligita per ŝnuro, sed kun ĉassaketo tute inkrustita per koaguliĝinta sango kaj pafiltuboj breĉetitaj ĉe la ekstremo kiel punto, per la forto kraĉi vundantan kugletaron.

Alifoje, la karavanoj estis pli pacamaj, el pli mormoderaj personoj, el piaj familioj kiuj, kun sia koncerna pastro, pilgrimis tien por oferi meson al Sankta Poncio, kiel plenumon de voto farita dum embarasa situacio. Tiuj karavanoj, tuj post ĉeesto en la meso, ankaŭ ridis kaj petolis, sed per alispeca petolmaniero, pli trankvila kaj gaja ol tiu de la unuaj.

Eĉ ankaŭ karavanoj malgajaj kaj malĝojigaj, tien supreniris, kvankam malofte, al la bonodoraj suproj de la Meza Ŝtonego. Mila klare havis en la memoro unu, kiun ŝi vidis elaperi ĉe la faŭko de la montokolo ĉirkaŭ la lastaj tagoj de aŭgusto. Antaŭe marŝis maljunulo, bele vestita kaj kun blanka lipharo tondita per la pinto de tondilo; post li sekvis proksimume duona dekduo da personoj ĉirkaŭ ĉevalo, sur kiu rajdis, laŭ maniero de virino, speco de abomena spektro: adoleskulo (2) flava kiel kruda vakso, kun la kolo rigida kaj la buŝo decentrita de la cikatro de malnova absceso. Tenante la

(1) Cyraneca = Rilatanta Cyranon de Bergerac, la franca literaturisto, kun famo de batalemulo kaj alnomo de demono de la kuraĝuloj.

(2) Adoleskulo = Juna viro estanta inter infana kaj seksmatura aĝoj.

manon de la juna viro ĉiam, kiam la akcidentoj de la vojo tion permesis, piede marŝadis, tuj apud la ĉevalo, belega kaj ankoraŭ freŝaspekta sinjorino, sed kun okuloj senbrilaj, kiel tiuj de maljunulino, kaj malvigligitaj de laca esprimo.

Kiam Mila eliris renkonte al ili por ilin akcepti je ducent paŝoj antaŭ la kapelo, la sekvantaro haltis, kaj la sinjorino kun malviglaj okuloj rakontis al la ermitino la motivon de sia supreniro al la monto. Ĝi temis pri kompatinda skrofolulo kiu, laca de kuracistoj kaj pocioj (1) kaj ne plu fidante al la homaj kuraciloj, konfidis ankoraŭ malprecize al la rimedo de la sanktuloj: al la miraklo. Li volis sin bani en la akvoj de la Akvo-Muĝulo, en la famaj kurac-akvoj pri kiuj multaj voĉoj certigis lin, kun verema akcento, ke ili forlavos liajn malbonajn humorojn, ke ili purigos lian infektitan sangon.

(1) Pocio = Nomo por esprimi malestime farmaciaĵon aŭ kosmetikon.

Kaj dum li ripozis, tremante somermeze pro malvarmo, de la laciĝoj de la vojaĝo, Mila, sola kun la servantaro, eksciis, ke la sinjorino estas urba riĉegulino, vidvino kaj sen alia parencaro en la mondo ol tiu deformiĝinta filo, ol tiu homa mizeraĵo, kiu malkomponiĝadis en haladzon jam preskaŭ de sia naskiĝotago mem. Kun ŝi li rondiris de unu loko al alia, petegante al ĉio kaj al ĉiuj, kvankam ne la absolutan saniĝon, almenaŭ iom pli da bonfarto, atendan intervalon antaŭ la morto, kiu al li permesus plilongigi, per tiu dolora fikcio de vivo, la tragikan vastecon de lia torturo kaj de lia sinofero.

Kaj kiam, pli poste, ŝi helpis doni la banon al la malsanulo, kiam ŝi povis kompreni, en ĝia vera amplekso, la mizeron de tiu kompatinda rakita korpo — plena de tuberoj kaj de ulceroj, kuntirita kaj rigida je la membroj, montranta al la fremdaj rigardoj sian tutan naŭzan nudecon kun la nepudora indiferenteco de la homa estaĵo sekse steriligita de la malsano — la virino hororis kaj por la unua fojo suspektis, ke la patrineco, tiu revita fonto de neelĉerpebla feliĉo kaj de konsolo en ĉia aflikto, povas esti iafoje io terura, speco de anticipa puno kontraŭ la plej timiga delikto, kiun oni farus super aliaj vivoj.

Krom tiuj vicoj da pasvizitantoj kiuj, gajaj aŭ melankoliaj, ĉiam al ŝi portis distron kaj profiton, Mila restadis sola, kaj pasigis la matenojn laborante en la domo kaj la posttagmezojn aranĝante la fruktejon aŭ flikante ĉe iu freŝa ombroloko. Baŭdilieto kaj la paŝtisto, vagadis tra la montaro kun la grego kaj Matio, faris monkolektojn en la vilaĝoj de la ebeno, hodiaŭ en tiu ĉi, morgaŭ en tiu alia.

La festo de Sankta Poncio estis la absoluta bankroto por la paro. Al la mizera perdo de ĉiuj iliaj havaĵoj, kvazaŭ tio ne estus sufiĉe, venis kuniĝi senfino da ŝuldoj, iom post iom konfesataj de Matio: ŝuldoj al la gastejo en Murono por la luprenitaj uziloj, ŝuldoj ĉe drinkejoj kaj revendejoj por trinkaĵoj kaj nutraĵoj, kiujn li ne pagis en la momento de la aĉeto, ŝuldoj al la sinjoro Paroĥestro por la laŭdo-kantfolioj kaj sanktulbildoj menditaj en Girona (1). Tuta fugo da ŝul-

(1) Elparolu: Jirona. (kataluna provinca ĉefurbo).

doj: ŝuldoj malgrandaj, el malmulta monsumo, sed multenombraj kaj pikantaj kiel kulosvarmoj, kiuj, sin manifestinte, lasis Milan inerta de timego kaj kiuj poste aliformiĝis en incitilon kaj motivon de konstanta angoro. Ŝi ne sonĝis pri io alia ol pri tiuj ŝuldoj kaj pri la maniero ilin pagi, kaj pro ili, jen ŝi cedis kaj suferis la honton, ne nur vidi Mation almozpetantan kun la urnokapeleto surŝultre, sed mem konsenti helpi sin por celoj ne koncernantaj la servadon de la Sanktulo, per la produkto de tiuj monkolektoj.

— Alian tagon, kiam bonŝanco favoros nin, kiam jam senŝuldigita, mi povos fari ŝparojn, ĉion mi redonos, ĉion, ĝis la lasta centimo al la kapelo... — ŝi ĉiutage diradis al si, kvazaŭ por malŝarĝi sian konsciencon; sed ŝia vizaĝo dispremiĝis pro honto, kiam ŝia edzo, reveninte de siaj rondiradoj, montris al ŝi la monprodukton, kaj prikalkulis, kion ili povos fari el la kolektita mono. Ŝi estus dezirinta ŝtopi al li la buŝon, sentigi al li la malgloron de tio, kion li efektivigis, eviti, spite ĉion, ke la paŝtisto sciiĝu pri tiu malgloro kaj ilin malfavore juĝu pro ĝi. Sed Matio ne komprenis tion kaj la paŝtisto aŭskultis kaj prijuĝis. Lia prijuĝo estis muta, estis prijuĝo, pri kiu ŝi estis certa, ke ĝi neniam evidentiĝos, nek per vorto nek per ago, kvazaŭ ĝin farus statuo, tamen pro tio ne malpli severa, ne malpli senkompata. Kaj ŝi, kiu, ne klare atentinte, estus dezirinta elstariĝi kaj sin aŭreoli per lumbriloj, kiel sanktulinon, antaŭ la okuloj de tiu viro, furioze kaj konfuze konstatis, ke tiu prijuĝo ŝin malnobligas, ŝin degradas, ŝin kondukas al pli malalta nivelo ol al tiu de la profesiaj ĉefvojaj rabistoj, ĉar la ĉefvojaj rabistoj, kompromitas sian vivon nur por prirabi la homojn, dum ili, sen ia danĝero kaj en la ĝuo de konfido pro posteno, prirabas la sanktulojn mem.

Sed ne venis al ŝi la esperita bonŝanco nek la momento forpeli de ŝia interno la memriproĉan mordon, kontraŭe, la bonŝanco ĉiutage pli malproksimiĝis de ŝi, kaj la memriproĉo ŝin rekaptis en pli grandan malliberon. Pro la estingiĝo de la somero, daŭre maloftiĝis la karavanoj da vizitantoj kaj kun ili la plej bona plimulto el la profitoj de la ermitejo. Dum septembro, kiam la suno ankoraŭ brulvundas en la profundaĵoj, ĉe la mezo mem de la tago, sed la ombroj komen-

cas esti trabatataj de kanalfluaj ventoj trenantaj malbonajn rezultojn, jam nur supreniris al la ermitejo unuopaj personoj, kiuj faris higienan promenadeton ekde la najbaraj vilaĝoj: iu laca ĉasisto, kiu petis kvar gutojn da brando kun akvo, aŭ iu burĝa paro, la virino portante en unu mano dankoferan vakskandelon, kaj korbeton kun la posttagmeza manĝaĵeto en la alia.

El tiuj ĉi, la duaj pagis la trinkaĵon, kaj la aliaj, atinginte, ke ŝi ĉion atente elmontru al ili kaj enuiginte ŝin per tedaj demandoj, ĵetis kvincentiman moneron en la almozkesteton, donis alian dekcentiman al la ermitino, kiel pagon por la tempodaŭro dum kiu ili ŝin embarasis, kaj reiris malsupren, tute kontentigitaj de sia abunda malavareco.

Finfine ankaŭ ĉi tiuj mankis, kaj kun timega frostotremo Mila konstatis, ke la vintro longpaŝe venas super la senfruktan montaron kaj ke ĝi minacas per siaj rigoroj la malriĉan ermitejon, kun la proviantejo malplena, la breto sen panoj kaj la plej nigra senkonsolo en la neperfekta kunvivado de tiuj, kiuj en ĝi loĝas.

Tiam la mildeco de la karaktero de tiu virino taŭziĝis de kapricoj kaj acidaĵoj, kaj la nigreco de ŝiaj pensoj rulfalis, kiel konstanta kaj ĝena pluveto, sur Mation, la viro pli trankvila kaj nepriokupiĝema laŭ temperamento, surŝprucigante lian humoron kaj fine perdigante al li la trankvilon. Ĉiam ŝi lin postsekvis, lin admonante, riproĉante, malkaŝe forpuŝante lin eksterdomen, al serĉado kaj persekuto de la malbenita centimo: kaj li, samtempe deprimita kaj ekscitita de la venena martelado, cedis, daŭre cedis, ĝis li ŝin obeis preskaŭ blinde. Ne kuraĝinte maldiligenti por forlasi la littukojn (1), li frue leviĝis kaj kun la urnokapeleto surŝultre, li entreprenis la longajn rondiradojn ĝis la ebeno. Post malmultaj tagoj oni povis ekkoni sur li la rezultojn de la neordinara piedirado: li rapide perdis tiun superfluan karnon de pigra kaj bone nutrita persono, tiel similan al tiu de besteto en stato de grasigo; la krispa nuko perdis sian grasaĵofaldon, sur la ŝultroj remburitaj de sebo aperis la strukturo de la muskoloj, for-

(1) Forlasi la littukojn = Ellitiĝi.

viŝiĝis la grasaĵokavetoj, kiuj ŝajnigis liajn manojn abatinaj manoj, kaj la zono de la pantalono jam ne lasis al li ian ruĝan sulketon ĉirkaŭ la korpo. Eĉ la sintenon li ŝanĝis: liaj movoj perdis la maldiligentan lantecon, kiu estis al ili kutima, kaj en lia vizaĝo aperis vigla esprimo, simila al tiu de la ceteraj viroj.

Mila estus dankinta Dion pro tiuj pliboniĝoj, se ilin akompanus aliaj, pli pozitivaj, sed jen tute male, ju pli kreskis la fervoro kaj la obeo de Matio, des pli malĝoja estis la rekompenco.

— Dio punas nin pro la peko, kiun ni faras — feroce (1) al si diris la virino ĉe ĉiu nova elreviĝo; sed la pika rememoro pri la ŝuldoj kaj la premanta bezono ilin pagi, devigis ŝin fermi la okulojn antaŭ ĉio kaj inciti Mation per persistaj instigoj.

Ĝis kiam, ĉe vesperiĝo, la paŝtisto, vidinte Mation eniri en tiel malfrua horo, ripoze lin admonis tiel:

— Ermito, ermito! Ne faru ja tiajn ekstravagancojn, se vi volas sekvi mian konsilon... La montaro havas multe da kaŝejoj, kaj la mono fetoras de malproksime... Eĉ se vi kunportus malmulton da ĝi, ne estas ja konvene, ke oni alkutimiĝu vidi vin je tiaj horoj... —

Matio diris, ke li ne timas kaj ke se li deziras kolekti iom da mono, li devas ĉiutage iri pli malproksimen.

Mila opiniis, ke, efektive, la paŝtisto estas tro timema, tamen de post tiu momento ŝi ĉesis tiel persiste inciti Mation.

En unu el la sekvintaj almoz-eliroj, noktiĝe, tiu ĉi ne suprenvenis al la ermitejo, kaj la morgaŭon li rakontis, ke la antaŭan tagon li tro multe distanciĝis kaj la Spektro devis akcepti lin ĉe si.

Tion aŭdinte, la paŝtisto fiksis al li la pupilojn, kaj poste, dum Matio iris delasi la urnokapeleton en la salono, li murmuris tute malkonfide, sin turninte al Mila:

— Mi opinias, ke antaŭ kelkaj tagoj mi uzis maltrafan momenton por diri tion al la ermito... Plejeble la medikamento estos pli malbona ol la malsano. —

---

(1) Feroce = Kruelege, furioze.

— Kial, paŝtisto? — demandis la virino, mirigite.

— Kion oni diru! Havas tiom da malbona veneno tiu bastarda vipuro, la Spektro! —

Mila iel ridetis pro tia timo: ŝi estis kutiminta al la sekreta abomeno, kiun la Spektro kaj la paŝtisto sentis al si reciproke, sed ŝi ne komprenis, kial viro serena kaj prudenta kiel ĉi tiu, okupiĝas pri la sovaĝa besteto kia estas la alia.

Matio revenis, kaj la virino, ne povante tion laŭtvoĉe esprimi, pensis:

— Plej bonŝance li devas esti nur ŝtelisto de kunikloj, sed de tio al la fakto kaŭzi malbonon al tiuj, kiuj vizitas lin... Li tro timas la juĝistaron! —

Kaj nek en tiu tago nek en ĉiuj aliaj el tiu tagdekkvino, dum kies daŭro Matio loĝis for de la domo, ŝi kuraĝis lin riproĉi pro tio, ke li tranoktis ĉe la Spektro, timante, ke li eble profitus tion kaj ĝin validigus, kiel pretekston por ne plu eliri almozpeti. Sed ekde la sekvanta tagdekkvino, la longaj forloĝoj dum du kaj eĉ dum tri tagoj tiel plioftiĝis, ke la virino komencis pro tio malkvietiĝi, kaj konsideris, ke jam venis la momento iom streĉi la ŝnuron. Ĉe la unuaj avertoj, Matio, surprizite, ŝajnis konsterniĝi; poste, implikiĝinte kiel ordinare en sinpravigojn, li ŝutiĝeme promesis sin korekti per fragmentaj vortoj, kiuj nenion signifis. — "Ke jes...", "ke *bone*...", "ke tamen...", "ke mi jam klopodos..." — sed tio estis ĉio, kaj eĉ ne la plej eta ŝanĝiĝo modifis lian novan agmanieron. Tiam Mila transiris de la avertoj al predikoj, kaj tujege de ĉi tiuj al formalaj ordonoj; sed la rezulto estis la sama: disfendiĝo de ĉiuj ŝiaj klopodoj kontraŭ la pasiva rezisto de Matio — tiu terura pasiva rezisto, kiu ŝajne devigis lin cedi kaj fleksiĝi kiel junko ĉe la alveno de ŝtormo, por restariĝi, tuj post ĝia forpaso, kvazaŭ nenio okazis. Li ĉiam pli kaj pli frue eliris elhejme, kaj kiam ŝi igis lin promesi, ke li revenos antaŭ la vespero, li tion promesis ne donante al ŝi motivon por insisti, sed vespere li ne revenis kaj ofte eĉ ne la morgaŭon; kaj estis vane, ke ŝi intencus lin reteni per ia ajn preteksto aŭ ke ŝi volus igi lin iel labori en la domo: li elglitis el ŝi, kiel angilo, kaj kiam ŝi lin serĉis, ŝi jam nenie lin trovis. Ŝajnis, ke la maldiligentemo kaj la pigreco solvi-

ĝis kun lia grasaĵo, kaj foje ŝi malkovris ĉe li malpezecojn de ĉamo kaj ruzoviglajn trajtojn de vulpo por ŝin trompi kaj perdigi al ŝi lian piedsignon. Baldaŭ Mila povis rimarki, ke la ŝanĝiĝo de sia edzo estas pli grava ol ŝi komence suspektis; ke io neatentita estis pli pova ol ŝi, ke penetris en lian antaŭan vivon, perfortante la fermitan pordon de besta indiferenteco, nova elemento, kiu ĝin interne modifis, kaj ke tiu mistera elemento enfermas forton, kiu estas malamika al la edzino, kiu ŝin rifuzas kaj apartigas de tiu vivo ankoraŭ pli ol kiel estis antaŭe.

La virino sentis kontraŭ la nova malvenko furiozan spiton de katenita besto, kaj dumnokte, en la malpleno de la geedza lito, ŝi mordis, surventre sternita, la malsekan malvarmeton de la kusentegoj.

Kaj kvazaŭ por sentigi al ŝi la malvenkon pli dolora, ŝi daŭre konstatis, ke ju pli li plilongigas la restadojn eksterhejme, des pli malriĉa li revenas kaj pli senpacienca por denove foriri. Ŝi fine parolis al la paŝtisto pri tiu mistero, kaj la paŝtisto al ŝi diris:

— Neniel plaĉas al mi havi suspektojn, kaj pri tio, kion mi volas esprimi mi ankoraŭ ne havas veran certecon, tamen... jen: mi krampiĝas al la ideo, ke via edzo ne tiel multe almozpetas, kiel li volas al vi kredigi... En unu antaŭa tago mi staris ĉe la ĉirkaŭaĵoj de la Kapreoloj kaj okazis ke, subite, mi rimarkis du figursimilajn flokojn, kiuj moviĝas trans la Baŭo de la Olivarboj, sur la Saltejo de la Kastrito. Ili troviĝis tre malproksime kaj ja ne klare distingiĝis, sed mi estus ĵurinta, ke ili estas via edzo kaj tiu damnita animeto... La Baŭo ja ne troviĝas survoje al la vilaĝo, mi supozas, kaj la ĉielaj birdetoj fakte ne portas gravan rentumon en la poŝo... Do ili ja ne povis sin direkti por la monkolekto, ĉu ne ŝajnas al vi tiel? Mi asertus, ke la alia verŝajne trenas lin al siaj kuniklaj ŝtelbuĉadoj, kaj ĉar via edzo havas tian temperamenton... ke ne sidas al li bone havi zorgojn... Tamen nenion al li diru, intertempe, ĝis mi klare scios pri kio, tio temas... Mi kaŝobservos, komprenite?... —

Efektive Mila nenion diris, tute kiel al ŝi rekomendis la paŝtisto, sed ŝia tuta kuraĝo neniiĝis antaŭ la nova provo, al

kiu ŝi estis submetita, kaj ŝia soleco densiĝis kaj glaciiĝis ĉirkaŭ ŝia animo kiel polusaj glaciblokoj. Oktobro finiĝis kaj la krepuskoj, lasante ĉiam pli multe da loko al la nokto, detranĉadis per sia ombra tondilo iom de ĉiu ekstremo de la tago, ĝin abunde malgrandigante. Matio pasigis for de la ermitejo kvin tagojn el la sep de la semajno. Arnaŭ de Sankta Poncio ne plu alproksimiĝis al la ermitejo post la deruliĝo de la konversacio en la korto; la Spektro, post la tago de la pilgrimfesto; neniun oni vidis sur la montaro, krom la fasĉinportistinoj el Ridorto, ĉiam kurbigitaj sub ŝiaj ŝarĝoj el arbustoj kaj astragaloj, kaj eĉ la paŝtisto jam ne enstaligis la gregon en la sunhoroj, kiel somermeze, por denove ĝin elkonduki en la vesperfreŝo, sed li paŝtis ĝin de la deka matene ĝis la kvara posttagmeze, kaj ĉe la retiriĝo, anstataŭ enfermiĝi en la domkuirejo, li ekprenis Baŭdilieton je la mano, kaj ambaŭ malsuprengrimpis al Murono. Tie la knabo rice-

vis unuhoran lecionon de la sinjoro instruisto, ĝis kiam, pro la alveno de la vintro, ili definitive malsupreniros por rehejmiĝi en la farmodomo kaj la knabo povos sekvi tuttagan lernadon. La paŝtisto estis aranĝinta tian kombinon, por eviti subite forpreni de Mila la knabon, sed ŝi malmultan profiton eltiris el la aranĝo. Sola en la domo la tutan tagodaŭron, sola en la malluma kaj dezerta kuirejo dum la senfinaj vesperiĝoj plenaj de frostotremoj, sen precizaj taskoj, kiuj forkonsumus ŝiajn superfluajn horojn, ŝi plue sentis sin invadata de la plej forta kaj dolora malĝojo. Mezmatene ŝi jam tenis ordigitaj virojn kaj bestojn, la tagmanĝo bol-boletis sur la forno kaj ŝi, libera de ĉia devo kaj de ĉia deziro ion fari, apogis sin sur la balustrado de la kuireja fenestreto, kiu donis vidon al la montokresto de la Meza Ŝtonego, aŭ sur la terasa balustrado, kiu rigardis orienten, kaj de tie, ŝi vidis la gregon elaperi, antaŭiritan de la vokoj de Baŭdilieto, ĉirkaŭvolvitan de la ululoj kaj ekscititaj kuroj de la Strigo kaj sekvitan de la paŝtisto en posta flanko, kun lia poŝego el denshara ŝafofelo, plektita per rimenoj sur la kamlota jako, la plušĉapo ĝisfunde lokita sur la kapo, la mantelo faldita sur la ŝultro, la celtisa bastono horizontale pendanta de lia dekstra mano, kaj paŝante per siaj najlumitaj ŝuoj kun solena malrapidemo, senigita je pigreco aŭ torporo.

La ŝafoj disŝutiĝis jen al tiu ĉi flanko jen al tiu alia de la monto, etendiĝante sur la malseka kaj bruna grundo, kiel ŝoviĝanta neĝtavolo. La knabo stumble saltis kaj sin turnis ĉe ĉiu paŝo por sendi al Mila adiaŭajn vortojn kaj petolajn ridetojn. Ankaŭ la viro kutimis sin turni unu aŭ du fojojn por fari per la bastono afablan geston, kaj kiam la neĝtavolo perdiĝis en malproksimo kaj fariĝis subtila kiel polvonubaro kaj la "gvardianoj" estis solviĝintaj en ĝi, Mila restadis ankoraŭ senmova en sia rigardejo. Ŝiaj malfermitaj kaj gapaj okuloj iom post iom poluriĝis, kristaliĝis, tute plornubiĝis, kaj fine de ili sin detiris du plenaj larmoj, kiuj rulfalis sur la krucigitajn brakojn. Aliaj larmoj akompanis la unuajn, kvietaj, sinsekvaj, abundaj, unu post alia trempendantaj de la arĝenta fadeno, kiun ili mem ŝpinis laŭlonge de la vangoj, kaj fine venis la plorkrevo: unue trema kaj mal-

certa, kiel tiu de perdita infano, poste ululanta kaj impeta kaj fine senbremsa, frenezeca kaj plena de singultoj kaj histeriaj krietoj. Ĝi estis ploro nostalgia, enua, angora, animagonia, kiu plilongiĝis momenton post momento, sen tio, ke sukcesus ĝin ĉesigi nek volo nek laciĝo; — ploro, kiu devis elverŝiĝi kiel droniganta fonto, kaj kiu, finiĝinta laŭ sia propra daŭro, per malrapida morto inter rompitaj ĝemoj kaj nazaj spirblovoj, lasis ŝin ellacigita kaj samtempe liberigita, sed kun la okuloj ŝvelintaj kaj granda dolora pezo, kvazaŭ de plumba kuglo, inter brovo kaj brovo. Poste, konsternita, laca kaj stultigita, ŝi vagadis en la domo aŭ tra la senkulturejoj, kun la malklara rigardo de siaj sangaj okuloj kunpuŝiĝanta kaj repuŝiĝanta, jen kun la muroj fuŝe blankigitaj, jen kun la ĉielo pura kaj sen nebuloj aŭ kun la konturitaj montoj, de netaj kaj precizaj limlinioj, kiuj ekprenis jam la vintrajn tonojn. Vidante ŝin moviĝi tien kaj reen sen nordo kaj celo, kiel suferanta animo, oni konjektus, ke ŝi atendas ion necertan, malkvietigan, kiu devis veni kaj ne aperis. Poste ŝi eĉ ne havis dezirojn ĉirkaŭiri, kaj falis en dormeman pigrecon, kiu ŝin tenis plurhore sternita sur la lito, aŭ sidanta sur seĝo kaj vizaĝe kontraŭ la tablo, por eviti la lumhelon.

Ŝi rapide malgrasiĝis: ŝi nek manĝis nek laboris, kaj mem sentis, ke ŝi paliĝas kaj ke malaperas la freŝeco de la haŭto kaj ke forviŝiĝas la klareco kaj vigleco de la rigardo, kiu iĝis malbrila kaj malforta, kiel tiu de la riĉa vidvino, la patrino de la skrofola junuleto. Ŝi perdis la guston por ĉio, eĉ por la pureco, kaj montriĝis malbone harkombita, kun la jupo malrekta kaj la ŝtrumpoj havantaj malplektiĝintajn trikmaŝojn, kaj malatente ŝi lasis ĉarpiiĝi la kubutojn de la jako de Matio kaj disbuŝiĝi, ŝiritaj, la poŝojn de la pantalono.

La paŝtisto alarmiĝis antaŭ la animstato de la virino.

— Ermitino! — li al ŝi diris unu tagon, kiam li ŝin trafis ploranta kaj ŝi devis evidente konfesi, ke ŝi ne scias pro kio ŝi ploras: — Jam de kelka tempo, vi ne dece bonfartas kaj ni devas apliki kuracilon al ĉio ĉi... sed ja ne kuracilon de ĉe la apotekisto, vidu... Vi kaptis surmontan malsanon, mi pensas, kio estas speco de aflikta malsano, kiun oni kuracas nur per distraĵoj. Ja ne ekzistas ĉi-tie kelkaj sufiĉe gravaj,

sed ŝajne ne estos al ni malfacile povi trabati iun. Antaŭ ol ĉio, ne konvenas, ke vi plu restu tute sola, kiel strigo en la kaŝejo: la akompano estas vivduono, ĉu ne? Morgaŭ vi ŝlosos la pordon kaj venos kun ni paŝti la brutaron, ĉu tio plaĉas al vi? Cetere ne suprenrampas al la ermitejo eĉ nura favovermo (1), krom via edzo, kaj se tiu ĉi suriros kaj renkontos la pordon fermita, li atendu aŭ reiru: cetere li ne multe mankas por nia bezono. —

Kaj mildiginte per malpeza tono kaj rideto la seriozecon de tiuj ĉi vortoj, li decidis per si mem, ne atendante ŝian konsenton, ke li ŝin prenos kun si tra la montaron.

— Tute ne pensu, ke oni tie sentas sin tiel malkomforte kiel ĉe la pendigilo... Jam pri tio vi nepre konvinkiĝos, kaj se vi ne paciencas demandu la etulon. —

Mila ne metis kontraŭstaron nek reziston, kvazaŭ ŝia volo estus malvigligita aŭ sekestrita, kaj la morgaŭon ŝi lasis sin dolĉanima konduki post la grego, kun ia dolĉanimeco de sufinfano. Vojire la paŝtisto daŭre ŝin distris per sia konversacio, poste ili haltis por trinkmanĝeti sub la Floko, pli poste ŝi vidis la knabon ludi bilbokon (2) kaj pafi enaeren ŝtonojn per la ĵetilo, kaj ankoraŭ pli poste ambaŭ ili silabis la alfabeton, kiun la paŝtisto portis en la felpoŝego...

Kiam ili malsupreniris laŭ la cetacoforma dorso de la Meza Ŝtonego, kaj la ŝafoj impetis al la ermitejo interpuŝante unuj la aliajn, la virino memoris, tute mirigite, ke de multaj tagoj tiu estis la unua, kiun ŝi pasigis, preskaŭ ne atentinte ĝin; kaj ekblovo da stimulanta malvarmeto, anoncanta la proksiman vesperkrepuskon, ŝin envolvis de supre malsupren kaj ŝin kvazaŭ sentorporigis, agrable revivigante en ŝi la mortintajn energiojn.

---

(1) Favovermo = Malspritulo.

(2) Bilboko = Infanludo farata per truita bulo el ligno aŭ osto, kiun oni ĵetas enaeren per ŝnuro ligita meze de stango, unuekstreme pinta kaj la alia ekstremo kun kuveto; kiun bulon la ludanto klopodas rekapti, ĉu per la pinta, ĉu per la kuveta flankoj.

XII

VIVO RETROSPEKTIVA

AŬTUNO regis kaj la vetero iel vigle malvarmetiĝis. Estis sinsekvo da grizaj tagoj, en kiuj la nubaro ŝvebis super ĉio, fandante la malproksimojn kaj vualigante per ĉasta poezio la montaron. Nek radio de lumhelo, nek rimarkinda reliefo de planoj vundis la rigardon, kiu povis ripoze fiksiĝi ĉiuflanken, sen timo suferi pro lumblindiĝoj aŭ palpebrumoj. Ĉio alprenis la subtilan kaj elviŝiĝeman aspekton de la aferoj de kvieta revo, kaj ŝajnis inviti la spiriton, dolĉigi kaj ankaŭ mildigi ĉiujn siajn elstaraĵojn kaj krudecojn.

Meze de tiuj moderaj pejzaĝoj saturitaj de kvietiga ripozo, kiel animitaj figuroj de senlima pentraĵo, vagis kun siaj akom-

panantoj Mila, kiu lante, tre lante, promenigis ĉie la virgajn perpleksecojn de sia resaniĝo.

Ŝi, iom post iom, reakiris la sanstaton, kun malrapidemo rivelanta bonajn aŭgurojn, kaj el sia laŭtakta revigliĝo ŝi eltiris neatenditajn surprizojn kaj ekstazojn. Kvazaŭ la dia mano estus elŝirinta la pikilon al la vespoj de ŝiaj suferoj, tiuj ĉi jam ne pikis ŝin kiel antaŭe, sed kontentiĝis flirti sen malico aŭ surde zumi ĉirkaŭ ŝia kapo kun speco de teda muziketo, kiu ne sukcesis ŝin senpaciencigi. La ermitejo jam ne estis por ŝi la malagrabla loko, kie oni ŝin tenas perforte enkarcerigita, sed la nesto, la ŝirmejo kien ŝi rifuĝas, kiel la birdoj, en la ripozhoroj, kiam ŝi ne estas flugipova.

La solecaj krutaĵoj de la montaro, riĉaj je perspektivoj kaj majestaj vidpunktoj, tuj kiam oni postlasas la ĉirkaŭfermaĵon de la ermitejo, kaj trairitaj trafe maltrafe de vojoj neniam signitaj de homa mano nek limigitaj de konvenciaj limŝtonoj, sed elektitaj plenĝue kaj laŭ la libera impulso de la volo, sur la granda libera etendaĵo, fariĝis plaĉolokoj por alloga distro, sur kiuj ŝi sentis la taghorojn forfandiĝi sen bedaŭro kaj sen turmentaj zorgoj. Eĉ Matio aliiĝis en tolereblan proksimulon, rigardatan kun bonvola indiferenteco de la supro mem de paca sereneco; ŝi jam ne riproĉis lin, jam ne persekutis lin kun siaj kritikoj, jam permesis al li fari kion li volas, ne lin incitante nek mem incitiĝante, kvazaŭ la perforta ligilo, per kiu ŝi intencis, ĝis tiam, teni lin proksima al si, estus subite rompiĝinta sen bruo kaj doloro, lasante por ĉiam plu malparigitaj iliajn nekunigeblajn vivojn kaj, per la intima divorco (1), dispelitaj ĉiujn malkonkordajn kaŭzojn, kiuj naskiĝis el la konstanta opono de iliaj antagonismoj. Ŝi sentis sin libera kaj mastrino de si mem, kaj dank' al la sekreta libereco, la harmonio spontane fluis el ŝiaj sentoj kaj regis ĉiujn ŝiajn agojn; vere ĝi estis malvigla harmonio, sen nervo kaj impeto, sed ĝuste pro tio agrabla al ŝia stato, ĉar ĝi ne postulis de ŝi ian lacigan klopodon.

Mila lantece reviviĝis, kiel soldato elsangiĝinta sur la batalkampo, kaj kiu devas reakiri sian sangon guton post guto;

(1) Divorco = Rompiĝo de la ligilo aŭ unuigo de du aferoj.

kaj tiel same kiel ĉe finiĝo de la vivo, la instinkto fortagrade kroĉiĝas al ĝi kaj volas ĝin ĝui intense kaj per unu tuta sorbo, kiam la vivo reaperas okazas tute kontraŭa fenomeno. La deziro, malcerta kaj trema pro sia malforteco mem, ankoraŭ ne kuraĝante marŝi sola al sia realiĝo, sencele haltas, kaj poste, dum ĝi atendas la kunhelpon de la povo, ĝi posteniras, kaj ĵetiĝas al retrospektiva vivo; anstataŭ agi, ĝi rememoras. Mila, revigliĝante, rememoradis.

En tiuj tagoj ili paŝtis en la ĉirkaŭaĵo de la Kresto de la Gnomo, krutega montetaro, kiu kaptis la malmultajn sunrigardetojn falantajn sur la teron. La brutaro disŝutiĝis kaj malkuniĝis laŭ la deklivoj kaj reliefoj, ĉiam kun la buŝego surgrunde, ternivele detranĉante la herbaĉon, kiu elstaris, kiel verdaj franĝoj, meze de la verukoj de la ŝtonbloko; la Strigo kuŝiĝis fronte al la estingiĝanta suno, palpebrumante kaj kun la pinto de la vosto sur la femuro; Baŭdilieto prilaboris sambukajn ŝprucigilojn el branĉoj deŝiritaj en la ebeno, aŭ rondigis, sinsekve frapetante per duono da ĉevala hufferaĵo, la ŝtonan bulaĉon, kiun li komencis ĉizadi antaŭ ses monatoj, kaj fine, Mila kaj la paŝtisto subtenadis longajn kaj ripozajn horojn da konversacio.

Igante ŝin kliniĝi super ĉiun terurigan profundegaĵon, instruante ŝin fleksi la korpon kaj firmigi la piedojn sur la danĝeraj lokoj kaj devigante ŝin postenrigardi, meze de suprenrampado tra krutaĵo, dum li bonhumore ridis pri ŝiaj timskuoj, li ŝin kuraĝigis en ŝiaj timinklinoj kaj ŝin forte tenis, kiam ŝin venkis kapturniĝo; Kajetano devigis la virinon akiri sian sperton de montaranino, kaj sukcesis fine triumfi super ŝia timema naturo de cervineto: kaj nun ŝi, kape kaj kore serena, sentas plezuron volupte ludadi kun la timtremoj, kiuj trafulmas la homkarnon, kiam oni vagas supre sur la sovaĝaj altaĵoj, kaj percepti, kiel elsuĉas la animon kaj la pupilojn la malluma sorĉo de la grandaj montabismoj.

Sidante sur la Pinto de Supranestoj, je centoj da metroj super la ebennivelo, kun la ŝirmotuko sur la ŝultroj, la kruroj pendantaj sur la talus-muro mem de la fendego, vidante la blankajn nubarojn rapide transpasi super ŝia kapo, kiel miriadojn da sovaĝaj ĉevaloj kaj la Nigran Ravinon malfer-

mi sub ŝiaj piedoj, tie ĉe la kavofundo, sian senmezuran sendentan buŝegon, Mila sentis sin kiel ĉe si, kaj kontraste, plejeble, kun la superbela grandiozeco de ĉio, kio ŝin ĉirkaŭis, al ŝi prezentiĝis la plej delikataj rememoroj el ŝia juneco.

Kun la rigardo perdita, forvišiĝinta, en la malproksimoj de la memoro, ŝi parolis, parolis ne laciĝante, kaj la paŝtisto, sidanta apud ŝi kaj prilaboranta tranĉilpinte ian ajn bagatelon por la etulo aŭ por la bestoj, atente ŝin aŭskultadis ne interrompante ŝin.

— Se vi estus koninta mian onklinon... ŝi estis tia bonkora virino! Ŝi havis kapon malgrandan, tre malgrandan, kaj brunetan kiel juglando, kaj ŝia hararo pendis ambaŭflanke de la harlinio ĝis ĉiu orelo, kiel blankaj kurtenetoj... Ŝi nomis tian hararanĝon *harbendoj*. Kiam mi kombis ŝin per la densdenta kombilo, mi plektis hartubereton laŭ amplekso de proksimume duono da duro (1) sur ĉiu tempio, kaj ŝi skuis mian jupon, ŝajnigante ke ŝi min batas. Ŝi tre amis min, kompatinda onklino... Neniu estus diveninta, ke ŝi estas boonklino mia. Kiam mia patrino mortis —ŝi estu en la ĉielo!— la onklino estis la unua, kiu sugestis adopti min ĉe si. La onklo estis afekciita de renmalsano, kaj ĉar li ne povis labori, li kontraŭstaris ŝarĝi sur sin ian kromelspezon, sed la onklino respondis al li: —Ŝi estas el via sango kaj vi ŝin rifuzas? Kion vi farus, se ŝi estus el mia! Mi estas nur ŝia baptopatrino kaj ŝin amas, kvazaŭ mi estus ŝin portinta en la sino... — Kompatinda onklino! La onklo ĉiam mokridis pri ŝia baptopatrineco. Li rakontis, ke li traekzamenis mi ne scias kiom da kalendaroj serĉante belsonan sanktulin-nomon, kaj ke, fine, li aljuĝis al mi tiun de Kamila, por ke mi estu tiel ranga kiel la unuenaskitino el la Kastelo, kiu ankaŭ sin nomis tiel. — Kaj jen vidu — li kutimis al ŝi diri por ŝin inciteti — ili ambaŭ rivalos inter si; se unu havas la kastelon la alia havos la barkon... — Ĉar la onklo estis barkisto, ĉu vi scias? Antaŭ ol oni konstruis la ponton, li havis blankan barketon, kiu pramis de unu bordo de la rivero al la alia pere de traetendita ŝnurego. Pli supre estis la travadejo por la ĉaroj, sed la personoj ĉiuj traveturis

(1) Duro = Kvinpeseta, hispana monero.

en la barko. Dimanĉe kaj foirtage donis plezuron ĝin vidi, tute plenan de terkulturistoj kun la baretenoj novaj kaj okulfrapaj kiel faskoj da ruĝaj diantoj. En la tagsoleno de Sankta Petro la Fiŝkaptisto ni celebris la jarfeston de nia barketo, kaj tiam ni ĝin tute ornamis per aŭtentikaj diantoj; diantoj, rozoj kaj tiomspecaj floroj kiom ni renkontis. Unu jaron, kiam mi estis grandaĝeta kaj zorgis pri tio jam multe pli ol la onklino, la knaboj el la vilaĝo lokis girlandon sur ĝia tuta ĉirkaŭrandaĵo, kaj ĉe la kapo de la lignostango, bukedon tre grandan ligitan per kaŭĉuk-ringetoj blankaj kaj bluaj. Tion ili aranĝis meznokte, kaj kiam ni iris tien, ili spionis nin kaŝite meze de la arbustaro, por subaŭskulti niajn laŭdojn. Kiom da homamaso venis tiun matenon por ĝin admiri! Ŝajnis, ke laŭ la rivervojo iras procesio... —

Mila iom haltis, ravita de la rememoro, kaj poste ekstaze aldonis:

— Ho, kia bela afero estas rivero, paŝtisto! —

— Ĉio en la mondo estas bela, se ĝin oni rigardas per bonecaj okuloj, ermitino! —

— Iuj aferoj pli ol aliaj... Jen vidu: de kiam mi havas rezonkapablon, nenio tiel plaĉis al mi, kiel tiu flanko de la trapasejo en la vesperkrepusko. Kiam tie ne atendis vico da transportota popolo, mi prenis kun mi la ŝtrumptrikaĵon, ekpuŝis kaj engrimpis la barkon, kiu glitis ĝis la rivermezo kaj tie mi haltis. La fluo estis malvigla kaj la barko balanciĝadis kiel lulilo, trim-tram... trim-tram... trim-tram, tute malrapide, kvazaŭ ĝi volus min endormigi; kaj mi, trikante, maŝon post maŝo, rigardis la subirantan sunon, ruĝan kiel flamo, malantaŭ la trunkobazoj de la Karolin-poploj (1), kaj aŭskultis la triletojn de la birdoj, kiuj interpepis en la riverbordaj arbaretoj antaŭ ol kuŝiĝi, kaj la ridojn de la segistoj, kiuj ŝercis segante supre ĉe la stabloj. Ŝajnis, ke ĉio staras malproksime, malproksime... kaj la ĉaroj, kiuj transiris la vadejon ŝpruciganto la akvon, tiel bele aspektis!... Mi ne plu volus movi-

(1) Karolin-poplo = Speco de poplo, kiu povas atingi altecon da 25-30 metroj kaj originas el Norda Karolino (Usono), de kiu ĝi ricevis la nomon. Latine: Populus angulata.

ĝi de tie... Kion mi diru! Mi tie sentis min plenĝue, kiel en preĝejo kiam neniu enestas, kaj nur venis al mi deziroj preĝi Patro-Niajn memore al la mortintoj kaj la vivantoj de ĉe mi... Aj, bona Dio! La ponto estis la malfeliĉo de ĉio: tiu de la rivero kaj nia. Dum du aŭ tri jaroj oni forhakis la plej bonajn arbarojn de la riverbordoj; oni tuj abolis la travadejon kaj konstruis fabrikon pli supre; kaj en la vesperkrepusko, anstataŭ tie trovi la ripozon kaj kvietecon antaŭajn, ĉu vi scias kion oni trovis? Viraĉojn, kiuj fininte la taglaboron en la fabriko kaj irante al la kantino por trinki, fortimigis la birdojn per ŝtonĵetoj kaj la virinojn, kantante al ili malĉastajn kanzonojn. Kaj la barko, kompatinda! Ĝi estus kaŭzinta al vi bedaŭron! Ĝi ĉiam restadis izola kaj ŝnurfiksita ĉe la palisoj kiel malsana besteto. La onklo ne volis ĝin retiri, pro memestimo, kaj nur iam kaj iam ni iris tien veturpromeni; li, la onklino kaj mi; sed la ponto malhelpis la tutan vidon, tiel de unu flanko kiel de la alia, kaj la onklo ĉiufoje ploris, vidante kiel la homoj transiras sur ĝi kvazaŭ nenio okazis... Tio mortigis lin, kredu! Li jam forte suferis pro renmalsano, kaj spertinte la renversiĝon de la barknegoco, li ĉagreniĝis kaj grandpaŝe pli malsanis. Dum li povis iri per siaj kruroj, li foriris frumatene el la hejmo kaj sin direktis al la rivero. Ĉar ni ne plu sarkis la riverbordon, la vepro fleksiĝis super la barkon kaj ĝin tute ŝirmis kiel baldakeno. Li ŝoviĝis en tiun kaŝejon, kaj pli ol sep personoj asertis, ke ili ofte aŭdis lin plorsingulti. Certe estas, ke li revenis hejmen kun okuloj ruĝaj kiel oranĝoj, kaj koleris se la onklino demandis lin, kio al li doloras. Poste li jam ne povis moviĝi de la kuirejo, sed ankoraŭ, je la tagreveno de Sankta Petro, li kondukigis sin per ĉaro al la rivero kaj volis ke, kiel memorajon pri la antaŭaj jaroj, ni florornamu la barkon. Estus pli bone se ni tion ne estus farintaj! ĉar, jen, kaŭzis tian malĝojon vidi tute garnita per helnuancaj rozoj tiun kompatindan barkon breĉitan kaj kovritan de musko! Tiun tagon ne nur la onklo ploris... Kiam li mortis, la onklino deziris ĝin vendi, sed por tio jam estis tro malfrue. Ĝi tra ĉiuj flankoj ensuĉis akvon, kaj ĉar ĝi restis tiel longan tempon en la ombro kaj sen ia repentrado, la lignotabuloj estis forte konsumiĝintaj... La tagon difi-

nitan por ĝin ekzameni mi konatiĝis kun Matio: li akompanis la direktoron de la fabriko, kiu estis la aĉetonto, kaj dum la direktoro kaj la onklino interparolis, li ne deturnis de mi la okulojn. Post nelonge li alparolis min pri edziniĝo kun li... Li ŝajnis bona knabo kaj la onklino havis piedon en tombejo... Mi estus restinta sola... Mi donis al li la jeson... Aj, Sinjoro, se la homoj interrilatus antaŭ ol fari certajn paŝojn... —

Koliziinte kun Matio, la rememoroj de Mila ĉiufoje interrompiĝis, kaj tial ke, dum la paŭzo, ŝi restis malĝoja, kaj lasis fali la rigardon al la profundegaĵoj de la Nigra Ravino kun esprimo de senforto pro la absorbiĝo, la paŝtisto, kiu tenis la mezuron pri la altiĝo kaj malaltiĝo de ŝiaj impresoj, ekkomprenis, ke estas alveninta la momento, kiam li devas ekagi. Lasante flanke vergetojn kaj tranĉilojn, li elstreĉis la brakojn por forpeli ilian rigidiĝon kaj stariĝis. — Ha, ha! Nun mia kruro jam estas rigida kiel piedo de seĝo kaj mi opinias, ke la aero estas malvarmeta... Eble estus konsilinde, ke ni ĉirkaŭpromenu ĉi-tie... — kaj li ridetis al la virino per sia vigla kaj bonkora rideto.

La virino levis la kapon por rigardadi al la simpatia figuro, kovrita per kamloto, altiĝinta sur la Pinto mem de Supranestoj, per la piedoj tuŝanta la teron, sed tute konturita sur la ĉielo kaj alta, alta kvazaŭ li estus subite elkreskinta. La virino redonis al li la rideton, ankaŭ stariĝante. La ŝafoj montriĝis dismetitaj, laŭ kolektiĝoj, sur unu granda etendaĵo, kaj Baŭdilieto kaj la Strigo distriĝadis per siaj malgrandaj tempopasigoj.

La paŝtisto sendis ekrigardon al sia apartenaĵo kaj poste komencis flegme rondiri sur la montetaro, sekvate de la virino laŭ ĉiuj liaj iroreiroj: kaj dum la irado, lia montra fingro etendiĝis signante diversajn lokojn proksimajn aŭ malproksimajn.

— Ĉu vi vidas la lastan surdeklivan olivarbaron? Pratempe, tie okazis terura tragedio!... Tiam vivadis en la valo de Liskento altrangulo kun multe distaŭzitaj haroj, kiu faris ĉiuspecajn kruelaĵojn. Li ne konis pli bonajn amuzojn ol delogi junulinojn, manĝi kaj trinki delikataĵojn kaj ĉeesti ĉason post ĉaso... Unu fojon okazis, ke li vidas knabineton ŝpinan-

tan ĉe la pordosojlo de sia domo; jen li tuj ŝin kaptigas per siaj armilservistoj, ŝin retenas unu nokton en sia kompanio, kaj en la mateno li ŝin forpeligas el la pordo de la kastelo. Vidinte sin tiamaniere forĵetita, la knabineto jen sin turnas fronte al la kastelfenestroj kaj ekkrias tiel: — Ha! sinjoro de la Valo de Liskento! Kiel beston vi traktis min, kiel beston mi povu vidi vin antaŭ mia morto! — Kaj ŝi foriris, kaj neniam plu oni sciis pri ŝi en la tuta Valo. Dum forpasis la jaroj, okazis, ke la altrangulo de la Ŝtonegoj invitis unu tagon la sinjoron de Liskento aranĝi ĉasadon en tiu teritorio, kaj tiu de Liskento ĉeestis kun sia tuta armilservistaro. Absorbita de la ĉasostreĉo, li, kiu estis forte impulsiĝema, devojiĝis de la ĉasistaro kaj venis sola ĝis tiu ĉi montdeklivo. Tuj post lia alveno, li jen rimarkas specon de kaprineto tre ĉarma, plantita per ĉiuj siaj kvar piedetoj sur la supro mem de tiu roka kapuĉo. Li, kiu estis tramigrinta multajn landojn, diras: — Jen mi atingos bonegan ĉasaĵon! Tiu ja ne estas besto ĉi-tiea, sed kapreolo veninta de la altaj montoj! Jen bona donaco por mia gastiganto! Kaj ĉar al li ŝajnis, ke la kapreolo lin atendas, li pretigas la arbaleston kaj al ĝi pafas sagon; sed la kapreolo faras eksalton kaj kuras supren al la monto kvazaŭ demonposedata. La ĉasisto jen pensas: — Ci jam havas la sagon en la korpo: ne multe ci ja kuros... — kaj ĝin sekvas por ĝin atingi. Sed la kapreolo fuĝas kiel la vento, kaj la ĉasisto tuj ĝin fakte perdas el la vido. — Ĉi falos supre de la deklivo... mi ripozos kelkan tempon kaj poste sekvos ĝian piedsignon... — li ree pensis; sed sammomente, sur la kresto de tiu montofendego, aperas al li alia kapreolo. — Kion tio signifas? Ĉu antaŭe masklo kaj nun femalo? Jen ankoraŭ pli valora la donaco! — Kaj li lokas alian sagon en la arbaleston kaj ekpafas. Li vidas klare, kiel ĉe sunbrilo, ke la sago enpenetras la kolon de la dua kapreolo, sed tiu ĉi, anstataŭ tuj flankenfali, faras eksalton kaj fuĝas sur la montetaron tute kiel la unua. La sinjoro de Liskento ne konsciis, kio al li okazas, kaj, helpu kruroj!, ankaŭ li ekkuris kiom li povis. Alveninte sur la supro, li eĉ ne povis revenigi la spiron. Li rigardas tien, rigardas reen kaj nenie li vidas signojn de kapreoloj mortaj nek vivantaj. — Jen mi ja fiaskis! — ekkriis la

viro. — Mi vidas nek arbuston nek altaĵon, kiuj povus ilin kaŝi. Kien ili do sin ŝovis? Escepte se ili falis per unu salto laŭ la Saltejo de la Kastrito! — Sed la Saltejo de la Kastrito troviĝas je pli ol duonhora distanco, kaj la kapreoloj, kiel ajn longkruraj ili estas, ne povas esti farintaj tiel fulman kuron, vidu. Sed tiu stranga okazaĵo pikis la memestimon de la sinjoro de Liskento, kaj li ja ne estis viro por halti kaj fari meditojn. Li decide volis alporti la kapreolojn al sia gastiganto, kaj ne atentinte la lacecon nek la longon de la vojo kiun li sekvis, li ŝanceliĝis de ŝtono al ŝtono ĝis la Saltejo de la Kastrito. — Sen ia dubo: ambaŭ ili portas la trapafitan sagon kaj certe ne povas vivi; mi ilin atingos sensangiĝantaj sur la kavofundo. — Li alvenas al la kavofundo pli morta ol vivanta, rondiras, serĉas kaj rigardas, kaj nenie li vidas la kapreolojn. La sinjoro de Liskento restas marmorŝtona. Se tio do ne estas



miraklo, li ne scias, kio ĝi povas esti. Ĉion li esploras alifoje, kvazaŭ tio devus kosti al li la vivon, sed nenion li atingas. Li jam estis preta rezignacii kaj reiri la vojon, malbenante ĉiujn ĉielajn kaj terajn aferojn, kiam, okaze, li levas la

kapon kaj rimarkas, tie sur la supro mem de la Rigardejo, unu el la kapreoloj, kun la kolo tute elstrecita, kaj ĝi flaras la venton tiel de unu flanko kiel de la alia. La sinjoro de Liskento eligas ĝojkrion kaj al ĝi rekte celdirektas pro timo mispafi. Tiam li rimarkas, ke tiu kapreolo estas tamen neniu el la du antaŭaj; ĝi montriĝas multe pli malgranda ol ili kaj ne portas enpikitan sagon. — Ĉi estas la idino: tute same! Kondiĉe ke mi povu ĝin ĉaskapti! — Li estis tiel obsedata pri la kapreoloj, ke, konsiderinte la pli grandajn perditaj, li jam kontentiĝis ekposedi nur la idan. Sed ĉar ĉi-tiu estas tiel eta kaj troviĝas tre malproksime, li timas maltrafi, kaj, ĉerpinte fortojn el propra malforteco, li iras antaŭen tra la kavofundo por alproksimiĝi al ĝi. Trovinte adekvatan paflokon, li ekfunciigas la arbaleston kaj enŝovas la sagon mezen de la ventro de la kapreolo. — Nun mi ja fakte ĝin mortpafis! — kriis la sinjoro de Liskento, vidinte ke la kapreolo ŝanceliĝas, kvazaŭ ĝi irus ekfali; sed la kapreolo rekonsciiĝas, kaj tute subite, kvazaŭ ektimigita, ĝi alĵetiĝas supren laŭ la Rigardejo. — Tio ĉi estas magioarto! — konjektis la ĉasisto, kape-pieden tremante; — sed se tion mi rakontus al mia gastiganto, li certigus, ke mi freneziĝis aŭ juĝus min mensogulo. Decas, ke mi alportu la kapreolojn mortaj aŭ vivaj aŭ ne plu prezentiĝu al la kastelo. — Li rigardis siajn vestojn, kaj ĉiuj estis ŝirpendaĵoj pro la uleksoj; li rigardis siajn piedojn, kaj ĉie, kie li pasis, li delasis sangan postsignon; sed ankoraŭ la incitiĝo, kvazaŭ braĝeto (1) de elfajraĵo, ekbruligis en li peceton da kuraĝo, interne de la brusto. Li ekiris. La noktombroj falis sur lin kiel cindra surversŏo, kaj venis momento, kiam li jam ne sciis, kien li metas la piedojn, kaj surpremis la pikilojn de la astragaloj anstataŭ la ŝtonojn. Ĉar li suprengrimpis rektalinie, jen ĉi-tie li falis kaj ekstreme kontuziĝis, jen tie li renkontis montofendegon kaj devis reiri por serĉi novan pasejon. Kiam li alvenis supre de la Rigardejo, estis nigra nokto. — Kion mi faris, freneza mi, ke mi jam ne vidos la kapreolojn!— Kaj sen spiro por ion plu diri, li lasis sin fali sur la grundon kiel morta. Post tempeto lin rekonsciigis malproksima reso-

(1) Braĝo = Ardanta karbeto.

no. — Tio estas miaj kunĉasantoj, kiuj min serĉas. — pensis la sinjoro de Liskento, kaj tiu penso donis al li kuraĝon. Jen li komencas aŭskulti, kaj post atentega aŭskultado, ŝajnas al li, ke tiu resono ne estas resono de ĉaskornoj, sed de sonoriloj. Li rigardas tien kaj reen kaj vidas elvišiĝeman lumhelon rekte al la fundo de la monto, ĉe la sunleviĝa flanko. Kaj rigardante, rigardante, la sinjoro de Liskento sentas, ke la okuloj kreskas en li, ke ili kreskas ĝis la kavoj tute pleniĝas, kaj ke ili fariĝas rondaj kaj potencaj, kiel tiuj de gufo. Tiam li vidas, ke tie, ĉe la fino de la monto, staras abatinejo, kaj ke tiu lumhelo estas procesio de monaĥinoj. La sonoriloj de la abatinejo sonoras por mortintoj, kaj la monaĥinoj, vicirante duope kaj kun vakskandelo en mano, kantadas responsoriojn (1). La sinjoro de Liskento eksentas malvarmon ĉe la kormembranoj, kaj volas fermi la okulojn, sed ne povas: oni estas forpreninta lian tutan vizaĝon kaj ili aspektas kiel du lanternaj vitroj; tiam, terurita, li volas ilin kovri per la manoj, sed rimarkas ke, anstataŭ brakoj, li havas du flugilegojn mallumajn kaj kovritajn de plumoj, kiuj faras surdan bruon, kiel ventoblovo, apenaŭ li ilin movas... — Ave Mario Purega! — volas voki la sinjoro de Liskento, sed anstataŭ parolo eliĝas el li siblo tre longa, kiu ĉirkaŭkuras la tutan montaron. Tuj liaj flugiloj disfaldiĝas kaj li ekflugas; flugante plue kaj plue meze de la mallumo, li ne haltas ĝis la bordo de gurgoj ekzistantaj super la abatinejo. Tute apude de la gurgoj staras maljuna glanarbo, kiu havas la aĝon de mil kvincent jaroj kaj kies foliar-amplekso superas dekdu ulnojn. Li haltas sur unu branĉo de tiu glanarbo kaj ekvidas sub si la turon, kun la sonorileto svingiĝantaj por mortintoj, kaj linion da fenestretoj, kiuj estas tiuj de la ĉeloj de la monaĥinoj. Unu el la fenestretoj estas malfermita kaj interne vidiĝas lito blanka kiel skribopapero kaj, sur la lito, monaĥineto kun krucifikso en la manoj kaj ĉe la litkapo, frato kun blanka tuniko longa ĝis la piedoj. La monaĥineto vivfiniĝas, kaj la frato helpas ŝin sankte morti, kaj la procesio de la monaĥinoj jam kantadas al ŝi la responsoriojn. La sinjoro de Liskento jen atente rigardas

(1) Responsorio = Preĝo, dirata aŭ kantata, intence por mortinto.

la vizaĝon de la monaĥino, kaj rimarkas, ke ŝi estas la knabino, kiun longe antaŭe li havis en sia kompanio dum unu tuta nokto. Tiam la sinjoro de Liskento ekkomprenas, ke tio, kio al li okazas, estas puno de Dio pro la peko, kiun li faris kun la knabineto, kaj komencas voki de supre de la glanarbo: — Pardonu al mi, Marieleno de la Valo! Pardonu al mi, pekulo! — Sed li mem hororas aŭdinte, ke anstataŭ homa parolo, alifoje eliĝas el li sibloj tiel viglaj, ke ili vekas tiom da homoj kaj bestoj, kiom dormadas sur la montaro. La monaĥinetoj, kiuj kantadas la responsoriojn, perdas la voĉon rigardante al la glanarbo kaj, forĵetinte la vakskandelojn, ili forkuras internen kiel frenezulinoj; la frato kun la blanka tuniko falas surgenue farante al si la krucosignon, kaj la monaĥineto, kiu ŝanceliĝas en la spasmoj de la morto, deturnas, timpremita, la okulojn al la fenestro.



En la momento ŝi vidas sur la brancoj de la glanarbo de ĉe la gurgoj, birdegon en la malhela violkoloro de la ombroj, duoble grandan ol la aglo de la Evangeliisto kaj kun grandaj rondaj okuloj, kiuj kuntiriĝas kaj larĝiĝas, brilante kiel du

forĝofornoj. La sinjoro de Liskento, vidinte, ke ŝi lin rigardas, denove petegas al ŝi kun pento: — Pardonu al mi, pekulo, Marieleno de la Valo! — kaj etendas ambaŭ flugilegojn, kvazaŭ petegante mizerikordon. Tiam la malsana monaĥineto faras grandan timskuon kaj plektas la manojn: — Ho, Ĉiopova Dio, jen ĝi estas la voĉo de la sinjoro de Liskento, kiam li min forpelis el sia kastelo! Mi sekve estas kontenta, pro tio ke, kiel noktobirdego, li min forrabis el mia nesto kaj kiel realan noktobirdegon mi vidas lin reveni antaŭ mia morto!... — Kaj tion dirinte, ŝi tri fojojn oscedas kaj mortas. La morgaŭon matene, jen okazas, ke la sinjoro de Liskento malfermas la okulojn kaj vidas sin sternita meze de la ebeno de la Rigardejo, kun la vestoj tute ŝiritaj kaj la piedoj kovritaj de koaguliĝinta sango. Apud si li vidas kuŝantan paŝtisteton, kiu lin rigardas, kaj ekaŭdas, ke de la tuta montdeklivo suprenflugas, bim, bom... bim, bom... laŭtegaj frapoj de sonoriloj. Jen li stariĝas kaj komencas konversacion kun la paŝtisteto, kaj demando iras, respondo venas, la paŝtisteto al li rakontas, ke la antaŭan nokton okazis granda miraklo. Mortis monaĥineto en la abatinejo de Kapridinoj, havanta famon de sanktulino, kaj ĉiuj sonoriloj de la paroĥejoj kaj monaĥejoj sonoris je mortintoj memore al ŝi... — Konsideru kiel sankta ŝi estis — diras la knabo —, ke la Malbona Spirito, ne trovinte pekon en ŝia vivo, volis ŝin kondamnigi en la morthoro, kaj preninte la pozojn kaj la plumaron de gufo, ĝi lokiĝis sur la branĉaro de la glanarbo de ĉe la gurgoj, kaj sible kaj resible, ĝi klopodis ŝin malatentigi, por ke ŝi faru malbonan konfesdonon... Sed ĝi ja ne povis atingi sian celon, kaj kiam ĝi konvinkiĝis, ke la animo de la monaĥineto forflugis rekte al la ĉielo, ĝi eksentis tiel grandan furiozon, ke la tuta montaro krevis per tondroj, fulmoj kaj sulfura haladzo... La glanarbo de ĉe la gurgoj estis dissplitigita same kiel dispremita sulfurkanabaĵo, kaj la blanktunika frato kaj la monaĥinetoj el la abatinejo ankoraŭ tremas pro tio, ke ili vidis per siaj okuloj Luciferon mem, kontraŭ kiu Dio nin gardu, amen! — La sinjoro de Liskento demandis la paŝtisteton, pri kiu rakontis al li tiujn aferojn, kaj la paŝtisteto respondis, ke ilin al li rakontis alia paŝtisto, kiun

li lasis pli malsupre, kaj al tiu paŝtisto ĝin rakontis la laika fratino de la monaĥinoj, kiu tion sciis de ili mem kaj kiu iradas de vilaĝo en vilaĝon raportante pri la miraklo. La sinjoro de Liskento ne deziris scii ion pli, kaj, pentinte pri ĉiuj siaj kulpoj pro simila Diavizo, li malsuprenvenis al la Kastelo kaj donacis cent orfuntojn al ĉiu el siaj servistoj, fordonis al la abatinejo de Kapridinoj ĉiujn havaĵojn kaj sinjorrajtojn, kiuj al li apartenis, kaj poste, en la samaj vestoj, kiujn li surhavis la tagon de la kunĉasado, pasis sur la vojoj, kiujn al li montris la kapreoloj kaj venis al la gurgoj, kiujn la popolo jam komencis alnomi la Gurgoj de la Gufo, dank' al la okazaĵoj dum tiu nokto. La fulmoj dissplitigis la tutan glanarbon, tiel, kiel rakontis la paŝtisteto, kaj en la loko de la radikoj restis truego, kiu kaŭzis teruron. La sinjoro de Liskento ĝin prenis kiel loĝejon, kaj ankoraŭ hodiaŭ oni nomas tiun kavon la Kaverno de la Ĉasisto memore al li, vidu... Kaj kiel rakontas la antikvaj historioj, tiu pekulo fariĝis pentofaranto tiel sankta kaj saĝa, ke la Sankta Patro en Romo, kiam li havis ian tre komplikan konflikton por solvi, sendis al li mesaĝulon kun siaj argumentoj kaj poste, li agis akorde laŭ la konsiloj de la pentofaranto... Kaj jen finita la fabelo pri la kapreoloj; kaj la fabelo ne iras plu; ĝi elĉerpiĝis, amen Jesu', kiel esprimas Baŭdilieto... —

Kiam la paŝtisto ĉesis paroli, Mila jam ne memoris pri sia edziniĝo kun Matio nek pri ia ajn meditiga priokupiĝo, kiu povus vualigi la kvieton de ŝia revigliĝo, kaj ĉar en la sekvinta tago ŝi aŭdis novan fabelon, kaj ankoraŭ alian kaj poste alian, — ĉar la majesta vervo de la paŝtisto ŝajnis eterna kaj nelacigebla kiel la marondoj —, Mila fine perdis el la vido sian propran vivon sensignifan kaj mizeran de modesta homestaĵo, por plene eniĝi en la fantastan vivon sur la montaro. Pro la sorĉo kaŭzita de la malavara kaj ardanta fantazio de sia amiko, la virino vidis larĝiĝi la konturojn de la Ŝtonegoj ĝis ili akiris la enhavoamplekson de kompletaj mondoj, kiuj tuj pleniĝis de vizioj, de revoj kaj de eksterordinariaj ĥimeroj. Ŝi perceptis, ke legendo elŝprucas el ĉiu loko, el ĉiu roko, el ĉiu branĉeto, kaj la sento pri io mirinda vekiĝis en ŝi, kiel nova superkonscio. Samtempe vekiĝis en ŝi, ekstaza fervoro

por tiu ŝrumpa hometo, kiu, helpe de lerteco kaj bonvolo, ŝin altigis ĝis serenaj spacoj, kiujn ŝi neniam ankoraŭ estis koninta.

Unu tagon, kiam li ĵus parolis, ŝi, lin rigardante per amvenkita rigardo de enamiĝintino kaj resumante en kvar vortoj ĉiujn siajn admirojn, al li demandis:

— Kiel vi aranĝiĝas, paŝtisto, por ekscii tiom da aferoj?—

La paŝtisto simple ridetis.

— Mi nenion faras por ion ekscii, ermitino. —

— Do, kiu instruis vin pri ĉiuj ĉi fabeloj? —

La paŝtisto ŝovis sian plušĉapon malantaŭen, kaj la paleco de lia frunto graveda je pensoj, ŝajnis elradii specon de lumbrilo.

— Unujn, la pli mallongajn — malrapideme li respondis— rakontis al mi la geavoj de la farmodomo de Sankta Poncio; la ceterajn... Nia Sinjoro... —

Kaj ĉar li rimarkis, ke la virino plu ŝin rigardas ne palpebrumante, li klarigis la misteran respondon:

— Kiam mi malkovras novan plaĉolokon sur la montaro, mi sidiĝas tute sola kaj ĝin profunde rigardas longan tempon; kaj ĝin rigardante, mi sentas varmon en la stomako, kaj iom post iom tiu varmo suprenrampas en mi kiel fumnubo, kaj plenigas mian kapon kaj meditigas min, meditigas... Kaj kvazaŭ voĉo ilin al mi diktus, venas en mian menson ĉiuj aferoj, kiuj verŝajne okazis sur tiuj lokoj... Kaj jen pro kio mi asertas, ke ilin al mi rakontas Nia Sinjoro, do, diru: ĉu povas esti alia, se ne la voĉo de Nia Sinjoro, tiu, kiun oni aŭdas, ĉi-tie interne, kiam oni meditadas? —

Kaj en la serenaj okuloj de la fabelkreinto, brilegis la firmeco de sankta konvinko, tute senigita je vantaĵoj, dum Mila sentis ke, antaŭ la eminenteco de la elektito, ŝi humiliĝas ĝis la polvo de la tero.



XIII

LA SUPRA-ALTAĴO

ALVENIS la tempo, kiam la paŝtisto forlasas la ermitejon kaj enloĝiĝas por la tuta vintrodaŭro en la farmodomon de Sankta Poncio, en la grandan kuŝejon ŝirmitan sub la senmezura granita kapo de la Blua Knabino. Konante per scio kaj sperto, ke li estas la animo de tiu ĉi domo kaj ke, post lia foriro, la virino restos liverita al la kaprico de la senkonsoloj, kiuj ŝin sieĝas, li celis prokrasti kiom eble sian malsuprenIron, sed li plu ne povis atendi. Li havis antaŭ si la periodon de la pluvoj kaj pli ol unu tagon la senĉesa pluvetado malpermesis al li elkonduki la brutaron, kaj devigis lin restadi la sena-

gajn horojn en la kuirejo, farante ian ajn superfluan bagatelon aŭ interparolante kun la kapringardistoj el Murono kaj el Ridorto, kiuj ankaŭ pro la pluvo devis rifuĝi tien dum la paŝtiĝo de siaj brutoj. La farmdomanoj de Sankta Poncio jam kelkfoje plendis al li, ke li tiel longe prokrastas la revenon; ili faris tion pretekstante, ke Baŭdilieto perdas la lernotempon, sed efektive tio estis pro la fakto, ke ili domaĝis la malkreskon de sterko, kiun tiu prokrasto reprezentis por la stalo. Eĉ la Spektro, la malbona vespo kia estas la Spektro, — unu tagon kiam li, sur la glitigejoj de la Kranio, vid-al-vide renkontiĝis kun Marinjo el la farmodomo kaj la vojo trudis al ambaŭ nelongan kunmarŝadon, — aŭdacis al ŝi diri, ke ili ne plu atendu malsupre la paŝtiston en la daŭro de la tuta vintro, ĉar li havas tro da taskoj en la ermitejo, nun kiam Matio ĉiam de tie forestas, kaj neniu lin malhelpas. Marinjo raportis, akcentante ĝian sencon, tiun malicecon de la Spektro, kaj la paŝtisto, malgraŭ tio, ke li respondis al la farmeja bofilino per trankvila kaj petola rideto, estis decide dirinta al si mem, ke jam estas tempo fine forlasi la ermitejon. Tiun vesperiĝon li tion sciigis al Mila. Kunestis ĉiuj tri — ŝi, li kaj la knabo — en la kuirejo, starantaj kiel muro apud la kameno; Matio ankoraŭ ne estis suprenveninta aŭ, kio ŝajnis pli probabla, li jam ne suprenvenos.

La paŝtisto ĵus lokis tri aŭ kvar arbustaĵojn sur la naskiĝantan flameton kaj, tute kaŭriĝinte por ilin firmigi, li duonturnis la kapon al la virino.

— Cetere, ermitino, decas, ke mi preparu por vi iom grandan staplon da fasĉinaĵo, antaŭ ol definitive vin forlasi... Ĝuste morgaŭ la etulo kaj mi konkuros kun la fasĉinportistinoj, ĉu ne, sturneto? —

La virino vive sin turnis.

— Ĉu vi volas jam baldaŭ foriri? —

La paŝtisto surpremis la arbustaĵojn per la manplato.

— Hodiaŭ estas sabato, ĉu ne?... Do proksimume je... je la mezo de la venonta semajno. —

Li volis esprimi "lunde aŭ marde", sed li ne kuraĝis. Mila eksentis varman fluon sur la vangoj, kaj nur murmuris:

— Ĉu, efektive?... — Sed tuj poste ŝiaj okuloj larmis. Al

la paŝtisto ŝajnis, en la flagranta mallumo de la ĉambro, ke ŝi kaŝe pasigas la fingron sur la larmodukto (1), kaj li turnis la vizaĝon kontraŭflanken por ne vidi tion.

Baŭdilieto eltondis kun multe da zorgo la unuopajn bildetojn el halelujo (2), kiun al li donacis la sinjoro Paroĥestro kaj nur atentis sian laboron.

La virino silabis per konfuza voĉo:

— Kaj do, kiel mi de nun aranĝiĝos ĉi-tie, tute sola?... —

La paŝtisto ree submovis la arbustaĵojn kaj ili krakis, kvazaŭ ĉifita papero; ĉar li nenion respondis, restis al la virino la dubo, ĉu li ŝin aŭdis. Post nelonge, ŝi redemandis samtone:

— Vi promesis al mi, ke ni supreniros al la Supra-Altaĵo... —

Tiun ĉi fojon la paŝtisto ŝin perfekte aŭdis.

— Ni ja devos tien ascendi, se Dio volos! Ba! nur tio mankus, ke vi restus ne vidinte nian montokupolon! De la kruco mem, se la ŝanco favoras, oni povas malkovri duonon da reĝlando... —

— Tamen, se vi foriras... —

— Tagoj restas, por tio... kaj ni nur bezonas unu por tia tasko, mi pensas... Kiun vi preferas? —

— Por mi tutegale... Tiel malmulte la taskoj premas min...—

— Morgaŭ estos mestago; do, nekonsiderenda... Ĉu ni iru lunde? —

La dimanĉon gutpluvis kaj Mila sentis sin la tutan tagon kaptita de stranga maltrankvilo, sed antaŭ la vespero la ĉielo sereniĝis kaj la paŝtisto aŭguris bonan veteron por la morgaŭo. Ili ellitiĝis kiam ankoraŭ ne estis matenruĝo, kaj la luno sin montris sur la malvarma ĉielbluo kiel blanka arko de ungo.

Mila febris dum la tuta nokto, kaj neintensa deliro, kiu malebligis al ŝi konscii, ĉu ŝi nur sonĝas aŭ normale rezonas,

---

(1) Larmodukto = Larma kanalo.

(2) Halelujo = Tuto da etaj bildoj, laŭorde vicigitaj, presitaj ĝenerale sur papero, eksplikantaj per suba legendo la diferencajn epizodojn de biografio, historio, religio, ktp.

lasis al ŝi specon de panika konsterno. Dum ŝi tratrancis la duonon de nigreca panrulo, kiu kuŝis sur la tablo, la paŝtisto konsilis al la virino, taŭge sin pretigi per subvestaro, ĉar la frumateno estos trancĉa, kiel klingo de ponardo.

Baŭdilieto, kun la manoj en la poŝoj kaj la ŝultroj sub la oreloj, kuntiriĝis apud la fajro, oscedante ĝis ŝiriĝo de la buŝo. Tiun tagon li do restos mastro de la ermitejo kaj de la havaĵo, ĉar konsiderinte, ke ankaŭ Matio forestis kaj la knabo jam ofte vizitis la Supran Altaĵon, ili lin lasis tie, por ke li prizorgu la brutojn kaj komencu ilin elkonduki, se je la elirhoro la paŝtisto kaj Mila ankoraŭ ne estus revenintaj.

Ĉiuj steloj estis malaperintaj, kiam ili forlasis la ermitejon, malsuprenirante tra la senkulturejoj rekte al la avangardaj pinaroj.

Post si ili aŭdis la hurlon de la Strigo, furioza ĉar ĝi ne povis akompani la paŝtiston, kaj teneran kaj perkutan voĉon kiu, de sur la teraso, vokis al ili: "Adiaŭ... adiaŭ!..." meze de la sarkasmaj eĥoj de la Trumpetulinoj.

La paŝtisto pravis: regis intensa malvarmo, akcentita de la matenkrepusko. Ankoraŭ ne okazis neĝado, sed la prujno blankis surgrunde, kaj ŝajnis, ke oni tretas vitrorubaĵon. Kvin minutojn, post kiam ili forlasis la domtegmentojn, Mila sentis frostotremojn, kaj imitante Baŭdilieton, ŝi ne ĉesis kaŝi la kolon mezen de la ŝultroj. Ili proksimiĝis al la Akvo-Muĝulo, kaj la zumanta bruo de la akvo, kirliĝanta unue en sia kaverno kaj poste batiĝanta de roko al roko, kondukis malproksimen la eternan ronkon de la monto.

Kiam ili estis tie proksime, tiu bruo, centobligita de la hiperakustikaj dumnoktaj iluzioj, tiel multe imponis Milan, ke, tute timpremita, ŝi apudiĝis al la paŝtisto.

Tiu ĉi marŝadis silenta kaj enprofundiĝinta en Dio-sciaskiajn-pensojn; sentinte la virinon tuj apud sia brako, li turnis la kapon, kaj lia iniciatita rideto forviŝiĝis en la malcertaj lumbriloj de la ektagiĝo.

— Ho!... Kian ĝuon donas travagi mondon je certaj horoj, ĉu vere? — li esprimis per voĉo tute mildigita; kaj, ne atendinte respondon, li denove rigardis fikse antaŭen.

Mila tiam konstatis kion jam ŝi plurfoje estis konstantinta: ke dum ŝi staras proksime de li kaj forte perceptas la ĉeeston de tiu viro, li, kondukata de la flugiloj de misteraj pensoj, forrapidas de ŝi, kaj ŝin tute forgesas.

Simila rivelado, kiu ĉiam estis al ŝi nova kaj ŝin vundis kun sama surprizo, igis ŝin apartiĝi de la paŝtisto kun speco de hontema pudoro. Same okazis al ŝi nunfoje. Ili trairis la pinarojn de la ambaŭflanka deklivo por ekpreni kaprinvojeton, kiu sekvis la implikitajn bazokrutaĵojn de la Alta Ŝtonego. La virino lasis, ke li iru tuj antaŭe tra la maldensiĝanta duonmallumo, kaj ŝi plue lin sekvis postkalkane.

La unuaj lumbriloj de la tago komencis nepercepteble fali, kiel delikata pulvoro, kaj ilia malprecizeco mem, pli ol la kompleta mallumo, farĉis la arbaron per suspektoj kaj malfidoj. La spaclimoj kaj la proporcioj intermiksiĝis kaj ĉio alprenis magiajn ŝajnojn, kiel en la fabeloj de la paŝtisto. Mila, sencele marŝante, ekturnis, ĉiam pli ofte, la kapon de unu flanko al la alia, kaj sentis, ke vekiĝas en la fundo de sia estaĵo iu timo nelogika, freneza, kiu ŝin multe martirigis kiam ŝi estis infanaĝa. Jen ŝin surprizis la sensacio, ke ŝi paŝas ne tuŝante per la piedoj la teron, jen al ŝi ŝajnis, ke el ĉiu roka faldangulo, el ĉiu rubusuja grupo, devis eliĝi blanka osta mano por ektiri ŝian jupon; kaj la pinoj, tiuj pinoj kun fantaziaj kaj konfuzaj siluetoj, kiuj intermite lasis grandajn maldensejojn, por kolektiĝi tie ĉi kaj tie en grupoj, alprenis en ŝiaj okuloj la aspekton de malbonfaraj fantomoj kiuj, senmovaj kaj spionemaj, atendas, ke ŝi preterpasu por poste, ĉiuj kuniĝi kaj persekuti ŝin kun perversaj intencoj. Kaj tiam ŝi sentis impulsojn ankaŭ kuri internen de la arbaro, en lokon kiun ŝi ne konis... Tiel ŝi iris kelkan tempon ĝis kiam, neatendite, la nuda ungego de eriko al ŝi gratŝiris la antaŭtukon, kaj tiam la impulso fariĝis tiel vigla, ke, nekapabla sin deteni, ŝi ĵetis krieton, kaj fuŝe impetis al la paŝtisto.

Tiu ĉi turniĝis, kvazaŭ per risorto sur siaj kruroj kaj surprizite haltis.

— Kio estas al vi, ermitino? —

Ŝia voĉo artikiĝis skuata de forta impreso.

— Aj!... Mi ne scias... nenio... Frenezaĵo. — Kaj la viri-

no, hontigita de sia teruro, tute ruĝiĝis sub la rigardo de la paŝtisto.

Tiu ĉi subite trankviliĝis.

— Ankoraŭ la sorĉistinoj, ĉu ne?... Mi pensis Dio-sciaskion, pro tiu krio... Kaj do, ĉu versâjne via malsano ne multe pliboniĝis? Vi estas kompatinda, tutcerte... —

Kaj kvazaŭ pentante, ke li tiel longe ŝin neglektis, li ne plu foriris de ŝia flanko. Pro la mallarĝeco de la pasejoj, kelkfoje iliaj korpoj kuntuŝiĝis, kaj en la seka matena malvarmeto, la virino kredis percepti la varmeton de tiu kontakto, kaj plezuriga tratremo movetigis ŝiajn ŝultrojn kaj igis ŝin denove protekti ilin per la ŝirmotuko. Ili marŝis en silento, ĉe ĉiu spiro elĵetante, tra la nazo kaj buŝo, blankajn fumnubojn, kiuj vagis, kiel nubaj deŝiraĵoj, antaŭ ilia vizaĝo, kaj la frotpremo de iliaj piedoj sur la prujna pinpingla tapiŝo estis la sola kraketado, kiun ili aŭdis.

Iom post iom ili forlasis la densaĵon de la arbaro, kaj la montogorĝo, jam per si mallarĝa, ankoraŭ plimallarĝiĝis laŭmezure kiel la pinoj maldensiĝis, kaj kanaliĝis kiel la divida sulko de du mamoj inter la krutaj deklivoj de la ĝemelaj Ŝtonegoj. Tiuj ĉi rektiĝis, imponaj kiel ciklopaj muregoj, ambaŭflanke, kaj ŝajnis, ke ili daŭre proksimiĝas kun deziro kuniĝi kaj dispremi inter si la du homflokojn, kiuj kuraĝis perturbi ilian ripozon en tiuj malkutimaj horoj.

Mila, denove malkvietigita de stranga sensacio de sufokiĝo, alkroĉis la rigardojn sur la branĉidojn, florantajn per blankaj gutejoj, kaj ilin levis supren, supren, ĝis ili renkontis la malklaran volbovelon de la firmamento. Rande de tiu ŝiraĵo el silko unukolora kaj ankoraŭ nelumbrila, ŝi perceptis, subite, kvazaŭ sonoran fosforeskon, iun kontinuan kaj moviĝeman pepadon, kiu ŝajnis pendanta en la aero, senpeze ŝvebanta super la Montokolo de Sankta Poncio, kaj sen forto por disfali malsupren de la fendego.

— Ĝi estas la Birdokaĝo — laŭtigis la paŝtisto, signante al ŝi la altecon per levado de palpebroj. — Nun kaj noktiĝe, se vi troviĝus, tie supre, la birdetoj forpikus al vi la okulojn. Ekzistas tie, kvazaŭ miloj da miloj da ili, konsideru... De

tiu altaĵo ili sin defaligas sur la grenejojn de la ebeno kaj ĉion avare forglutas... —

Iom pli malsupre de la Birdokaĝo, la dekstra krutmurego fendiĝis kvazaŭ tondita, kaj du dentoformaj montoŝiraĵoj aŭdace elstaris super ĉiuj aliaj, simile al du grandaj embriaj ungegoj.

— Kio estas tio tiea? — demandis Mila ĝin rimarkinte.

— La Kombiletoj. Tiuj du estas la grandaj kaj trans la Montokolo kuŝas la malgranda. De sur la eĝo de la Rigardejo oni vidas ĉiujn ilin tri en vico, kaj pro tio la gurgon, kiu kuŝas malsupre, oni nomas la Gurgo de la Tri Kombiletoj. Famo kuras, ke pratempe ili konsistis el orlakita arĝento, kaj

la sorĉistinoj ilin trempis en la senmovajn akvojn de la Gurgo kaj poste, per ili, la harojn malimplikis al la personoj, kiujn ili volis ensorĉi, por ke al ili restu, jam de frua juneco, la hararo blanka kiel tufo da kanabo.

La paŝtisto, sen deziro por paroli, ne longigis la eksplikojn, kaj ili ree antaŭeniris en silento, ĝis nova akcidento de la loko elvekis en Mila novan scivolon.

Ĝis tiam la ravino daŭre profundiĝis kaj, alveninte ĝuste sub la Kombiletoj, la paŝtisto kaj Mila sin trovis en la loko

plej profunda. La trancîtaĵo de la talusoj malfermiĝis laŭ formo de V, kaj la muroj, kun grandaj krustoj, kiuj elstaris unuj super la aliaj, kiel aknoerupcio malmoliĝinta sur la skvama haŭto de granda monstro, malsorbis akvon, kvazaŭ ili ĵus estus ricevintaj grandan pluvon, kaj aspektis tute cindrokoloraj pro la naskiĝantaj bluoj de la ĉielo, kiun ili pale spegulis. Tie ĉe la supro brilegis la tago, kaj ĝia heleco ŝajnis plimallumigi la ombrozonon de la montokolo.

— Kian timon kaŭzas ĉi tio! — murmuris Mila ĉion esplorante per la rigardo kaj premante la brakojn kontraŭ la korpo.

— Ni staras en la Kavo de la Fulmo-Pasejo. Se iam vi estus ofendinta iun malbonfaran animeton, neniel pasu ĉi-tie tute sola. Ŝtono, kiun oni ĵetus al vi de sur la Kombiletoj, lasus vin platigita kiel hostio. Mi jam de longe malkutimiĝis veni ĉi-tien kun la grego... Konsilinde estas ne tro fidi. —

Kaj serioza ventblovego sulkigis la frunton de la paŝtisto. Nun Mila, bone distingante en tiu mallumo, profile ekzamenis la trajtojn de la viro kaj en ili ŝi trafis ion strangan, fiktivan; esprimon, kiu al ŝi estis nekonata. Tuj poste terurfrapo trapikis ŝian koron. — Kaj se li mem estus la malbonfara animeto, pri kiu li parolis, kaj subite sin turnus kontraŭ ŝi? — Antaŭ tiu penso la virino konsciis, ke ŝi paliĝas kaj restis abrupte plantita. La paŝtisto, kredante, ke ŝi tion faras pro la mallarĝo de la vojo, trankvile antaŭeniris. La ruĝa mantelo, faldita kaj tralokita sur la ŝultroj, kovris liajn kolon kaj dorson ĝis la brakartiko, kaj la ŝvelaĵo de la felsako, kaŝita sub la kamloto, faris al li kvazaŭ grandan ĝibon. La virino longe fiksis sur tiun dorson la pupilojn ankoraŭ dilatiĝintajn de la terurskuo. Ne: la paŝtisto neniel estas malbonfara animeto; ŝi estis certa kaj firma pri tio, kiel pri sia vivo mem; sed... — kaj la suspekta ideo prenis vojon pli ŝajnigan por denove elveki la maltrankvilon — sed... la viroj, eĉ ne estante malbonaj, havas avidojn, havas tentojn, kiuj foje ilin falpuŝigas, pekojn, kiuj transiras ĉiujn iliajn intencojn kaj renversas ilian konsciencon. Proverbo certigas, ke la okazo naskas la ŝtelisto, kaj ili tiumomente troviĝis interne de abismo, malproksime de la vido kaj de la aŭdo de kiu ajn persono; nur Dio

sciis ilin en tiu loko kaj povis esti la sola atestanto de iliaj agoj; tamen, kiu havas kanajlan intencon, tiu ja ne pensas sin kaŝi antaŭ Dio; li pensas nur pri la homoj...

Kaj Mila, agitita de longa frostotremo, revidis, en la prujna ombrodenseco de la Fulmo-Pasejo, tiun varman, fervoran, senfinan rigardon, kiun forvišis tie, en la korto, la matenon de la malpaciĝo, la ruĝo de la lipoj de Arnaŭ de Sankta Poncio, rompante por ĉiam la altiran fluon, kiu establiĝis inter la fraŭlo kaj la virino. Tiu rigardo ŝajnis rivelo, promeso... Do, ĉu estus mirige, se...? Kaj la virino, kun sango glaciiĝinta, akceptis la eventualecon de tia horora okazaĵo.

Tio estis nova minuto de instinkta timego; tamen, abrupte, kvazaŭ oni malfermus plennokte la pordon de balkunvenejo, ŝia teruro pleniĝis de lumbriloj, kiuj ŝin blindigis, kaj zumanta tumulteco brusurdigis ŝin. Ŝi subite klare vidis en la fundo de sia animo, kaj sentis sen ombro de dubo aŭ de mistero ke, se estus okazinta aŭ okazus *la afero tia*, ŝi, venkita, kapitulacinta antaŭ ol batali, ja ne trovus en sia sino impulson de ribeliĝo aŭ de sindefendo. Ne: se li, la viro saĝa kaj bona, tie en la serena trankvilo de la montosuproj aŭ ĉi-tie, en la tentanta mallumo de la profundaĵo, estus apudiĝinta al ŝi kaj ŝin estus preninta inter siajn brakojn, tute kiel li prenis ŝafidon ĵus eliĝintan el la internaĵoj de la ŝafino, ŝi ja ne sentus en si, la forton por peti helpon, ne intencus forkuri, ne trovus vorton de rifuzo aŭ spiron de spitiĝo... Ne, ne: ŝi lasus sin ekpreni obeema, jubilanta, ŝi lasus sin alpremi kontraŭ tiu protekta brusto kaj, neniigita en la paroksismo de la voluptoj, ŝi estus volonte liverinta al la amiko, la helon de siaj pupiloj, la ardon de siaj lipoj, la supermezuran feliĉon de sia korpo... Kaj kun la rigardo nubigita de la sveniga enreviĝo, la virino gustumis la dolĉojn de la ama ĉirkaŭpremo kaj sentis sin transportita al la misteraj mondoj, kiujn li sola vizitis, kiam lia animo forŝoviĝis el la tero.

La paŝtisto abrupte turniĝis.

— La ĉielo min prenu! ĉu vi jam laciĝis? —

Mila, sencele marŝante, plipostiĝis kaj ĵus restis denove haltinta. La vortoj de la viro ŝin surprizis, kiel neatendita pafo. Ŝi intencis rideti kaj rigardadis la paŝtiston per la mire-

ga rigardo, per kiu oni rigardas la nekompreneblaĵon, tion, kio estas eksternatura.

Tie, je dekduo da paŝoj, staris li, ŝin atendante, plantita, kun sia teniĝo kvieta kaj ordinare serena kaj kun la eterna rideto vaganta sur liaj lipoj.

La virino juĝis sin amare ridinda antaŭ siaj propraj okuloj. Ĉu li, kapabla efektivigi kanajlaĵon? Ĉu li kapabla intenci ŝin ekpreni kun freneza avido pro deziro aŭ kun la bravigînta forto de energia volo? Kia frenezaĵo!... Kaj la evidenteco de tiu nova elreviĝo hontige vipis al ŝi la vizaĝon, kiel sarkasmo. Ŝi sentis sin bela, apetitiga, avidinda kaj avidita de la viroj: unue la diboĉaj sovaĝuloj el la pilgrimantaro, poste la urbaj rondoj da ĉasistoj, kaj ĉiuhore la sopiranta pleneco de ŝia animo tion al ŝi klarvide pruvis. Sekve, se estis tiel, kial ŝin ne avidis, kial ne mordis en ŝin, kiel en dolĉan kaj ĝustmaturan frukton, ankaŭ tiuj du viroj — Matio kaj la paŝtisto —, al kiuj ŝi estis dezirinta fari malavaran donacon de si mem? Matio havis ŝin kiel oni havas ĉiujn kutimojn: sen ia iluzio, sen ia surprizo, sen ia sopiro: eĉ ne fajrero de la sankta brulrestaĵo estis povinta ekbruliĝi en tiu malvarma animeto por ĝin animi kaj ŝprucigi en ĝi la logincitan flamon. Kaj la paŝtisto? La paŝtisto ŝin ne havis nek iel volus ŝin havi. Antaŭ, kiel post la malpaciĝo, li estis por ŝi, same kiel li estis por la farmeja bofilino, kiel por Baŭdilieto kaj eĉ kiel por la brutoj mem,— speco de bonfara providenco, kiu ĉion egale protektas, sen distingoj kaj sen preferoj.

Subite tiu providenco tuŝis la brakon de la virino, kiu, surprizita meze de siaj meditoj, faris salton posten.

— Ĉiam vi timpremiĝas, certe! Oni dirus, ke vi estas knedita el hidrargo... Ha! tiuj nervoj, tiuj nervoj, ermitino!... — Kaj la paŝtisto kormole ŝin minacis per sia felaspekta mano.

— Mi iris distrite — konfesis la virino.

— Tion mi ja tute kredas! Kaj ke vi havas tian manieron iri distrite, ke neniam vi ion atentas! Cetere, mi volus eldiri, ke nun ni jam povas interparoli. Dum mi rondiras kaŝitajn kavernojn kaj en mallumo, mi amas pli movi la okulojn ol la langon. Oni ja ne ĉion scias, kion la montaro verŝajne portas

sur si, komprenite? Nun, ĉar mi povas disfaldi ĉiuflanken la rigardon jam estas alia afero. —

Tiam Mila rimarkis du aferojn, kiujn ŝi estis neglektinta: unuan, ke jam tagiĝis, duan, ke ili estas baldaŭ eliĝontaj el la Montokolo de Sankta Poncio. Dudek paŝojn pluen, la dekstra krutmurego ĉesis, preskaŭ apike eltranĉita, kaj la Montokolo subite malaperis kiel strato, kiu estingiĝas. Plenigis la vakuon surfaco da ĉielo lumhela kaj glata kiel spegula kristalo, kaj supre sur la altega fendego, kvazaŭ ĝin kulminante, leviĝis ŝiraĵo de krutŝtonego soleca kaj svelta kiel tureto de mezepoka kastelo.

— Ĝi ŝajnas la Limŝtono de la Maŭroj! — diris Mila, ĝin signante.

— Kia diferenco ja inter unu kaj alia, ermitino! — al ŝi respondis la paŝtisto. — La Limŝtono estas grajneto de milio kompare kun la Judo de Pom-Ŝisklenj'... Ĉi tiu eblas havi altecon, kvazaŭ de dek sonorilturoj kiel tiu de la ermitejo, kaj homo, staranta tie supre, ŝajnas ne pli granda ol moskito. Mi tien suprengrimpis rektalinie antaŭ multaj jaroj kaj riskis perdi la ekvilibron. Kia kruta irejo! Vi estus konjektinta, ke mi dancas sur pinto de pinglo. —

Ekster la Montokolo la tuta ridema vasteco de la spaco rultreniĝis super la montaro, dolĉe masaĝante deklivojn kaj rampaĵojn kaj komunikante al la lastaj limoj travideblecon kaj irizajn nuancojn de venecia kristalo.

— Ho! kiel bona estas la taghelo! — pensis la virino sentante, ke ŝia koro tute malfermiĝas kiel la spaco kaj ke, kiel ĝi, ŝi abrupte liberiĝas el la detruaj zorgomordoj, kiujn naskas la mallumo. Ŝi levis la kapon, jam tute sereniĝintan el la venenaj ideoj, kaj plenbuŝe enspiris la freŝan helecon, kiu ŝin ĉirkaŭis. La aero de la mateno, tranĉa kiel razilo sur tiuj suproj, ŝin fronte ekatakis, per lojala impeto de amiko, kaj ĝi muldiĝis sur ŝia vizaĝo kiel metalmasko.

La paŝtisto haltis, kaj sin apogis sur la celtisa forkbastono.

— Jen, kia superbela tago, ermitino. Nek vualo de nebulo treniĝas surtere nek floko da nubeto ŝvebas surĉiele. Ni ne povis trafi ĝin pli bona, tiel certe kiel ekzistas la mondo! De

supre ni vidos ĝis la lastaj malproksimoj... — Kaj sorĉita, ravita, li promenigis la rigardon de unu flanko al la alia, kun la majesta parsimonio, kiun uzas reĝo pompanta la purpuron.

— Ĉu vi divenus, kio al mi okazas, kiam mi suprengrimpas tiel? — abrupte demandis la virino, fermante la palpebrojn kaj klinante la kapon malantaŭen.

— Kion oni scias, sankta Dipatrino! — ŝercis la paŝtisto. — Oni diras, ke ĉiam okazas al la virinoj io stranga. —

— Jes, ĝi ja estas stranga... Jen vidu: miaj okuloj strabiĝas, kaj ŝajnas al mi, ke la ĉielo turniĝas kiel muelŝtono, irante malsupren kio estas supre; kaj kiam mi ĝin vidas sub mi, tute kvazaŭ mi ĝin rigardus en akvobaseno, venas al mi deziro min delasi kaj tute profundiĝi internen de la ĉielo!... —

La paŝtisto ŝin rigardis mirigite.

— Al mi ankaŭ okazas io simila, vidu! Nur ke mi sentas nenian deziron iri malsupren, kiel ŝtono, sed ĉiam supren, kiel la birdetoj de Nia Sinjoro. —

Kaj li ree marŝis diagonale tra la montaro sen vojo, ĉiam altiĝante kaj serĉante al si, kiel la kaprinoj, la taŭgan pasejon tra inter la cistoj, kermokverkoj kaj rosmarenoj, tiel kovritaj de prujno, ke oni konjektus ilin surŝutitaj per sabla sukero. De tempo al tempo li turniĝis por animi sian akompanantinon.

— Kiel teniĝas via kuraĝo, ermitino? Neniel elĉerpu la paciencon, ĉar ni baldaŭ atingos belan rigardejon. —

— Mi ja tute ne laciĝas, paŝtisto... Se ja ŝajnas, ke mi ĵus eliris elhejme! Ĉi tio estas kiel ŝtupoj, kaj tiu ĉi venteto tiel subtila donas tian stimulon por supreniri! — Kaj, efektive, la virino, incitita kiel soldato, kiu marŝas sub la tolo de flago, suprengrimpis kun viva impeto, sentante interne de la brusto dolĉan varmeton de nesto, kiu igis al ŝi ankoraŭ pli agrabla la malvarmeton de la atmosfero.

Ĉe ilia trapaso la kermokverkoj dismovataj ellasis la malplenajn ingojn de la gajloj, kaj la branĉetoj ankoraŭ florplenaj de la rosmarenoj priverŝis al ŝi la jupon, kaj elskuis sur ŝin la prujnajn kristaletojn, kiuj ilin kovris.

La virino tiam memoris la unuan supreniron al la montaro kune kun Matio: tiun supreniron tiel malgajan, tiel lacigan,

tiel pikitan de malklaraj antaŭsentoj meze de la reala trankvilo de ŝia tiama vivo. Kia diferenco inter tiu supreniro kaj la nuna, tiel agrabla, tiel rejuniga, en plena vintra krudeco, en plena malriĉeco kaj geedzeca fatalo! En spaco de monatoj ĉio estis renversiĝinta ĉirkaŭ ŝi, ĉio gajiga forkurinta de ŝia spirito kaj, malgraŭ tio, ŝi nur nun komencis senti sin animita kaj kvazaŭ sekura sur la tero, sin forte krampinta al io, kio, vole nevole, ŝin tenis surflose, ne lasante ŝin renversiĝi kun ĉio cetera. — Ho! kiel valoras la bonaj akompanoj! — pensis la virino dum ŝiaj okuloj denove karesis, sed nun sen malsana tumultemo, tiun superŝarĝitan dorson, kiu vojiris tuj antaŭ ŝi.

La paŝtisto alifoje haltigis la paŝadon.

— Rigardu la Pokalon de la Reĝo! — kaj li signis montomalsupren per firma gesto de gvidisto, kiu scias parkere ĉiujn terenojn kiujn li tretas.

— Aj, bona Dio! Ĝi ŝajnas paperkorneto! — ekkriis Mila mirigite. — Jen atentu! Ĉu tio ne estas la Blua Knabino? Kaj la farmodomo, kaj la Ponto de la Frapo, kaj...? —

— Ĝuste! Kaj Rokapera, kaj la Seĝeto de la Pendigito, kaj la Baŭo de la Olivarboj... Ĉio, kion oni renkontas irante laŭ la vojo al Murono... —

— Tiom da interspaco kiom, vojire, ekzistas de unu loko al la alia, kaj tamen, de ĉi-tie, kiel apudaj inter si ili ŝajnas!... —

Evidente. Funde de tiu speco de funelo, kiun formas la profundaĵo unuiganta la tri Ŝtonegojn, distingiĝis, tute amasigita kiel la feĉorubo en filtrilo, superkvalita abundo da kripa pejzaĝeto kovrita de kaŝejoj, de vojetoj, de naturaj altaĵetoj kaj de modestaj belaĵoj taŭge aranĝitaj de homa mano, kvazaŭ por prepari kaj serĉi agrablegan aspekton.

Ĉu vi vidas tiun specon de blonda pilko, kiu ŝajnas ruliĝi al la Baŭo? Ĝi estas Rokapera. Se tie, ĉe la ŝanĝiĝoj de vetero, vi aplikus ternivele la orelon, vi aŭdus ronki interne specon de sovaĝa besto, brave furiozanta... —

— Kaj kio ĝi estas, paŝtisto? —

— Kion oni scias, ermitino! Kompetentaj personoj raportas, ke la tuta montaro estas kava kaj plena de kavernoj, kiel

ĉe granda formikejo, kaj ke tiu bruego venas el la maro, kiu grumblas je kelkaj horoj malproksime... —

Post kiam Mila satrigardis la belan panoramon, ili denove grimpis laŭ la kruta deklivo, farante zigzagojn, jen antaŭen, jen kvazaŭ ili revenus sur siajn paŝojn, tamen altiĝante, altiĝante, ĉiam altiĝante. Kaj laŭmezure kiel ili altiĝadis, la Ŝtonegoj kreskis kaj vastiĝis, malkovrante, ĉe ĉiu paŝo, al la scivoligita virino ĉiujn lokojn, kiujn al ŝi estis menciintaj kaj konigintaj la fabeloj de la paŝtisto. Eble tiuj lokoj ne estis tiel belaj kaj imponaj kiel la panegira parolo de la viro kredigis al ŝi, sed la tago estis tiel hela, la horo tiel viviga, la ascendo tiel distra kaj plaĉa, ke Mila ĉion juĝis mirinda.

En unu el tiuj vojofleksoj orientaflanken, subite aperis ĝuste sub ŝi, kvazaŭ speco de granda etendita mantelo el verda veluro, kun la randaĵo sur la montoflanko kaj ĝi mallarĝiĝis pluen, al iu plumbokolora duonrondo, kiu ŝajnis utili al ĝi kiel pelerino kaj kiu siavice finiĝis en franĝo duberuĝa kaj mallonga, kiun oni supozus ĝia kolumstrio.

— Ĉu vi tion konas? — demandis la paŝtisto ĝin signante.

La virino bone atentis.

— Ĉielreĝino, la ermitejo! — Kaj kun infana manifestiĝo de ĝojo: — Kiel miniatura, kiel neta, kiel bela!... Rigardu la terason! Rigardu la tegmenteton sur la kuirejo... kaj la sonorilturon, rektan kaj blankan kiel anserkolo... kaj la sunflankon, kaj la pinarojn! Kiuj estas tiuj ĉi tiel densaj, ĉu la unuaj aŭ la duaj? —

— La unuaj, naivulino! Ĉu ne vi ja vidas la drakkapon de la Akvo-Muĝulo eligantan, meze inter ili, la nazegon? —

— Efektive, efektive. Eĉ mi aŭdas ĝian murmuron... — Ŝi turniĝis tute decide al la paŝtisto: — Kial vi ne kondukis min pli frue ĉi-tien? Ĝi estas la plej bela parto de la montaro... —

— Tamen, ĉu vi eble jam rimarkis tiujn stratojn el kermokverkoj bruligitaj kaj sen folio? La kapringardistoj el Murono ekbruligas en ili fajron por havigi al si, en printempo, freŝan kreskaĵaron, kaj nun la brutetoj renkontas tie nur karberetojn kaj jen vidu, tio ja ne estas bonkvalita manĝaĵo por ili, kompatindaj! Pro tio, mi ĉiam deklinas min al la alia flanko. Tiu tereno estas pli trankvila kaj certe neniu tien venas provoki konflikton al mi. —

Mila plu rigardis kun atento la ermitejon.

— Kion tie nun verŝajne faras la knabo? — duonvoĉe ŝi demandis.

— Melkas por la matenmanĝo — respondis al ŝi la viro; sed, tuj sin reĝustigante, li aldonis: — aŭ rostas al si pantranĉaĵon apud la kameno... Mi rimarkas koloneton da fumo sur la kamentubo... —

Kaj ambaŭ, li kaj ŝi, subite moligitaj de la komuna aminklino, revidis per fervoraj okuloj la amatan infanon, kiun unuafoje, kaj eble movataj de nekonfesinda deziro renkontiĝi solaj, ili estis lasinta sen bedaŭro.

Efektive, dum la longaj kaj erarvagaj promenadoj daŭre de la resaniĝo, por la virino tiel plenaj de kaŝita ĉarmo kaj avidaj je intimeco, la ĉeesto de Baŭdilieto estis por ŝi, pli ol unu fojon, superflua pro liaj ekstertempaj entrudiĝoj, liaj konsternaj tranĉaj krietoj kaj lia petola moviĝado. Kvankam ŝia aminklino al la knabo neniel malpliiĝis, ĝi tamen estis ne

tiel radianta nek tiel absorbema kiel antaŭ kelka tempo, kvazaŭ en ŝi denove regus la sentoj de virino super tiuj de patrino. Kaj, tion eĉ ne dirinte al si en la penso, pli ol unu fojon, ŝi esperis efektivigi unu el tiuj forkuroj, for de ĉio kaj de ĉiu, pri kiuj eterne revas la geamantoj. Tiun esperon plipravigis la instinkto, se ne la preciza kalkulo, kiu ŝajnis al ŝi sugesti, ke nur laŭ tiu vojo eble, fine, fandiĝos la glacio de indiferenteco aŭ de rezervo nepenetreblaj, donante al ŝia vivo ion gravegan, nerevokeblan. Sed la fluo de la okazaĵoj neniam estas tia, kian signas la fantazio de la homoj, kaj nun ŝi tion klare perceptas. Ŝi jam estis alveninta al la duopa soleca forkuro, al la dolĉa izoliĝo kun la amata estaĵo, kaj malgraŭ ŝiaj timoj kaj antaŭjuĝoj nenio estis okazinta, nenia peko estis efektivigita. Krom la malluma momento ĉe la Fulmo-Pasejo, en kiu ŝin regis perturboj kaj fortomankoj, kiuj nun, en la plena lumo, ŝin hontigas, tiu matena promenado rezultis por ŝi tute kiel la ceteraj, eble pli trankvila, pli naiva, pli senigita je kaŝiĝemaj emocioj, Efektive, tio estis la vero; sed, malgraŭe, el kio venas al ŝi tiu vivoplena ĝojo, kiu dimanĉigas (1) ŝian koron, hodiaŭ pli ol iam?

Ŝajnis, kvazaŭ la paŝtisto donus al ŝi respondon. Laca ŝin vidi senmova kaj kvazaŭ absorbita rigardante birdofluge la ermitejon, li subite kunbatis la manojn laŭ sonora klako, por ŝin vigligi, ekkriante:

— Ĉu ni reiru antaŭen, ermitino? Vi tiel gapiĝis rigardante vian dometon, ke mi tre bedaŭras distaŭzi vian kvieton. Sed, vidu, la suno rapide kuras kiel skolopendro kaj ni, pro la haltoj kiujn ni faras, ne plu alvenos al la fino... —

— Vi tute pravas. Ni iru, do... kaj ĉiufoje kiam mi plantiĝos, donu al mi viglan pinĉon. Mi gapiĝas kaŭze de tiu montaro tiel bela!... —

— Ĉu tion mi ja ne certigis al vi, kiam vi tiamaniere langvoris, ke vi ĉion opiniis pli malbona ol morta peko? Decas bone pripensi la aferojn antaŭ ol formuli aŭgurojn... —

— Kion vi volas rebonigi en tio, paŝtisto, se mi ne havas

(1) Dimanĉigi = Festoplenigi.

vian flegmon? — rapide respondis la virino, per tia impulsema animiĝo, ke al ŝi mem ĝi kaŭzis spriton.

Spriton ĝi kaŭzis ankaŭ al la paŝtisto, kiu ekkriis tute rideme:

— Jen kiel al mi plaĉas vin vidi, virino, kaj ne kun la beko sub la flugilo kiel pasintatempe! Laŭdata estu Dio, ke fine vi forpelis la ensorĉon. —

— Dank' al vi, paŝtisto! — esprimis ŝi, denove serioza.

—Ĝuste al mi! Ne igu min ridi, certe... Ĉiuokaze, al la glora Sankta Poncio!... —

— Preterlasu Sanktan Poncion, kiu tiel zorgas pri mi kiel pri neniaĵo! Vi, vi sola faris la miraklon, per viaj fantazioj, kiuj ĉion metamorfozas kaj vidigas laŭ flanko pli bela... Sen vi mi certe jam estus mortinta sur tiu ĉi montaro, kaj nun mi farus akompanon al la antaŭa ermitino, kiu estas enterigita sub la ŝtonplato ĉe la placeto. —

La paŝtisto ne respondis, tial ke li vidis je kelkaj paŝoj junuleton, kiu suprengrimpas tra la kruta deklivo, tute kapklininte, kun vergo el agnokasto (1) ĉe la dekstra mano, kaj balancante la maldekstran kiel pendolon. Malantaŭ li bando da kaprinoj, kun vigla vizaĝo kaj la mentono malkvieta, interpetolis disiĝinte sur la ŝtonplenejo.

Kiam ili interkruciĝis:

— Hola, knabo... —

— Bonan tagon, Kajetano... —

— Vi eliras frue!—

— Kion oni faru!... Tiuj ĉi diablaj brutoj englutus la hostimontrilon mem... —

— Por tio ili naskiĝis... Iru, kaj ne laciĝu! —

— Adiaŭ Kajetano, kun la akompanantino! —

Kaj li trankvile malproksimiĝis, kantetante melodion.

— Kiel plaĉus al mi esti paŝtistino! — certigis tiam Mila.

— Kiel ĉi tiuj? — ekkriis la viro kun malestimo. — Mallaborema junularo, kiu sin fordonas al la brutogardado por

---

(1) Agnokasto = Vegetaĵo verbenaca, du metrojn alta, bonodora, kun frukto ronda, malgranda, kolore ruĝe-nigra, kreskanta sur termuroj kaj malsekaj lokoj de la mediteranea regiono. Lat. Vitex Agnus-castus. Ĝi troviĝas en la P. V. de Emile Boirac.

eviti fleksi la dorson farante metion. Se ili falus en miajn manojn!... Korpremas min vidi ilin en vintro ĉe la suno, en somero ĉe la ombro, plenlonge sternitaj sur la deklivoj tute kiel atakitoj de apopleksio, sen ia inspiro en la cerbujo aŭ fajrero da bonvolemo por kia ajn afero. Ili suferigas la kompatindajn brutojn per malsatigo aŭ tromanĝigo kaj krom tio, ilin ankoraŭ vundas per ŝtonĵetoj... Ĉar ili fakte sin dungigas ne por alia afero krom por la mallaboremo, ĉu vi komprenas?... Ho! ke oni tiel forkonsumu la junecon, kvazaŭ ĝi estus afero ne estingiĝanta! —

Kaj la vizaĝo de la paŝtisto, ĉiam trankvila, serioziĝis per esprimo severa.

Kaj ili revidis, denove irante al okcidento, kaj de multe pli alte ol la unuan fojon, la Pokalon de la Reĝo, iel variinta je aspekto, sed ĉiam kava kiel funelgorĝo kaj kun ĝia ete ornamita pejzaĝo, de kripo, en la fono; kaj ili revidis ankaŭ la Tri Kombiletojn kiuj, apartigitaj kaj starantaj iom pli malsupre ol ili, kombetis la bluojn de la ĉielo, kaj poste la gorĝon de la Fulmo-Pasejo, kvazaŭ grandan sabron, kiu fendus la rokejon ĝuste ĉe la piedoj de la altega Judo el Pom-Ŝisklenj', kaj, post ĉio ĉi, ili komencis malkovri fordistancajn malklaraĵojn konfuze buntajn kaj kiuj ne estis io alia ol la malprecizaj teroj de la ebeno.

Tiam Mila haltis momenton por demandi:

— Diru, paŝtisto: por iri supren, ĉu ne ekzistas alia vojo ol tiu, kiun ni ĵus laŭiris? —

— Certe jes! Tiom, kiom vi volos, Ĉar la tuta montaro estas tio, vojo, vi povas ĝin ekpreni, kie ĝi plaĉas al vi... —

— Ne pasante tra la Fulmo-Pasejo? —

— Ha! Tiel ne... escepte se oni iras rektalinie, kaj tio ne estas konsilinda por virinaj kruroj; aŭ tra la Okulo de Korberoj... Vidu: temas pri tiu sunleviĝa intermonteto, trans la Ŝtonego... —

— Ĉu vere?... Lasu min reveni laŭ tiu flanko ĉe la malsupreniro... —

— Se vi havos sufiĉan kuraĝon, jes ja! Konsideru, ke ĝi estas vertikala kiel satanvojo kaj ne prezentas multe da vidaĵo... —

— Tute egale: ĝi ankaŭ plaĉos al mi. —

La paŝtisto ekridis.

— Mi jam divenas la intencon, en vi! Vi volas lerni parkere la tutan montaron... —

— Ĝuste tio, ĝuste tio, paŝtisto... —

— Do, jen: ni revenos laŭ la intermonteto... Vi jam estas rezistema kaj povas esti, ke ankaŭ plaĉos al vi tiuj glitigejoj de la Kranio. —

Mila atingis kion ŝi volis. Ŝi ne deziris denove pasi tra la Fulmo-Pasejo, la sola makulo en la daŭro de tiu brila promenado. Ĉu gravus al ŝi kuspi siajn piedungojn, kondiĉe ke ŝia bonstato neniel malklariĝu per angoraj pensoj de devojiĝinta virino, kiuj naskis ŝian honton kaj ŝian torturon?

Kaj ili daŭre suprengrimpis, ĉiam farante akutajn angulojn de oriento al okcidento kaj de okcidento al oriento. Jam la rigardoj de la virino, avidaj je horizontoj, komencis domini (1) la grandadorsan kreston de la Meza Ŝtonego; jam ili ĝin transiris, kaj ankaŭ subrigardis, de la kontraŭa flanko, la larĝan platformon linion; jam ili vidis la Flokon enfundiĝi inter la montaron, laŭ maniero de senmezura bolido (2) falinta el la ĉielo; jam malgrandiĝis iom post iom, ĝis ĝi similis sensignifan monteton, la ĝiba Malgranda Ŝtonego kun sia Plataĵo de la Limŝtono, kalva kiel ulcero, en la mezo; jam la suno, en purora flaveco, varme radiis sur tiun densan kolonaron, gratĉizitan sur detranĉaĵo de la ŝtonaro, kiu staris fronte al ili. Tiun kolonaron nomis la paŝtisto la Orgeno pro la kunfiguriĝo de ĝiaj vertikalaj reliefoj, kiuj konfuze memorigis pri tiuj de la tuboj de templa orgeno; jam, konklude, la virino vidatingis, sen videbla obstaklo, naŭ dekonojn de la spaco, kiam la paŝtisto, kiu ŝin iomete antaŭis, haltinte kaj atente rigardante al unu punkto, signis al ŝi, ke ankaŭ ŝi haltu.

Mila obeis kaj rimarkis surprizite, ke la paŝtisto rapide serĉas ion kaj, ekpreninte ŝtonon kiel pilketon, li adoptas la bravan kaj gracilan pozon de la ŝtonĵetisto, rapidege trastrekante la aeron per lerta svingoturno de sia dekstra brako. La

(1) Domini = Povi vidi de alta loko.

(2) Bolido = Fajra meteoro trairanta la atmosferon, kiu lasas luman postsignon kaj foje eksplodas kaj tondras.

ŝtono forrapidis kiel kuglo, kaj el la loko kie ĝi falis, leviĝis, proksimume tri spanojn alte super la tero, io, kio blondis kaj tuj fandiĝis. Ĉio ĉi okazis pli rapide ol dirite, kaj kiam Mila tion rimarkis, la paŝtisto, skuinte sian etenditan brakon, jam montris al ŝi harkovritan besteton, kiun li tenis malliberigita.

— Mi certigas vin, ke hodiaŭ la anĝeletoj sin klinas favore al nia flanko, tutcerte! Rigardu kian delikatan leporidon mi ĵus trafis sur ĝia kuŝejo. Ĝi troviĝas en fazo de tuja hararŝanĝo kaj estos pli molgusta ol folio de laktuko. —

Tenata je la malvarmaj oreloj, kun la kapeto fendita kaj sangoplena kaj dum, sub ĝia haŭto, kuris tremetoj post tremetoj, la besto elskuis per bruskaj resaltoj la postajn piedetojn. Aerblovo rapide pasis, malfermante strekojn kaj rondojn en ĝia hararo, longa ĉirkaŭ unu colon kaj pli malpeza kaj delikata ol lanugo ŝvebanta dum la ventoturniĝo sur la vojoj. La paŝtisto ĝin batsvingis kontraŭteren, tri aŭ kvar fojojn, por finmortigi ĝin, kaj eksplikis al la virino, mirigita de la simpleco de tiu ĉaso, la kutimojn de la leporoj.

— Rimarkinda afero! La leporo estas la besto plej subtila, kiun vi povas imagi, ĝi estas pli timigebla ol vi mem. Ĉio al ĝi figuras kiel malamiko, kaj tuj kiam ĝi ektimas ĝi fuĝas kiel la vento. Tamen, vidu, ĉiuj maleoj batas sur la kapon (1), kaj venas tago, kiam la leporo, kutime tro kurante kaj tro fuĝante por eviti la danĝeron, ĝin mem serĉas kaj ĵetiĝas rekte en ĝin. Kiam la leporoj estas tute ellaciĝintaj, ili bezonas longan ripozon, kaj tiam, en lokoj malmultе frekventataj de ĉasistoj, ili serĉas platan kuŝejon, kiu permesas bonan vidon, alpremiĝas al ŝtono aŭ tufo da arbustoj, kiu al ili utilas kiel parapeto, kaj endormiĝas tiel, ke ili ŝajnas mortaj. Nenion ili aŭdas nek vidas intertempe... kaj ĉi tiu ja ne estas la unua nek la dua nek la tria fojo, kiam okazas, ke mi ĝistuŝe apudiĝas al ili sen tio, ke ili moviĝas. Eĉ kaŭzas al mi specon de premo en la stomako, severe agi kontraŭ ili; tamen vidu, ĉar, se ili ne mortas per miaj manoj, ili ja mortos per ies aliaj, mi

(1) Maleo = Speco de granda ligna martelo. La frazo signifas: Ĉiuj ekstremoj estas malbonaj.

flankelasas la kompaton por pli bona okazo kaj ilin pereigas per trafa ŝtonĵeto... — Kaj la paŝtisto ekridis, sed vidinte, ke la virino, rigardante la leporidon, per kunsovo de brovoj alprenis sintenon tute ĉagrenan, li aldonis tiujn ĉi argumentojn: — Sed vi ja ne devas montri plorgrimacon pro tio, viavice! Finfine tio ne temas pri funeralo al la bopatrino; kaj kiam vi enpenetrigos la dentojn en ĝian femurkarnon, vi konsentos, ke mi efektive havis bonan ideon eligi ĝin el la mondo. Ĉar estas iom malsame matenmanĝi panrostaĵon kun ajlo aŭ leporidon kuiritan sur la fajrardaĵo... Kaj se mi ne eraras, ĉi tiu estos pli bongusta ol nubila (1) heredontino. —

Mila tuj senĉagreniĝis, kaj ili interkonsentis, ke tuj kiam ili atingos la Orgenon, ili kuiros la leporidon. Kaj dum ĉiumomente ties felo malvarmiĝis kaj ĝiaj membroj perdis la flekseblecon, viro kaj virino plu antaŭeniris kun revigliĝinta energio kaj amike konversaciante. Ĉe ĉiuj du-tri paŝoj Mila elpafis freŝajn kaj senmotivajn ridojn, kaj laŭ ilia vastiĝanta resono animiĝis la soleco de la montaro kaj la profunda kvieto de la suproj, kvazaŭ tie naskiĝus fontaj degutejoj.

Ili tuj alvenis al la Orgeno, tiu altega detranĉaĵo trastrekita de supre malsupren per malegalaj profundaj strioj elhakitaj de la kunfluoj de la akvoj, kiuj malsupren impetis kiel kaskadaroj dum la fortaj pluvofaloj. Fronte al oriento, ĝi prezentis tentantan ŝirmejon al la paro, kiu ĝis tiam estis suprengrimpinta en la ombro aŭ nur tuŝita oblikve, kaj ĉiam nur malofte, de kelka disradiado de tiu suno, kiu lumverŝiĝis tien en malavara abundo. Apenaŭ ŝi sentis sur sia haŭto, ruĝigita de la malvarmo, la kareson de tiu suninundo, Mila memoris similan impreson dum sia unua supreniro al la montaro: la impreson de sia alveno al la Limŝtono, post eliro el la Kanalo-Krurrompanta. Sed tiam estis printempo, kaj kiom ajn agrabla la suno estis post la ombro, ĝi ne povis tiom kontentigi kiel nun, meze de la frostoj de la vintro. Mila, apenaŭ haltinte, beate fermis la palpebrojn, rektigis la kolon, kaj, kun ĝemeto de ĝuo, prezentis la vangojn, unue unu, poste la alian, al tiu sunverŝo, kvazaŭ petante al ĝi, ke ĝi ŝin kisu.

(1) Nubila = Edziniĝopova.

Kaj la suno ŝin longe kisis, kvazaŭ ankaŭ plezuriĝante sur ŝiaj vangoj malvarmetaj, sur ŝia korpo ŝirmita kaj plena de frostotremoj.

— Ŝajnas, ke tio plaĉas al vi, ermitino! — al ŝi diris ŝia kunulo vidante ŝin tiel ekstaza.

— Aj, kiel tio revivigas! — respondis la virino. — Ĝis nun, vojirante, mi havis la impreson, ke mi ne povas min senti pli bone, sed nun mi rimarkas, ke tiam estis terure malvarme. Ĉu vi kredus, ke mi havas la piedojn rigidaj kiel lignaĵo? Mi ne sentas ilin ĉe mi... —

— Efektive, efektive... Pro la malsekeco de la tero kaj pro tiaj ŝuoj, kiajn portas vi, la virinoj, kiuj ja ne ŝajnas el ledo!... Ĉu vi scias, kion vi devus fari?... Dum mi iros serĉkolekti la lignon, demetu viajn ŝuojn, kuŝigu ilin en la sunradiojn kaj frotadu viajn piedojn por revenigi al ili la varmon. —

Mila tion faris. Ŝi senŝuigis sin, kaj per la ŝtrumpoj, ŝi donis al si fortajn frotojn, ĝis, fine, ŝi rozkolorigis la haŭton de siaj piedoj pli blankaj kaj sensentaj ol piedoj de statuo, kaj poste, anstataŭ sin tuj piedvesti, ŝi lasis ilin nudaj sur la varmeta grundo kaj sub la plezurigaj radietoj de la suno, kaj perceptis intensan ĝuon, sekvante, laŭlonge de la vejnoj, la jukon de la sango, kiu malsorĉiĝas kaj denove cirkuladas liberflue. Kaj tie, sidante sur ŝtono de la grundo, ŝi rigardis, kiel la viro okupiĝas, kaj poste firme eltenis la piedojn de la leporido, dum li, tranĉilon en mano kaj surgenue antaŭ ŝi, trankvile ĝin senfeligis.

La virino, tiam, sentis sin feliĉa, kvazaŭ ŝi neniam antaŭe estus tia; ridis ŝiaj lipoj, ridis ŝiaj okuloj, ridis ŝia animo kaj ridis, fine, la tuta spaco kaj la tuta montaro ĉirkaŭ ŝi. Ĝis kiam, meze de tiu spontana enridiĝo de la vivo, ŝin ekatakis impulsoj al kisado: impulsoj hastaj, ekscititaj, nerezisteblaj por kisadi ion... Nevolonte, tute treme, ŝi fleksiĝis al la paŝtisto, kies kapo, malkovrita kaj klinita super la leporido, proponis al ŝi je atingopovo de la lipo sian nukon, sed... antaŭ ol fini la agon, ĝin malhelpis surpriza afero. Ne sciante kial, ne aŭdinte la plej malgrandan brueton, ne obeante al ia ekstera signo, la paŝtisto kaj ŝi, per unu sama instinkta movo, levis la kapon alarmitaj por rigardi supren. Ili restis

sen spiro. Tie, ĉe la supro de la tuboj de la Orgeno, obskura tubero — alia homa kapo, kiu ŝvebis en la altaĵo, super la iliaj — vive posteniĝis kaj malaperis, ne lasinte postsignon. Tio estis nur fulma vizio, preskaŭ nur suspekto, kaj malgraŭ tio, la virino kaj la viro restis inertaj, ne palpebrumante, en la daŭro de pli ol unu minuto, ankoraŭ vidante sur la ĉielvolbo, kvazaŭ ĝi estus tie restinta stampita, la malhelan makulon de la kapo kaj la blankan movobrilon de ŝakalaj dentoj.

La paŝtisto estis la unua, kiu rekonsciiĝis. En lia defiguriĝinta vizaĝo aperis esprimo kruele decida, kiel ĉe luktanto je morto. Per unu mankapto li alnajlis la fingrojn sur la plusĉapon kaj ĝin premegis grincigante la dentojn, kvazaŭ por ekspansii la unuan impeton de detrua deziregó; poste li fikse rigardis al la virino.

— Ĉu vi vidis? — li ŝin demandis malrapide. — Certe, kiel ekzistas Dio, mi lin atendis hodiaŭ: mi estis konvinkita, ke li sekvas niajn paŝojn. Sed, ha! — kaj lia trankvila vizaĝo ardiĝis de flamo de kolero: — li ja ne skuu min, li ja ne min provoku! Ĉar, mi tion al vi ko.e ĵuras: li atingos malbonan vivofinon! —

Kaj per unu trafa tranĉilfrapo li vigle ŝirkrevigis la ventron de la leporido.



XIV

SUR LA KRUCO

Ĉiuj serenecoj de ilia ĝojo fandiĝis en la nubaroj de la konsterniĝo, kiu ilin invadis.

La paŝtisto, post senfeligo de la leporido, pretigis fajrujon ĉe kaveto el ŝtonoj, lokis sur ĝin kradrostilon faritan el torditaj vergoj de izola sorparbo, kiu staris tie proksime, kaj sur la kradrostilon li diskuŝigis la kadavron, laŭmeze malfermitan kiel libro, kaj longe frotŝmiris ĝiajn internon kaj eksteron per ajlero kaj kelkaj gutoj da oleo. Kun tiu spicaĵo, kaj tiu el sia propra sango en la mezo de gutado, la leporido rostiĝis, kaj ili, kapklininte kaj ĉiu remaĉante siajn pensojn, ĝin manĝis dentobroge kaj kun apetito, sed sen ple-

zuro; kaj el tiu matenmanĝo, kiu, laŭ la paŝtisto, devis esti pli bongusta ol nubila heredontino, kaj kiu efektive estus tia sen la amareco de la stranga matenokazaĵo, rezultis nenio alia krom la malgaja kontentigo de animala bezono.

De tempo al tempo, kaj dum ili manĝis, Mila, kaptita de malfido, vive levis la kapon, kvazaŭ por denove surprizi la spionon sur la supro de la krutaltaĵo de la Orgeno, ĝis la paŝtisto al ŝi diris:

— Ne plu penu, bonulino; ja ne timu, ke hodiaŭ li ree venos apud nin. Eĉ se la ĝendarmoj trakurus la tutan montaron, ili ne trovus plej etan spuron de la malspritulo... Li spionas kaj faras abomenaĵojn dum oni lin ne vidas, sed tuj oni lin malkovris, li malaperas, kvazaŭ englutita de la tero... Jen kial li ne plu vizitis la ermitejon post la bruego pro la kunikloj... Sed, ha! Decas tion definitive plibonigi, kaj se ne estos li, kiu venos renkonte al ni, ja ne mankos, kiu iros renkonte al li... —

Mila haltigis la viandotranĉaĵon vojantan al la buŝo, kaj eldiris kun tremo en la voĉo:

— Paŝtisto, pro amo al Dio! Lasu lin, lasu tiun ĉi viron... Nenion al li diru... —

— Manĝu, manĝu, ermitino, kaj ne plu donu al vi maltrankvilon... Ĉi tio estas afero mia... —

— Pro amo al Dio, paŝtisto, ĉar li verŝajne havas malbonan instinkton!... Li neniam kaŭzis al mi timon, kaj nun li komencas ĝin veki en mi... —

— Lasu ja timi pri vi, dum mi vivos! Mi ne scias kial, sed ĝi estas tiel; mi ĉiam inspiris al li pli da teruro ol la kruco al la diablo, kaj li neniam kuraĝis rigardi al mi en la vizaĝon per siaj bubalaj okuloj... Pri la kunikloj, pri la ermitejo, pri ĉia afero li senhonte riskos ĉar li kalkulas je la apogo de via edzo, sed pri vi li tion ja ne kuraĝos, ĉar li certe scias, ke mi tion de li ne tolerus! —

La paŝtisto ellasis tiujn vortojn en la daŭro de la konsterniĝo, sed ili iris rekte al la koro de Mila. Emociita, kun nodo en la gorĝo, ŝi nur esprimis:

— Paŝtisto... paŝtisto... — kaj du larmoj grandaj, kristalaj, rulfalis de ŝia vizaĝo.

La paŝtisto vive revigliĝis, kiel dormemulo surprizita de la tagiĝo.

— Kion tio signifas, ermitino! Mi ja ne volas, ke vi absorbiĝu en tiaj ĥimeroj, ĉar vi riskus malamikiĝi kun mi!—Li pene ekridis.—Videble vi tro fidas al vortoj, vi, kaj tio ja ne konvenas... Foje oni babilas, babilas, ne pripensinte, ke vi estas virinoj, kaj poste... Nu, ni tion lasu ĉi-punkte kaj ne plu parolu pri ĝi, komprenite? Ni formetos la manĝotukojn kaj reiros supren, se al vi plaĉos, aliflanke ni atingus, ke oni venu nin serĉi kun lanterno! — Kaj forĵetinte la ostojn kaj malfarinte la fajrujon per piedbato, li metis en la felsakon la uzilojn, kiujn li estis eliginta por la matenmanĝo, kaj en okulturniĝa daŭro li jam estis preta por ekmarŝi.

— Li min amas! Min amas! — decide deklaris la virino por si mem. — Li tion ne volas konfesi, ne konsentas, ke mi tion suspektu, sed li min amas! —

Kaj alifoje kun la okuloj kovritaj de larmoj, ŝi konsideris, kia estus ŝia feliĉo se ŝi estus renkontinta en sia vojo tiun viron pli frue ol la alian. Sed nun la ĵetkuboj estas jam luditaj, kaj kio povis esti la feliĉo, se ĝi okazus siatempe, nun jam nur povas esti kulpo, peko, adulto. Efektive: ŝi tion ne komprenis, ĝis ŝi malkovris super sia kapo la perversan kapon de la Spektro, sed de tiam, la kruela ideo pikis ŝin. Kian malbonon faris ŝi kaj la paŝtisto sub tiu Dia ĉielo, por ke ili devu timi viran rigardon? Certe, nenian! Sed malgraŭ tio, kiam falis sur ilin tiu de tiu diablulo, ili tiom konsterniĝis, ke ili estus donintaj duonon de sia vivo por ĝin eviti. Kaj tio okazis, ĉar tiu rigardo ilin vundis kiel insulto, kun la intenco, kiu ĝin animis, perforte malkovri makulon en iliaj vivoj, rabi la sekreton de ia supozata kaŝita intimeco. La paŝtisto kaj ŝi ja ne konkubinis, sed la Spektro tion suspektis, kaj, malkovrinte en li tiun suspekton, la virino estis dispremita kaj plena de neklarigebla teruro, tute kvazaŭ oni ŝin estus trovinta en vera delikto. Kredeble, ĉar ŝi duone efektivigis — se ne fakte, tamen enpense — tiun delikton, la virino jen angoris, ĉar ja ne doloras kio ne estas vundita, nek sentas la impreson pri la peko alia krom la pekinto mem aŭ tiu, kiu jam por-

tas en si la ĝermon de la peko. Sed, malgraŭ tio, pro kia motivo, pro kiaj kombinoj de la sorto devis esti malbona kaj abomeninda en difinitaj horoj, kio alitempe estus afero sankta kaj natura? Kaj kun sia rezonado sencele naĝanta en maro da konfuzoj, la kompatinda virino penis trovi la helan lumturon, la okultan leĝon pri tiu fenomeno. Ŝi ja ne sukcesis ĝin trovi nek liberiĝi de ĝia efiko. Unu afero estis certa kaj pozitiva: ke la ĝusta kaj sana kontentiĝo, kiun oni eltiras el tio, kion oni posedas malkaŝe kaj videbla por ĉiu, ne plu ekzistas por ŝi, kaj ke la kaŝita plezuro, la fraŭda feliĉo, estas malnobligaĵo, kokreco, peko... ĝuoj kondamnitaj kaj abomenaj al la konscienco. Preskaŭ pli valoras neniam ilin havi, ilin deziri; preskaŭ pli valoras reciproke sin amadi tiel, kvazaŭ ili sin amadus de malproksime, sen profito, sen limo kaj fino. Kvankam tia interamado estus nekompleta kaj kontraŭnatura, tamen en ĝi troviĝus pli da pureco kaj honesteco...

Kaj nun Mila, denove skurĝita de la vortico de siaj impresoj, variemaj kiel tempestaj ventoblovoj, arde admiras la paŝtiston kaj dankas al li pro tio mem, pro kio nelonge antaŭe, en la profundaĵo de la Fulmo-Pasejo, ŝi lin akuzis: pro tiu kvietigo de deziroj, pro tiu rezervo, per kiu li kovris, kvazaŭ per vualo de serena ĉasteco, la humanecon de siaj sentoj. Ĉar fakte li ŝin amas, ŝin ege amas! Ŝi ne povas, ŝi ne volas tion dubi... Lia rigardo en la mateno de la malpaciĝo tion certe ne dementis: li ŝin amas! Li ŝin amas pli ol ĉian alian aferon kaj zorgas pri ŝi!... Kaj, sorĉita de la konsola ideo, ŝi ripetis ĝin al si, ŝi ĝin vinktis en la cerbo, ŝi ĉirkaŭpremiĝis al ĝi kiel al sia lasta savotabulo...

Survoje antaŭen, ili estis alvenintaj, per alia brustostreĉo, preskaŭ al la kapuĉo de la Granda Ŝtonego, ankoraŭ ne lasinte la nordan flankon. Ili randiris laŭ abismoj kovritaj per kolrompejoj kaj, levinte la kapon, ili vidis, ke elstaras el la monto, aŭdace kliniĝante super la abismon el krutaj ŝtupoj kaj deklivoj, la supermezuraj Kasteloj de la Supra-Altaĵo, — la feroca kornico de ŝtonegoj, kalvaj kaj roditaj de la tempo, kiu ŝajnas la ruina barbakano de la fortikaĵo, kia estas la tuta Ŝtonego. Pasante sub ĝi, Mila iom klinis la kapon, kvazaŭ timante vidi, kiel disfalas, kun granda bruo, tiuj ŝtonkrustoj je nekalkulebla pezo de miloj da kvintaloj (1), kiuj, surmetitaj kvazaŭ hazarde, donas la impreson, ke ili faras mirindaĵojn pri ekvilibro en la vakuo. Sed la paŝtisto kaj ŝi senhalte preterpasis sub la Kasteloj, kaj la Kasteloj restis tiel, kiel ili staris dum jarcentoj kaj jarcentoj, firmaj kaj neŝanceleblaj sub la ĉielo kaj kvazaŭ mokridante la terurojn de la virino tra la transversaj fendoj, kiuj, grandnombre en formo de buŝoj, tranĉe limigis al ili la platan larĝecon de la ŝimhavaj frontispicoj. Kiu troviĝis en situacio tuj ekfali kaj ruliĝi malsupren de la monto, tiu estis Mila mem; per ronda vojkurbiĝo ili estis turnintaj la dorson norden, kaj subite la grundo ĉiuflanke forfandiĝis kaj la ĉielo rulfalis, kiel sceneja kurteno, ĝis la piedoj de la virino.

---

(1) Kvintalo = Unuo de pezo, egala proksimume al 41'5 kilogramoj. La metra kvintalo, tamen, egalas al 100 kilogramoj.

Ŝi, ricevinte grandan timskuon, subite posteniĝis. La paŝtisto haltis, ŝin rigardis kaj ridetis.

Al Mila ĵus ŝajnis ke, se ŝi farus plian paŝon, ŝi malaperus laŭ la kurba deklivo, ĉe kies limo cistoj kaj rosmarenoj hirtigis siajn malhelajn branĉetojn, kiel dentojn el densdenta kombilo kontraŭhele rigardata. Kie estas la restaĵo de la monto? Kie la homa mondo? La spaco ilin ensuĉis, kaj same ŝajnis ensuĉi la ideon pri ilia ekzisto tiu malsufiĉeco de videblaj elementoj, kiuj restis: la lumabismo en la fono, detranĉita de la randaĵo de la Ŝtonego, sur kiu staris alnajlitaj la viro kaj la virino.

Sensacio de liberiĝo, de vakuo neniam sentita, ŝin tute invadis.

— Paŝtisto!... paŝtisto!... — ŝi kriis per obtuza voĉo, etendante la brakojn kaj sentante, ke ŝi perdas la konscion, kvazaŭ ŝi flirtus en la aero.

Sed antaŭ ol ŝi malfermis la buŝon, la paŝtisto jam mankaptis forte ŝin je unu brako.

— Nu, pro ĉiuj diabloj! Mi ja supozis vin pli stabila... Atentu, ĉar ĉi tio neniel estas afero por distriĝi, plencerte. De ĉi-tie ĝis la supro ni havos ĉiam unu flankon neŝirmita, kaj kia ajn deglito via vin forĵetus Dio-scias-kien... —

Tamen ĉio estis momenta efekto, surprizo pro la abrupta ŝanĝo de dekoracio. Tuj Mila refortikiĝis kaj, sekvante la konsilojn de la paŝtisto, ŝi suprengrimpis en silento kaj ne distriĝante pro io. Kvankam ŝi sentis la senmezuran malplenaĵon, jen post si, jen flanke; kvankam ŝi sentis la forton, kiu elsuĉis ŝiajn pupilojn, kvazaŭ por devigi ŝin rigardi, malgraŭ ŝi, tra sia korpo mem; kvankam ŝi duonvidis, preter la fokuso de sia rigardo, kapturnigajn profundegaĵojn, kiuj proviziĝis per miraĝoj; tamen ŝi, kun la kapo klinita kaj rezistante al la delogo de tio nekonata, serpentumis supren inter la kermokverkoj, denove bruligitaj, kies nigrigitaj trunketoj kroĉiĝis al ŝia jupo kaj malagrable gratvundis ŝiajn krurojn.

Ŝi ne haltis, ĝis la paŝtisto esprimis kun profunda sopirĝemo:

— Laŭdata estu Dio! Jam ne necesas pluiri! —

Ili staris sur la Kruco. Granda roka plataĵo kronis la

Ŝtonegon, kiu montriĝis ebenigita kiel la greno en mezurilo, kiam oni pasigis sur ĝi la nivelilon. Unuamomente Mila, vizaĝe al la centro de tiu platajo, ekvidis nur etendajon da ŝtonetaro surkovritan per la nevarieblaj tufoj da kermokverkoj, cistoj kaj rosmarenoj. Kanalo da vento, kiu tuj ekblovis de oriente okcidenten, ŝin puŝis per tia forto, ke ĝi igis ŝin fleksi la korpon, samtempe distaŭzante ŝiajn harojn.

— Ave Mario! — ekkriis la virino, ĝenita.

— Ho! la vento ĉi tie ja ne havas ian baron: pro tio ĝi blovas tiel latine (1). Sed tuj kiam ĝi forpasis, snufu, ermitino! Neniam vi perceptis fenomenon tiel plezurigan! Ĉio bonodoras je rezedoj, je incenso kaj je marbrizo... —

Efektive: la tuta supro ŝajnis aliptero (2). De tempo al tempo ĉirkaŭflugis nevideblaj nubaroj el ĉiuspecaj sanigaj aromoj, invadante la sentumojn delice malvigligitajn. De kie venas tiaj aromoj? De la tuta montaro, de la malsupra mondo, kiu tralasas tion plej puran el sia elspirado, dum ĝi maldiligentiĝas kaj sin venenas per siaj propraj malpurajoj reenspiritaj. Tamen, kie estas ankoraŭ tiu mondo?

La paŝtisto ŝin kaptis je la ŝultroj kaj ŝin turnigis duonronde.

Mila metis la manojn sur la okulojn kaj eksentis la radiketojn de la haroj tra sia kranio. Tiuj rememoroj pri la vidajoj ĉerpitaj de post la Limŝtono, de post Supranestoj, de post ĉiuj altajoj sur la montaro, kiom malriĉaj, kiom diluitaj ili restis antaŭ la pejzaĝo, kiun ŝi nun admiras! Tio ja vere estas etendajo, tio ja estas supermezura senlimajo!...

Ŝi apenaŭ bezonis demandi. Tiu speco de okra kaj siena kahelpavimo, kiun ŝi havis sub la okuloj, estas Murono, la granda antikva vilaĝo, tute striita, kvazaŭ per karbeto, de la sulkoj de ĝiaj stratoj. La fumnubetoj, kiuj elflugis el ĝiaj kamentuboj, miksiĝinte en la aero, ŝvebis kiel blueca nebulo super la tegmentoj. Tiu granda disetendiĝo de rektangulaj makuloj, nuancita de la tuta gamo el la verdoj, kiu ĉir-

(1) Latine = Kataluna esprimo por signifi, ke afero iras glate, ne havas malhelpon.

(2) Aliptero = Salono, kie la grekoj gardadis la parfumojn. Loko, kie la romanoj, elirinte el la bano, sin parfumis.

kaŭas la vilaĝon, estas la legombedoj kaj furaĝokampoj. Tiu transversa streko el blanka arĝento, kiu ilin limigas, estas la rivero, la eta Nilo, kiu igas fekunda kaj riĉa la regionon; kaj tio, kio blondas, en paralelaj franĝoj, ĉe ĉiu flanko de la rivero, estas la senfoliaj tremolaroj, kiujn postiras la dilatiĝinta sunbruno de la pandonaj teroj. Kaj ankoraŭ pli pretere, dum ilia ĉiam rektalinia antaŭeniro, haltigis la rigardojn pala montoĉeno de griz-ambra koloro, kiu estis nenio alia ol la montoj de Roktremoloj. Kiam la paŝtisto kaj la virino flankiĝis dekstren, tiuj montoj akcentiĝis — ĉiuj vezikiĝante per minusklaj vilaĝetoj, kiuj blankis kiel plenmanoj da anizoj — kaj elfiniĝis en promontoro brave fieranta inter ĉielo kaj tero; kaj maldekstre, la blanka montoĉeno eningiĝis en alian, brunan kaj pli altestaran, kiu en malproksimo horizontale tegis la tutan flankon sudan. La krestaron de tiu malhela barikado interspace borderis festono de roza blanko, tiel neta, ke malgraŭ la distanco, ĝi ŝajnis resalti antaŭ la okuloj.

— Tio estas la eternaj neĝoj — deklaris la paŝtisto, ĉe demando de la virino. — En kia ajn tempo, se vi ascendus la Ŝtonegon, vi ĉiam ilin vidus, tiujn montojn, montrantaj surkape sian mantilon... Ili solaj dimanĉigas la tutan vidaĵon, ĉu vi komprenas? —

Sed Mila ne inkliniĝis, kiel la paŝtisto, al la entuziasmo por tiuj montoj. Ŝi preferis rigardi, ĉi-flanke, la etajn detalojn konatajn.

Kaj ili komencis rondiri la plataĵon. La kapuĉo de la Ŝtonego estis la plej alta supro en la ĉirkaŭaĵo, kaj ĝi dominis ĝin en granda amplekso. Mila baldaŭ revidis la Malgrandan Ŝtonegon, kvazaŭ infankasketon (1) falintan al la piedoj de ĝia grandaĝa frato; la ringoforman ebeneton de Ridorto centrigantan, kvazaŭ la pupilo de okulo, sian beletaspektan altaĵeton; la labirinton el arbaroj, montetoj kaj vojoj, kondukantan ĝis Liskento, la kruda kamparana vilaĝo reliefiĝanta, en la konfuzo pro la distancoj, per la fajrero, bri-

(1) Infankasketo (aŭ Kasketo de infano) = Speco de ronda senviziera ĉapo, farita el pajlo aŭ vimeno, por ŝirmi kontraŭ kontuzoj la kapon de infanoj lernantaj ekpaŝi.

lanta kiel ornamlenteto, de la metala bulo de ĝia sonorilturo; la cilindrajn pilastrojn de Turetoj; la malproksimajn malaltajn marmarĉojn, kaj ankoraŭ tiom kaj tiom da aĵoj, perditaj en tiu granda teramplekso. Ili plue rondiris iomete, kaj ekvidis aperi la kapricajn ravinojn de la Ŝtonegoj, la longigitan kaj krispan eĝon de tiu Meza, similan, de la supro de tiu altaĵo, al malkovrita intesto de granda ŝtontripaĵo; kaj, malantaŭ la eĝo, la etendaĵon de la ebeno, nun en polveca nuanco, kiun al ĝi donas la manko de vegetaĵaro; kaj en la fono, ankoraŭ novajn montojn, bluajn, travideblajn, de akvarelo... Kvindek paŝojn pli, kaj la orienta flanko malkovriĝis antaŭ iliaj okuloj.

Jen tiam Mila ilin ja fermis rapide la okulojn, refoje blindigita de subita kaj fulmanta spegula fosforesko. Kio estas tiu lumstreko, longa kaj vundanta, kiu transverse dividas ĉielon kaj teron? La paŝtisto tion klarigis per nura vorto, per magia vorto:

— La maro! —

Mila turniĝis, kvazaŭ pikite.

— Sed, ĉu *tio* estas la maro, tiu netaksebla io, pri kio ŝi tiomfoje estis aŭdinta paroli? —

Ripete ŝi palpebrumis, farante grandan purigon ĉe siaj korneoj; poste ŝi ree rigardis, per larĝe malfermitaj okuloj, kun fiksaj pupiloj, heroe rezistante al la flagranta, blindiga trembrilado.

— La maro! La aĵo neniam de ŝi vidita!... La maro granda de la fiŝoj, de la ŝippereoj, de la sirenoj, de la viglakoloraj grotoj, de la konketoj kaj apudbordaj celtisberoj!... — Kaj en ŝia menso trapasis, kiel elspiro, la eksvotoj en la kapelo, la rakontoj de la paŝtisto, la onidiroj kaj legendoj de antaŭ ilia supreniro al la monto, ĉio, kio parolis al ŝi pri tiu maro tiel izola kaj laŭdata de la homoj... Seniluzia fluo ŝin elrevigis kape-pieden. La paŝtisto legis sur ŝia vizaĝo tiun elrevigon kaj klopodis revivigi en ŝi la admirojn per novaj altetaksaj raportoj. Mila ŝajnigis, pro edukiteco, ke ŝi konvinkiĝas, sed ja ne povis, eĉ proksimume, kompreni, ke ĉiuj ĉi raportoj koncernas tiun simplan brilantan sulkon, kiu ne ŝajnas pli ol la sunbatata randaĵo de longa fabele giganta spado; en nenio

ĝi similas la grandan maron bildigitan en ŝia imago, plenan de eksterordinaraj mirrakontoj. Kaj ŝi ĉesis ĝin rigardi por denove alpaŝi tien kaj reen, ekzamenante, post la malproksimoj, la ruinojn de la abatejo nomita de Kapridoj, tie, sur la flankaĵo de la monto, tiujn de la kastelego de la maŭra reĝo, kiu aspektas, kvazaŭ ĝi glitfalus sur Muronon de post la malglataĵoj de la deklivaro, la mueldentojn kaj embrazurojn nealireblajn laŭ la flanko de la ebenaĵo, kaj la girlandon da foliriĉaj olivarboj, kiuj ornamis, en la timtremiga fundo de la profundaĵo, la vejnan soklon de la Ŝtonego... Subite, kun la menso vundita de ideo, ŝi demandis la paŝtiston:

— Kaj la Kruco, kie ĝi staras? Ankoraŭ mi ĝin ne vidis... —

La paŝtisto respondis:

— Ĉu la Kruco? Pratempe ĝi estis alnajlita tie meze, sur tiu akraranda montosupro... —

— Kaj nun? —

La viro ŝin rigardis mirigite.

— Ĉu nun? Ĝi nun ja staras nenie... Ĉu do eble vi ankoraŭ ne scias la historion pri la Kruco? — Kaj tial ke Mila skuis nee la kapon, li ĝin rakontis al ŝi en kelkaj vortoj.

— Proksimume antaŭ kvin aŭ ses jarcentoj invadis la vilaĝon Murono maligna pesto, kiu en la daŭro de tempeto por diri: amen, Jesuo! forbalais la duonon da ĝiaj animoj. Sur placoj kaj stratoj mortis la loĝantoj tute kiel muŝoj, kaj kvankam oni enterigis tiom da ili kiom oni povis, oni ne kapablis kontentigi la bezonojn. Konsideru, kiom da provaĵoj oni efektivigis por dispeli la epidemion! Jen disfluigon de sanigaj parfumoj, jen okazigon de procesioj, jen pentofaradojn... tamen nenio efikis, nenio. Sed, fakte, ĉar estas naturleĝo, ke ĉio monda ekstermiĝas, venis tago, kiam ankaŭ la pesto ekstermiĝis per si mem. Tiam ĉiuj, kiuj restis vivantaj, juĝis kiel devon danki Dion pro la saviĝo, kaj kontribuante, ĉiu laŭ sia povo, ili forĝigis por si ferkrucon, tiel grandegan, ke, plantita sur la Supra-Altaĵo, ĝi povus vidiĝi de ĉiuj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo. Apenaŭ ĝi estis pretigita, ili decidis ĝin suprenkonduki per siaj propraj fortoj, kaj por ke tio fariĝu pli agrabla al la okuloj de Dio, ĝin porti tra tiuj ĉi kavoj

kaj krutaĵoj de ĉe la flanko de la vilaĝo. Kaj ili ja ne rezignis tion, vidu! Flavaj kaj malfortikaj kiaj ili restis, unuj pro la pasinta epidemio, aliaj pro la kontraŭstaroj kaj maltrankviloj, ĉiuj, riĉaj kaj malriĉaj, junaj kaj grandaĝaj kuniĝis, kaj penante kaj sin reciproke anstataŭante ĝin alportis ĝis la supro. Kie ilin atingis la nokto, ili haltis kaj, manĝante kaj preĝante litaniojn, ili gardostaris ĉe la Kruco. Kvar tagojn ili deĵoris sur la vojo, en la kvina ili ĝin alvenigis al la difinita starloko, en la sesa ĝin plantis sur la supro, kaj en la sepa, kiu ĝuste estis dimanĉo, ili interkonsentis tion celebri per granda festo. Intertempe, renegato, kiu loĝis en Murono, repuŝita kaj abomenita de ĉiuj pro lia malboneco, sin trapu-

ŝis mezen de la homamaso kaj laŭte esprimis, ke sur la Kruco io mankas: la Sankta Krucumito, kaj ke li Lin metos tien. Kaj antaŭ ol la homamaso povis lin deteni, li grimpis laŭ la stango de la Kruco, kaj meze de la tumulto de la homsvarmo, li pendigis sur la transversa trabo mulan tintilon.

— Jesuo, Maria, Jozefo! — murmuris Mila, hororigita.

— Tamen, li ja ne devis atendi la punon, ermitino! Apenaŭ li efektivigis la sakrilegion, kaj ankoraŭ la tintilo ne tute finis sonori, jen el la ĉielo, serena kiel hodiaŭ, pafiĝis furioza fulmo kaj aŭdiĝis tondrokrako tiel superlativa, ke la tuta homsvarmo falis teren surbuŝe. Kaj kiam ili levis la kapon, unu post la alia, ili ne plu vidis ie postsignon de la Kruco nek de la renegato. Nenio alia do restis, krom la monto izola kaj granda sulfurhaladzo, kiu ŝtopis la sentumojn. Kaj jen kiel estis metita kaj demetita la Kruco de la Supra-Altaĵo. Nun, kiam la homoj renkontas ian oston blankigitan de la tempoforpaso kaj ne divenas el kiu speco ĝi estas, ili rapidas ĝin enterigi tre internen de la tero, dirante: "For inferen pro malŝat', ĉiu ost' de renegat'". Sed se ili renkontas pecon da karboskoriaĵo, ili opinias, ke ĝi estas postrestaĵo de la Kruco kaj ĝin metas sur la litkapon, por ke ĝi antaŭgardu ilin kontraŭ malbonaj intencoj. Mi, ĉar mi liton ne havas, ĉu vi scias?, ĝin ĉiam portas en la felsako... — Kaj la paŝtisto enŝovis en ĝin la manon, kaj palpinte kaj fingruminte, li eligis el ĝi ŝimhavan bulon, kiun li prezentis al la virino.

Tiu ĉi demandis, dubeme:

—Kaj ĉu vi kredas, ke tio vere estas de la Kruco? —

— La ĉi-tiea popolo tion efektive rakontas kiel aferon certan... Iun tagon mi ĝin trovis sub la ŝuo kaj ne dubis ĝin ekkapti konvinkita... Cetere, kion oni scias? Kaj kiel ajn ĝi estas, ĝi verŝajne ne ĵetos al mi ian piedbaton, mi pensas... —

Tiam trakuris la kapon de Mila la dubo, ĉu la sereneco de la paŝtisto estas prefere ŝuldita, anstataŭ al lia propra virteco, al la efiko de tiu ŝirmanta amuleto.

Sed li denove esprimis:

— Kio estas vero certa, ermitino, tio estas la resono de la tintilo. De tempo al tempo ĝi sonoras tiel, kiel ĝi sonoris kiam la renegato ĝin pendigis sur la Kruco; kaj tio ĉiam fari-

ĝas, kiam devas okazi malfeliĉo en la enfermaĵo de la monto. Mi ĝin aŭdis du fojojn. Ĉe la unua mortis mia edzino, ŝi estu en ĉielo; ĉe la dua rulfalis peco de la Knabino kaj ĝi renversis la tutan staltegmenton ĉe Sankta Poncio, kaj trafis la bovogardiston, kiu troviĝis sube. —

Desegniĝo de rideto kuntiris la lipojn de Mila, kaj fajrero de nekredemo flagris antaŭ ŝiaj kristalaj okuloj. Foje al ŝi ŝajnis, ke la paŝtisto estas granda infano, kiu tro multe fidas al la fabeloj, kiujn li mem al si ŝpinis.

Jam sufiĉe ili estis rondirintaj kaj reirintaj, per kio ili saturiĝis de sunbriloj, de bonodoroj, kaj de pura aero, kaj la viro proponis eksidi momenton antaŭ ol entrepreni la returniron.

— Estas tuj batonta la naŭa horo. Ni povas ripozi, kaj, pasinte tra la intermonteto, momenton post la deka ni jam estos hejme. —

Mila malfermis grandajn okulojn.

— Ĉu nur la naŭa? Kiel tio eblas, se ni tiel longe rondiris? —

La paŝtisto trankvile sidiĝis, kun kruro etendita kaj ĉirkaŭbrakante la alian fleksitan sur la genuo.

— Ĉu tiel longe? Do, kiel longe, laŭ vi opinias? —

Mezuroj baraktis en la menso de la virino, kaj ŝi ne sukcesis ion precizigi.

— Nu do, ne plu penu: mi tion jam konigos al vi. Suprenirante per unu brustostreĉo, de la ermitejo ĝis ĉi-tie, estas distanco de du mallongaj horoj. Ĉian superfluan tempon ni konsumis per restadoj kaj matenmanĝo, jen vidu! —

Mila ne sciis formi al si koncepton pri tio. Rezultis ke, enkalkulinte supreniron kaj ceteron, ili foruzis malpli ol kvar horojn, dum ŝi estus asertinta almenaŭ ses aŭ sep.

Ŝi ankaŭ sidiĝis ne tro malproksime de la paŝtisto, kaj kiel li, regata ankoraŭ de la malbona impreso ĉe la Orgeno, kiu, pli aŭ malpli vualita, eĉ momenton ilin ne forlasis, ŝi malatente ekrigardis malsupren. Sube ili havis Muronon, la brikkoloran ebenon kvadratitan per karbokrajono. Post la horo de la matenmanĝo, la nebulo, kiu malklarigis la atmosferon preskaŭ forpeliĝis: nur tie ĉi kaj tie ankoraŭ leviĝis,

elkraĉitaj, je buŝplenoj, de la inertaj kamentuboj, kelkaj fumnubetoj je koloro de brando kun akvo, kiujn oni juĝus subtilaj kaj nedaŭraj kolonoj el stibino (1) de granda fabela templo, jam senigita de ĝiaj portikoj, arkaĵoj kaj panelaroj. Sub la suno, kiu atestis la reliefon kaj proporciojn de la planoj, la tegmentoj elmontris sian rektalinian sulkaron, kvazaŭ de plataj konkoj, kaj sur la liberaj aleoj de la placoj, moviĝis la nigraj punktetoj, pli malgrandaj ol muŝpunktoj, de la malmultaj personoj, kiuj ilin krucigis.

Mila, per siaj penetremaj okuloj de pasero, serĉis sur la ampleksa ŝarado la lokojn, kiuj estis al ŝi pli familiaraj: la straton de Francujo, sidejo de la ŝin provizantaj butikoj; la halon, la ĉefan preĝejon, la paroĥestran domon, la promenejon, la foirejon de brutoj... Pleje elstaris la preĝejo, pro siaj dimensioj kaj pro tio, ke ĝi kuŝas kontraŭrigarde al la suno. Kun sia duobla sonorilturo detranĉita, la duobla ringego de sia O (2) kaj sia ruĝa pordego meze de la grizeco de la ombro, ĝi havas ioman similecon kun la kapo de kolosa noktuo. Dum ŝi ĝin rigardis, la sono, klara kaj delikata, de la naŭ batoj malrapide flugis supren.

Mila abrupte, ekpensis:

— Kiu scias, ĉu Matio nun promenas tie malsupre? — kaj tuj poste ŝi ripetis laŭtvoĉe sian penson.

La paŝtisto balancis la kapon, ne rigardante ŝin.

— Tion mi ne kredas, verdire... Prefere li devas kuŝi. — Mila miris.

— Ĉu kuŝi en tiaj horoj? Nur tio mankus al li. —

La paŝtisto iom turniĝis, rigardis ŝin kaj ŝajnis heziti.

— Do, vidu... — fine li murmuris. — Tion mi ja ne volis diri al vi, ĉar ĝi kaŭzos al vi aflikton, tamen... povas esti pli bone, ke vi tion sciu nun, kiam mi estas forironta.

— Kio estas, paŝtisto? — ekkriis la virino, alarmita de tiu antaŭparolo.

— Mi certigis al vi, ke mi observos vian edzon, ĉar liaj

---

(1) Stibino = Sulfuro de antimono.

(2) O = Finialo aŭ aperturo, ovala aŭ cirkla, en fasado; speciala de preĝejo. Vd: La O de sankta Paŭlo, signifas la finialon de la preĝejo Sankta Paŭlo.

teniĝoj ne tute al mi plaĉas. Ĉu vi memoras? Do mi lin observis kaj... —

— Kaj...? — ripetis ŝi, sciavida.

— Kaj... la ermito ne almozpetas por la Sanktulo: jen ĉio! —

— Ho, Ne grave! Tion mi jam suspektis; ĝi ja trafas min tute atendite... Li verŝajne agadas kiel hundo de la Spektro... — Kaj amara duonrido malvarme kuntiris la lipojn de la virino.

— Certe, li servas al li kiel hundo... sed ne tute por ĉasi kuniklojn... Ĉar vidu: la dimanĉojn, kiam mi malsupreniras por ĉeesti la meson, mi faras ĉiujn enketojn, kiujn mi bezonas... kaj vilaĝe, per lerteco kaj prudento, oni povas ĉion esplori, kiel ajn kaŝita tion oni portas... Via edzo, nunmomente, oficas... kiel aldonita monludemulo. Nokte li praktikas la ĵetadon de la ostoj en kaŝejo ĝis tagiĝas, kaj tage dormas en alia kaŝejo: en la kuŝloko de tiu maligna vipuro. —

Mila restis ŝtoniĝinta.

— Ĉu Matio, monludemulo? —

Se tion asertus kia ajn persono en la mondo, ŝi estus brave respondinta: — Mensogo! — Sed estas la paŝtisto, kiu tion diris, kaj ne kiel supozon; kaj ŝi sufiĉe konis la seriozecon de tiu viro, kiu la vortojn mezuris antaŭ ol ilin diri.

Ŝi atendis, malkaŝe lin rigardante, ke li plu ekspliku tion. La paŝtisto plu eksplikis.

— Ĉu vi memoras kian temperamenton havis pasintatempe la ermito? Li estis kuŝemulo, artifikulo, kiun oni ne povis eltiri el la lito eĉ per piprofumo. Se ne estus vi, kiu lin instigis, li estus lasinta, ke la tineoj formanĝu lian postaĵon... Tion mi al vi certigas, mi ne povis lin rigardi sen tio, ke ekbruliĝis mia tuta malvarma sango... Sed li prenis surŝultre la sanktulkapeleton, elĵetiĝis al la almozpetado, kaj en kvar tagoj li transŝanĝis la sintenon tiel, ke li ŝajnis denove knedita. —

— Efektive! — konfirmis Mila.

— Mi tuj ektimis, ke tiu ronda turniĝo certe ne kondukos lin al bonrifuĝa haveno, kaj kiam mi konstatis, ke li portas, kiel ŝipestron, la Spektron, ĉion mi konsideris perdita. Tiu ĉi estas histriono, kiu scias ludi ĉiuspecajn komikaĵojn, kaj krom tio, kie li flaras odoron de mono, li ŝovas tien la lipojn ĝis li ensuĉis el ĝi eĉ la tintadon. Via edzo estis bieneto; la Spektro fariĝis ĝia farmisto. Post la ĉasadoj venis la drinkadoj, post la drinkadoj la restadoj en la drinkejo kaj la tranoktadoj en lia domaĉo... Li tuj gajnis al si lian volon... Jam de sia naskiĝo, la Spektro ludis per ĉia mono, sed li ĉiam havis ŝancon de pendigito (1)... Via edzo bontrafis per la unuaj ostoĵetoj, kaj de tiam ili dividas inter si la gajnojn...—

Kapklininte kaj kun la okuloj senmovaj en la orbitoj, Mila, sekvante per la orelo la rivelojn de la paŝtisto, meditis propraopinie: ŝi primeditis farojn, dirojn, ĥimerojn, ektimojn, konfuzojn de sia edzo; detalojn de lia lastatempa vivado, kiuj ŝajnis al ŝi sensignifaj aŭ kapricaj, kvankam ili ŝin surprizis, kaj kiuj nun, ĉion al ŝi klarigas, vestante per aŭtentikeco tiujn rivelojn, kiuj falis sur ŝin tiel neatendite...

---

(1) Ŝanco de pendigito = Forludo, perdo.

— Monludemulo!... Li, tiel pigra, tiel senemocia, tiel malvigla! Kiu tion antaŭdirus pasintatempe? —

La paŝtisto daŭrigis, ankaŭ li kiel sorĉita, kaj kun la rigardo etendita super Muronon:

— La senfortiĝo, en kiu vin lasis via malsano, ne malmulte favoris ilin ambaŭ... Dank' al la timo, kiun vi inspiris al la ermito, se vi prezentus al li seriozan vizaĝon, li estus ankoraŭ deteninta sin dum iom da tempo... verŝajne; tamen mi estas pri tio ne absolute certa, ĉar kiam oni komencas sin klini tiel kaj kun tiaj tikloj en la animo!... Sed vi tuj malstreĉis al li la tutan ŝnuron, kaj... —

La virino interplektis la manojn kaj lin rigardis per granda senkonsola rigardo.

— Kaj kion vi volis, ke mi faru, malfeliĉa mi, se mi estis pli malviva ol vivanta? —

— Ej, ermitino! Mi ja ne riproĉas al vi ian kulpon! Mi raportas la aferon kaj ne pli... — Kaj lia klara kaj firma rigardo ellasis sur la virinon larĝe indulgan absolvon.

Denove ili silentis. Matio, la Spektro, la ermitejo... mallaboremoj, malpacoj, mizerrigoroj, malĝojoj... ĉiuspecaj pikvundoj, en venenaj ĉirkaŭflugoj, zumadis en iliaj kapoj, aerumitaj de la pura malvarmeto de la Supra-Altaĵo. Ĝis la paŝtisto, kun la rigardo ankoraŭ perdita super Muronon, daŭrigis per malpreciza voĉo:

— Ha! la vilaĝoj, la vilaĝoj!... Kiom da malbono ili kaŭzas al la mondo! Rifuĝejoj de korupto kaj de diboĉo... Mi preferas ŝtonon de la montaro ol tiun ĉi tutan semitaĵon da domoj... Sen la vilaĝoj ja ne rulfalus tiom da animetoj en la inferon, nek la familioj vivadus tiel maltrankvile... Neniam plaĉas al mi resti en tiuj malvastejoj, kaj ĉiam, kiam mi iras al ili, mi gapas serĉante la ĉielon, kiel freneza ŝafino. Jen, en mia junaĝo, iel longe post mia vidviĝo, oni instigis min, establi tie viandobutikon; oni proponis al mi sufiĉe bonajn kondiĉojn, sed mi fakte nenion volis scii pri tio... Kvankam en tiu tempo la moralo ne flosis tiel malalte kiel hodiaŭ: ne ekzistis tiom da dissemita malvirto nek tiom da domoj de malĉasto, antaŭ tridek kvin jaroj... —

Mila, surprizita, pikiĝis de scivolemo:

— Ĉu tridek kvin jaroj, vi diris? Do, kiom da ili vi havas, vi, paŝtisto? —

La paŝtisto turnis al ŝi la kapon, alifoje kun sia duonrideto sur la lipoj.

— Kiom da ili vi konjektas, ermitino? —

— Ĉu mi?... Mi aljuĝis al vi... kvardekon... —

Malgraŭ sia animstato, la paŝtisto ellasis plenan ridon, aŭdinte tiujn vortojn.

— Laŭdata estu Dio! Jen kiel vi subtaksis mian aĝon! Ha, ha, ha!... Vi ja estas ŝercemulino, tutcerte!... — Kaj vidinte la virinon tute konsternita de lia amuziĝo, li ankoraŭ ridis: — Sankta Lucia plibonigu vian vidkapablon, kaj dume, kiam mi renkontos la stratvendiston de okulvitroj, mi faros al mi la devon aĉeti por vi iujn tre akravidajn... —

— Do, ĉu estas certe, paŝtisto...? —

— Ke vi forgesis tro grandan nombron da ili kaj mi ja ne povas doni konsenton al tiuj ĉi kalkuloj kaj dekalkuloj... —

— Sekve?... —

— En proksima januaro, se antaŭe ne krucosignos min la mortfalĉilo, mi jaratingos sesdek kvar... —

Tiu tago estis por Mila unu el la plej plenaj de ĉiuspecaj fortaj emocioj, sed eble, neniu, nek tiuj ĉe la Fulmo-Pasejo, nek tiuj apud la Orgeno, nek la riveloj mem pri Matio, produktis al ŝi tian baton, kia ĵus ŝin vundis. Ŝi ne havis eĉ kapablon por ĝin maski: kun la frunto dense paligita, kvazaŭ konvulsio ŝin tuj trafus, ŝi protestis pri tio, kion diris la paŝtisto, per skuiĝo de ĉiuj siaj trajtoj. La paŝtisto, erarinte pri la naturo de tia impreso kaj supozinte, ke la virino montriĝas simple mirigita, eltiris al ŝi la kalkulon laŭ la fingropintoj, kun granda kolekto da datoj kaj rememoroj.

La virino tute ne aŭdis lin: ŝia penso baraktis en la kranio, kiel la baraktado kruda kaj sentakta de pulso meze de granda febroskuo.

— Jen la virto! Jen la kvieteco! Jen la mezurateco!... — Per spasma premo de la pugnoj kontraŭ la genubenko, ŝiaj fingrartikoj krakis. — Sesdek kvar jaroj! Dolora eraro, naŭza afero kio al ŝi okazis!... — Kaj dum ŝi troviĝis sur la Su-

pra-Altaĵo ŝi ne povis sin elŝiri el la cirklorezono pri la terura malkovro.

La viro, post ioma parolado pri si, denove parolis pri Matio, kaj faris avertojn al la virino kaj donis al ŝi gvid-konsilojn.

— Ankoraŭ ne tute perdu la konfidon... Foje, kiu scias!... Flatu lin, klopodu, sen kolerkrioj kontraŭ li, ke li restu hejme... Petegu lin, ke li ne lasu vin sola. Povas esti, ke li obeos... —

Sed Mila nur ekstere aŭdis tiujn admonojn, kaj ili ne atingis ŝian komprenon, kaj la forta kaj kanala aero, kiu skuis kiel flageton la angulpinton de ŝia antaŭtuko, ilin rapide forportis pluen, voje al la perditaj aferoj. Ĝis la paŝtisto, rimarkinte ŝian malatenton kaj konstatinte, ke ŝi kape-pieden agitiĝas, al ŝi demandis:

— Ĉu vi do ne fartas bone, ermitino? —

— Jes... ne... Mi sentas iom da malvarmeto en mi... —

La viro tuj stariĝis.

— Kial vi tion ne diris, bonfidulino! Mi ja ne troviĝas en via haŭto, vidu!... Ni ekiru, ekiru malsupren!... —

La maro, kiel granda angulrandaĵo de ŝtala instrumento vundata de la suno, ankoraŭ fulmis tie en malproksimo. La virino, apartiginte de tie la rigardon, kun venĝema spitiĝo, pensis:

— Nenio certa ekzistas en la mondo... Ĉio estas mensogo, trompaj fabeloj... —

Ili komencis malsupreniri laŭ la orienta flanko. Ne ekzistis fingramplekso da ebeno sur tiu interkruciĝo de vejnoj kaj vojsulkoj, kiuj kondukis al la Okulo de Korberoj, la naskiĝloko de la intermonteto. Oni nomis tiun deklivon la Glitigejoj de la Kranio pro kalkaj vejnoj, kiuj interspace ilin ŝtupigis, laŭ maniero de senŝeligitaj vergetoj el pratempa riparo. Sur tiu zono de la monto kreskis abunda miksaĵo el sanigaj herboj, kiujn la kamparaninoj el la farmodomoj plej sperte konis, kaj kiujn ili iliatempe rikoltis por pretigi per ili trinkaĵojn kaj kataplasmojn por bestoj kaj homoj; kaj ĝuste tie estas la loko, kie la fraŭda ĉasisto renkontis Marinjon de Sankta Poncio, kiu estis faranta sian herbokolekton, kaj

kie li al ŝi rakontis la malbonan suspekton pri la paŝtisto kaj Mila. Kaj la paŝtisto, tie pasante, memoris tion kaj la deziro pri puno kaj venĝo, kiu komencis ĝermi en li kontraŭ la spiono, prenis pli da intenseco, kiel ventumata brulaĵo.

Mila, siavice, sekvante la paŝtiston kiel eble plej proksime, ne fortiris, kiam ŝi povis, la okulojn de sur li. Forte disbatita de la lasta elreviĝo, ŝi tre rapide reakiris la akrecon de vidado kaj jam ne bezonis iuspecajn okulvitrojn. Pro la malniveleco de la deklivo, la kapo de la paŝtisto atingis altecon de tri aŭ kvar spanoj malsupre de ŝi kaj ŝi povis fari senindulgan ekzamenon. Kaj jen nun ŝi efektive vidas lin tia, kia li estas, sen la iluziaj araneaĵoj. Estas nedubeble, ke lia maldensa barbo, liaj mallongaj kaj delikataj kaŝtankoloraj haroj sen ia blanka punktiĝo, kaj lia facilmoveco de persono malgraseta, konfuzas ĉe la unua rigardo, sed se oni atente rigardas kaj observas, la jaroj elmontriĝas sur li kiel makulo ĉe la suno. Tiuj malhelaj haroj mem havas la senbriliĝon, la sentinkturiĝon de la antikvaj objektoj; la haŭto, sen suba grasaĵo, algluiĝis al la ostelstaraĵoj kaj tute sulketiĝis per malgrandaj faltoj, kvazaŭ de ĉifita papero, en la kavetoj de la orbitoj, sur la deklivoj de la vangoj, ĉirkaŭ la ventumilformaj oreloj; liaj ungoj havas la malmolecon de tiuj de la korvo, kaj la artikoj de liaj genuoj kaj manradikoj foje perfidas senilan rustiĝon. Ne, ne, se oni bone atentas ne plu restas duboj: la paŝtisto ja ne estas tio, kio unuamomente li aspektis.

Ŝi pense komparis lin kun sia edzo. Tiu ĉi, junulo kun maljunula animo, la alia, maljunulo kun ŝajnoj de junulo. En ambaŭ ili la anomalio, la eterna anomalio, kiu ŝin senhalte persekutis, venenante kaj detruante al ŝi la vivon!... La virino denove spertis nigran ekscitan senkonsolecon de la venkito kontraŭ ĉiu rajto kaj pravo. — Ĉio renversita, ĉio perdita por ĉiam!... Jen nekapablulo!... Jen maljunulo!... — Kaj ŝi mordis al si la lipojn ĝis ili sangis, kaj ŝia prudento malklariĝis.

— Kial ne longigi iom pli ol konvene unu piedon kaj fini la vivon definitive, rulfalante malsupren laŭ la rokejo?

— ŝi kuraĝis al si demandi, dum ŝi zorgeme kaj sin firmigante malsupreniris, jen per unu paŝo, jen per alia...

En unu pli danĝera interspaco, la paŝtisto etendis al ŝi la manon por ŝin teni. Tiu kontakto tiam fariĝis al la virino tiel naŭza, ke ĝi ribeligis ŝian sangon. Logimpulsoj, varmiĝoj, pekaj deziroj ĉe la Fulmo-Pasejo, kiel malmoralaj, kiel malgloraj ili nun al ŝi ŝajnas!

...Kiam ŝi alvenis al la ermitejo, ŝi sentis sian koron malforta kaj sian kapon kiel malplenan sferon kun dolora ŝelego. El la granda tiutaga promenado ŝi konservis nur la torturon pro la deprimanta impreso.

— Jen nekapablulo!... Jen maljunulo!... Jen nekapablulo!... Jen maljunulo!... —



XV

LA GLITFALO

Mila denove havis la piedojn sur firma tero. Falinte, kvazaŭ el nesto, de sia stranga enamiĝo, ŝi subite trovis sin sola kaj frontigita al la realeco. Ŝi jam ne revis, jam ne esperis, jam ne timis, pri kia ajn el tiuj neprecizaj antaŭtimoj, kiuj antaŭe ŝin obsedis. La supreniro al la Supra-Altaĵo ŝin tiel forte skuis, ke eĉ ŝanceliĝis la fundamentoj de ŝia estaĵo, kaj poste restis en ŝi ia senbindeco, kvazaŭ de malkomponiĝinta objekto, kiu laŭ la fluo de la tagoj ŝanĝiĝis en la platigitan kvietecon de rezignacio. La morgaŭon kiam foriris por la tuta vintrodaŭro la paŝtisto kaj la knabo, kaj ankaŭ Matio denove forestanta, la virino ordigis ĉiujn siajn aferojn, kiujn ŝi havis ankoraŭ tre malzorgitaj de post sia malsano, kaj tuj kiam estis forbalaitaj la araneaĵoj de la domo, flikita la tolaĵaro kaj sarkita la legomejo, ŝi sin direktis al Murono

por akiri kelkajn manĝoprovizojn. Pasokaze ŝi eniris en la farmodomon de Sankta Poncio, kien ŝi ne enpaŝis de antaŭ pluraj semajnoj, de kiam ŝi ne malsuprenvenis laŭ tiu flanko.

Estis proksime de la dekunua, kaj antaŭ la pordo ŝi vidis Arnaŭ-on, kiu maljungas. Ŝi ja ne estis vidinta lin de post la tago de la malpaciĝo en la korto, kaj li ŝajnis al ŝi pli malgrasa kaj malbonfarta. Li ŝin ne rimarkis, kaj kiam, subite, li vidis ŝin je kelkaj paŝoj, li rapide klinis la kapon kaj turnis sin dorse, kvazaŭ ion serĉante surtere. Ŝi haltis momenton, konsternite. Poste, klare subkompreninte, ke li ne volas esti demandata, ŝi enpaŝis en la domon, vundita de doloriga piko. Tie ŝin atendis alia malagrabla impreso. Sidante apud la kameno, kiel ordinare, la avino ion pistis en kaserolo surplanken metita; la flamoj, incititaj sur la amaso da femurdikaj ŝtipoj, plenigis la tutan kamenon, kaj konturis la figuron de la maljunulino per ruĝa rando. Tute apude de ŝia jupo, cindrokolora kato longigis la kolon flarante kaj miaŭante.

— Bonan tagon, avino: kiel vi fartas? — Mila salutis enirante, per voĉo tute afabla.

La avino, kurbigita, duonturnis rapide la kapon al la pordo, ne forŝovinte la manojn el la kaserolo.

— Ha! tio estas vi? — ŝi malvarme murmuris, vidinte la alvenantinon, kaj denove daŭrigis sian taskon, kvazaŭ ŝi neniun estus vidinta.

Mila restis haltigita meze de la kuirejo. Ŝi ne estis kutiminta al similaj akceptoj fare de la maljunulino; tute kontraŭe, ĝuste estis ŝi, el ĉiuj farmdomanoj, kiu favoris ŝin per pli da flataĵoj jam de la unua tago, kiam ŝi ŝin konis. Sed ĉar ŝi havis famon esti lunatika, Mila tuj opiniis ke, tiun tagon, la avino verŝajne havas humorkrizon, aŭ eble ke ŝi estas ofendita de ŝi, tial ke ŝi ne vizitis ŝin pli ofte. Ŝi antaŭeniris, do, kaj iom klopodante por montri al ŝi duonridon, ŝi frapetis ŝian dorson.

— Kaj do, kiel statas via sano, de kiam mi ne vidis vin?—

— Nuntempe, dank' al Dio... Neniam pli malbone!... — ŝi respondis al ŝi meztone, ne levante la kapon.

— Efektive, mi jam sopiris al vi... — aldonis Mila, preskaŭ ne sciante kion diri.

Malagrabla gorĝoplaŭdo, kiu kvazaŭ similis sarkasman ridon, antaŭiris tiujn ĉi vortojn, diritajn de la maljunulino kun inciziva tono:

— Tion mi ja kredas, virino! Ni ja ne plu parolu pri tio... —

Mila subkomprenis, ke ŝi estas superflua en la kuirejo, kaj per kelkaj konfuzaj vortoj ŝi adiaŭis ŝin kaj eliĝis eksteren. Ŝia mentono tremis, kvazaŭ ŝi estus krevonta per ploro. Kio okazas en Sankta Poncio? Kial oni prezentis al ŝi mienon tiel strangan? Pri Arnaŭ ŝi tute ne miris: prave aŭ malprave li devis senti al ŝi antipation; tamen, kial la avino? Bone ekzameninte en sia memoro, ŝi trovis nenion, kio akuzus ŝin laŭ tiu flanko.

— Nenio povas tion motivi krom la humorkrizo! — ŝi fine deklaris al si por konsoliĝi. Sed ĉar al ŝi restis dubo, en la sekvintaj tagoj ŝi malsuprenvenis al la farmodomo, ankoraŭ du aŭ tri fojojn, por certiĝi pri tio. Tuj ŝi povis konvinkiĝi, ke tie ĉio ŝanĝiĝis rilate al ŝi. Nur kiam ŝi tie renkontis Marinjon, estis pli bone: ĉi tiu ŝin akceptis kun la ĉiama simpla afableco, sed kvazaŭ kun certa nememvola rezervo, kiun ŝi ne sciis kaŝi. Interŝanĝe, la avino kaj Arnaŭ neniel maskis al ŝi, kion ili sentis: li — deturnante aliflanken la kapon kaj malaperante, apenaŭ li ŝin ekvidis, kaj ŝi — malŝate langoklakante kaj enfermiĝante en malamika mutemo se ĉeestis la bofilino, aŭ malkaŝe turnante al ŝi la dorson, se la bofilino forestis.

Kaj Mila daŭre rompis al si la kapon por esplori, kion kovas tiu familio kaj kial ĝi tiel abrupte ĉesis ŝin estimi. Ĉu ili do eksciis, ke ŝi estas la kaŭzo de la malamikiĝo inter la unuenaskito kaj la heredontino de Ridorto? Ĉu ili do ekflaris (1) la malbonan deflankiĝon de Matio?...

Unu tagon, kiam la paŝtisto, suprenkondukante la gregon por paŝtiĝo, envenis en la ermitejon por esprimi bonan tagon al Mila, ĉi tiu, kun la koro ŝvelinta pro ĉagreno, ne povis sin deteni tuj paroli al li pri tio, kio tiel vigle ŝin turmentas.

---

(1) Flari = Antaŭsenti, suspekti.

— Aŭskultu, paŝtisto: kion vi scias pri la edziĝo de Arnaŭ? Ĉu ĝi efektiviĝos aŭ ne? —

— Ĉu ĝi efektiviĝos, vi demandas? Nur tio mankus! Antaŭ la falĉadotempo la farmistoj de Sankta Poncio jam havos ĉe si novan bofilinon. —

— Laŭdata estu Dio! Ĉio alifoje aranĝiĝis! — pensis la virino, kvazaŭ malpezigite; sed tuj poste: — Se estas tiel, do, kiu hundo ilin bojatakas? — Kaj ŝi rakontis al la paŝtisto la severan mienon, kiun ili al ŝi prezentis.

La paŝtisto, ĉiam tiel serena, iomete embarasiĝis.

— Ja ne cerbumu pri tio, ermitino... Ĉu vi donis al ili motivon de malplezuro?... Do, koro senpeka, kapo rekta... Ĉio estas implikoj kaj malbonfaroj, sed venos tago, kiam Dio restarigos la veron, kaj tiam... —

—Sed kial ili tion faras, paŝtisto? —

Li kontraŭvole respondis:

— Ĉe Sankta Poncio, estas bona domanaro, ĉu vi scias? tamen... ili opinias, ke mi sentas pli da alligiteco al la ermitejo ol al la farmodomo kaj... — kaj la bona viro, perdinte dum momento la memregecon, kiun li ĉiam havis super si, venĝeme ekkriis: — Ha! la lango de la skorpio! Mi devas ĝin al li detranĉi! —

Mila ne plu demandis. Konsternita, senkuraĝigita, ŝi ĵus divenis pri kio temas. Ŝi ne plu vizitos la farmodomon!

Feliĉe Baŭdilieto estis infano kaj ne ellaboris la malbonajn pensojn, kiel la grandaĝuloj. La unuan dimanĉon, post kiam ili ambaŭ forlasis la ermitejon, Mila aŭdis lin eniri sur la korton per senbrida kuro kaj suprengrimpi la ŝtuparon, kiel feo. Ŝi eliris renkonte por lin akcepti kun ne malpli da rapidemo.

Kiam ili staris vid-al-vide, la infano ĉirkaŭpremiĝis al ŝiaj kruroj kaj frotetis la kapon sur ŝia jupo nenion dirante. Tiu eksplodo de intensa kormoleco larmigis la klarajn okulojn de la virino. Ŝi lin kunkondukis al la kuirejo kaj tie, dum ŝi sidis sur la benko, kun la knabo metita meze inter la kruroj kaj tenante lin ĉirkaŭprenita je la talio, ili krude interparolis, ambaŭ samtempe, per nekohera babilado, kvazaŭ birdopepado.

— Ĉu ci ankoraŭ elkondukas la gregon?... Ĉu ci jam vizitas la lernejon? Ĉu vesperiĝe oni tie rakontas fabelojn?... Ĉu ci nostalgias en la farmodomo?... —

Kaj li, tirante jen unu, jen alian el la maŝoj de ŝia kaprinhara tuko:

— Mi jam deklamas la nombrotabelon, ĉu vi scias?... Hieraŭ infano eraris ĉe la *ses per ses* kaj sinjoro *Karolĉjo* svingis al li nukfrapon... La avino volis, ke mi ĉeestu katekismoinstruon, hodiaŭ... Mi ne, malbene! Prezentu al vi, en dimanĉo! Kiam mi venus al vi?... Ĉu vi scias? Jam mi havas la ŝtonbulon polurita... Kiom da salivo ĝi kostis! Fi!... Mi restis kun la gorĝokanalo seka!... Sinjoro *Karolĉjo* diris al mi, ke la proksiman monaton jam mi lernos paĝoskribadon. La *toj* (*tt*) estas tiel komplikaj, malbene!... —

Ĉar li, dum la eksplikoj, gratis al si la kapon per grandaj ungoskrapoj, ŝi lin kombis por esplori, ĉu li ekhavis ian *paraziton;* poste ŝi donacis al li malmolajn makaronetojn kaj subrostitajn migdalojn el tiuj, kiujn ŝi ĉiam disponis por tio, ĉu iu suprenvenas al la ermitejo, kaj parteton de orita puntaĵo el la vestaĵeto de *Jesu-infano* (1), kiu pasintatempe tenis la knabon ravita. Kvazaŭ nur Dio scius kiel longe li tion ne vidis, ŝi montris al li la floretojn sur la teraso kaj la brasikojn en la legomejo, ĉiuj brulvunditaj de la prujno kaj kun la velkintaj folioj premplatigitaj sur la tersulkoj... Kaj kiam venis la horo de reiro, ŝi lin akompanis iel longan vojspacon malsupren de la ravindeklivo, kaj la knabo al ŝi promesis, ke la *proksiman festotagon* li diros al la avino, ke li iras ĉeesti katekismon kaj anstataŭe li supreniros ŝin revidi.

Kaj post tiuj du vizitoj ŝi pasigis tagon tute sola, kaj alian kaj alian... Bonmaniere ŝi intencis persvadi Mation al reprudentiĝo, sed baldaŭ ŝi komprenis, ke tio estas bati sur malvarman feron: Matio estis perdita, senrevene perdita. Resanigita dank' al la rivelo ĉe la Supra-Altaĵo, kvazaŭ per efiko de aspergoj, de tiu pasio, kiu ŝin igis blinda antaŭ ĉia afero, ŝi konstatis nun, ke dum la tempo, kiam ŝi ne prizorgis sian edzon, ĉi tiu definitive ŝanĝiĝis radikale. La nova elemento,

(1) Jesu-infano = Bildo translokebla, kiu troviĝas en multaj katolikaj hejmoj, por adorado.

kiun ŝi, komence de sia malsano, jam antaŭsentis penetri en lian vivon, en malmulte da tempo impone faris en ĝi sian verkon. La kovemulo (1), la artifikulo, la malvarma animo, estis transformiĝinta sub la impulso de la skuanta pasio, kiel trafe esprimis la paŝtisto. Karne ensuĉita, haŭtkolore paligita, kiel persono, kiu nokte ne dormas, kaj kun la frunto kovrita de sulkoj kaj la rigardo de malfidoj, li havis la izolitecan sintenon de malkuraĝa besto, kiu en sia kaŝejo avide manĝegas sian kaptaĵon, sed kiu, se oni volas ĝin forpreni, ĝin defendas per ĉiuj siaj ungegoj kaj per ĉiuj siaj dentoj ĝis ĝi tie lasas la vivon. Montriĝis, ke li, kiu ŝajnis naskiĝinta por nenio, naskiĝis por monludemulo: sed li jam ne plu estos io alia. Li estis perdita, neeviteble perdita!...

Tion kompreninte, Mila ĉesis luktadi. Ĉio al ŝi malprosperis, ŝi estis sola en la mondo, ŝi ne devis atendi helpon de io nek de iu... Kaj tuj kiam ŝi fariĝis plene konvinkita kaj penetrita de tiu ideo, eniris en la virinon la modera forteco de tiu, kiu, riskinte la lastan soldon kaj ĵetinte la lastan ludkarton, certe scias, ke nenio alia restas al li por perdi. Ĉirkaŭ dekkvinon da tagoj ŝi travivis en tia animstato, kiam unu posttagmezon, proksime de la dua horo, la ĉielo, ĝis tiam serena, rapide tranubiĝis; kasteloj el nubaroj, kvazaŭ de lumeca blanko leviĝis super la Supra-Altaĵo, poste ili etendiĝis, nigriĝante, rande de la monto, kaj antaŭ forpaso de horo ekfuriozis grandioza ŝtormo. Ĝi estis la unua, kiun Mila vidis sur tiuj montolokoj, kaj kaptita de ekscito, kvazaŭ de elektrizita kato, kaj avida pri la spektaklo, ŝi kuris de unu fenestro al la alia por ĝin rigardadi.

Post granda krakanta tondrado, kiu ruliĝis tra la tuta firmamento, laŭ maniero de tambura koloraturo, kiu signalus ĝian envenon, deŝarĝiĝis furioza pluvofalo, kiu vipis la domvitrojn kiel seka hajlo. Mila, kun la nazo premita sur tiuj de la ĉambra fenestro, vidis malsuprenfali el la ĉielo grizan pluvokurtenon, kiu disfaldiĝas sur ĉian objekton, tuj forvišante la malluman silueton de la Granda Ŝtonego. Tiu kurteno, rebatita tien ĉi kaj tien de la turnoblovoj de subita ven-

(1) Kovemulo = Maldiligenta kuŝemulo.

tego, kiu ĝin puŝis jen orienten jen okcidenten, kaj iufoje trafendita de la lumradianta zigzago de fulmo, plidensiĝis tiel rapide, ke baldaŭ ĝi fariĝis nepenetrebla. Mila forlasis la ĉambron kaj kuris al la fenestreto de la kuirejo. La akvo malsuprenfalis je kaskadoj laŭ la montodorso de la Meza Ŝtonego, kunfluis en la ravinetojn de la deklivo, impetis sur la domon, ŝtopis la malkovritan defluilon de la lavoŝtono, kaj denove elfluis kirliĝante je grandaj ŝaŭmantaj buŝplenoj. Dume la bruo de la tempesto estis surdiga. Al la grinco de la pluvo, kiu plaŭdis kontraŭ la tegmentoj kaj resonis en la krutegejoj, kuniĝis la surda blekego de la ventoturniĝoj, kiuj ĉion atakis kaj batpuŝis, ŝancelante la ĉarpentaĵojn de la aperturoj, turnante la sonorilojn, kiuj sentakte sonoradis, kvazaŭ teruritaj, kaj muĝe ŝraŭbiĝante laŭ la sonoriltura ŝtupareto, ŝajne por freneze invadi la ermitejon. Mila, elpreminte el tia granda brukonfuzo specon de kvietiga gajeco, alkuris, tute diligente, por loki baraĵojn ĉe la pordo de la kuirejo, tra kies sojlo, sen lignokadraĵo, eniĝis la akvo, kvazaŭ tra instalo de kranoj; ŝi sorbis, per la bajeto (1) tiun akvon, kiu inundis la malgrandan ĉambron, kaj dismetis terpelvojn sur la liton por ricevi tiun de la gutejoj, kiuj malfermiĝis ĉe la plafono de la granda ĉambro... Meze de tiuj iroreiroj, ŝi memoris, ke tiun matenon ŝi estis etendinta antaŭtukon sur la balustrado de la salonbalkono. Kiu scias kien ĝi verŝajne forbloviĝis! Ŝi tuj tien iris. Feliĉe tial, ĉar ŝi ĝin alligis al la manapogilo, la antaŭtuko ankoraŭ tie restis. Pro ŝiriĝo de unu el siaj rubandoj, ĝi diable baraktadis en la aero, ankoraŭ fiksita per la alia rubando. Sed se ŝi ne rapidus ĝin formeti, ankaŭ la rubando, kiu restis ŝiriĝus kaj ŝi jam ne plu vidus la antaŭtukon. Ŝi tuj metis manon sur la tenilon de la falebo (2), sed apenaŭ ŝi ĝin eligis el la hoko, kiam la ventoturniĝo, per granda ekpuŝo, kiu ŝin preskaŭ faligis surdorsen, plenlarĝe malfermis al ŝi la balkonon. La klapegoj re-

(1) Bajeto = Peco de mola ŝtofo, ĉu tutlana, ĉu kun miksaĵo el kotono, kovrita aŭ ne de hararo ambaŭflanke, taŭganta por purigouzoj. (Vd. vortarojn Esp.-Esp-ta: de E. Boirac kaj Anglo-Esp-ta de Fulchet kaj Long).

(2) Falebo = Espanjoleto. Aparato konsistanta el mantenilo kaj rigliloj, kaj servanta por fermi pordon aŭ fenestron kaj ilin fiksi.

saltis kontraŭ la masivon de la muro, kaj per tri aŭ kvar ventobatoj ĉiuj vitroj disfalis en pecetojn. Kun la kapo kaj unu brako ekstere kaj sufokiĝante sub la impeto de la ventofuriozo, Mila ektiris la rubandofinon por malligi la nodon, sed la rubando, malseka, spongiĝis kaj rezistis detiriĝi, kaj dume la pluvo plaŭdis sur la virinon kaj kelkaj malvarmaj gutoj, penetrinte tra la dekoltaĵo de la kolo, deglitis malsupren laŭ ŝia dorso. Tiumomente la ventomuĝo kondukis al ŝia orelo metalan tinton.

— Ĉiel-Reĝino! — ekkriis al si la virino, konsternita: — La Mutulo el Murono! —

En Murono estis muta almozulo, kiu portis pendantan tintilon ĉe la kolo. Kelkfoje li suprenvenis al la ermitejo, ĉar li sentis grandan amikecon al Mila tial, ke ŝi, regalis lin krom per peco da pano ankaŭ per tiro da vino.

De multaj tagoj oni lin ne vidis sur tiuj suproj kaj nun, aŭdinte lian tintilon, la virino opiniis, ke la ŝtormo lin surprizis longe post kiam li entreprenis la supreniron.

— Atendu min, Mutulo! Mi tuj venos malsupren! — ŝi vokis tiel laŭte kiel ŝi povis por sin aŭdigi malsupre, kaj ne suspektante, ke li ne ŝin aŭdos; kaj paŝinte internen, ŝi ekprenis eluzitan buŝoŝirmilon de Matio, ĝin ĵetis sur la kapon kaj revenis al la balkono por pli oportune malligi la antaŭtukon. Baraktante por tio, ŝi antaŭenkliniĝis super la balustrado kaj traesploris per rapida rigardo la vastan placon. Ŝi nenie vidis la Mutulon.

— Sed, nu! — ŝi murmuris surprizite: — Mi estus asertinta, ke mi lin aŭdis! — Kaj, jam malliginte la antaŭtukon, ŝi intencis posteniĝi, kiam denove la metala tintilsono ripetiĝis pli klare, pli percepteble, supre, super ŝia kapo, kvazaŭ ĝi malsuprenvenus el la ĉielo. Malvarma ŝvito trasorbigis la virinon, ŝiaj fingroj malstreĉiĝis kaj la antaŭtuko, kaptita de ventobato, forflugis Dio-scias-kien. Per senfortaj manoj ŝi, kiel eble plej bone, enhokigis la falebon, trairis la salonon sin apogante ĉe la muroj, ekprenis en la kuirejo la alumetojn kaj, laŭ la ŝtupareto de la malgranda ĉambro, ŝi descendis al la kapelo. Ankaŭ tien la akvo penetris, kaj vastiĝis malsupre al la pavimŝtonoj, sed ŝi tion ne atentis. Ŝi ekbruligis du

kandelegojn de ĉe la altaro, kaj falinte surgenue al la pavimŝtonoj, ŝi fervore etendis la brakojn al Sankta Poncio.

— Sankta Poncio... Glora sankta Poncio!... Faru, ke al li ne okazu io malbona! Ke oni lin ne arestu! Ŝparu al mi ĉi tiun honton, glora sankta Poncio! — Kaj tordinte la brakojn, kvazaŭ al ŝi venus atako de epilepsio, ŝi lasis fali la buston kaj restis duonsveninta sur la estradeto de la presbiterio.

Dum ŝia lasta intervidiĝo kun la paŝtisto, ili parolis pri Matio, kaj la paŝtisto, skuante la kapon, raportis al ŝi ke, kuras malbonaj onidiroj kaj ke, se ŝia edzo ne reprudentiĝos, nepre al li okazos io eksterordinara.

— Plendoj iris eksteren el la vilaĝo... instrukcioj alvenis de supre; la pedeloj kaŝobservas kaj nur atendas trafan

okazon por enretigo... Se ili ne ĉesos monludadi — kaj tion ili ja ne faros — mi tion scias el bona fonto: post nelonge ili ĉiuj estos arestitaj... kaj via edzo la unua, ĉar li estas la ĉefa blindigito tial, ke li gajnas kaj ne plu moviĝas de tie nokte kaj tage. —

Mila, preskaŭ indiferenta al ĉio, tiam ne multe konsideris tiujn vortojn; sed nun, aŭdinte la misteran sonon de la tintilo el la Supra-Altaĵo, ŝi kvazaŭ denove sentis, ke la antaŭdiro falas sur ŝian kapon, kiel puno de la ĉielo. Ĉar ŝi ne dubis, ke estas la tintilo de la renegato, kiu tintis en la aero, kaj ke la malfeliĉo, kiun ĝi anoncis, devos ŝin plene trafi.

Kaj ŝiaj brilantaj okuloj preĝeme leviĝis al Sankta Poncio, por adresi al li la angorajn preĝojn de la voĉo:

— Faru, ke al li ne okazu io malbona!... Ke oni lin ne arestu!... —

Neniam, krom en tiuj momentoj, ŝi estis sentinta sian koron fervorigita de flamo de pieco tiel pura kaj verema; kaj kvazaŭ por senkulpigi sin antaŭ la Sanktulo, pro tio, ke ŝi petegas de li helpon kaj apogon por la ŝtelisto de liaj almozoj, ŝi pense al li diris, ke ĉi tiu estas ŝia edzo, ke li estas devojigito, tamen ne malbonulo, ke lia sorto iras unuigita kun ŝia, kaj ke la hontigo estus dividebla inter ambaŭ... Se oni lin malliberigus, ili ambaŭ estus forĵetataj de la ermitejo, kaj kien ili rifuĝus, forpelitaj disde la honesta vilaĝanaro kaj sen domo, sen ŝirmo, sen nordo (1) kaj gvidado?

Li ankoraŭ povus trovi drinkejan angulon, kie finperdiĝi, sed ŝi, kio el ŝi fariĝus?... Kaj denove ŝi revenis al sia fervora, insista petego:

— Ke oni lin ne arestu! Ke oni lin ne arestu!... Se li meritas punon, al li venu malsano, kia ajn maskita malfeliĉo, kvankam grava, sed neniel la publika hontigo! —

Kiam la virino eliris el la kapelo ŝi devis kunpreni unu el la brulantaj kandelegoj. Ĉio estis malluma: antaŭ la kvara la tago estis kliniĝinta, kaj en la fermiĝo de la anticipata nokto ankoraŭ ruliĝis, longe perkutante, la tondrokrakoj, siblis la muĝoj de la vento kaj surde zumis la furiozaj akvoj, kiuj

(1) Nordo = Orientiĝo (en sencoj fizika kaj morala).

malplektiĝis kaj plektiĝis malsupren laŭ la ravinoj. Dume, tra la fendetoj de la domaperturoj filtriĝis, de tempo al tempo, la verdaj ekbriloj de la fulmoj malbonaŭgure zigzagante. Sed kiam, post la vespermanĝo, la virino, dispremita kaj kun bluringaj okuloj, enlitiĝis, la tempesto jam ŝajnis malproksimiĝi, kun malrapideco de ekstermanta armeo, lasante la spacon plena de realaj bruoj kaj la aŭdon obsedata de mil aliaj fiktivaj sonoj. Sekve, al tiuj, kutimaj kaj akompanaj de la Akvo-Muĝulo de Sankta Poncio, de la noktuo ĉe la sonorilturo kaj de la kesthorloĝa tiktakado, la virino aŭdis, ke almiksiĝis, en la konfuzoj pro la peza dormo, ronkantaj babiloj de la torentetoj, malproksimaj bojoj de hundo, plendaj blekoj de ŝafino... Tuta tumulto de resonoj, kiuj, eĉ plendorme, al ŝi kaŭzis hemikranion kaj kapturniĝojn.

Ŝi leviĝis tre frumatene, kun unu sola ideo inter brovo kaj brovo: iri kaj scii, kio okazas kun li, forskui de si la kormordon. Kaj, se ankoraŭ estus tempo, paroli al Matio, averti lin pri la ĉielavizo, enbati la timon en lian korpon, fari la

lastan provon por lin konduki sur bonan vojon. Ŝi nur sciis, ke li dormas ĉe la Spektro, kaj opiniis, ke ŝi devas iri tien por lin trovi.

Ŝi eliris por prizorgi la kortbirdetojn. Antaŭ la pordo ŝi falpuŝiĝis je granda ŝirita branĉo de la cipreso; la basenoj

estis plenaj de verda akvo, sur kiu naĝis ia vepraĵo kaj kelkaj helikoj kun la faŭko supre; la ŝtupareto al la bedoj, ŝtopita de rubo; la grundo, degratita, kvazaŭ sen signo de kulturateco; la migdalarboj kun sternaĵo el naskiĝintaj florkapetoj... La akvego ĉion formordis, kiel en iu antaŭa festotago de Sankta Poncio.

— Puno super puno! — pensis la virino; kaj ne dezirante ion plu vidi, ŝi prenis la mankorbon kaj la ŝirmotukon kaj iris rekte al Murono.

Post la kataklismo de la antaŭa tago, ĉio en la altaĵo denove kunordiĝis, tute kvazaŭ nenio estus okazinta: sed surtere restadis la postsignoj altgrade videblaj. Ĉe ĉiu paŝo Mila renkontis novajn flakojn (1), novajn ravinetojn gratitajn de la akvoj, amasiĝojn da koto kaj ŝtonoj, elterigitajn kermokverkojn, kiuj montris la radikaron, nekonatajn pluvofontojn; kaj pli malsupre, direkte al la kulturteroj, detruitajn pasejojn, disartikigitajn baraketojn pluvoŝirmajn, brancoŝiritajn olivarbarojn kun ĉiuj burĝonoj surgrunde, kvazaŭ oni suferigis al ili grandan draŝadon... Siaflanke, la torento de Malbon-Sangulo, ĝisrande plena, malsuprenfluis pli impeta kaj malafabla ol iam, kaj ne povante alkonduki tute senmanke sian akvokvanton tra la okulo de la Ponto-de-la-Frapo, ĝi incitite superverŝiĝis kaj salivumis siajn ŝlimajn akvojn sur la bordojn...

Kiam Mila alvenis ĉevide al la farmodomo de Sankta Poncio, ŝi rememoris kun korpremo la konflikton, kiun ŝi havas kun ties familio. Ŝi estis pura de vera peko, kiel en la tago kiam ŝi naskiĝis, kaj malgraŭe, en tiu domo, same kiel la Spektro, ĉiuj konsideris ŝin senmorala virino, kaj kiel tian ili ŝin traktis. Sed nun, reveninte unu kaj alian fojon al tiu penso, Mila antaŭsentis, en necerta maniero, ke tio, kion la avino — mumio detruita de la maljuneco kaj izolita por ĉiam en angulo de la hejmo — ne povis al ŝi pardoni, prefere ol la supozata kulpo, estis ŝia juneco kaj ŝia ankoraŭ neperdita logopovo; kaj Arnaŭ, la viro venkita kaj subjugigita de ŝia ĉarmo, sendube ankaŭ ne pardonis al ŝi la rajton forrifuzi lin por sin fordoni al alia... — Malnobluloj, senkoruloj!... —

(1) Flako = Malgranda kvanto da akvo, aŭ alia likvaĵo, restanta en kavo.

Kaj Mila, tute konsternita kaj venĝema, intencis preterpasi senhalte la domon tra la pasejo, kiam ŝi aŭdis, ke de la krutaĵo oni ŝin vokas dufoje per ŝia nomo. Ŝi turniĝis, mirigite. Marinjo, la bofilino, kurante malsuprenvenis rekte al ŝi, metante la tukon sur la kapon kaj laŭte al ŝi vokante:

— Atendu min! Ankaŭ mi tien iras! —

Mila ŝin atendis, ankoraŭ pli mirigita de tiu subita alvoko. Kiam ili kuniĝis, la bofilino, farante nodon ĉe la tuko, tuj ekkriis, eĉ ne espriminte la bonan tagon:

— Kiu tion estus dirinta, ĉu vere? Ĝuste hieraŭ, kiam ni travivis nenian maltrankvilon pensante, ke li troviĝas en la ermitejo!... —

La bofilino montriĝis tute agitita. Mila, ne kompreninte ŝin, restis ŝin rigardanta.

— Sed kiam frumatene venis la hundo bojante kaj gratante la pordon, kiel frenezulo, jam tio kaŭzis al ni malkonfidon. Ĝi estis tute malseka kaj kovrita de koto, kaj tuj kiam ni malfermis, ĝi fuĝis al la ponto turnante la kapon kaj ululante. Poste, ĉar ni ne moviĝis, ĝi revenis kaj reiris tri fojojn, kvazaŭ esprimante, ke ni sekvu ĝin. — Tiu ĉi besto venas nin serĉi: certe io okazis — diris mia edzo; kaj li kaj la knabo prenis la mantelon kaj la pafilon kaj ĝin postiris... Nun ili denove troviĝas tie kun la juĝisto, por lin rekonduki, ĉu vi komprenas? —

— Kiun? — silabis Mila per malforta voĉo, fine elpelinte la ŝtopilon, kiun ŝi ŝajne havis en la buŝo.

Marinjo ŝin rigardis, surprizite.

— Sed, nu! La paŝtiston, virino! — Kaj vidinte, ke Mila malfermegas la palpebrojn, kaj restas kvazaŭ fulmobatita, ŝi demandis kun granda miro:

— Ĉu vi do nenion scias? —

Mila apenaŭ skuis iomete la kapon.

— Jen li enabismiĝis! La paŝtisto!... Li enabismiĝis ĉe la Platŝtonoj! —

La ermitino sentis, kvazaŭ tie finiĝas ŝia vivo pro la impreso. Sen pulso, sen koloro sur la lipoj, sen starforto en la kruroj, ŝi dorse alpremiĝis al la termuro. La rememoro pri

la tintiltinto ĉe la Supra-Altaĵo traflugis ŝian cerbon, kiel densa nubo.

Marinjo, vidante ŝin en tia stato, murmuris tute embarasite:

— Mi supozis, ke vi jam tion scias! Ĉar jen la tuta vilaĝanaro tie ĉeestas!... — Sed rimarkinte, ke Mila iom klinas la kolon, ŝi levis la brakon kaj per decida movo donis al ŝi vangofrapon.

La barbara reaktivigilo faris sian efikon. Mila tuj rekonsciiĝis kaj pasigis la manon sur sia malseka frunto.

— Pardonu! — tiam senkulpigis sin la bofilino: — Tion mi faris por cirkuligi en vi la sangon... Vi restis, kvazaŭ senviva... —

— Tio trafis min tiel neatendite!... — murmuris Mila, ektremante.

Kaj kun la sango denove funkcianta, kaj dum ili konversacie iris rekte al la Platŝtonoj, ŝi povis aŭskulti la raporton pri la malfeliĉo, kiun laŭdoze, laŭporcie, al ŝi faris Marinjo.

— Ĉu vi scias? Oni diras, ke li ekpaŝtis ĉe la Rigardejo... Ĉar la ŝtormo prezentiĝis senavize, li, kun la celo eviti malsekiĝon de la brutoj dum la rondirado, verŝajne intencis reveni laŭ la abismorando... La platŝtonoj estis malsekaj, kaj ĉar ili deklivas kaj estas tiel glataj, vidu!... Li deglitis kaj falis kapo-antaŭe en la profundegaĵon... Li tute ĝin frakasis al si, la kompatinda... —

Mila serĉis iom da spirforto por demandi:

— Kaj... ĉu li statas tre malbone? —

— Kion vi diras, malbone? Se tiel estus! Morta, virino, morta, same kiel la kadavroj en tombejo! —

La alia prenis ŝin je la brako, hororigita.

— Morta? —

— Li jam estis eĉ rigida kiam tie alvenis miaj familianoj. Pro tio ili tuj rapidis denunci la okazaĵon... Dio lin pardonu, malfeliĉa paŝtisto! La juĝisto pafigis kuglon al la hundo, kiu ŝajnis freneza, ne permesante, ke iu eksterulo alproksimiĝu al la kavo, kaj ordonis enstaligi la ŝafojn, kiuj la tutan nokton dise erarvagis sur la monto... —

Mila tiam memoris la senbridajn bojojn kaj la plendajn ŝafblekojn, kiujn ŝi supozis ensonĝaj imagaĵoj. Poste ŝi rakontis al la bofilino pri la terura kaj mistera sono de la tintilo.

— Ĝi estis la avizo, estis la avizo! — certigis la bofilino.

Mila pensis, paŝante kun kapo klinita:

— Kiu antaŭdirus al li, kompatinda paŝtisto, antaŭ malmultaj tagoj, kiam li rakontis al mi tiun tutan historion, ke baldaŭ la tintilo signalos lian propran morton! Tiun ĉi fojon, tio ja ne estas mistifiko... Jen do jam plenumita la malfeliĉo!... Jen ĝin vidu... Jen ĝin vidu!... —

Kaj tamen, kiom ŝi timis pri Matio! Ŝi jam ne bezonis ion timi... Sed kial nur pri Matio, kvazaŭ neniu alia ekzistus en la mondo?... Kiel strange!... Kaj en la virinon, kiu havis ankoraŭ ĉiujn kapablojn agititaj, penetris speco de granda konsciencriproĉo pro tio, ke ŝi ne priatentis ankaŭ la paŝtiston, ke ŝi ne preĝis por li. Kiu scias, ĉu ŝiaj preĝoj estus haltigintaj la glitfalon?

Antaŭ ol ili alvenis al la Platŝtonoj, ili aŭdis malproksiman interparolon kaj ekvidis popolgrupon irantan returne. Ĝi estis la sekvantaro, kiu iris tien por kunpreni la kadavron. Meze de la aro da scivoluloj, vidiĝis la juĝisto, la vilaĝestro, du kuracistoj kaj sinjoro Paroĥestro, ĉiuj el Murono. Post ili, noktogardisto kaj la edzo de Marinjo portis brankardon kovritan per etendita mantelo el kamloto: la mantelo de la paŝtisto.

Sur plataĵeto de la deklivo ambaŭ viroj delasis la brankardon surgrunden kaj la sekvantaro haltis por ripozi. La bofilino kaj Mila alproksimiĝis al ili.

— Bonan tagon — salutis la bofilino.

— Bonan tagon — ĉiuj al ŝi respondis.

Mila, krurtremante kaj trafite de forta sveno, ne estus povinta artikigi vorton.

Sub la kamlota mantelo, la korpo de la mortinto faris kvazaŭ monteton, ĝiban tie ĉi kaj tie. La mantelo estis tute malhela de malsekeco, kaj tute malpura de koto.

Ĉirkaŭ la brankardo la grupo interparolis mallaŭte, kiel en preĝejo.



Mila aŭdis, ke oni demandas:

— El kiu vilaĝo li estas?... —

Kaj alia respondas:

— Mi ne scias... el la montaro... Lia legitimilo tion versâjne klarigas... —

Mila levis la kapon kaj renkontiĝis kun la rigardo de Arnaŭ, kiu estis fiksita al ŝi. En la vizaĝo de la unuenaskito de Sankta Poncio desegniĝis sovaĝa duonrido. La virino, kun profunda kordoloro, bedaŭris ke, pro ŝi, tiu fraŭlo ĝojas pri la morto de la paŝtisto. Tuje varmeta io tuŝis ŝian manon, kaj Mila rimarkis, ke Baŭdilieto staras apud ŝi. La knabo havis

la vizaĝon brulanta kaj la okulojn ĝiskreve ŝvelintaj. Li stringis (1) brakon de Mila, ŝin rigardis, kaj poste ekrigardis la brankardon.

— Ĉu ne, vi... kiel li malfeliĉa? — kaj li eksplodis per dolora krio.

Severa rigardo de lia patro al li ĝin abrupte ĉesigis.

— Ĉu ci ne memoras, kion mi al ci ordonis? —

Ricevinte la novaĵon pri la morto de la paŝtisto, la knabo estis kurinta, kiel frenezulo rekte al la Platŝtonoj kaj tie li ricevis grandan senkonsoliĝon. Por lin kvietigi lia patro devis lin serioze riproĉi, avertante lin, ke, se li plu flustros vorteton, li irigos lin al la lernejo per plej rapidega paŝo. La knabo, de tiam, sin moderigis kiom liaj fortoj al li permesis.

Mila etendis la brakon ĉirkaŭ lia kolo kaj premis sur li kison, ne multe malpli afliktita ol li.

Marinjo demandis mallaŭtvoĉe al sia edzo:

— Ĉu oni ne permesas lin vidi? —

Ŝia edzo kuntiris la ŝultrojn.

— Montru lin al ŝi — ordonis la juĝisto, kiu estis ŝin aŭdinta.

Ĉiuj apudiĝis al la brankardo.

La edzo de Marinjo levis angulon de la mantelo, kaj la vizaĝo de la kadavro estis malkovrita.

Mila sentis, ke larmoj rulfalas unu post alia laŭ ŝiaj vangoj.

Kiel la mantelo, kiel la vestaĵoj, tiu senmova vizaĝo montriĝis plena de koto. Ŝi preskaŭ ne rekonus lin. Li havis la vangojn verdaj kaj enprofundiĝintaj, la frunton kun malbrila blanko de kazeiĝinta sebo, kaj la okuloj, malfermitaj kaj kun la pupiloj vualitaj, ne havis rigardon. Al Mila ili pensigis pri la okuloj de la leporido, kiam ili ambaŭ ĝin senfeligis ĉe la Orgeno. Super la dekstra brovo estis violkolora ŝvelaĵo — sendube kontuztubero pro la glitfalo — kaj iom pli supre, inter la haroj, montriĝis nigraj koagulaĵoj pri kiuj Mila pensis, ke ili estas sango. Ĉu *tio*, tiu stranga kvieta figuro, kiun ĉiuj silente rigardadis, estas la paŝtisto?... ŝi demandis

(1) Stringi = Forte ĉirkaŭpremi, ĉirkaŭstreĉi.

al si mirigite kiel antaŭ kelkaj tagoj kiam ŝi vidis la maron. Je unu gesto de la juĝisto la mantelangulo refalis, kaj la viroj, per unu mano ĉe ĉiu tenilo, suprenlevis la brankardon. La sekvantaro denove moviĝis antaŭen.

— Kien oni lin kondukas? — demandis Mila al unu el tiuj, kiuj, kiel ŝi, tuj postsekvis.

— Al la hospitalo — respondis tiu ĉi, sin turninte: kaj li restis ŝin rigardanta, tute sorĉita.

Arnaŭ, de iom pli antaŭe, ŝin ree rigardis, ankaŭ fikse, kaj poste kraĉis teren.

La virino eksentis, ke la kruroj ne povas plu ŝin teni. Kiam la sekvantaro alvenis al la Ponto-de-la-Frapo, ŝi diris al Marinjo:

— Adiaŭ! —

—Kien vi iras? —

— Hejmen... Mi ne fartas tre bone... — Kaj ŝi transiris la ponton por ekpreni la vojeton.

Baŭdilieto, aŭdinte, ke ŝi ne bonfartas, haltis, kvazaŭ kun intenco ŝin sekvi. Li rigardis ŝin, rigardis la brankardon, restis momenton ŝanceliĝante, kaj poste li ekkuris post la sekvantaron.



XVI
SUSPEKTOJ

Ju pli da tagoj forpasis de post la morto de la paŝisto, despli Mila restis pro ĝi afliktita. Freŝmomente tio kaŭzis al ŝi pli ol io alia, miron kaj spiritan senkonscion. La maniero per kiu oni donis al ŝi la novaĵon, ŝia iro kun Marinjo renkonte al la kadavro, ŝia vido de li sur la brankardo, sternita, alifiguriĝinta, sen movo, sen parolo, sen rigardo, sen io el kio konsistis la paŝisto, kiun ŝi konis, ĉiuj estis impresoj kiuj, kvankam ili forte ŝin vundis, iamaniere estis al ŝi fremdaj, speco de scenoj el dolora komedio en kiuj, ĉiuj alĝustiĝas al konvencia rolo kaj kiuj, pro tio mem,

havas pli da eksteraĵo ol da intimeco; eĉ vundinte ŝian senteblecon, ili estis preskaŭtuŝe preteririntaj la veran senton, ĝin ne tuŝinte. Ĝis la morgaŭo post la malfeliĉo, la tago de la entombigo, dum ŝi kun ĉiuj ceteraj akompanis la korpon al la tombejo, tiu impreso de malvarmo, de malligiteco, ŝajnis al ŝi mem ekstertona. Ŝia koro restis trankvila, sen fajrero de maltrankvilo, ŝiaj okuloj sekaj kaj plenmalfermitaj por ĉion rigardi, kio ŝin ĉirkaŭis: la vizaĝojn komike dolorigitajn de la virinoj; la nazpinton de Marinjo de Sankta Poncio, ruĝan kiel ĉerizo pro la malvarmo kaj pro tio, ke ŝi plorgrimacis; Mation, kiu sekvis pli antaŭe, inter la viroj, flava, bluringokula, kvazaŭ li estus malsana, kun sia felta ĉapeleto, kiel ĉiam ekstravaganca kaj sia nigra festa jako, kiu jam ne strečiĝis sur li, de akselo al akselo, kiel antaŭe, sed adaptiĝis tiel malstrikte, ke sur la tuta dorso formiĝis faldoj... Kaj la virino, kun atento distrite flirtanta de unu afero al alia, aŭdis ke ŝia dekstraflanka najbarino flustras al tiu pli pretera, parolante pri la malfeliĉo:

— Mia kara, mi iris viziti lin en la hospitalo... Kian fendon li havis sur la nuko kaj kian frakasitan vizaĝon! — Kaj tiu pli pretera aldonis: — Kaj jen li montriĝis tute nudbrusta kaj kun la zono malvolvita, kvazaŭ li estus volinta alkaptiĝi al io! — Kaj la unua reprenis: — Efektive, la malfeliĉulo! Kiel li povus firme alkaptiĝi sur tiu abismo glata kiel manplato! — Kaj alifoje tiu pli pretera: — La kuracisto deklaris, ke de la falfrapo kaj de tiu fendo li mortis sammomente... —

La virinoj daŭre interparolis, dum Mila celis esplori, de kio venas al ŝi tiu trankvilo kaj indiferenteco siaj... Ĉu tio signifis, ke ŝi ne bedaŭras la morton de la paŝtisto? Ĉu tio signifis, ke ŝi nek nun nek iam amis tiun viron, kiu tiel bonkore kondutis al ŝi? — Ne, ne — ŝajnis, ke fine al ŝi respondas interna voĉo: — Fakte tio estas, ke ĉio, kion ŝi faris neniel tuŝas la paŝtiston... — Kaj tiam ŝi prezentis lin al sí en la ermitejo, starantan ĉe la sojlo de la korto, atendantan, ke ŝi revenu kaj demandantan al ŝi apenaŭ li ŝin ekvidis: — Kaj do, ermitino, ĉu vi jam revenas de la entombigo? Kiel vi fartas, kiel vi fartas? —

Ankoraŭ post semajno tiu impreso persistis, ankoraŭ al ŝi ŝajnis malpli certa kaj vera la morto de tiu viro. Ĉiam, en ĉiuj momentoj, ŝi atendis lian suprenvenon por komuniki al li tion aŭ alion, por peti de li komplezon aŭ konsilon.

Unu tagon kiam, en ŝia rapidiro, ŝia rozario kroĉiĝis al la klinko de pordo kaj rompiĝis la ĉeneto, ŝi sencele pensis, ne tion mezurante: — Mi petos al la paŝtisto ĝin ripari. — Alian tagon kiam, dismovante en la ŝranko, ŝi renkontis naztukon lian, kiun ŝi malatente enmetis inter la tolaĵaron de Matio, ŝi murmuris interdente: — La proksiman dimanĉon mi ĝin malsuprenportos al li... — Kaj tiel ĉiam: la ideo, ke la paŝtisto jam ne estas en tiu ĉi mondo ne povis tute penetri en ŝin. Sed tio ne malpermesis al la virino, percepti la mankon de tiu rigardo plena de kvietigaj antaŭzorgoj, kiu ŝin protektis en ŝiaj senfortiĝoj, de tiu milda rideto, kiu dispelis ŝiajn maltrankvilojn, de tiu magia parolo, kiu vidigis al ŝi ĉion mondan bela; tute kontraŭe: ŝi sentis je tio bedaŭron strangan, nebulan, kvazaŭ la malakutan doloron pro naskiĝanta malsano, kiu iom post iom devis plipreciziĝi kaj graviti por ĉiam per io peza kaj premanta super ŝia ĉagrenita animo.

Kiel kulmino de malĝojo, ankaŭ Baŭdilieto ne suprenvenis, kvazaŭ li ankaŭ estus mortinta. Nur Matio suprenvenis por alporti al ŝi la mendojn, kiujn ŝi kutimis al li konfidi ĉiun fojon por la sekvonta. Sed, restadi kun Matio estis tute kiel restadi sola: li ne faris iuspecan akompanon. Sidanta sur ekstremo de benko, kun la kubutoj sur la tablo kaj enfiksinte la makzelojn sur la duobla seĝeto, kiun li al ili formis per la manoj, li pasigis la tutan tempon torpore aŭ meditememe. Ŝi, enuigita de la eternaj mensaj monologoj, al kiuj ŝi estis kondamnita, serĉis kun li konversacion, tiris de li la langon, volis, ke li rakontu ion pri la mondo, eĉ se ĝi estus pri la fetora drinkeja mondo, kie li travintris, pri la malluma obstino mem, kiu lin konsumis. Sed Matio al ŝi respondis malvolonte, senatente, per duonvortoj... ŝajnis, ke li jam ne scias paroli, ke li pri tio perdis la kutimon, ke eĉ ne venis al lia menso la trograndigoj kaj mensogoj al kiuj li estis tiel sin fordonin-ta dum sia tuta vivo... Tio estis agonio por la virino! Maltrank-

vila, sata de tiu situacio, ŝi alvenis al punkto, ĉe kiu ŝi sentis veran malsaton, veran soifon por vidi homamason, por aŭskulti homan voĉon, kaj subite ŝi havis la inspiron malsupreniri al la farmodomo de Sankta Poncio. Ŝi ne plu eniris tien de antaŭ la malfeliĉo, sed nun la kerno de la malkonkordo, la motivo de kolero estis malaperinta: li jam estas morta, tiel same por ili kiel por ŝi, la malfeliĉa paŝtisto... Ŝi vidu, do, kiamaniere ili ŝin akceptos. Antaŭ ol descendi tien, ŝi iris ion repreni sur la teraso, kaj, ĝin faldante, ŝi ekrigardis antaŭen kaj okaze vidis tra inter la pinaroj de apud la Akvo-Muĝulo ion nigran, kiu ilin krucigas...

— Sed nu! — ŝi pensis: — sola virino! — Tamen ŝi pli zorge atentis: — Ne, ĝi ja estas pastro... Virgulino, jen la sinjoro Paroĥestro! —

— Adiaŭ, ekskurso! — Ŝi iris internen, etendis puran tablotukon sur ekstremo de la tablo kaj metis sur ĝin sekkolbason, duonkvadratojn da ĉokolado kaj dolĉajn biskvitojn. Poste ŝi malsuprenigis sian jupon, kiun ŝi portis suprenfaldita, kaj atendis. Sed, ŝi atendis longtempe, horo pasis, sekvis alia kaj sinjoro Paroĥestro ne venis. Mila oftigis la eliron sur la terason. — Kial li tiel prokrastas? De la Akvo-Muĝulo ĝis ĉitie ja ne estas tiom da interspaco! — Eĉ ŝi malsuprenpaŝis ĝis iom pli malsupre de la sunflanko, por eliri renkonte al li. Ĉio vane: dum la tuta posttagmezo ŝi ne vidis sinjoron Paroĥestron. La virino sentis sin ĝenata de tiu malĝentileco. Ascendi ĝis la Akvo-Muĝulo kaj ne enveni en la ermitejon! Domaĝa posttagmezo kiun ŝi estas perdinta!

La morgaŭon ŝi malsupreniris al la farmodomo de Sankta Poncio. La viroj troviĝis ĉe la laboroj, Baŭdilieto en la lernejo kaj la avino en la lito, malsana. Mila ĝojis renkonti la bofilinon sola. Tiu ĉi flikis, sidante ĉe la sunlumo, kiu eniris tra la fenestro de la kuirejo: kun kudro-seĝo (1) ĉe la piedoj, la kankorbeto apudflanke kaj la okulvitroj fiksitaj per nigra bendeto sur la kaptuko. La bofilino havis lacigitan vidadon kaj por fliki ŝi bezonis okulvitrojn. Aŭdinte la "Ave Mario!" n de

(1) Kudro-seĝo = Seĝo kun sidilo pli malalta ol la ordinaraj seĝoj.

Mila, ŝi levis la palpebrojn kaj ekrigardis supre de la rustiĝinta muntaĵo.

— Tute ne moviĝu, Marinjo! — diris la ermitino; kaj preninte alian kudro-seĝon ŝi sidiĝis tute antaŭ ŝi kaj al ŝi demandis pri ĉiuj en la domo. Marinjo respondis al ĉio malrapideme, kaj Mila eksciis, ke la fianĉino de la unuenaskito jam aĉetis al si la komodon, "komodon, kiu ĝuste kostis okeskudan ormoneron"; ke Baŭdilieto fariĝis akolito kaj, ĉar li tagmanĝas en la paroĥestrejo, ili ne vidas lin ĝis la vesperiĝo; ke la avino suferas pro renŝtonoj kaj la kuracisto ordonis ŝin sondi (1); ke la duenaskito eniras nunjare en rekrutadon kaj tio donas al ili tian maltrankvilon; ke la *Ruĝa*, la franca ĉevalino, havis malbonan akuŝon kaj naskis la idon morta... Sed, malgraŭ tiuj eksplikoj, Mila rimarkis en ŝi la saman rezervon kiel antaŭ kelkaj semajnoj, kaj interna voĉo flustris al ŝi, ke ŝia vizito tute ne kaŭzas al la bofilino multe da plezuro. Tiu impreso nodis ŝian koron, sed tamen ŝi ne kapablis moviĝi de tie, kvazaŭ ŝi ion atendus. Ĝis tiu io alvenis.

Daŭre interparolante, Marinjo menciis la paŝtiston, kaj Mila, ne memorinte pri pasintaj aferoj, tuj esprimis bedaŭron pro lia morto, deklarante, ke ŝi tiel forte sentas lian mankon. Tiam en la vizaĝo de Marinjo aperis glacia esprimo, kiun Mila neniam sur ĝi rimarkis kaj kiu pikis ŝin.

— Iru do! — diris la bofilino. — Se ĉiuj povus plori per viaj okuloj! —

— Kion tio signifas? — demandis Mila, mirigite.

— Ke vi ne rajtas tute plendi, ĉar li vin ambaŭ amis! —

— Sed nu! kiel vin ĉiujn, mi kredas, Marinjo... —

Marinjo levis rapide la kapon, kaj iel incitite:

— Pruvojn li donis koncerne tion, certe! — Sed tuj, sin moderiginte: — Tamen... Dio lin pardonu! Kiu scias, kiu kulpas pri tio! —

Mila divenis per tiuj vortoj zumadon de nova mistero kaj, senkuraĝigita ne sciante la motivon, ŝi humiligis la siajn.

---

(1) Sondi = Enkonduki en la korpon instrumentojn de formoj specialaj, por batali kontraŭ obstakloj, kiuj malhelpas la bonan funkciadon de organo, jen enigante likvajn aŭ gasajn substancojn, jen ilin eligante. En nia kazo: Apliki unu el tiuj instrumentoj — sondilo — por eligi la urinon de la veziko.

— Se vi ne pli precizigas viajn eksplikojn!... Mi ne scias, pri kio vi parolas, Marinjo! —

— Iru do, virino, iru! Ne montru vin tiel naiva!... — Kaj ŝi ekridis per rideto tiel glacia kiel ŝia ĵusa esprimo. — Se li volonte faris tion, ĉar ĝi estis propraĵo perfekte lia, jen, mi nenion povas riproĉi tiurilate... Li nedubeble sciis, kial li tion faris... La viroj havas siajn kaŝitajn devo-ligojn... Sed kio konsternas min, estas, ke la popolo pensas pri ni... Inkluzive de la sinjoro Paroĥestro: — Ke li diris al mi tion, ke li diris al mi alion... — Tamen nu! Al ni ankaŭ li supozigis, se li ne precize tion deklaris, sed la fakto estas, ke ni ne tiris el tio eĉ grajnon de sinapo! —

Mila, terurita, komencis diveni la misteron. Kion oni vetu, ke tiu virino aludis pri mono?

— Ĉiel-Reĝino! — ŝi tiam ekkriis. — Ĉu vi eble opinias, ke la paŝtisto heredigis al ni ion? —

— Mi jam scias, ke li ne faris testamenton! Tamen heredigita aŭ... aŭ... ĉio estas same! Li per tio eĉ ŝparigis al si la registaran imposton! —

Mila sentis sin ofendita.

— Nek per testamento nek alimaniere transfluis al ni ia heredaĵo de la paŝtisto! Vi esprimis, ke lia estis tio, kion li havis: vi scias pli ol ni: ni ankoraŭ ne sciis, ke li ion havas! —

Tiel energia, tiel vibranta estis la akcento de Mila kaj tiel firma ŝia rigardo, ke Marinjo, iel konfuzita, mallevis la okulojn. Sed ŝia voĉo insistis, obeante al la nevariebla ideo.

— Do, mi ne komprenas... La fakto estas, ke oni ne trovis havaĵon lian, kaj lia animo ja ne povis ĝin porti kun si al la alia mondo! —

Vere indignita tiun ĉi fojon, Mila fieris.

— Kaj per tio vi deduktas, ke ni nepre devas ĝin posedi? —

Marinjo iomete fleksiĝis.

— Mi ne tiom precizigas... Sed ĉar la korinklinoj kreas la devo-ligojn... se li estus havinta iun... vidu! —

Nur tiam, abrupte, Mila komprenis, la tutan pensamplekson de la bofilino: la paŝtisto *verŝajne pagis korinklinojn* kio, laŭ ŝi, signifis difinitajn servojn.



— Sankta Virgulino! — ŝi ĝemis sufokite: kaj kovrinte al si la vizaĝon per ambaŭ manoj, ŝi krevis per intensaj plorsingultoj.

Marinjo, embarasite, lasis tion, kion ŝi flikis, sur la kudroseĝo.

— Helpu Dio! Kio estas nun al vi? Substance, kion mi diris, por ke vi fariĝu tiel senkonsola?... —

Sed Mila, meze de sia konsterniĝo, pensis:

— Jen ilia ĵaluzo! Jen ilia malico! Ili timis, ke li donacis al ni havaĵon... Avaruloj, suspektuloj!... —

Kaj kiam, iomete senpezigita, ŝi estis mastrino por regi siajn plorsingultojn, ŝi eldiris al la bofilino kun profunda resento:

— Marinjo, mi konsideris vin pli honestaj, vin kaj viajn familianojn... ĉar vi opiniis pri mi tiajn aferojn, kiuj ne meritas Dipardonon! — Kaj stariĝinte, ŝi viŝis al si la okulojn, kaj aldonis kun dolora digneco: — Memoru bone tion, kaj mi tuj ĉi-tie mortu se mi mensogas! Neniam mi estis la konkubino de la paŝtisto, ĉu vi aŭdas, Marinjo? Neniam mi tia estis; kaj pri tio, kion li havis aŭ ne havis, li verŝajne sciis, kion

li faris, do ni estas tiel puraj de tiaj aferoj, kiel Virgulino Mario de peko! —

Kaj ŝi moviĝis por eliri, sen plia vorto; sed gesto de Marinjo ŝin haltigis, jam proksime de la pordo.

— Kien vi iros kun tia vizaĝo? Kvietiĝu, unue... Kion oni pensos, se oni vin vidos!... Cetere... se oni parolas, tio estas ĉar oni devigas paroli... —

Mila restis, denove ŝin rigardante.

— Efektive, — aldonis la bofilino, rezistante ĉi tiun fojon ŝian rigardon: — Ĉie vi havis ŝuldojn... vi mem tion al mi konfidis... Do, se li ne heredigis al vi ion, kial vi tuj pagis, post la morto de la paŝtisto, la ŝuldojn? —

Mila restis konsternita, kvazaŭ oni estus preskaŭtuŝe ekpafinta al ŝi per kanono.

— Kion vi diras?... ke ni...? — Kaj revigliĝinte: — Laŭdata estu Dio! — kaj ŝi ridetis kun rezignacia amareco.

— Ĉu vi kuraĝas ankaŭ tion nei? Se eĉ la butikistinoj mem tion certigis al mi!... —

Mila malfermis la buŝon por repliki, sed Marinjo, ekscitita, ne donis al ŝi tempon.

— Ĉe la morto de la paŝtisto, vidinte, ke oni ne trovis havaĵon lian, ĉiuj pensis: "En la ermitejo sendube oni ĝin havas"; kaj ili postulis de via edzo la pagon de la ŝuldoj; kaj via edzo, jen unu, jen alian, pagis ĉiujn ilin tute senprokraste!... Do, diru: kion la popolo devas opinii nun pri tio?... Se oni ne havigis al vi monon, el kie vi ĉerpas tiel senprepare la rimedojn? —

Mila perceptis laŭlonge de sia tuta korpo sparkon (1) de apopleksio. Kial la fatalo tiel senkompate ŝin persekutas? Kial ĉio turniĝas kontraŭ ŝi?

Ŝi fikse rigardis Marinjon de Sankta Poncio; ŝiaj lipoj tremis... ŝi volis ion diri... sed, subite, ŝi metis en sian buŝon la poŝtukon, saturitan de larmoj, kaj freneze ĝin mordis.

— Adiaŭ! — ŝi poste balbutis; kaj fuĝis el la farmodomo de Sankta Poncio, lasinte Marinjon tute plantita ĉe la pordo.

---

(1) Sparko = Simbola esprimo signifanta fajreron.

Ŝi alvenis al la ermitejo, kvazaŭ ŝin estus portintaj la demonoj.

Kial, kial ĝuste nun Matio pagis? Kial Dio ne provizis lin per iom da kapo kaj da antaŭvido? Aŭ prefere ankoraŭ: kial, kial la paŝtisto mortis? Kial, li, kiu ŝin tiel estimis, heredigis al ŝi tiun havaĵon el suferoj anstataŭ tiun alian, kiun la popolo supozis? Li estis asertinta, ke Dio ĉiam alkliniĝas por la vero... Se tia estas la maniero alkliniĝi!... Kaj kaptita de nerva konvulsio ŝi tiris de si la harojn, mordis la manojn...

Kiel besto, kiu sentas sin mistrafe vundita kaj enkaŝejiĝas por morti, ŝi decidis ne plu descendi de la monto. Sammaniere kiel ŝin traktis la farmdomanoj el Sankta Poncio, farigintaj mizersentaj kaj malŝatindaj pro monavido, ankaŭ la aliaj sendube ŝin traktus. La kalumnioj agas kiel la agropiro: ĉie ili enradikiĝas kaj neniam plu fortiriĝas... La malbona famo diskurus, oni ŝin signus per la fingro, oni ŝin tenus en la langoj kun hontigaj supozoj!... Ŝi sentis, ke ŝi ne havas sufiĉe da koro por tion rezisti. Se oni devis supozi, oni tion ne faru antaŭ ŝia vizaĝo; se oni devis kalumnii, tio alvenu ne al ŝiaj oreloj! Matio reiru agi kiel furiero, li suprenportu hejmen la mankantajn provizojn kaj ŝi restados tie, sekestrita por ĉiam, morta en vivo!

Tiu ĉi estis ŝia intenco, sed du tagojn poste, suprenvenis Baŭdilieto ĝin disrompi. Li venis tiun ĉi fojon ne propravole, sed laŭ ordono de sinjoro Paroĥestro kaj kun la komisio diri al Mila, ke ŝi havu la komplezon malsupreniri, kiam ŝi povos, al la paroĥestrejo. La virino, kies alarmopreteco estis nun konstante vekita, demandis la knabon, ĉu li scias, kion volas de ŝi sinjoro Paroĥestro; sed ĉar la knabo tion ne sciis, ŝi rapidkure formetis de la fajrujo la tagmanĝon kaj, priokupita kaj kun premita koro, ŝi lin sekvis al Murono.

Sinjoro Paroĥestro troviĝis en sia ĉambro, tute sola kaj komfortigita en sia brakseĝo, trans la skribotablo. Li enirigis Milan kaj petis ŝin, ke ŝi fermŝovu la pordon.

— Eksidu, eksidu, ermitino... Mi vokigis vin ĉi-tien, ĉar mi bezonis, urĝe bezonis interparoli momenton kun vi... Mi jam supreniris al vi, jam supreniris antaŭ kelkaj tagoj, sed, verdire, mi rezignis enpaŝi, mi tute rezignis... Ekzistas mal-

facilaj aferoj, malfacilaj por ilin esprimi kiel ajn... sed ĉar hieraŭ ree parolis al mi pri tio la patrino de la akolito... —

Apenaŭ ŝi ekaŭdis mencii Marinjon, Mila fariĝis inerta, senkolora... Ŝi sidiĝis sur rando de seĝo kun la pozoj de mort-kondamnito al kiu oni tuj legos la verdikton. Kio do okazis de post tiu momento? Kiel deruliĝis tiu konversacio kun sinjoro Paroĥestro, kiu tiel profundan sulkon devis en ŝi lasi? Ŝi ne povus tion klarigi. Ŝi nur sciis, ke ŝi estis elmetita al detala demandaro de juĝisto, plena de intencaj demandoj kaj kontraŭdemandoj, de kruelaj surprizoj kaj riveloj. El tiu tuta reto da enfaligiloj kaj subtilaĵoj, ŝi klare eltiris: ke la paŝtisto posedis monon, "multan, multan monon"; ke li ĉiam ĝin portis kun si sub la lanzono, en duobla rimeno el ledo; ke li parole sciigis al Sinjoro Paroĥestro, ke, en la okazo se li mortos, li lasis ĝian duonon al la preĝejo, "memore de la edzino kaj de la filo", kaj la alian duonon al la knabo, al Baŭdilieto; ke, okaze de la malfeliĉo, sinjoro Paroĥestro ĉeestis la formalaĵojn de post la levado de la kadavro ĝis ĝia entombigo, kaj ke, nek li nek iu, estis trovinta ialoke la ledorimenon nek monon; ke estas vero, ke Matio iom post iom pagis ĉiujn ŝuldojn, kaj, fine, ke se *iu* scias kien tiu mono rifuĝis, tiu havas la devon tion komuniki, sub puno de morta peko, ĉar nur silenti, signifas prirabi la preĝejon kaj "naivulon de Nia Sinjoro..." dum ke, ĝin rivelinte, "ĉio estus pardonita, ĉar Dio estas mizerikorda kun tiuj, kiuj pekis, kondiĉe, ke ili tutkore pentu..."

Dum la longa parolado, pli longa ol laŭ ĝia substanco, pro la ĉirkaŭfrazoj kaj esprimripetoj, kiujn sinjoro Paroĥestro kutimis uzadi, Mila ĉiam restis tiel, ke ŝvito el ŝi fluas dum alia al ŝi venas (1) ĉar malgraŭ la certigoj, ke ĉio nur okazis "por demandi, ĉu havinte lin tioman tempon hejme, ili scias ion certan", ŝi klare komprenis, ke en la paroĥestrejo, tiel same kiel en Sankta Poncio, oni tuj malfidis pri ambaŭ. Denove ŝi neis; riskante ĉion super ĉio kaj atentante nenian respekton, ŝi neis kun aroganta vigleco, spronita de la vasteco de la ofendo. — Ne, ne kaj ne! Nenion ili scias pri

(1) La frazo signifas: En situacio de konfuzo aŭ embaraso.

la paŝtistaferoj, nenion ili havas de li, ili povis tion garantii ĉiuloke kun la kapo tute rekta! Kaj kiu scias, ĉu ĉiuj povus fari la samon!... Eble, kiu pli plendis estis pli informita ol ili ... Finfine, la paŝtisto jam de antaŭ kelkaj tagoj ne loĝis en la ermitejo, kiam okazis la malfeliĉo ... — Kaj agitita, kun la voĉo malkomponiĝinta pro senfinaj tonŝanĝiĝoj kaj kun la tuta animo flagranta sur ŝiaj klaraj okuloj, ŝi asertis kaj reasertis kun obstino de maniulo, ke ŝi estas honesta virino kaj ke la Ĉiopova ĉiela Dio estas atestanto pri tio... Ĝis kiam sinjoro Paroĥestro, kiu ŝin aŭskultis kun granda atento kaj ĉiam ŝin fikse rigardante, dum li faris al ŝi, per sia ŝanceliĝanta mano, pacigan geston, fine al ŝi deklaris, ke "li konsideras ŝin kiel bonfaman virinon kaj ke li neniam lasas sin influi de nuraj onidiroj". Sed kiam ŝi, iom kvietigita de tiu deklaro, estis senkaŝe konfesinta, kiel lastan senkulpigan pruvon, la devojiĝojn de Matio kaj la fonton, el kie verŝajne estis ĉerpita la kvitiga mono, la trema gesto de sinjoro Paroĥestro abrupte haltis kaj la esprimo de lia vizaĝo pleniĝis de rezervo.

—Mi jam sciis, jam sciis pri tio, kaj ĝuste pro ĝi... Ĉar,

diru: kion oni povas atendi, kion oni povas atendi de viro blindigita de malvirto?... La monludemulo pasas survoje al cio... kaj la proverbo jam mencias: "De la ov' al la gros', de la gros' al la bov'..." (1) Vere ili nun jam ne monludas... Kun la helpo de Dio ni sukcesis tion malpermesigi, car gi estas pereigo, pereigo de animetoj... Sed ili insistos, insistos ankoraŭ, car tiuj viroj neniam lacigas... Ili ree monludos, ermitino... kaj tiam vi, vi, ion ne dirante... observu, observu... Mi jam suspektas ke... kvankam ciuj povas esti havintaj senhonorigan momenton... Kaj se okaze vi rimarkus... vi, kiu estas bonfara virino... sen ia timo... cu vi komprenas?... Car konfesanto, konfesanto... —

Mila eliris el la parohestrejo ankoraŭ pli dispremita ol el la farmodomo de Sankta Poncio. Stelistoj, bona Dio!... Ili suspektataj kiel stelistoj pro la malbona konduto de Matio kaj sen ebleco ekbriligi, kiel la tagmeza suno, sian senkulpecon! Car fakte ili ne povis gin briligi, kaj la suspekto ciam plu flosos super iliaj kapoj. Cu ne sinjoro Parohestro ankoraŭ komisiis al si farigi spionino kaj denuncantino de sia edzo?...

Malbonsance tiu ci supreniris tiun vesperon por dormi. Li venis pli ofte ol antaŭe kaj nun si komprenis la motivon. Li sidigis apud la kameno kaj la virino, vidinte lin tiel silenta kaj enpensigînta, opiniis:

— Jen kial li ciutage farigas pli stranga! Car guste, de kiam li ne povas monludadi li suferas kaj alsopiras kiel demamigita sucinfano... —

Kaj si sentis deziregon cion al li riproci, frapi lin survange per rakonto pri la vero, kvazaŭ per fajfanta vipo, sed si tuj rezignis tion. Car kion si gajnus? Nenion, sen ia dubo. Kaj aliflanke, li estas tiel nula ke, tuj sciigînte, li estus kapabla suti al si ankoraŭ pli da grundo en la okulojn (2) per unu el siaj malsagajoj.

La virino jam de longe estis lerninta gardi por si la impresojn kaj si ilin gardis ankoraŭfoje, tamen per tiu lasta la pesiltaso falis.

---

(1) "...kaj por fin' l'esafod'". Indikas, ke la delikteco komencas per malmultajo kaj pligravigas laŭgrade gis la perditeco.

(2) Signifas: Pligravigi sian situacion.

Ĉio daŭre forbloviĝis de ŝi iom post iom: unue la konsidero, poste la korinklino, pli poste la pacienco; nun ĵus rompiĝis la lasta ringo el la ĉeno: la rezignacio. Por tiu viro restis al ŝi nur sovaĝa malestimo, kiu en dudek kvar horoj pliakriĝis kun granda intenseco. Lia paŝo, lia rigardo, lia voĉo, eĉ lia spiro fariĝis al ŝi tiel abomenaj, ke nur je ilia percepto, ŝi sentis sin ekster si kaj en situacio efektivigi ian sensencaĵon. En tia stato, je ekstrema akuteco, la komuna vivado jam fariĝis al ŝi netolerebla. Tage, dank' al liaj forestoj kaj al la hejmaj taskoj, ŝi sentis sin pli trankvila, sed nokte, en la mallumo kaj honesteco de la geedza lito, ŝiaj torturoj ŝajnis ne posedi limon. Apenaŭ ŝi duondormiĝis, eta kuntuŝiĝo, la plej sensignifa kontakto, ŝin skuvekis, kaj instinkte ŝi apartigis la korpon de tiu de la edzo, kaj ŝtopis la orelojn por ne aŭdi lian spirblovadon.

Li jam de longe ne dormis laŭ sia antaŭa paca dormo de kontentigita besto, sed laŭ alia dormo pli agitita kaj rompiĝema de neŭrozulo, kiu devigis lin turniĝi kaj returniĝi, sin grati, svingi piedfrapojn kaj elĵeti obtuzajn hurletojn de infano, kiu gorĝopremiĝas; kaj ĉe ĉiu el tiuj movoj la virino pensis: "Jen nun, jen nun li vekiĝas!" Kaj regata de naŭzaj teruroj, ŝi, laŭ treniĝetoj, laŭ neperceptebla treniĝetoj, daŭre apartiĝis ĝis preskaŭ ŝi defalis de la lito, kaj poste restadis kvieta, korpremita, ne kuraĝante spirblovi pro timo provoki la katastrofon, la timatan revekiĝon... Ĉis kiam, je la unuaj aŭrorheloj, kiuj videbligis la fendeton de la fenestroŝutro, ŝi saltis de la lito, kaj kun la vestoj en la manoj, iris sin vesti en la kuirejo.

Denove ŝi aspektis malbonfarta kiel antaŭ kelka tempo, kaj ŝiaj grandaj, verdaj okuloj ŝajnis eksterordinare grandiĝi, kvazaŭ, tute kiel okazis al la sinjoro de Liskento, ili volus forpreni de ŝi la tutan vizaĝon.



XVII

EN TIU NOKTO

Mila eksciis pere de Matio, ke jam estas la malgranda ĉeffesto en Murono, kaj en la posttagmezo de la unua tago, ŝi malsupreniris tien por vidi la dancadon. La malnova placo ŝajnis abelujo, dank' al la denseco kaj zumado de la ĉeestanta amaso, kaj, de sur la balkonoj, girlandoj el sinjorinoj, tute belvestitaj, olimpe (1) rigardadis la sardanojn.

Mila rifuĝis, iom brusurdigita, sub la malaltajn kaj volbajn portikojn, kun kvarangulaj pilastroj, kies sokloj, konstante priverŝitaj de hundoj kaj infanoj, ellasis malagrablan kloakodoron.

(1) Olimpe = Troige majeste.

Eksterportike du aŭ tri vicoj da starantaj viroj kaj virinoj prezentis al ŝi la dorson, malhelpante ŝin vidi la placon, kaj subportike la sinsekva fluo de la homamaso, kiu ie post ŝi paŝis tien kaj reen, surtretante ŝian jupon kaj donante al ŝi puŝojn, baldaŭ ne permesis, ke ŝi restu kvieta. Kunpremita inter tiu senmova popolo antaŭ ŝi kaj tiu moviĝema malantaŭe, kaj kun tiuj malbonodoraj emanoj sub la nazo, la virino komencis, post nelonge, sin senti ĝenata kaj tedata. Ĉu tio estas amuziĝi? Bone ĝin konsiderinte, anstataŭ nenion vidi, pli valoras enspiri pli puran aeron kaj ne havi, en ĉiu momento, dekduon da piedoj sur si! Kaj elpuŝiĝinte kiel ŝi povis, ŝi iris efektivigi kelkajn aĉetojn, antaŭ ol reiri al la ermitejo.

Enbuŝiĝante en la straton de Francujo ŝi renkontiĝis kun la muzikistoj, kiuj, post fino de la unua parto, sin direktis por trinkmanĝeti. Ili estis la samaj, kiuj muzikis ĉe Sankta Poncio, kaj la *fiskorno-muzikisto* el la koblo prezentis tute rideman vizaĝon kaj ŝin vokis de malproksime: "Adiaŭ, *belulino!*". La fiskornomuzikisto havis la kapon ronda kiel ŝpar-terkruĉo kaj ĉiam okulumis per la dekstra okulo kun sinteno de komika friponeco. Mila, siavice, ne povis sin deteni de ridado, memorinte, ke dum la tagsoleno de Sankta Poncio tiu fraŭlo regalis ŝin per multe da flataĵoj, konjektinte ŝin fraŭlino. Dank' al la neatendita renkontiĝo iom malaperis de ŝi la embaraso ricevita sur la placo, kaj tuj kiam ŝi havis siajn aferojn pretigitaj kaj, pensante pri la komika vizaĝesprimo de la fiskornomuzikisto, ŝi malsupreniris tra la strato de Francujo.

Matio, kiu ŝin spionis, atingis ŝin ĉe la eliro de la vilaĝo.

— Ĉu vi jam foriras? —

— Jes: ĉu vi venas kun mi? —

Matio gratis al si la nukon.

— Ĉu nun?... Estas frue... Post la dancoj... nome, post la vespermanĝo... oni diras, ke okazos tia brila parado kun torĉoj... —

Mila tuj komprenis lian artifikon.

— Kaj vi kredeble volas resti?... — ŝi demandis, malvarme lin rigardante.

— Nur momenton... ne pli... —

— Restu — ŝi respondis al li sen seka tono. — Adiaŭ! — Kaj ŝi malproksimiĝis per malpeza kaj decidita paŝado.

— Mi jam suprenvenos, ĉu vi aŭdas? — li ankoraŭ postkriis al ŝi; kaj kiam li opiniis, ke ŝi jam troviĝas sufiĉe malproksime, por ke ŝi ne povu lin riproĉi, li aldonis per parolpafo. — Ĉar tio estos iom malfrue, ne atendu min, ĉu? Mi jam frapos! —

Kial ŝi lin atendu! Unu nokton sola, unu nokton libera: kia trankvilo! Kaj trim, tram... trim, tram, ŝi komencis suprengrimpi, ankoraŭ pensante pri la fiskorno-muzikisto.

Verŝajne li havas bonan karakteron; tiu vizaĝo devas inklinigi lin al gajeco, kiel li inklinigas la ceterajn al ĝi; ekzemple, ŝin. Rigardi lin kaj devi ridi estas afero sammomenta, kaj ŝi komprenis ke, se dum cent jaroj ŝi lin havus antaŭ si, dum cent jaroj al ŝi okazus same. Kial ŝin prenis por fraŭlino tiu viro? Ŝi opiniis, ke ŝi ne aspektas tia. Ankoraŭ hodiaŭ li flatnomis ŝin *bela* kaj same ŝi ne sentis sin tia, hodiaŭ. Sed, jen kion ŝi pensis: tiu viro plejeble havas kontentigan karakteron, konformiĝantan al ĉio; estas favorŝanco posedi similan temperamenton...

Kaj distrita per tiaj pensoj sensubstancaj, ŝi alvenis supre ne atentinte. Noktokrepuskiĝis. Ŝi penetris en la stalon kaj palpe eligis la ovojn el la demetnestoj. Tie estis du... tri... ses, sep... Sep. Kun la manoj plenaj ŝi suriris la ŝtuparon kaj direktis sin por ilin meti en la korbeton, en la sonoriltura ĉambro. Ŝi kalkulis ilin ĉiujn: mankis unu por kompletigi tri dekduojn. Ĉar ili vendiĝis je kvin realoj la dekduo, la sumo estis kvin... dek... dekkvin. Ŝi estis ne malkontenta pri tiu semajna rikolto.

Ŝi kovris la ovojn kaj transiris al la alia ĉambro por ŝanĝi sian veston: poste, ŝi fermis la fenestroŝutrojn de la salono kaj sin turnis al la kuirejo por ekbruligi fajron kaj la petrollampon. Ŝi havis la vespermanĝon pretigita kaj nur bezonis ĝin varmigi. Ree ŝi malsupreniris por fermi la pordon de la korto. Grilo ekstere kantadis per ia sinsekva kaj penetrema rik-rik. Ĝin aŭdinte, la virino ne sciis, pro kia kaŝita rilato ĝi donis al ŝi deziron manĝi helikojn. — Morgaŭ mi kuiros da ili — ŝi ekpensis kun apetitekscito; kaj, fiksinte la pivoton

de la pordoĉeno, ŝi turniĝis. Sammomente ŝi ellasis aj-krion (1) kaj faris eksalton. Ĉar ŝi estis alarmiĝema, subite ŝajnis al ŝi, ke ŝi vidis ion, kio moviĝas en la ombro de la stalo. Ŝi bone atentis. — Tamen, nenio!... Sorĉistino, jen kion asertus la malfeliĉa paŝtisto!... Ŝi suriris la ŝtuparon, sed ankoraŭ ŝi ne troviĝis sur ĝia mezo, kiam la malkonfido devigis ŝin refoje turniĝi. Ho, Dio! Ŝi tiam ne plu eligis aj-krion nek faris eksalton, sed obtuzan tranĉ-krion kaj pafis sin al senbrida kuro supren de la ŝtuparo. Tiu io, eliĝinte el la ombro, impetis post ŝin!... Eĉ kapablon ŝi ne havis por ŝovi la pordon de la kuirejo. Stare sur la sojlo, estis viro. Ŝi, kun sango glaciiĝinta, sin apogis ĉe la tablo.

— Ne timu... — esprimis raŭka balbuto; kaj, en la nesufiĉa lumo de la petrollampo, ŝi vidis en la malluma vakuo blankan vizaĝaĉon.

Se oni estus pikvundinta Milan, ne elfluus el ŝi eĉ sangoguto. Sed ĉar la viro lante antaŭeniris du paŝojn, eskapis el ŝi granda krio.

— Kion vi volas? —

Li haltis.

— Ne timu... Hu, hu, hu!... — Kaj li ŝovis la manon en la subŝtofon de la pantalono kaj gratis sin kiel besteto.

— Kion vi volas, mi diras? — ŝi ripetis, pli timigite.

Li salivglutis, hezitis, tute skuiĝis...

— Hu, hu, hu!... Mi... volas al vi diri... mi... se vi volus. — Kaj la raŭka balbuto estingiĝis en li, kvazaŭ membrano sin lokus en lia gorĝokanalo.

Mila tremis kiel folio. Per granda klopodo ŝi povis ankoraŭ aldoni:

— Iru... tuj foriru! —

Sed li ne moviĝis: li ŝajnis surplanke plantita; li nur etendis la simian manegon, sur kies bruna plato rebrilis flava fajrero.

— Se vi volas... ĉu vere jes?... diru?... — Kaj li ĵetis al la piedoj de la virino ormoneron; la monero resaltis kun sonora tinto.

---

(1) Aj! = Vea krio.

La virino, ĝin vidinte, posteniĝis ĝis la muro, kvazaŭ ĵus aperis al ŝi monstro. Ĉe li la nevideblaj okuloj flagris sub la brovotufoj, kiel en tiu tago, kiam ili ŝin vekis ĉe la bedoj de la migdalarboj.

Vidinte, ke ŝi nenion respondas:

— Ĉu vi volas du?... Mi donacas al vi du... — li murmuris; kaj alia monero falis kaj ruliĝis ĝis sub la tablo.

— Ne, ne! — tranĉe kriis la virino, dorse alpremita al la muro: — Iru... foriru! —

Sed li, anstataŭ foriri, faris novan paŝon. Brue li spirblovis tra la malfermitaj naztruoj, kaj tute tremis, kvazaŭ pikite de la tarantulo.

— Kiom, do?... Ĉiujn?... Ĉu vi volas ilin ĉiujn?... — kaj

rapide li daŭre ĵetis monerojn kaj pliajn monerojn al la piedoj de la virino.

Tiu ĉi ne moviĝis nek ion diris: ŝi estis perdinta parolon kaj agon; tute kvazaŭ la vibranta falo de tiu orpluvo ŝin estus blindiginta. Sed subite la forto mem de la teruro ŝin malsorĉis, kaj sentinte, ke el siaj piedoj ŝprucas flugiloj, per granda timega rapidmovo ŝi sin ĵetis al la malluma salono.

Ŝi klare aŭdis la blekon de la mokita sovaĝbesto, kaj tuj poste ĝian furiozan ululon, kiu antaŭenĵetiĝis post ŝin. Persekutata de li kaj denuncata de la impeto mem de sia forkuro, ŝi pasis kiel fulmo tra la ĉambro de la sonorilturo, sin englutis laŭ la ŝtupareto de la kapelo, oblikve trairis ĉi tiun kaj, kvankam ŝi troviĝis tute meze de la mallumo, ŝi eĉ alvenis ĝis la pordeto de la altarpostaĵo; sed abrupte, ĝin trairante, io transversiĝis ĉe ŝia paŝo kaj la virino, ĵetinte penetrantan hurlon, rulfalis per transkapiĝo sur la ŝtonplatojn...

Ŝi ekvidis grandan lumilaron kaj opiniis, ke la vivo al ŝi mankas; tamen, antaŭ ol tute perdi la konscion, ŝi ankoraŭ sentis, ke falas sur ŝin kaj profundiĝas en ŝian karnon la harkovrita ungego kaj la ardanta spirblovo de la sovaĝbesto.

. . . . . .

Longe post kiam la virino restis surplanke sidanta, ŝi ekstaris: ŝi havis la kapon plena de nuboj, kaj la okulojn incitis ombroj intermitaj. Palpante per la ŝuoj la plankon, ŝi pasis tra la altarpostaĵo kaj la najbara ĉambro, plena de eluzitaĵoj, kaj kviete puŝis la pordon de la stalo. Ĉe la alia ekstremo, la lumrestaĵoj de la vesperkrepusko konturis en la interna mallumo la arkaĵon, kiu donis aliron al la korto. Pretere, ties pordo estis tutmalfermita. En la sorĉanta soleco de la nokto, tiu malfermita pordo vekis teruron. Trans ĝi, la grilo, nelacigebla, ankoraŭ kantadis per sia persista rik-rik. Mila suriris la ŝtuparon. Fine de la balkona koridoro ankaŭ la pordo de la kuirejo estis malfermita. Ĝia flaveta makulo, konturita de la lumo de la petrollampo, ŝajnis orsigelo stampita sur la malklare blankeca muro. Tiu oro kondukis al la

memoro de Mila la alian oron, kiun ŝi vidis falantan al siaj piedoj.

Ŝi eniris la kuirejon: la planko estis pura, sen ia fajreraĵo. La krimulo estis denove kolektinta sian kapitalon antaŭ ol foriri. Kiel sola postsigno lia, restis nur piedmarko de malseka kanabŝuo apud la pordosojlo... Mila, sentante siajn manojn gluiĝeme malpuraj, ilin ekrigardis: ili estis sangokovritaj; subrigardante, ŝi ankaŭ vidis tute ruĝmakulita la blankan kaprinharan ŝirmotukon, kiun ŝi portis ĉe la kolo. Ŝi ekbruligis stumpon de kandelo, kiun ŝi havis ĉe angulo de la lavoŝtono kaj transiris al la salono. Unu... du... tri duonoj da piedmarkoj de malseka kanabŝuo distingiĝis sur la kaheloj. Ŝi suprenlevis la kandelon por rigardi la horloĝon: ĝi montris kvaronon de la deka. Ĝia tiktako, senĉesa kaj persista kiel la grilkantado, ŝajnis nun al la virino io mokema.

Ŝi eniris en la ĉambron kaj proksimiĝis al la speguleto. La nuboj en ŝia kapo inkandeskis same kiel sunsubiraj nuboj. Momenton ŝi fermis la okulojn kaj poste ilin ree fiksis: la vizaĝo, egale kiel la manoj, kiel la ŝirmotuko kaj kiel la nuboj en la cerbo, estis tute sanganta, kaj meze de la ruĝo ŝi rimarkis vundoŝiraĵon, kiu ampleksis ekde apud la centro de la dekstra vango ĝis sub la malsupra makzelo. Nun ŝi komprenis, de kio venis la granda doloro, kiun ŝi sentis ĉe la rulfalo. Ŝi verŝajne koliziis kun la ferbolto, kiu elstaras el malnova altartabulo, izolita ĉe la altarpostaĵo... Ŝi lavis la vundon per alkoholo kaj ĉi tiu mordis tiel pikdolorige la vivan karnon, ke larmoj rulfalis de ŝi unu post la alia. Pro timo ree sveni ŝi interrompis la flegadon de la vizaĝo kaj refoje sin spegulis. La vundostreko ne estis tre profunda, tamen el ĝi restos vasta cikatro por ŝia tuta vivo! Ŝi ŝanĝis siajn tukojn kapan kaj kolan kaj lavis al si la manojn. Io ŝin spronis, ŝin puŝante eksterdomen. Ŝi estingis la kandelstumpon kaj trairis la salonon. La nokto estis preskaŭ milda, kiel printempa nokto, kaj tiel serena, ke ŝi distingis tie supre de la muro de la kuirejo la rondan vizaĝon de la sunhorloĝo, ridantan kiel stultulo per la ŝpar-terkruĉa ridado, kiun havas la fiskorno-muzikisto. La pordo de la korto, ankoraŭ larĝe malfermita, ŝin elsuĉis: ŝi iris eksteren. Ŝajnis, ke la firmamento en sia tuta amplek-

so, rapide sin delasas ĉirkaŭ ŝin... Ĝi staris mirinde stelpunktita, kaj la steloj havis tian eksterordinaran lumreflekton, ke oni dirus, ke la tuta spaco trembrilas per neesprimebla lumflagrado.

Mila, rekte kaj sentime, iris eksidi super izola akvofluejo ĉe la sunflanko. Ŝi, ĉiam tiel timema, subite estis perdinta la timon. Kio povis al ŝi okazi, pli forta ol tio, kion ŝi jam spertis?... Kun la kruroj kunpremitaj kaj la kubuto sur la genuo, ŝi per la tuko ŝirmis la vundon dume subtenante sian kapon.

Antaŭ ŝi la Granda Ŝtonego similis ĉielpecon pli malluman kaj sen steloj, kaj pli malsupre, grandaj masoj de konfuzaj formoj naĝis en bruna duonombro, plena de mistero; el tiu duonombro ŝajnis delikate ŝpruci, kiel la aromoj el parfumbruligilo, tiu profunda silento, plena de neaŭdeblaj harmonioj, kiu ĉion senescepte invadis. Mila sentis sin agrable, ĉirkaŭita de tiu granda silento. Ŝi komprenis, ke en tiu momento, kia ajn bruo estus al ŝi kaŭzinta ĉagrenon, preskaŭ fizikan doloron. Kaj ŝi sentis dankemon al la persista grilo, tial ke ĝi silentis. Sed, plejeble, ŝi ĝin dispremis elirinte el la domo... Kaj venis al ŝi unu penso: kiu scias, ĉu estas peko mortigi grilon? La griloj havas vivon, kaj vivo, eĉ se ĝi estas grila, finfine estas vivo. Ekstermi, do, tiun vivon antaŭ ĝia natura limo, estas la plej granda domaĝo, kiun oni povas kaŭzi al ili: ĉar ĉiu grilo, kiel ĉiu besto, kiu kreiĝas sur la tersurfaco, havas nur unu vivon... Nuran vivon: kiel sensignifa afero!... Kaj se oni ĝin nevole kripligas? Kaj se oni ĝin rompas laŭmeze, kiel ŝi estus povinta rompi tiun de la grilo? Ĉu ne ekzistas ia maniero tion ripari? Ĉu ne ekzistas ia ajn kompenso?... Eble jes estas peko, mortigi grilon, kaj eble peko pli grava ol aliaj, kiuj al ŝi ŝajnis, ĝis tiam, pekoj tre gravaj...

Taksi kio estas aŭ ne estas peko, ĉiam priokupis Milan, kaj nun, kiam ŝi ree meditis pri tio, ŝajnis al ŝi, ke ŝia penso iom post iom kreskas, kaj apartiĝas de ŝi, malproksimiĝante al la senfino kaj prenante la duonsferan formon de la konstelacia volbo; kaj ŝi, centra punkto de tiu dilatiĝanta penso, kiu ŝajnis ĉion ampleksi, senpene komprenis tion, kion ankoraŭ ŝi neniam estis kompreninta, klare vidis la malluman flankon de ĉiuj okazintaj aferoj, kaj per klareco tiel neta, tiel

diafana, ke ŝi vere miris pri la pasinta blindiĝo. Ekzemple: kial antaŭ longe ŝi ne komprenis, ke la *skorpio* realigos en ŝi fiaĵon? Kial ŝi ne rimarkis, ke li ŝin spionas de la tago mem, kiam li ŝin konis, de post momento kiam li ŝin surprizis en la kapelo, desaltantan de la altaro, kie ŝi purigis la kruron de la ligna anĝeleto? Nun ŝi revidas lin, kiel tiam, kiam antaŭ ŝi li ŝin rigardadis en silento kaj kvazaŭ fulmovundita de ŝia ĉeesto; nun ŝi legas la naskiĝon de la perfida intenco en liaj enkaviĝintaj pupiloj. Kaj deirinte de tiu punkto, en kia ajn momento, kiam ŝi rememoris lin, ŝi konstatis en liaj faroj, en lia tuta estaĵo, la teruran antaŭsignon. La paŝtisto estis dirinta: — Nenion timu dum mi vivos... — sed kial ŝi ne divenis, ke la alia, erarinte, same kiel ŝi, rilate la korinklinon, kiun la paŝtisto sentis al ŝi, forigos lin el la mezo por sin ĵeti sur ŝin sen ia timo?... Ĉar efektive, ŝi kaj la *alia* estis plene erarintaj. La paŝtisto neniam ŝin amis kun la pasio de viro al virino. Kaj ŝi tion nun bone konstatis; ne estis la jaroj, ne estis la antaŭgardanta amuleto, ne estis virto aŭ prudento supera al tiu de la ceteraj viroj, kio sin intermetis meze inter ili, ne: estis rememoro, ombro, respekto; estis la nura rememoro pri la alia virino, pri lia edzino, pri la iama servistineto ĉe Sankta Poncio.

Nun, ĉe la freŝa klarvido, kiu lumigas ŝian menson, ŝi ilin vidas, unu viva kaj la alian morta, antaŭenmarŝi parigitaj tra la tempo, kvazaŭ ili ambaŭ estus vivantaj; nun ŝi perceptas alimaniere la nerompeblan geedzoligilon de iliaj animoj...

Longa siblo de la noktuo en la sonorilturo interrompis la meditojn de la virino. Tiu siblo faris al ŝi la efekton, ke ĝi traŝiris la eteron per terura ŝirimpulso, tute kiel la bolto de la altartabulo ŝirvundis ŝian vangon. Kiu scias, ĉu en la etero restos ankaŭ cikatro pro tiu sekcado, kiel sur ŝia vango? Ŝajnis al ŝi, ke ĉiu okazintaĵo devas postlasi signon: kaj se estas tiel, kiom da signoj devas ekzisti, kiuj ne ĉie vidiĝas!...

La virino rektigis la korpon ne foriginte la manon de sur la vizaĝo. La kubuto kiun ŝi estis apoginta sur la genuo kontuzis al ŝi la karnon kaj dolorigis la oston. Ŝi lokis mezen la

alian manon, laŭ maniero de kuseneto, kaj ree restis senmova kiel paralizitino.

La nokto, saturita de granda mita beleco, defaligis sur ŝin siajn nenombreblajn rosvualojn, sen tio, ke ŝi ilin perceptus, kvazaŭ ŝia tuta sentebleco restus limigita al la dolora kontuzo ĉe la genuo kaj al la fajrobutono, kiu brulvundas ŝiajn internaĵojn.

La luno ekaperis, kaj iom post iom ĉio stompiĝis, melankolie koloriĝante per modera blu-verdo de beriloj. Elstaris el tiu ĝenerala tono, ĝin ne rompante nek mem malfokusiĝante, la plej rimarkindaj aferoj. Tie proksime la pluvakvaj basenoj, sorĉitaj, kiel kolosaj smeraldoj; la du cipresoj, kiuj ĉe la enirejo al la bedoj, pli longaj kaj distaŭzitaj ol iam, silente ĉirkaŭpremiĝis en la altaĵo, kiel du maljunaj gigantoj, kiuj adiaŭus unu la alian por eterne; la Granda Ŝtonego — je bluo kontinua kaj intensa, apenaŭ distingiĝanta sur la ĉielo pro malforta fosforesko, pro necerta poezia brilo, kiu ŝajnis trasorbiĝi sur ĝia tuta surfaco (mistera aŭreolo, eble, de ĝiaj entombigitaj legendoj) — la blanka muro de la kuirejo en la ermita domo, nun pentrita de la luno per pala elektra bluo (1), kiu liveris helegan malvarman noton, kaj... preskaŭ nenio alia, ĉar la pinaroj, la ravinoj, la deklivoj, la malproksimaĵoj, ĉio enmergiĝis kaj solviĝis en la granda kvieta kaj silenta maro, kiu ŝajne ne havis bordojn...

Preterflugis granda nokta rabobirdo, per zumanta flugo de fortikaj flugiloj. Preskaŭ samtempe falstelo, desegnante per luma streko kvaroncirklon sur la firmamento, rapidis fali malproksimen, en direkto al la Knabino. Mila pensis:

— La paŝtisto jam estus elpensinta fabelon pri tiu birdego kaj pri tiu falstelo... La paŝtisto estis saĝulo... Ŝajnas ke Flortremolo faris al li la donacon, kiun ŝi promesis al la pentofaranto, kiu neniam konis naskitan virinon... Efektive: li estis saĝulo kaj neniam eraris, kvazaŭ li antaŭe scius ĉion, kio devos okazi... —

Kaj tuj ŝi memoris, kiel ofte li ŝin avertis, kun la frunto sulkigita de la priokupoj pro sia antaŭvidado: — Fiksu aten-

(1) Elektra bluo = Bluo verdnuanca.

ton al tiu ĉi viro, ermitino: li estas la persono plej malŝatinda sur la montaro...; — kaj poste: — Bone ni fuŝis! Tiu malbonaŭgura rabobirdo rondiras la ermitejon... kaj tio ne estas ridiga afero, certe...; — kaj poste ankoraŭ: — Se validas tion eldiri, li estas la sola motivo, kiu impulsas min havi la okulon atentega... Se mi falus en liajn manojn li ja ne min indulgus... — La virino, en sia interno, ĉiam iomete ridis pri tiuj antaŭtimoj; nur nun ŝi komprenas kiom ili valoris, nun kiam jam estas tro malfrue, nun kiam tiel ŝi kiel li... Ĉar fakte la paŝtisto mortis de la manoj de la Spektro; nun la virino estas pri tio tute certa, kvazaŭ ŝi estus ĝin vidinta per propraj okuloj; la tinto de tiuj ormoneroj, kiuj falis al ŝiaj piedoj, tion pruvis al ŝi, kaj tiu tinto ne mensogis... Kaj ŝi memoris pri apartaj detaloj, kiuj gravuriĝis en ŝia menso okaze de la malfeliĉo: "tute nudbrusta..." "la zono malvolvita..." "la nuko fendita..." "la vizaĝo frakasita..." "tute malpura je koto..." kaj "sen ledorimeno..." *Sen ledorimeno!...* Ne, la paŝtisto ne glitfalis: ŝi sufiĉe konis la firmecon de tiu kapo kaj la prudenton, kiu gvidadis ĉiujn liajn paŝojn... La paŝtisto ne estis glitfalinta: li estis atakita de post la dorso kaj, de perversa mano, ĵetita malsupren... Efektive, atakita de post la dorso; ankaŭ tion li antaŭsentis: — Mi ne scias kial, sed mi inspiras al li pli da timo ol la kruco al la diablo... li neniam ja kuraĝis min rigardi en la vizaĝon per siaj bubalaj okuloj!... — Li kondutis kiel okaze de la pafo sur la Kresto de la Gnomo: kiel perfidulo... Estis la ataksalto de la sovaĝbesto, kiu gvatas; la trafa frapo, kiu fendis al li la kranion, kiu lin ĵetegis laŭ tiu krutegaĵo "glata kiel manplato..." Li estis falinta vizaĝe al la fundo de la fendego... Jen la falfrapo kaj la koto sur lia antaŭaĵo.. "Mortinta sammomente" la kuracisto deklaris... Kaj kian penon kostis lin transturni kaj returni, jam kadavron, por prirabi de li la ledorimenon?... Malfeliĉa paŝtisto! Kial neniu suspektis perfidon tiel klaran?... Ĉiuj asertis "li glitfalis, li glitfalis!", kaj al neniu venis en la kapon io alia... kaj la skorpio ĉiam ankoraŭ vagas libera sur la montaro... ĝis li renkontos alian paŝtiston kaj alian ermitinon... —

La virino konvulsie skuiĝis kaj ree sentis la fajrobutonon brulvundi ŝiajn internaĵojn kun pli da pika dolorigo ol tiu,

kun kiu la alkoholo ĵus mordis sur la viva karno de la vango. Kaj, subite, venis al ŝi nova rememoro, kiu glaciigis ŝian tutan animon: la rememoro pri tiu fervora preĝo suprenlevita ĉe la Akvo-Muĝulo, dum ŝi trinksuĉis la miraklofaran akvon, kaj tuj-tuje pri la mokemaj ridoj de la Sanktulo, skuanta, en la ombro de la sonĝo, sian abomenan ventron kiel de graveda virino... — Ho! Sankta Poncio neniam al ŝi sentis simpation! — Kaj pro nova pli forta timskuo, ŝi fermis la teruritajn okulojn kaj ekscitite kunpremis la kunigitajn krurojn...

Rik, rik, rik!... Tie, tuj apude, ĉe la piedo mem de la akvobasenoj, la grilo ree kantis, kuraĝe ripetante sian solan noton, sekan, penetreman, malagrablan, kvazaŭ de klariono.

La virino turnis la kapon, kaj vane ĝin serĉis en la blua duonombro. Ŝi do ne estis dispreminta ĝin... tiom pli bone! Ĝi estas unu vivo, kaj ĝi ne havas alian krom tiu... Ĉu nur unu vivo?... Ĉu tio estas certa?... Sed ŝi ree memoris la paŝtiston. La paŝtisto ĉiam parolis pri aliaj vivoj, pri vivoj estintaj, kiuj pludaŭras en la nuna. Ĉio ekzistinta en pasintaj jarcentoj pluvivas, laŭ liaj fabeloj; la tuta mondo estas plena de vizioj kaj de spektroj, kiuj vagas inter ĉielo kaj tero, senigitaj je la karno kaj ostoj, kiuj iutempe donis al ili percepteblan formon, sed kiuj, malgraŭ tio, ankoraŭ sekrete miksiĝas en ĉiujn okazaĵojn...

Kaj daŭre rememorante, la virino perceptis, per pure interna percepto, la bluecan flamon de erarlumo, kiu rapide transiris la profundegaĵon; vidis la animon de tiu maljunulo el la antikveco, kondamnita, meze de la eterna mokimito fare de la Trumpetulinoj, al la eterna sopirado pri neeblaj amvoluptoj... Kaj poste ŝajnis al ŝi, ke ŝi aŭdas, el trans la pleja profundo de la abismo, funebrajn kaj fandiĝemajn resonojn de voĉoj de mortintoj: la dolorajn ĝemojn de la fortranĉitaj kapoj, kiuj resaltas tra la arkaĵoj de la Ponto de la Frapo, ruliĝante meze de la vezikiĝado de la akvoj ruĝigitaj de ilia propra sango... Efektive, ĉiuj tiuj fabeloj parolas pri aliaj vivoj, pri mistera supervivado de ĉio, kio ekzistis, sed ili estas fabeloj, fabeloj, kiuj sorĉas la orelon kaj la intelekton, tamen nur fabeloj... Kaj la skeptika spirito de la virino rezistis konsenti kredadon pri ĉio, kion ne atestis ŝiaj sentumoj, ĝis fine ŝi ektuŝiĝis kun lasta fabelo: tiu pri la tintilo ĉe la Supra-Altaĵo.

Ĉu ankaŭ ĝi nur fabelo?... Ne, ne, tiu ne!... Meze de la ŝtormo ŝi estis aŭdinta ĝian tintadon super sia kapo, kvazaŭ ĝi malsuprenvenus el la ĉielo, kaj ĝin reaŭdis ĉiufoje, kiam ŝi pensis pri ĝi... Ne, certe, tiu ne estis fabelo... — Kaj do?... — La virino, perpleksa, lante profundigis la rigardon pluen, en tiun grandan nerealan maron el blu-verdaj akvoj, kvazaŭ ŝi volus dronigi en ĝi la akravidecon jam senutilan de sia superekscitita menso, kiu komencis senfortiĝi iom post iom...

Intertempe la luno, svene vagigis super tiu granda maro, abundaĵon da arĝentaj lumradioj, similaj al la fadenoj de la Dipatrino, kiujn la araneoj subtile teksas, por ornami la kvieton de la grandaj solecoj, kiun la homoj ne devas perturbi per siaj malagrablaj intermalamoj.



XVIII

LA MALSUPRENIRO

La horoj, nekonsterneblaj, estis trankvile ruliĝintaj super Mila, ĉiam sidanta kaj senmova, kiel gvardia statuo, super sia akvofluejo ĉe la sunflanko.

La nokto defaligis sur ŝin siajn rosmantelojn, sen tio, ke eĉ por momento venus al ŝi en la kapon la ideo, eniri en la ermitejon. Tute kontraŭe: se foje ŝiaj senokupaj rigardoj sin turnis laŭ ties direkto, la virino ilin tuj devojigis, tute movata de longa ektremo.

Kion ŝi faris tie? Atendi Mation. Li estis promesinta al ŝi, ke li suprenvenos kaj ŝi lin atendis. — Tio estos iom malfrue — la viro avertis, kaj nun la virino komprenis, kial tio devis okazi malfrue. Matio monludadis. Estis la malgranda ĉeffesto en Murono, kaj ĉe ĉiuj iel gravaj festoj en tiu vilaĝo oni monludadis, spite ĉion kaj ĉiujn. Matio monludadis kaj ne estis probable, ke li supreniros dum la monludo ne estos ĉesinta, sed poste li efektive supreniros. Ŝi ankaŭ pri tiu detalo estis certa, hodiaŭ. Pro tio ŝi restadis ĉe la sunflanko.

Mila, do, atendis, kaj intertempe la nokto sekvis sian vojon kun ŝajna malrapido de okazaĵo indiferenta, kiu tro prokrastas sin forŝovi; sed, kun malrapido aŭ ne, ĉar ĝi havis la tempon mezurita, la nokto finpasis tute senmanke, do jam estis tagiĝe, kiam resonis tie, rekte al la fundo de la montokolo, la paŝoj de Matio, kaj poste, laŭ maniero de malklara

vizio de miraĝo, elaperis lia figuro, ankoraŭ malpreciza pro la malmulta lumeco de la matenkrepusko.

Li supreniris rapidpaŝe kaj kapklininte, eble, elpensante artifikon por trompi ŝin, la edzinon, maskante al ŝi la veran motivon de tiu longa sendorma nokto.

Ŝi daŭre lin sekvis per la rigardo, estante senmova, kaj kiam ŝi vidis lin deflankiĝi en direkto al la ermitejo, ŝi lin vokis per natura voĉo. Li ekhaltis timskuite, vive rigardante ĉiuflanken. Kiam li ŝin lokalizis, li iom post iom proksimiĝis al ŝi, surprizite kaj malfide. Lia lacigita vizaĝo verdis kiel tiu de la Spektro.

— Sed nu, ĉu vi jam leviĝis? —

— Ankoraŭ mi ne enlitiĝis... —

Kaj tuj, sen krioj, sen gestoj, sen larmoj, kun sobreco tragike nudigita, la virino plendetale rakontis al li ĉion al ŝi okazintan. Ŝia priskribo havis la koncizecon kaj neton de lapidara surskribaĵo, kaj en ŝiaj supermezuraj verdaj okuloj kuŝis la mistera trankvilo de la profundaj gurgoj.

Kiam ŝi estis fininta, sur la vizaĝo de Matio riveliĝis la plej granda konsterno, kiun li iam suferis en sia vivo: konsterno kruela, terura, muta.

Vidinte, ke li ne malfermas la buŝon, ŝi signis al li la ermitejon.

— Nun, vi devas jam tion supozi... En tiun dominternon mi ne plu enpaŝos!... Tamen mi ne volis foriri, tion ne dirinte al vi... —

Lia kadavra vizaĝo, tute elartikiĝis sub la influo de tiuj novaj vortoj.

— Kio! — li murmuris per terurita voĉo. — Ĉu vi volas foriri? Kien?... —

Ŝi pene respondis:

— Mi ne scias... Kien Dio disponos... Tiel malproksimen de ĉi-tie kiel mi povos! —

Tiam li, kiel la Spektro antaŭ kelkaj horoj, kape-pieden ŝanceliĝis, tute kiel surprizita de la impeto de neatendita tempesto. Por momento li ŝajnis heziti, kvazaŭ li volus ribeli aŭ petegi, sed subite mankis al li la kuraĝo kaj sen protesto li submetis sin, mallevante la kapon kaj surde esprimante:

— Ni iru, do... —

Sed en tiu momento la trankvilo de gurgo profunda malaperis kiel pafo, kaj io furioza, demoneca, fulmis en la verdaj okuloj de la virino.

Ŝi denove etendis la brakon per malbonaŭgura gesto.

— Ankaŭ ne, kun vi! Neniam plu!... Ja ne provu min sekvi... Mi... vin mortigus! —

Kaj decideme, ŝi vid-al-vide lin rigardis, kvazaŭ ŝi volus penetrigi en lian animon la teruran minacon.

Poste ŝi malrapide desaltis de super la akvofluejo kaj, ne aldoninte alian vorton, ne turninte la vizaĝon, sen io alia kun si krom la surmetita vestaro, la virino, rigida kaj gravmiena, kun la kapo rekta kaj la okuloj ombraj, entreprenis sola la malsupreniron.

La enfiltraĵoj de la soleco estis amare kristaliĝintaj en ŝia destino.

Februaro, 1905.



ENHAVO

Paĝoj

Portreto 5
Klarigoj 7
Antaŭparolo 9

Ĉapitroj

I. — La Supreniro 13
II. — Mallumo 29
III. — Heleco 43
IV. — Purigo 61
V. — Sumigante tagojn 83
VI. — Fabeloj 99
VII. — Printempo 115
VIII. — La Festo de la Rozoj 123
IX. — Ĉojtumulto 135
X. — Relikvoj 149
XI. — Surmonta malsano 163
XII. — Vivo retrospektiva 177
XIII. — La Supra-Altaĵo 193
XIV. — Sur la Kruco 217
XV. — La Glitfalo 239
XVI. — Suspektoj 257
XVII. — En tiu nokto 271
XVIII. — La Malsupreniro 285